

Tri prilingvaj artikoloj:

<i>Ambau / ambau, ambi, amboy, ambaj(n)</i>	p. 1 ^a
Kronologie pri la alfabetoj de Esperanto.....	p. 22 ^a
Pri la artikolo de Neves pri <i>ambau</i>	p. 170 ^a

Antonio Alonso Núñez.- Hispanio.

=====
=====

Ambau / ambau, ambi, amboy, ambaj(n)

ENHAVO:

- Ghenerala rimarko.- p. 1^a
- Enkonduko.- p. 2^a
- (A) Pri *ambau* lau niaj bazaj libroj.- p. 3^a
- (B) Z alternativoj al *au*-finajho.- p. 7^a
- (C) Gradigho en la semantiko de *ambau*.- p. 7^a
- (D) Pri la pronomo rolo de adjektivoj.- p. 16^a
- (E) Gheneralajhoj pri gramatikaj nombroj.- p. 18^a
- (F) Klasoj de adjektivoj kaj de pronomoj.- p. 19^a
- (G) Semantiko kaj gramatika priskribo de *ambau*. Formo *ambaj(n)*. FE.A8.- p. 20^a
- (H) Ekzemploj pri uzo de *ambaj(n)*, *amba*.- p. 20^a

=====

Ghenerala rimarko.- Mi uzas *h*-alfabeton. Nur en eventuala okazo de strikta bezono mi uzas la principan E alfabeton, kaj tiukaze mi bezonas komplikajn rimedojn por provi sukcesi (!?), ke chapelitoj kaj arkito ne malaperu au transformighu al aliu simboloj tra diversaj laborfazoj.

Tamen, l'o plej bona kiun mi atingis pri tio montrighas chi-apude:

c	g	h	j	s	u	ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ
ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ	ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ

Mia komputilo ne sukcesas cherpi la chapelon nek la arketon el interretaj paghoj; nu, mi tion ne korektas (ech ne per *h*-alfabeto), char pri tia fushado mi certe ne kulpas.

Che citado inter citiloj " ... " mi ja fidele respektas la tutan originalan tekston, do kun nura aliigo al *h*-alfabeto.

Tekstoj inter ortaj krampoj " [...] " estas almetajhoj miaj.

La steleto " * " havas sian gheneralan signifon en lingviko, nome, montrado al formo/ vorto/ sintagmo/ propozicio neekzistanta, kaj pri kiu kunteksto indikas 'chu temas pri lingvero hipoteza, neregula, nove proponita, ks.

Estas uzataj du literasajzoj, tiel ke la malgranda sajzo indikas ke temas pri aferoj principe malpli gravaj ol la ceteraj.

La bibliografio konsultita ja estas tiu ordinara, konata de chiu E-uzanto; tial, mi ghin ne listigas tie chi. La sigloj uzataj ja estas tiuj komunaj en E-logio. •

=====

Enkonduko.-

(a) La *au*-finajhaj vortoj estas la jenaj (20 entute):

Adverboj: *adiau, almenau, ankau, ancorau, apenau, baldau, hierau, hodiau, kvazau, morgau, preskau.*
 Prepozicioj: *anstatau, antau, chirkau, kontrau, lau, malgrau.*
 Konjunkcio: *au.*
 Numeralo: *nau.*
 Adjektivo: *ambau.* (Tamen, shajne, Z ial ghin konsideris pronomo; vidu (b)).

(b) Jena tabelo resumas pri la diversaj formoj kiujn Z elpensis por la koncepto *ambau*, kaj aldonas kelkajn ghegeneralajn informojn:

baj	En la Praesperanto de j. 1882 ^a .- Memstara, senfinajha vorto.- [Forme, en tiu lingvo povus temi pri <i>b'a'j</i> , adjektivo plurala, sed tio estus ekscesa interpreto].
---	En UL, j. 1887 ^a , ne ekzistis vorto por tiu koncepto [oni uzus "la du", "chiuj du", "unu kaj alia"]. Alfabeto kun diakritoj.
---	En j. 1888 ^a , en "La Esperantisto", Z enkondukas la surogatan <i>h</i> -alfabeton; tamen nur por presejoj ne disponantaj la diakritoportajn literojn.
ambau ambau	Unafoja apero de tiu vorto, en Z vortaro, j. 1889 ^a .- Kun neutra finajho <i>-au</i> . (Do, alternativo por <i>ambau</i> , nur por presejoj ktp, lau la permeso de j. 1888 ^a).
---	Z, en j. 1892 ^a , en "La Esperantisto": "... mi proponas: 2) Anstatau la finig-ho "au" en diversaj vortoj oni povas uzi apostrofon. Ekzemple: " adi " (legu " adĭ ") anstatau "adiau"; "adi'a" anstatau "adiaua"... ". (Tio estas lia sola ekzemplo). (Tia eblo estis apene praktikata).
ambi	En la flanka Z reform-projekto, j. 1894 ^a .- Unbloka finajho substantiva plurala <i>-i</i> [do, pronomo].- (Analoge al tio, anstat "unu, unuj" Z metis "un, uni").
ambau ambau	Z, en FE, j. 1905 ^a .- (En UV kaj EKZ, kadre de tiu oficialigita FE). (Do, alternativo por <i>ambau</i> lau FG kadre de FE, tamen nur por presejoj ktp).
amboj	Z, en j. 1906 ^a ; finajho substantiva plurala <i>-o'y</i> [do, pronomo]. (Kadre de planita propono al LK pri paralelaj plibonigoj). (Tra la jaroj 1905 ^a -1908 ^a (do, post la apero de FE, kaj kadre de ties alineo A8), Z planis au efektive proponis al LK kaj al AdE diversajn paralelajn plibonigojn. Inter ili trovighis paralele uzeblaj alternativoj kun semantike pli ghustaj finajhoj por la vortoj kun <i>au</i> -finajho, kiel <i>morg'e</i> apud <i>morg'au</i> , <i>ĉir</i> apud <i>ĉirkau</i> , <i>amboj</i> apud <i>ambau</i> , ktp). (La litero "y" paralelis al la litero "j").- (En j. 1909 ^a la AdE malakceptis chiajn "reformojn / shanghojn" [!], inklude de tiuj proponitaj de Z).

La praformo *baj* ne gravas por chi artikolo.- La tri formoj *ambau/ ambau, ambi, amboy* estas tiuj interesaj por ni char, evidente, ili konsistigas un tuton en la menso de Z; krome, la du lastaj formoj indikas ke, almena lauforme, Z ial konsideris ke tiu vorto estas pronomo (kvankam ial ja povanta funkcii anke en adjektiva rolo, kiel ni abunde vidos en la sekvajho).

Kvankam " ambi " ne apartenas al la historio de E propra, jen tamen helpas nin kompreni, 'kiel Z komprenis tiun koncepton.

(c) Chi artikolo provas analizi pri la semantiko kaj gramatika priskribo de tiu vorto *ambau*, kaj venas al la konkludo ke, tiel koncepte, kiel forme, temas pri la enhavo de la tabelo en parto (G).

De tiu rezulto ja venas la prova, au luda, au definitiva uzado de la formo *amb'(a'j)(n)* kiun iuj (kaj mi inter ili) faras.

Rimarko.- Tiuj, por kiuj la enhavo de tiu tabelo en parto (G) estas afero semantike jam apriorie, triviale kaj mem-evidente klara, nu, tiuj povas eviti al si la penon legi plu. •

=====

Parto (A).- Pri *ambau* lau niaj bazaj libroj:

(1) En FE.UV (el la j. 1905^a):

ambau l'un et l'autre | both | beide | оба | obaj || ambos.

La kvin unaj nacilingvaj tradukoj (sinsekve, F, A, G, R, P) estas oficialaj; la lasta aperas en la neoficiala H versio de FE.

Rimarko.- Tiaj tradukoj ja estas nur *bazaj*, t.e., ke per ili oni akiras nur ghereneralan superrigardon al la baza semantiko de tiu vorto, char ja ne sufichas koni chi alineon por jam scii ekzakte pri la semantiko kaj uzado de *ambau* (kio, cetere, estas konstato tiel triviale kiel, ekzemple, ke helpe de nur tiu alineo jen anglalingvano ne ighus ekzakte scianta pri la semantiko kaj uzado de la G *beide* per nura atento al sia A *both*). •

(2) En FE.EKZ (el la j. 1905^a) tiu vorto **ambau** aperas nur en jena frazo:

(11.1) *Unu vidvino havis du filinojn...* (11.3) *ili **ambau** estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ilĉ.*

Rimarko.- Por simpleco, en la sekvajho mi ne indikos (escepte de ial eventuale pli gravaj kazoj) 'chu la grasigo de iuj literoj aperas jam en la originala teksto, au 'chu ghi estas mia. En la jhusa ekzemplo ghi ja estas mia. •

(3) LR 121 (el la j. 1911^a) diras: " '**Ambau**' signifas: '**chiuj du**', t.e., ghi estas uzata anstataŭ 'chiuj', kiam ni parolas nur pri du personoj au objektoj. Tial, la konjunkcian uzadon de "ambau" ... mi trovas tute ne aprobinda... Kvankam mi ofte uzis la formon 'la ambau', tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton 'ambau' *sen* artikolo".

Rimarko.- Bedaurinde, Z ne informas en sia LR pri la kialoj semantikaj, fonetikaj, ritmaj au aliaj lin portintaj al la konkludo, ke sen-artikola alternativo estas pli logika ol tiu kun-artikola. (Rimarkindas, ke tiu LR 121 estas mem tre malfrua, el la j. 1911^a). (Krome, mi ne sukcesis trovi firman informon pri la epokoj en kiuj li uzis unun au alian formon).

Mi supozas ke por tia shangho decide gravis la fakto, ke tiu almetita *la* simple enkondukas redundon al la nuanco "la" jam entenata en la semantiko propra de *ambau*, tiel ke *ambau* kaj *la ambau* estas strikte sinonimaj (vidu (9.3) kaj (9.9.1)). Krome, alia forsa kauzo estis la deziro eviti la hiaton en *la ambau*, krome ne dezirante anke pri elizio *l' ambau*". (Vidu (9.2.ii)).

Aldonajho: Okaze de la tralaborado de chi artikolo mi sciighis pri jena citajho: "Rim. Uzo de la artikolo apud **ambau** estas senutila k malkonsilinda." (Grosjean-Maupin, j. 1933^a). (Nu, lau mia kompreno, tiu "senutila" ghuste montras al la fakto, ke "la" nenion aldonas al la semantiko de "ambau"; t.e., ke "la", akompane al "ambau", estas redunda).•

(4) El PAG, 4^a eld., j. 1980^a. (1^a eld., en j. 1935^a):

§61: **Ambau = Chiuj du.**- Nevaria pronomo.- En funkcio de kvazaunomo ghi montras nur al personoj.- En funkcio de reprezentanto ghi povas montri homojn, bestojn, ajhojn.

§86 (en la fino): Al la numeraloj iel apartenas ankau la apartaj adjektivoj *ambau*, *lasta kaj fina*, kaj *ech sola*, *unika*.

Ekzemploj:

(4.1) *La tri fratoj promenis kune.*- *La du fratoj promenis kune.*- *Chiuj tri fratoj promenis kune.*- **Chiuj du** fratoj promenis kune = **Ambau** fratoj promenis kune.

Ambau samtempe abdikis.- *Kiun vi prenas el la du chapeloj?* – **Ambau!**

(4.2) *Jordano inundis siajn ambau bordojn*^Z.

PAG diras ke la nevarieco de tiu "ambau" klarighas per tio, ke oni rilatigas ghin al numeraloj [t.e., al la nevaria nombro "du"].

(4.3) *neniam aliaj povas farighi pli felichaj, ol ni ambau*^Z.- *kaj malfermighis la okuloj de ili ambau*^Z. [Tute ne povus esti **ambau ni**].

pli bone estas iri senfila en la chielon, ol se ambau, la patro kaj la filo, iras en la inferon^Z. [Shajnas al mi ke tute bone povus esti, anke, "... ol se **la patro kaj la filo, ambau, iras...**"]

PAG diras ke en la du unaj ekzemploj tiu "ambau" estas uzata apozicie al [persona] pronomo ("ni", "ili"), kaj metenda post chi tiu.- Kaj ke en la lasta ekzemplo, la substantiva sintagmo "la patro kaj la filo" estas uzata apozicie al "ambau", kaj metenda post chi tiu. [Do, ambakaze, la apoziciato iru en la fino].

(4.4) Zamenhof notis en sia Lingva Respondo 121: "Kvankam mi ofte uzis la formon 'la ambau', tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton 'ambau' sen artikolo". (Vidu (3)).

Ekzemploj [ne en PAG]:

Chiuj sidighis chirkau la ambau [fratoj] Pjotroj Ivanovicho^Z. [Lau tiu LR, jen pli logike *chirkau ambau*].

La ambau *trompantoj petis lin alveni*^Z. [Lau tiu LR, jen pli logike: **Ambau** *trompantoj*].

Rimarko.- Shajnas al mi, sed mi ne certas, ke por pronoma rolo Z uzis chiam nur la nudan "ambau", kaj ke la kun-artikolan "la ambau" li uzis nur che adjektiva rolo, kaj nur

en la unaj tempoj (kvankam, kiel jam dirite, mi ne scias pri la epokoj en kiuj li uzis chiun el tiuj du alternativoj).•

(4.5) PAG diras ke Z foje uzis 'ambau' en foresto de la ideo pri 'chiuj', do en la senco de nura 'du', precipe apud personaj pronomoj; do, char pli logike, ke oni uzu "du".

Ekzemploj.- [**Ni ambau** estas hungaroj] / **Ni du** estas hungaroj.- [Kiel senditojn, elektu **ilin ambau**] / Kiel senditojn, elektu **ilin du**.- [Chiu sidighis chirkau (**la ambau** fratoj] / Chiu sidighis chirkau **la du** fratoj.

[Sed "Chiu sidighis chirkau **du** fratoj" estus tute aliu afero].

(4.6) **ambau** kune vivi **ni** ne povas!^Z. [**Ambau** kune vivi ne povas! = **Ambau** kune vivi **ili** ne povas!].

oni devas peni trovi rimedon, ke ili povu ambau paroli inter s^Z.

PAG diras ke **ambau** povas esti metata iom memstare [= aparte de la persona pronomo, "ni" au "ili" en chi ekzemploj], kaj ke en tiu kazo ghi akiras sencon proksiman al **duope**.

(4.7) El §221.I [Iau la supre citita LR 121]: Nekorekte: [**Ambau Petro kaj Paulo** estas miaj amikoj].- Korekte: **Kaj Petro kaj Paulo**...^Z .- **Tiel Petro, kiel Paulo**...- **Kiel Petro, tiel ankau Paulo**... .- **Petro kaj Paulo, ambau**...

(5) El PIV (j. 1970^a, [1^a eld.]):

Ambau = **chiuj du** = **la du kune kiel tutajho**.- Nevaria pronomo kaj adjektivo.

Rimarko.- En PIV, tamen, mankas ekzemplo pri strikte adjektiva rolo de tiu vorto. •

Ekzemploj:

(5.1) *Chu li savighis? Chu Elektro vivas? – Jes, ambau vivas^Z.*

*al vi klopodojn kaj al mi suferon vi kuzas, tamen ambau estas vana^Z.
en unu tago ili ambau mortos^X.*

(5.2) Nekonsilinda la germanismo uzi "ambau" kun la senco de simpla "du".

Ekzemplo: Eksonoros **ambau liaj** oreloj.- [Mi opinias ke chikaze, tamen, ghi estas tute bone uzebla: **ambau** oreloj, **ambau** manoj, ktp]. [Eksonoros **liaj du** oreloj].

Rimarko.- Ni havas, do, jenajn sintaksajn ordojn: *Ni ambau venis, Ambau niaj amikoj venis, Niaj du amikoj venis*. [Sed *Du amikoj niaj venis* estas alia afero. Vidu (9.2 Rim)]. •

(5.3) **ambau**flanke de sh^Z.- kolekti fruktojn **ambaumane**.- **ambau**trancha glavo^X.- **ambau**dekstra viro.

(5.4) Z iafoje uzis **la ambau** ...konfesis... pli logike **ambau**, sen artikolo.

(5.5) Tute ne aprobinda [el la supre citita LR 121]: *ni loghas en Londono ambau en somero kaj en vintro*. Oni diru: **kiel** en somero, **tiel** [ankau] en vintro; **ne nur** en somero, **sed ankau** en vintro.

(5.6) [**Ambau** ploris].- **Ne ambau** ploris.- **Neniu el la du** ploris / **Nek... nek... ploris**.

(6) Estus interese scii pri la klasado kaj ekspliko pri la signifo de la vorto **ambau** en la kvin naciaj lingvoj rolantaj en FE. (Pri chi lingvoj mi ja ne kompetentas; nur pri la tri unaj el ili mi havas suprajhajn gheneralkulturajn scierojn).

En la H ni havas, lau la vortaro de la Hispana Akademio: "**Ambos / ambas** [temas pri formoj icha kaj ina]: (El latino **ambo**).- Adjektivo plurala.- *La unu kaj la aliu; la du*.- Estas uzata anke estiel personpronomo plurala".

Rimarkoj.- [i] El latina-hispana vortaro: "ambō -æ -ō: *La du kune, la du samtempe*.- Ghi diferencas de *uterque*, kiu signifas *un kaj aliu* ech se ne kune au samtempe".

Tiu latina "ambo" estas la etimo forma kaj semantika de E "ambau" (vidu (9.3)). Ghi, krome, etime rolas en la E vortoj *ambigua* kaj *ambivalenco* (PIV).

Al tiu vorto latina respondas lau origino kaj signifo la helena -μφω, kaj mem rolanta, ekzemple, en *amfibio*, *amfibrako*, *amfiteatro* (PIV).•

[ii] La Hispana Akademia Vortaro supre citita prezentas nur tiujn suprajhajn priskribojn "adjektivo plurala" kaj "personpronomo plurala". Pli precize pri tio vidu en (13).•

[iii] Lau la H tradicia terminologio (kiel en la supra cherpajho el la vortaro de la Hispana Akademio), jen, ekzemple, en "ambau gefratoj" tiu "ambau" estas adjektivo plurala en rolo adjektiva, kaj en "Jes, ambau vivas!" tiu adjektivo ludas rolon pronoman. (Vidu (10)).

Nu, tiuj tradiciaj terminoj estas por mi semantike perfekte klaraj kaj lauaj al siaj roloj en la parolo, cetere jam ellernitaj en la elementa lernejo.- Tute diference, mi ne sukcesas koncepte kompreni ke en la sintagmo "ambau fratoj" (kiel anke en "la du fratoj", "chiuj du fratoj", "chiuj tri fratoj", "neniu frato", ks) povus ech minimume enesti pronoma nuanco, sed ja tute bone komprenas ke, lau la dirita element-lerneja instruo, jen en "ambau venis", "chiuj du venis", "la du venis", "chiuj tri venis", "la tri venis", "neniu venis", temas pri adjektivoj pronome rolantaj.

Kaj, analoge, mi ne sukcesas koncepte kompreni ke pronomoj povus esti lingvajho pli baza kaj elementa ol adjektivo, char ja la realo estas ghuste inversa, nome, ke pronomo estas tre pli abstrakta koncepto ol adjektivo.

Por kontrasto: Se ni allasas, ekzemple, ke lau sia baza semantiko jen "ambau" estas pronoma (kiel en "Ambau vivas"), jen do en "Ambau gefratoj vivas" ni havas pronomon en funkcio de adjektivo. Sed en tio la bedaurinda afero estas, almene por mi, ke, tamen, mi ne sukcesas konstrui al mi semantikan komprenon pri chi inversa arangho.

[iii] Mi ja tamen bone scias ke tia [ekscesa kaj inversa] uzo de la terminoj "pronomo" kaj "adjektivo" estas ech principa kaj sistema en la diversaj koncernaj partoj de PAG, kiel anke en multaj modernaj libroj hispanaj kaj alilingvaj.

Nu, mi taksas perfekte nenidiraj kaj tial seninteresaj chiaj provoj pravigi tian uzadon pere de nur-formalaj argumentoj, char por chiuj nuraj ordinaraj parolantoj (kiel mi mem estas), nur semantiko gravas.•

[iv] Miaj du denaskaj lingvoj (nome, la galega kaj la kastilia (= la antonomazie hispana)) heredis el latino du adjektivojn nur plurale uzatajn, nome, tiun jam diritan **ambos** (el 'ambo', koincide ambalingve) kaj **senllos** (galege) / **sendos** (hispane) (el 'singulos', ja samfamilia al 'singulara'). La una havas la jam diritan kolektivigan signifon, kaj la dua havas distribuan signifon "po un kozo por chiu el du au pli da kozoj".

Ekzemplo: *Los niños recibieron sendos juguetes* = *La infanoj ricevis po un ludilo* (kion mi preske kuraghus imiti per preska lauvorta traduko la *infanoj ricevis *poajn ludilojn*).

La galega, krome, kreis al si kunmetajhojn *cadanseu* = *cada+un+seu* = *chiu+un+sia*, kaj *cadanseus* = *cada+un+seus* = *chiu+un+siaj*.

Ekzemplo: *Os nenos recibiron cadanseu xoguete = La infanoj ricevis chiu-sian ludilon.*- *Os nenos recibiron cadanseus xoguetes = La infanoj ricevis chiu-siajn ludilojn* (lau egala, au pli-malpli egala nombro).

=====

Parto (B).- Z alternativoj al *au*-finajhoj kadre de E propra (do ne konsiderante nun tiujn *bai* kaj *ambi* cititajn en la *Enkonduko*).

(7) Kvankam propre fremda al nia nuna temo, mi opinias interesa jenan tabelon, en kiu montrighas la ekzemploj kiujn Zamenhof metis en siaj proponoj (jen nur-planitaj, jen efektive faritaj) pri la *au*-finajho. (Pluraj el ili suferis sinsekvajn shanghojn, kaj tial jen en pluraj kazoj aperas pluraj alternativoj):

Paralele al la formo...	... oni povus uzadi ankau la formon:
Morgau, morgaua	Morge, morga
Hodiau, hodiaua	Hodie, hodia
Almenau	Almen'e
Adiau, adiaua	Adi (legu " adi "), adi'a / adie, adia
Anstatau	Lo [tiele!] / stete [tiele, kun adverba finajho]
Antau	Pri loko: Pre / davan / anter.- Pri tempo: Vor / antau
(Post)	(Pri loko: Hint.- Pri tempo: Post)
Chirkau	Chir
Ambau	Amboy ("y" anstatus "j") (tiele, kun plurala substantiva finajho) [do, pronomo]

.....

(8) Egalkauze kiel en (7), chi-apuda tableto prezentas ekzemplon pri kombinado de ambaj alternativoj por alfabeto (diakrita au *h*-surogata), kun ambaj alternativoj por finajho (jen *-au* au semantike ghusta finajho (chi-kaze, *-e*)).

⊗ar au hierau	⊗ar au hierē
Char au hierau	Char au hierē

=====

Parto (C).- Gradigo en la semantiko de la [adjektivo] **ambau**.

(9) Ni konsideru jenajn ekzemplojn:

(9.1) *Un mano, du manoj, tri manoj, kvar manoj, ...* .- *Un riverbordo, du riverbordoj, tri riverbordoj, kvar riverbordoj, ...* .- *Un ganto, du gantoj, tri gantoj, kvar gantoj, ...* .- *Un filino, du filinoj, tri filinoj, kvar filinoj, ...* .- *Un amiko, du amikoj, tri amikoj, kvar amikoj, ...* .- *Un kuko, du kukoj, tri kukoj, kvar kukoj,*- *Un alfabeto, du alfabetoj, tri alfabetoj, kvar alfabetoj, ...*

Unopo, duopo, triopo, kvaropo da manoj / da riverbordoj / da gantoj / da filinoj / da amikoj / da kukoj / da alfabetoj ...

Nedubeble, ke en chi ekzemploj temas pri nuraj nudaj numeralaj esprimoj.

Lau PAG §86, la vortoj *unu, du, tri, ...* estas nevariaj adjektivoj determinaj, difinaj pri la preciza nombro.- Lau PAG §87.E, la vortoj *unuopo, duopo, ...* estas kolektivigaj numeraloj.

Rimarko.- PAG fakte diras ke *unu, du, ...* konsistigas manieron de difinado per determinado de la preciza nombro. •

(9.2) *Ambau manoj necesas por bone knedi la paston.*

Shi knedas la paston per ambau manoj.

¿'Kiu(j) mano(j) necesas por bone knedi la paston? — ¡Ambau manoj! — ¡Ambau! — ¡Iu ajn el ambau manoj!.

¿Per 'kiu(j) mano(j) shi knedas la paston? — ¡Per ambau manoj! — ¡Per ambau! — ¡Per iu ajn el ambau manoj!.

Sur ambau bordoj del river' olea^{Auld}.

Ghiaj ambau bordoj plenighis de printempaj floroj.

Jordano inundis siajn ambau bordojn^Z.

-- Anke, kun redundo au alternative (lau diverslingvaj kutimoj au ech per libera konstruo, kvankam ne chiuj estas akcepteblaj en E, tamen nur pro stilaj kausoj, char ili chiuj estas semantike ghustaj kaj egale klaraj): *Per la ambau manoj, per ambau la manoj, per ambau la du manoj, per ambau siaj manoj, per ambau manoj siaj, ...* .- *Per chiuj du manoj, per chiuj la du manoj, per chiuj du manoj siaj, per chiuj la du manoj siaj, ...* .- *Per siaj du manoj, per la du manoj siaj,*- *Per sia paro da manoj.*

-- Sed ne: *Per du manoj, per du manoj siaj = per du el siaj manoj.*

-- Krome: Kadre de adekvata kunteksto, ech la nura *la du manoj* povas sufiĉi por la senco *ambau manoj*.

Ekzemplo.- Se tiun version de Auld ni aliigus al *Sur la du bordoj de l' river' olea*, ja temus pri la sama objektiva informo pri duopeco de la bordoj, ja la leganto antauscius ke tiu "la du" estas fakte "ambau", sed perdighus la estetika kaj subjektiva, eksplicita informo pri la sam-pareco de la du bordoj. •

Rimarkoj.- [i] La kontrasto inter la difinita *per siaj du manoj* kaj la nedifinita *per du manoj siaj* (kiel anke inter *Niaj du amikoj* kaj *Du amikoj niaj* en (5.2 Rim)) estas traktita de Wells en sia "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" (j. 1978^a), piednoto de p. 48^a:

... (la difinita amiko, (kiam tia propono necesas) ktp.

Foje oni trovas la konstruon *amiko mia* en la senco 'iu nedifinita amiko de mi', 'unu el miaj amikoj', distinge de *mia amiko* 'tiu difinita amiko de mi' – en angla traduko, respektive 'a friend of mine' kaj 'my friend'. Tiu uzo supozigas, ke antaŭmetita poseda adjektivo enhavas la semantikan valoron de *la*, sed postmetita ne. Ĉu tia distingo estas akceptebla en Esperanto?

Shajnas al mi, ke tiu jam de longe bonvena fakto povas, tamen, tute bone kunvivi por la difinita nuanco kun *tiu amiko mia*, ech kun *la amiko mia*. Cetere, la fenomeno estas pli ampleksa char, ekzemple, tute bone kunvivas, por la difinita senco, *Lau la ekzemploj chi-supraj = Lau chi-supraj ekzemploj.* (kaj, malpli ofte, *Lau la chi-supraj ekzemploj*).

En la galega ambakaze uzendas artikolo, difinita au nedifinita, tiel ke eblas sintaksa libero, respektive: *O meu amigo = La mia amiko* (prefere al *O amigo meu*), kaj, kun inversa sintaksa arango, *Un amigo meu = Un amiko mia* (prefere al *Un meu amigo*).

Tia sama arango ekzistis en la hispana, sed jam de tre longe la afero reduktighis, respektive, al *Mi amigo = Mia amiko* kaj *Un amigo mío = Un amiko mia*. Nur en malgrandaj zonoj au sociaj tavoloj foje estas uzata *El mi amigo = La mia amiko* por la difinita signifo. Krome, ja daure ekzistas, por la difinita senco, *Ese amigo mío = Tiu amiko mia*, kaj *El amigo mío = La amiko mia*.

En la itala oni uzas *il mio amiko = la mia amiko = mia amiko*, kaj *un mio amico = unu mia amiko = amiko mia*.

[ii] Rimarkindas la iela paraleleco inter la Z simpligo de *la ambau amikoj* al *ambau amikoj*, kaj la simpligo de la H *el mi amigo = la mia amiko* al *mi amigo = mia amiko*. (Vidu (3.Rim)).•

K (9.3) Surbaze de tio semantike analizita en (9.2), jen en chi-sekva tabelo temas pri la signifo kiun, lau mia kompreno, nedubeble havas la sintagmo **ambau manoj** en la ekzemploj chi supraj:

Sinonimaj esprimoj	Sed ne, au ne tute klare
ambau manoj	chiuj du manoj
la ambau manoj	la sam-paraj manoj
la du sam-paraj manoj	du sam-paraj manoj
chiuj du sam-paraj manoj	du manoj
chiuj la du sam-paraj manoj	la manoj
	(Helpe de kunteksto ili eventuale ekvivalentas al <i>ambau manoj</i>)

Do, ni havas jenon:

(a) Kerne: *ambau* estas vorto kun komplekse miksa semantiko, lau chi-apuda ekvivalento.

ambau = la+du+(samparaj)
(*sam-paraj* = apartenantaj al un sama paro da entoj)

(b) Akcesore: La eventuala almeto de "la" simple enkondukas redundon, char "ambau" enfermas mem tiun nuancon.

Redunde: **la ambau.**

(c) Lau gramatike faka vidpunkto, la vorto **ambau** montras al la nuanco de la t.n. gramatika nombro **dualo** (= la gramatika nombro temanta pri **paroj**, vidu (11)).

(d) Krome, en la ekzemplo **ambau manoj** temas pri tiu klaso de dualo kiun ni povus nomi **natura dualo**, t.e., la dualo preparolanta duopojn da entoj pli-malpli egalaj kaj kiuj aperas lau **naturaj paroj** (kaj inter kiuj elstaras tiuj simetriaĵoj en la homa korpo, kiel *ambau oreloj/ okuloj/ lipoj/ brakoj/ manoj/ pugnoj/ poleksoj/ mamoj/ pulmoj/ flankoj/ testikoj/ genuoj/ kruroj/ piedoj/ makzeloj*, ktp.- Anke: *ambau bordoj de (la) rivero, ambau Ter-hemisferoj*, ktp.- Anke, tamen jam lau pli kompleksa semantika rilato, kaj ekster nia nuna temo: *Belo/ malbelo/ ambau ecoj, varma/ malvarma/ ambau ecoj, riska/ senriskaj/ ambau situacioj*, ech la kontrasto *jes/ ne*, ktp.

Rimarkoj.- [i] Ja veras, ke laŭ vidpunkto de la E gramatiko, en ĉi lingvo rolas nur du gramatikaj nombroj, nome, *singularo* (kiel en *mano, un mano*) kaj *pluralo* (*manoj, du manoj, tri manoj, multaj manoj*). Sed, aldone al tio, se anstataŭ *du manoj* ni diras *ambau manoj*, jen ja plu temas pri la plurala *du manoj*, tamen kun la aldona duala semantika nuanco, ke ne temas nur pri la nur-nombra-kolektiviga *man-duopo*, sed anke pri la nombra-kolektiviga-plus-kvalifika *man-paro*.

Tian semantikan diferencon ni povas montri dirante ke jen unuflanke ni havas aferon al senfina nombra serio *un mano, du manoj, tri manoj, kvar manoj,...*, kaj aliflanke al nur du-membra serio *un mano, ambau manoj*.

Kaj eĉ pli klare, ni povas diri ke jen unuflanke ni havas la rilatajn vortojn *du/ duopo*, kaj aliflanke la rilatajn vortojn *ambau/ paro*.•

[ii] Ĉe tio ĉi lasta, jen necesas, ke ni bone distingu inter *duopo* kaj *paro* (al kio ni alproksimighas per la konstato, ke ĉiu *paro* ja estas ia *duopo*, sed certe ne ĉiu *duopo* estas ia *paro*).

-- Laŭ PAG §87.E: La sufikso *-op-* signas, el 'kiom da elementoj konsistas certa grupo.- Kaj laŭ PIV: *-op-* Sufikso montranta kolektivecon... "ĉiuj kune", "en grupoj de".

[Tial, *duopo* = grupo konsistanta el du membroj = aro konsistanta el du anoj].

-- Laŭ PIV: **paro** Kunajho el du objektoj aŭ estuloj [= **duopo**], prezentantaj similecon aŭ rilatecon kaj rigardataj kiel unu tuto, kaj pli precize: **1** Kunajho el du samspecaj objektoj, destinitaj por duopeco: *paro da gantoj; paro da ŝuoj; jen kushas paro da galoshoj; du botoj faras paron* (propre kaj figurasence); *veturi sur sia paro da kruroj*^Z. **2** Kunajho el du samspecaj estuloj: *paro da bovoj; paro da amikoj; pli tiras virina haro, ol ĉevala paro*^Z. **3** Kunajho el samspecaj sed malsamseksaj uloj: *la cikonia paro*^Z; *tie loghis paro da maljunaj homoj, vilaghano kaj vilaghanino*^Z; *amantaj paroj renkontighas*^Z; *bela paro por altaro*^Z. **4** □ Sistemo de du fortoj egalaj, paralelaj kaj kontraŭaj, kies kuna ago kaŭzas turnon.

El la ĵusaj PIV-ekzemploj nur la duala nuanco ĉe *paro da kruroj* (kaj el tio, *ambau kruroj*) apartenas al tio kiun ni nomis la *natura dualo*. Pri la ceteraj dualaj nuancoj temas en la sekvajho (kies interlimoj, cetere, ja ne estas akre difinitaj).•

(9.4) Ni venas nun al ekzemploj en kiuj la vorto *ambau* montras al tio kiun ni povus nomi **funkcia** aŭ **laucela dualo** (t.e., duopo da aĵoj pli-malpli egalaj kaj formantaj paron, ne ĉar ili nature ekzistus, sed ĉar la homo ilin konstruas aŭ almenaŭ ilin destinas al **komuna funkcio**).

Inter tiaj paroj elstaras tiuj destinitaj al homa surkorpa uzado, do kiel *paro da gantoj/ ambau gantoj, paro da ŝuoj/ ambau ŝuoj, paro da okulvitroj/ ambau okulvitroj*, ktp.

Parence al tio ĉi ni havas, ekzemple, *paro da cirkel-branchoj / ambau cirkel-branchoj, paro da tenajl-makzeloj / ambau tenajl-makzeloj, paro da strat-trotuaroj / ambau strat-trotuaroj, paro da civil-gvardianoj / ambau civil-gvardianoj* (H "pareja de la guardia civil", iaj hispanaj ghendarmoj, origine zorgantaj pri kamparo, kaj ĉiam deĵorantaj ~~duope~~ pare), *paro da plug-bovoj / ambau plug-bovoj*. (En la H ekzistas *pareja de bueyes* = *paro da (plug)bovoj*, kaj anke, sinonime, *yunta de bueyes*, kvankam tio ĉi lasta etimologie respondus al *kunajho da bovoj*). (Tio ĉi lasta, siavice, iel parence al E *jugajho*).

(9.5) Ni venas nun al *ambau* ĉe **gea dualo**, ja rilata al **geaj paroj**:

Distingante la vortojn *edzo*, *edzicho*, *edzino*, *geedzoj*, jen ni havas *ambau geedzoj* = *ambau membroj de geedza paro*. (Che neuzado de sufikso por la maskla sekso (kiel *-ich-*) oni principe diras nur *la geedza paro*, char tiel *ambau edzoj* kiel *ambau geedzoj* estas neghustaj).

Analoge che *la paro da maljunaj homoj / ambau gehomoj*, *la cikonia paro / ambau gecikonioj*, ktp.

(9.6) Kaj ni fine venas al *ambau* che tio kiun ni povus nomi *por-okaza dualo*, au *stil-efekta dualo*, au io tia, lau jena ekzemplo:

El EKZ.: (11.1) *Unu vidvino havis du filinojn...* (11.3) *ili ambau estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun il^z*. (Alternative, sen "ili": *ambau estis tiel fieraj...*). (Kaj, ja tamen kun perdo de la nuanco "paro, dualo": *Ili du estis...*, *Ili estis...*)

(9.7) La fakta signifo en la parolo de chia lingva esprimo (kaj ne nur de dua-laj esprimoj) ja dependas ne nur de la koncerna teksto en kiu ghi aperas, sed anke de kunteksto, situacio, cirkonstancoj, sciaro-pri-la-mondo de la kunparolantoj, kaj eventuale ech de pliaj aferoj. (Vidu **(10.1)**).

Nu, en rilato al tio chi estas interesa kaj decide grava jena semantika diferenco inter la tri unaj dualeco-tipoj kaj la kvara el ili:

(a) En la dualoj natura, laucela/ funkcia kaj gea donighas la komuna trajto, ke chiu kunparolantoj antauscias, el sia komuna **sciaro-pri-la-mondo**, ke temas pri homoj, ajhoj, aferoj, konceptoj ktp, mem spontane aperantaj lau paroj kaj ke, tial, en iliaj mensoj tuj shprucas la bildo kaj koncepto pri *pareco* (kaj ne nur pri la pli simpla *duopeco*) sendepende de tio, 'chu en kunteksto, situacio, ktp eksplicite aperas informo pri tia eco.

(b) Diference, en la *por-okaza* au *stil-efekta* dualo nenia pria antauscio ekzistas en la komuna **sciaro-pri-la-mondo** de la kunparolantoj, tiel ke nur per eksplicita iela indiko pri ghi povas la informato sciighi ke en la informo rolas nuanco duala.

Ekzemploj.- [i] La propozicio *Miaj okuloj malsanighis* estas nepre komprenata ne nur *Miaj du okuloj malsanighis*, sed ech *Miaj ambau okuloj malsanighis*, char tiun informon pri dualeco ni spontane, ech kvaze senpense, tiras el nia jama scio-pri-la-mondo. (Pri tio, 'chu oni nepre diru *Miaj du okuloj* au *Miaj ambau okuloj*, ja nenia logika legho povus trudi ion ajn, char pri tio decidus nur la suverena rajto de la diversaj lingvoj, autoroj, de la nuanco kiun oni volas substreki, ktp).

[ii] *Kaj, subite, jen la dekstra antaŭa pneuo kaj tiu liva krevis.- ... la du antaŭaj pneuoj krevis.- ... ambau antaŭaj pneuoj krevis.*

En la lasta esprimo, jen la enteksta vorto *ambau* rekte informas ke la parolanto ial konsideras la du antaŭajn pneuojn ia paro, do ne nur ia duopo. •

[iii] En la ekzercara ekzemplo pri la vidvino kaj la filinoj, une aperas kunteksta informo pri duopo (*Unu vidvino havis du filinojn*), kaj poste, per almeto de tiu *ambau*, la informanto informas ke tiu duopo ighas ia paro kadre de lia rakonto.

Kaj se anstat "Ili ambau estis..." temus nur pri "Ili estis... / ili du estis ... / la du estis... / chiu du estis...", ja simple daurus la komenca informo pri filinoj-duopo, sed ne rolus la intence aldonita nuanco "filinoj-paro". •

[iv] *Chiuĵ sidighis chirkau la ambau [fratoj] Pjotroj Ivanovichoĵ*. - Nu, ĉar mi ne konas la tutan kuntekston en kiu tiu propozicio aperas, jen mi ne povas juĝi mem 'ĉu en tio Z enkondukis nuancon pri por-okaza aŭ stila dualo per tiu "ambau" (analoge al "ili ambau" ĉe parolo pri la fieraj knabinoj), aŭ 'ĉu preferindus la nuda "la du Pjotroj Ivanovichoĵ".•

Rimarkoj.- [i] Lau mia kompreno, en la nuda "la du Pjotroj Ivanovichoĵ" enestas aŭ povas enesti ia nuanco pri malŝato. En "chiuĵ du Pjotroj Ivanovichoĵ" jen tiu "chiuĵ" estas iom ŝvela (almenaŭ, en E). Tial, finfine, eĉ se temu nur pri eleganto de la esprimo, jen prefere "la ambau Pjotroj Ivanovichoĵ" aŭ, ja, simple, "ambau Pjotroj Ivanovichoĵ".

Cetere, en ordinara parolo, speciale en popola lingvajho (almenaŭ, en la H kaj en la galega), ja povus tute bone ŝufiĉi *chiuĵ sidighis chirkau la Pjotroj Ivanovichoĵ*, se la kunparolantoj jam scias ke temas pri du, aŭ tri aŭ kiu ajn nombro de Pjotroj. (Se temas pri unu sola Pjotro, en tiuj lingvoj oni principe ne metus artikolon, kvankam en popola lingvajho tio ja eĉ oftas (ofte kun nuanco pri malŝato), kaj iam oftis anke ĉe parolo pri aktoroj ks). (Pri sama aŭ simila nuanco pri malŝato en la germana informas R. Shulco en sia traduko *La perdita honoro de iu Katharina Blum*, responde al la germana ... *der Katharina...* = ... *de la Katharina...*).•

[ii] Ni konsideru jenajn alternativajn dialogetojn:

-- *Ĉu li savighis? Ĉu Elektro vivas?*

-- *Jes, la du gefratoj vivas.*- *Jes, la du vivas.*- *Jes, ili du vivas.*- *Jes, ili vivas.*

-- *Jes, ambau gefratoj vivas* (adjektivo).- *Jes, ili ambau vivas* (*ambau* apozicias al *ili*).- *Jes, ambau vivas*^Z (pronomo kvazaŭnomo).

La ĵhusaj alternativoj klare montras, ke uzado aŭ ne-uzado de dualo (speciale, de por-okaza aŭ bel-stila dualo) neniel dependas de rigidaj, automataj, nur-formalaj reguloj, sed nur de semantiko, de stil-efektoj dezirataj de la parolantoj, anke de kutimoj personaj aŭ eĉ lingvaj.

Por ekzemplo, en la H kaj en la galega:

-- La rekta apozicio *ili ambau* propre ne eblas en tiuj lingvoj, ĉar en H oni principe simple dirus *la du estis...* aŭ (malofte) *ili du estis...*, kaj en la galega oni principe simple dirus *la du estis...* aŭ (malofte) *ili la du estis...* (kaj, analoge, *la tri estis...*, ktp). (T.e., la pronomon *ili* akompanas nombra adjunkto *du*, *tri*, ... por precizigo aŭ pliintensigo de la signifo).

Kaj se oni entute volus pri uzado de la duala vorto *ambau* en tiuj lingvoj, jen oni devus ĝhin apartigi per komoj, aŭ prefere eĉ meti ĝhin aparta de la pronomo.- Ekzemplo: En H, *Ili, ambau, estis...* aŭ *Ili estis ambau...* . En la galega *Ili, ambau la du, estis...* aŭ *Ili estis ambau la du....*•

(9.8) ¿Stranga? ekzemplo.- Ĉi-apu-
de vidighas la titolo de triptiko temanta

<p><i>Ambau mamoj de l' monto Porushir'</i> (la monto-nomon mi ne memoras precize)</p>
--

pri la ajnuoj (tiu triptiko jam antaŭ longe perdighis al mi; ghi estis grand-formata, el papero tre bonkvalita, preske minca kartono).

Tiu uzo de la duala "ambau" en la triptiko-titolo estis tre surpriza por mi,

ĉar mi ja nepre dirus "La du mamoj de l' monto Porushir' ", tute analoge al "La du pintoj de l' monto Porushir' ", kaj tute analoge al tio, ke ĉapitro de anatomi-libro havus titolon "La du manoj de la homa korpo", kaj ne, au apene, iu ajn el la tri ceteraj alternativoj lau la dua jhusa chelo.

Nu, mi ne scias 'chu tia enteksta uzo de la vorto "ambau" en nudaj titoloj estas ghusta idiomajho en la originala lingvo de la triptiko au en iu ajn lingvo, sed nur opinias, ke ghi estas neghusta au almenaŭ ekscesa en E por ĉiuj dualeco-tipoj (kiel anke en H kaj en la galega).

(9.9) En ĉi-sekva tabeleto ni provas distingi plurajn aferojn en rilato al la sintagmo "ambau ...oj":

ambau bordoj -----	(la) ambau bordoj both (the) banks	L'une et l'autre rive. [Tio ĉi estas la F traduko kiun UV donas por "ambau"].
la ambau bordoj	(die) beide Ufer	*(la unu kaj la alia bordo)
ambau la bordoj	оба ???	unu kaj alia bordo
ambau du bordoj	obaj ???	*(la una y la otra orilla)
ambau la du bordoj -----	ambas orillas ámba(la)s (dúas) beiras	una y otra orilla -----
ĉiuj du bordoj	-----	ni l'une, ni l' autre
la du bordoj	les deux rives	ni una, ni otra
=====	[la du bordoj; (adjektivo)]	nek unu, nek (la) alia.
la bordoj	toutes les deux	=====
ĉiuj bordoj	[ĉiuj la du]; (ĉiuj du / ambau, pronomo)	un día y otro día = día tras día = *(unu tagon kaj aliajn tagon) = tagon post tago
	les trois frères	
	[la tri fratoj; (adjektivo)]	
	tous les trois [ĉiuj la tri]; (ĉiuj tri, pronomo)	

(9.9.1) En la unua kolono de la tabelo:

-- **Ambau bordoj** estas la baza, minimuma esprimo, tamen komplete, en kiu **ambau = la+du+(sam-paraj)**.

-- La kvar esprimoj en la tujsekva fakto estas strikte sinonimaj al tiu baza, kun nura diferenco, ke ili eksplicite enkondukas redundan informon pri la nuanco "difiniteco" pere de "la" kaj/au redundan informon pri la nuanco "duopeco" pere de "du".

Ambau manoj de l' homa korpo

La paro da manoj de l' homa korpo

La duopo da manoj de la homa korpo

La du manoj de la homa korpo

Rimarkindas ke neniu el tiuj alternativoj enkondukas redundan informon pri la sampareco.

Akceptebleco, neakceptebleco au devigeo de iu(j) el tiuj alternativoj ne venas de konsideroj logikaj kaj/au semantikaj ĉar ili estas sinonimaj, sed nur de la suverena rajto de ĉiu unopa lingvo decidi pri la afero, ofte anke de la personaj preferoj de la parolanto au aŭtoro, eventuale eĉ de manieroj, ktp.

-- La du esprimoj en la tria fakoj malhavas eksplicitan informon pri "sampareco". Ili havas nur eksplicitan informon pri "duopeco" (pere de "du"), kaj anke jen pri "difiniteco" pere de "la", au jen pri "kolektiveco" pere de "ĉiuj".

K Nu, tie ĉi ŝprucas **grava afero**: Ne ekzistas semantika diferenco inter "ambau" kaj "la ambau", ĉar tiu "la" simple redundas al la nuanco "difiniteco" kiu per si mem jam enhavas la nudan "ambau". Sed ja ekzistas enorma diferenco inter "du" kaj "la du", ĉar la nuda "du" estas nedifina, kaj tial povas temi pri du ajnaj kozo el inter aro da kozo minimume havanta du kozojn, sed "la du" estas difina, kaj tial montras al difinita duopo pri kies ekzisto ni sciigas el teksto, au kunteksto, ktp.

K Krome, laŭ mia kompreno, jen ni havas akcepteblan klarigon pri la Z shangho de "la ambau" al tiu, laŭ li pli logika, nuda "ambau": Pro analogeco al la nepra uzado de artikolo en "la du" ĉe difina nuanco, jen li komence diris "la ambau" (*forse anke sub la influo de lingvo(j) uzanta(j) tian redundajhon), kaj nur poste li venis al la decido ne plu uzi tian redundajhon (forse anke, siavice, de la influo de aliaj lingvoj au de tiuj samaj lingvoj uzantaj nur unu au laŭplache ambajn alternativojn). (Forse influis al tio, anke, la deziro eviti la hiaton en "la ambau", kiel anke rifuzi elizion "l' ambau"). (Vidu **(3)**).

Rimarko.- Mi ĝenerale uzas *eble* por H, A, F, G, I *es posible / se puede, it's possible/ one can, il est possible/ on peut, kann man, è possibile / si può* (do, por la baza, propra signifo de *eble* pri kapablo, kompetento, ks.), kaj la italan "forse" por *quizás/ es posible que, perhaps/ maybe, peut-être/ il se peut que, vielleicht, forse* (do, por la konvencia signifo de **eble** pri eventuala, necerteco, ks). Kaj el tiu **forse* oni ricevas **forsa, *forso, ...*•

-- La du esprimoj en la kvara fakoj havas eksplicitan informon nur pri difiniteco au kolektiveco.

-- Tial, neniu el tiuj kvar lastaj esprimoj estas sinonima per si sola al *ambau bordoj*. Tamen, ja nenio malhelpas ke kunteksto, lingvaj kutimoj kaj/au konvencioj,

scio pri la situacio ks de la kunparolantoj, estas sufichaj por enkonduki la nuancon "sampareco".

(9.9.2) Pri la dua kolono:

La lingvoj E, A, G, R, P, H kaj galega disponas pri rekta, simpla vorto, por la nuanco dualeco/ sampareco.

Nur la lingvo F ne heredis el latino tian simplan vorton (de kio, tamen, ĝi ja neniel suferas), kaj esprimas tiun signifon jen per ĉi-kolona esprimo "toutes les deux", au per "l'une et l'autre" laŭ la tria kolono.

En tiu "toutes les deux" rolas eksplicita esprimo pri "kolektiveco" per "toutes = chiuj", pri difiniteco (les = la), kaj simpla esprimo pri duopeco (deux = du), tamen sen eksplicita indiko pri sampareco.

Krome: El tio estighas unforma serio: *Tous les deux, tous les trois,...* = *chiuj du/ ambau, chiuj tri, ...*

Rimarko.- En tiu chi kolono vidighas klare, ke la kerna afero estas, 'chu la lingvo disponas au ne disponas specifan vorton kies kompleksa signifo estas **la+du+(sam-paraj)**.

Kaj tute akcesora afero estas, 'chu, che ekzisto, tiun vorton akompanas au ne akompanas vortoj redundaj al iuj eroj de tiu kompleksa signifo, jene:

-- Neniu el tiuj lingvoj esprimas redundon pri sampareco.

-- La tri unaj esprimas redundon pri difiniteco pere de la artikolo "la" (en kio, krome, jen povas temi pri redundo nepre au nenepre esprimenda, kaj, che esprimo, jen "la" iru antaŭ au post "ambau").

-- La galega montras jenan variaĵon: Ĝenerale, ghi esprimas redundon káj pri difiniteco káj pri duopeco (kiel en *ámbalas dúas beiras = ambas-as dúas beiras = ambau-la du bordoj*). Malpli ofte, kaj iom grince por la ordinara parolo, ghi esprimas redundon nur pri difiniteco (kiel en *ámbalas beiras = ambas-as beiras = ambau-la bordoj*). Kaj escepte, krome kun gusto de klerisma parolo, ghi ne esprimas redundon (kiel en *ambas beiras = ambau bordoj*).- Diference, la H koincidas kun E ne-uzado de "la", "ambas orillas = ambau bordoj".•

(9.9.3) Pri la tria kolono:

La kvin esprimojn de la una fako mi komprenas lau la H "Una y otra orilla = Jen un bordo, kaj jen aliu bordo; pliaj bordoj ne ekzistas". (Do, tie chi ne plu temas pri kvaza unbloka, sinteze duala percepto de la bordoparo, sed pri analiza, distribua percepto de du apartaj bordoj, forse ech en du sinsekvaj kontrastaj fazoj, kvaze sen scio au kun preteratento pri dualeco). (Pri ekvivalentoj de chi konstruoj en la ceteraj lingvoj rolantaj en FE mi povas nenion diri).

En la dua fako temas pri "neniu el ambau bordoj". Krome, tio chi disbranĉighas al nova tereno, al kiu "ambau" fremdas, kiel en "unu au alia", "unu al alia", ktp.

En la tria fako temas pri la H idiomajho "un día y otro día".

Rimarko.- En (6) temas pri jena ĉerpajho el la Vortaro de la Hispana Akademio: "**Ambos / ambas** ... Adjektivo plurala.- La unu kaj la aliu; la du.- Estas uzata anke estiel personpronomo plurala".

Nu, rimarkindas ke por klarigi la signifon de tiu vorto ghi uzas la esprimojn "la unu kaj la aliu" lau la tria ĵhusa kolono, kaj "la du" lau la dua ĵhusa kolono.

Kaj koincida sed pli preciza pri chi afero estas la citajho en (6 **Rim i**): El latina-hispana vortaro: "ambô -æ -ð: La du kune, la du samtempe.- Ghi diferencighas de *uterque*, kiu signifas un kaj aliu ech se ne kune au samtempe".•

=====

Parto (D).- (10) Pri la pronoma rolo de adjektivoj.

(10.1) Temu pri jenaj propozicioj:

Tiu libro estas bela.- *Tiu libro estas mia.*- *Tiu libro estas la mia.*

En chi propozicioj sinsekve aperas predikativoj *bela* (kvalifika adjektivo), *mia* (poseda adjektivo), *la mia* (poseda pronomo).

La tria propozicio estas mallongigo de *Tiu libro estas mia libro / Tiu libro estas la libro mia*, t.e., *la mia* ekivalentas chi-kaze al *mia libro / la libro mia*.

Tiel en *mia libro* kiel en *la libro mia* rolas substantiva sintagmo kies kerno estas la substantivo *libro*, tiel ke ghin determine akompanas jen poseda adjektivo *mia*, jen artikolo *la* kaj adjektivo *mia*.

Nu, en *Tiu libro estas la libro mia*, jen "mia" semantike estas adjektivo, kaj ghi krome ludas adjektivan rolon akompane al la kerno *libro*. Diference, en *Tiu libro estas la mia*, jen *mia* daure kaj neeviteble gardas sian adjektivan semantikon, tamen ne plu ludas adjektivan rolon, sed pronoman rolon, char la kerno *libro* ne rolas eksplicite en la sintagmo, sed estas nur subkomprenata (de kio oni ricevas propozicion pli mallongan, kaj anke pli elegantan char tiele oni evitas ripeton de vorto).

La rimedoj per kiuj la kunparolantoj povas veni al tia bonefika subkompreno ja estas tiuj samaj efikantaj al la fakta signifo de chiu lingva esprimo, t.e., *teksto*, *kunteksto*, *situacio*, *cirkonstancoj*, *scio-pri-la-mondo*, kaj eventuale aliu (vidu **(9.6.Rim)**).

Krome: Tian pronoman rolon de adjektivoj daure gardantaj sian adjektivan semantikon povas ludi chiaspecaj adjektivoj, kvankam tion pli facile kaj pli ofte faras adjektivoj determinaj kaj adjektivoj semantike miksaj, ol adjektivoj kvalifikaj.

Ekzemplo.- En la dialogo *¿'Kiajn inojn vi preferas? — La blondajn*, jen la adjektivo "blondajn" rolas pronome, char ghi akompanas neniun eksplicitan substantivan kernon, kvankam ja el kunteksto klaras, ke temas pri "la blondajn inojn".•

Rimarko.- La H k.a. pli facile kaj pli ofte ol E, A k.a. uzas kvalifikan adjektivon en rolo pronoma, char en chi lastaj lingvoj oni prefere transformas tiujn adjektivojn al substantivo au substantiva sintagmo: Ekzemple, apud la adjektiveca H *Las rubias = La blond(in)ajn*, jen ni havas *La blondinojn*, *The blond ones*, *the blondes*. Kaj analoge che participoj: La H tute bone allasas *La lavitaj* en pronoma rolo, sed en E oni prefere metas *La lavitoj*, en A *The washed ones*.•

(10.2) Temu nun pri jenaj alternativaj propozicioj:

Ni en Esperanto ja havas problemegon che skribado/tajpado, sed nenian problemon, ech nenian problemeton, des malpli problemegon, che legado.

Ni en Esperanto ja havas problemon che skribado/tajpado, sed nenian che legado.•

Evidente, ni revenas al la sama afero, kiel en **(10.1)**: En la una propozicio la adjektivo *nenia* ludas sian propran adjektivan rolon apud la substantiva kerno *proble...on*, kaj en la dua [propozicio] la adjektivo *nenia* ludas pronoman rolon, char en tiu [propozicio] mankas substantiva kerno kiun la adjektivo akompanus; krome, chi-kaze el kunteksto ni scias ke fakte temas pri kerno *problemo*.

Kaj nun: Se en la dua propozicio ni metus "problemeĝon", jen la pronome rolanta "nenian" signifus "nenian problemeĝon", kaj tial allasus la eblon ke, se ne problemeĝon, ni forse havas problemon aŭ problemeton.

K T.e.: La eventuala pronoma rolo de adjektivoj estas nura ilo por kurteco kaj eleganteco de esprimoj, sed ĝi ne estas ĝenerala ilo tiucela, ĉar ĝi taugas nur por semantike simplaj situacioj. Ĉe ajna komplikeco, oni devas rezigni pri eleganteco, kaj sin teni al preciza eĉ se peza uzado de adjektivoj nur en sia propra rolo adjektiva.

Rimarko.- En la ĵhusa klarigo mem pri eventuala pronoma rolo de adjektivo enestas un plia tia kazo: Efektive, ni povas alternative diri *Tiel en la una serio da respondoj, kiel en la dua serio da respondoj, rolas... / ... kiel en la dua serio, rolas... / ... kiel en la dua, rolas... .*•

(10.3) Temu nun pri jenaj alternativaj dialogoetoj:

– *ĉ'Kiu(j) pneuo(j) krevis?.*

– *La kvar pneuoj.- Ĉiuj kvar pneuoj.- Mi timas, ke forse tri pneuoj.- La du antaŭaj pneuoj.- Ambau antaŭaj pneuoj.- La antaŭaj pneuoj.- Feliche, nur un pneuo.- Feliche, neniu pneuo.- Mi ne scias, iu ajn pneuo.-*

La kvar.- Ĉiuj kvar.- Mi timas, ke forse tri.- La du antaŭaj.- Ambau antaŭaj.- La antaŭaj.- Feliche, nur un.- Feliche, neniu.- Mi ne scias, iu ajn.

Evidente, ni ree havas la saman situacion kiel en **(10.1)**: Tiel en la una serio da respondoj, kiel en la dua (serio) (da respondoj), rolas la samaj vortoj semantike adjektivaj (*La kvar, ..., iu ajn*). Krome, en la una serio ili ludas sian propran rolon adjektivan ĉar ili akompanas substantivan kernon (*pneuoj*), kaj en la dua serio ili ludas pronoman rolon ĉar ili ne akompanas substantivan kernon, tiel ke tiu ĉi estas iel subkomprenata, tiel ke de tio oni ricevas esprimojn pli mallongajn kaj pli elegantajn ol tiuj de la una serio (ĉar oni tiele evitas tre proksiman ripeton de vorto).

(10.4) Ni konsideru nun jenajn variaĵojn de un sama afero:

*Unu vidvino havis du filinojn. **La du knabinoj** estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.- ... **La du** estis... .- **Ambau knabinoj** estis... .- **Ambau** estis... .*

Ree evidente, ni ree havas la saman situacion kiel en **(10.1)** rilate la kontraston inter adjektiva kaj pronoma rolo de vortoj semantike adjektivaj, tiel ke en la nudaj "La du" kaj "Ambau" oni subkomprenas el kunteksto ke temas pri elegantaj mallongigoj de "La du knabinoj" kaj "Ambau knabinoj", ktp.

Rimarkoj.- [i] Ĉi ekzemplo pri *ambau knabinoj*, kiel anke tiu pri *ambau antaŭaj pneuoj* en la ĵhusa **(10.3)**, aperis jam en **(9.6)**, tamen temante pri tute alia afero, nome, pri la nuanco *dualeco*.•

[ii] Rimarku ke la ripete farita ekspliko pri "pronoma rolo de adjektivoj kiuj tamen nepre daŭre gardas sian adjektivan semantikon ktp" estas ĝuste la simpla kaj perfekte klara instruo pri ĉi afero kiun ni ĉiuj ricevis en niaj element-lernejaj jaroj.•

[iii] Lau mia kompreno, jen PAG §§ 24, 41, 52, 61, 75, 79, 80, 86 (en la fino), ktp. ktp. faras galimatieton al si kaj al siaj legantoj per sia decido adopti moderneskan termino-

logion, krome trakti pri pronomoj antaŭ ol pri adjektivoj [!], kaj krome klopodi meti semantikon en tian prokustan liton.

[iv] Lau mia kompreno kaj deziro, gramatiko-libroj celantaj instrui pri kiel eble plej ĝusta, informiva, nuancita, belstila parolo, devas sin okupi ĉefe pri tia tasko, do ĉefe pri semantiko kaj kiel eble plej elementa semantikema terminologio, kaj forlasi la tenton sin levi ĝis tiuj ĉielaj altoj en kiuj esence gravas la algebra kunteneblo de abstraktaj, formaj teorioj, tamen je la kosto, ke en ili semantiko apene aŭ neniel gravas, aŭ eĉ apene aŭ neniel rolas. •

=====

Parto (E).- Ĝeneralajhoj pri gramatikaj nombroj.

(11) Nun ŝprucas la demandoj, unuflanke, 'kial iuj lingvoj disponas tiun tre specifan vorton "ambau", kaj, aliflanke, 'ĉu ekzistas aŭ oni povus enkonduki aliajn vortojn kun pli-malpli parencaj specifaj signifoj.

Nu, kaj ne bezonante pli profunde analizi, la respondo estas plej simpla: La tuto dependas nur de la suverena rajto de ĉiu unopa lingvo (aŭ, se oni volas, de la suverena rajto de la koncernaj lingvanoj tra la historio) enkonduki vortojn kiujn ĝi/ili trovas necesaj, konvenaj, utilaj, belaj, ktp.

Jen, tamen, ni provu respondi tiujn demandojn iom pli detale:

(11.1) Unuflanke ni havas la senfinan serion *unu, ĉiuj du, ĉiuj tri, ĉiuj tricent tridek tri, ...*. Aliflanke, ni havas la nur du-membran serion *unu, ambau*.

Nu, la lingvoj havantaj la vorton *ambau* decidis disponi specialan vorton por koncize kaj belstile rekte preparoli tiajn ofte aperantajn aferojn kaj okazojn en kiuj doniĝas la semantika kompleksaĵo *la+du+(sam-paraj)*. Kaj la lingvoj ne disponantaj tian vorton decidis kontentighi per la nura *ĉiuj du* (aŭ io simila), kiu ja malhavas eksplicitan indikon pri sam-pareco, tiel ke la ĝhustan komprenon oni lasas jen al la sciaro-pri-la-mondo de la kunparolantoj, jen, en okazo de bezono, oni eksplicitigas per almetado de pliaj vortoj en la kunteksto.

Krome: Eĉ tiuj lingvoj disponantaj pri *ambau* ne koincidas pri ties uzado: Jen en iuj (kiel E) ĝi estas uzata laŭ ĉiuj ĝhiaj eblaj roloj, tiel ke verkistoj (inter ili, kaj abunde, Z) uzas ĝin anke por simple veni al difinitaj stil-efektoj per flekseblo, leghera parol-ritmo, ktp., en okazoj en kiuj *ĉiuj du, ili du, tiuj du, la du*, ktp tute bone sufichus (kiel en la ekzemplo pri la du fieraj filinoj), aŭ eĉ estus la ĝhusta esprimo (laŭ la komuna kompreno pri la ekzemplo pri la du Pjotroj). Aliaj lingvoj (kiel, ekzemple, la helena) propre uzis ĝin nur ĉe natura dualo, funkcia dualo, ks., sed ne aŭ apene en porokaza dualo, ktp.

(11.2) Per tradicia libro-legado mi pli-malpli sciis pri ĉio ĵhus dirita pri la kontrasto (nura duopeco) / (sam-pareco). Sed ĉe alveno de la interreta trezoro jen mi facile kaj unstreke sciighis aŭ plibonigis miajn sciojn pri multaj mirindaj, foje subtilaj nuancigoj de tre diversaj lingvoj: Ja la kontrasto (nura duopeco) / (sam-pareco) estas tiu plej ofte ekspluatata, sed ekzistas anke gramatikaj nombroj *trialo* (pri *sam-triopeco*, do analoge al dualo), *singulativo* (pri un sola kozo ĉerpita el aro da), ktp., ktp.

(Vidu, ekzemple, en la H, http://es.wikipedia.org/wiki/N%C3%BAmero_gramatical).

Rimarkoj.- [i] En la pralingvoj de kiuj devenas la lingvoj supre cititaj ekzistis tri gramatikaj nombroj, nome, *singularo* (= la gramatika nombro temanta pri un sola ento), *dualo* (= la gramatika nombro temanta pri paroj da entoj (do, ne simple pri duopoj)) kaj *pluralo* (= la gramatika nombro temanta pri pli ol un ento, do pri duopoj, triopoj, ..., pluro-
poj, multopoj da entoj), chiuj tri kun plenaj paradigmoj deklinaciaj kaj konjugaciaj. Nu, en ili daŭre restas plene vivaj nur singularo kaj pluralo, kaj dualo jam antaŭ tre longe mortis, tiel ke nur la vortoj *paro / ambau*, kaj eventuale kelkaj aliaj, estas la sola spuro aŭ restaĵoj de tiu iam riĉa dualo. •

[ii] Shajnas al mi ke, laŭ strikte gramatika vidpunkto, nur la vorton *ambau* oni povas rekte rilatigi al la faka signifo de "gramatika nombro dualo", kaj ke la vorto *paro* propre estas nura substantivo inter amaso da substantivoj.

Nu, tamen, laŭ mia kompreno, jen *ambau* vortoj kune konsistigas unu semantikan blokon, kaj tio estas la grava afero por tiuj kiuj, kiel mi, interesigas nur pri semantiko. (Ja tamen, mi estus tre kontenta, se mi sciighus ke ekzistas termino pli taŭga ol "dualo" por preparoli tian semantikan unblokecon de *paro / ambau*). •

=====

Parto (F).- Klasoj de adjektivoj kaj de pronomoj.

(12) En ĉi nova tabelo mi provas klasi kaj ekzempli pri adjektivoj kaj pronomoj, laŭ mia kompreno pri la instruoj de PAG:

<p>(a.1) (Pronomoj kaj kvazaŭnomoj) mi iu kiu kio ĉio</p> <p>(a.2) (Determinaj adjektivoj diversspecaj) (Ofte pronome, adjektivoj-pronomoj) la tuta kelka(j) <i>certa</i> mia (la mia) tiu kiu alia aliu pluraj multa(j) ioma cetera</p> <p>(a.3) (Determinaj adjektivoj numeralaj ks) (Ofte pronome, ĉefe kun "la", "chiuj" ktp) du dua due du(op)o duobla duono [po du] [la du] [chiuj tri] [chiuj *la kvar]</p>	<p>(b) (Kvalifikaj adjektivoj)(Maloŭte pronome) bela beliga martela ŝtona</p> <p>muzika ferma fermita konsterna ĉagrena <i>certa</i> posta antaŭa alia kroma balda hiera trea disa mala fia eta ula ista era uma</p>
<p>(c) (Apartaj adjektivoj)(= Numeralaj determinaj + kvalifikaj)(Ofte pronome, ofte kun "la")</p> <p style="text-align: center;">8 la du.....ambau.....sam-paraj 8</p> <p style="text-align: center;">lasta, fina; sola, unika</p>	

(La du sagoj ja montras al la kompleksa, miksa semantiko de la adjektivo *ambau*: Unuflanke, difinita artikolo "la" plus determina nombra adjektivo "du"; aliflanke, kvalifika adjektivo "sam-paraj").

Rimarko.- Estas rimarkindaj jenaj kontrastaj trajtoj inter tiu tri specoj de adjektivoj:

-- **(b)** Kvalifikaj adjektivoj: Ekzistas enorma kvanto da ili (miloj); facile kaj ofte nas-kighas pliaj (= ilia inventaro estas aperta); ili estas semantike kaj sintakse relative tre unformaj.

-- **(a)** Determinaj adjektivoj: Ekzistas nur kelkaj dekoj da ili; apene eblas apero de novaj pliaj (= ilia inventaro estas fermita); ili estas semantike kaj sintakse tre diversaj.

-- **(c)** Mikse determinaj/ kvalifikaj adjektivoj.- Ili konsistigas liliputan fermitan vortostoketon. Inter ili pleje specialas *ambau*, tiel pro sia semantiko pri *dualeco*, kiel pri la fakto, ke en tiu stoketo nur ghi malhavas adjektivan finahon *-a*.•

=====

Parto (G).- Semantiko kaj gramatika priskribo de *ambau*. Formo *ambaj(n)*.- FE.A8.

K (13) El chio ghis nun dirita, kaj daure lau mia kompreno, kaj provante atenti nur al semantiko (kiu, kiel jam dirite, estas la sola afero vere interesa por chiuj ordinaraj parolantoj, mi ja inter ili), ni venas al jena semantika kaj gramatika priskribo pri la vorto *ambau* (kion ni anticipas citis jam en (Enkonduko **(c)**):

ambau = **la du samparaj** (sam-paraj, el un sama paro)

la+du+samparaj (Adjektivo de kompleksa, miksa semantiko).

Nevaria pura adjektivo, difina+(nombre determina)+(duale kvalifika), kiu ja povas funkcii pronome. (La artikolo "la" ja estas ia adjektivo).

[Do, ne temas pri pronomo kiel, shajne, pensis Z. (Vidu *Enkonduko (b)*)].

El tio sin trudas la konkludo, ke tian adjektivan semantikon ghuste eksplicite montras la formo *amb'(a'j)(n)* (kiu estas adjektivo plurala anke morfeme, kaj varia lau la deklinaciaj kazoj). [Ja analoge al la iel parenca vorto *plur'(a'j)(n)*].

Kaj el ghi oni povus derivi, almena principe, vortojn *amb'e*, *amb'o*, *amb'a-*, ktp.

Tiu formo *ambaj(n)* lauas la preskribojn de alineo FE.A8 de nia konstitucio por ke ghi eventuale povus esti oficiale akceptita por libervola paralela uzado apud la principa kaj daure valida formo *ambau* / *ambau*.

Rimarko.- La enhavo de chi tabelo ja konsistigas la kernon kaj la celon de chi artikolo.•

=====

Parto (H).- **(14)** Ekzemploj pri uzo de *ambaj(n)*, *amba-* :

(14.1) *La prepozicioj "antau" kaj "post" ricevas ambau duoblajn vortojn aparte por la ideo de loko, kaj aparte por la ideo de tempo*^Z (LZ I, p. 316^a)

La prepozicioj "antau" kaj "post" ricevas ambaj duoblajn vortojn...

La prepozicioj "antau" kaj "post" ricevas ambajn duoblajn vortojn...

[...ricevas ambaj / duoblajn vortojn...] [...ricevas / ambajn duoblajn vortojn...]

(14.2) *Shi knedis la paston ambamane* (= per ambaj manoj) .

Shi salutis ambamane (= per ambaj manoj).

Shi subskribis ambamane (= (principe) un subskribo, per ambaj manoj kune tenantaj la plumon).

Shi subskribis per unu kaj aliu mano (= (principe) du subskriboj, per chiu mano aparte; jen samtempe, jen sinsekve).

Verkita en j. 1996 ^a Planita por (K+E)-Seminario.- Nepublicita Tralaborita kaj reformatigita en j. 2009 ^a
WordPerfect8 + PDFCreator

===== **FINO** =====

Kronologie pri la alfabetoj de Esperanto. Faktoj plus komentoj.

Plus: Pluraj faktoj soci(ologi)aj.

Plus: **Jam temp' está!**: Plia pledo (ech se teda) por *h*-alfabeto.

Alternativa titolo: 122 jaroj da masohhismado

Rilate la normaron de la interlingvo *Esperanto* mi estas pli fide-
la al alineo *FE.A8* de nia konstitucio ol la tuta iama *Lingva Komitato*
kaj ol la tuta posta kaj ghisnuna *Akademio de Esperanto*.- *А.А.Н.*

Sigloj:

E = *Esperanto, esperanta*.

Z = *Zamenhof, zamenhofa*.

UL = "Unua Libro" (aposteriora nomo por la diverslingvaj eldonoj de *Lingvo Internacia*, Z, j. 1887^a).

DL = *Dua Libro de l' Lingvo Internacia, Kajero N^o 1* (Z, j. 1888^a).

ADL = *Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia* (Z, j. 1888^a).

FE = *Fundamento de Esperanto* (Z, j. 1905^a).- (9^a eldono, j. 1963^a, edit. Albault).

LR = *Lingvaj Respondoj [de Zamenhof]*, (edit. Waringhien, j. 1962^a).

OV = *Originala Verkaro [de Zamenhof]*, (edit. Dietterle, j. 1929^a).

LZI, LZII = *Leteroj de Zamenhof* (du volumoj, edit. Waringhien, j. 1948^a).

PAG = *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Kalocsay-Waringhien, j. 1935^a).- (Kvara, tralaborita, eldono, j. 1980^a).

LDI = *Iudovikologia dokumentaro I* (edit. Iudovikito, j. 1991^a).

IE = *la inkunabloj de esperanto* (edit. Iudovikito, j. 1979^a).-

LV = *Lingvo kaj Vivo* (Waringhien, j. 1959^a).-

PIV = *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Waringhien k.a., [1^a eldono], j. 1970^a)

GDEE = *Gran Diccionario Español-Esperanto (= Granda Vortaro Hispana-Esperanta*, de Fernando de Diego, j. 2003^a). (Mi uzadas la retan eldonon).

Enhavo:

- (1) La alfabetoj de pra-Esperantoj.....
- (2) La una alfabeto de Esperanto
 - (2.3) La pres-literoj en UL....
- (3) La dua alfabeto de Esperanto...
- (4) La flanka reformo-projekto de j. 1894^a....
- (5) La du alfabetoj en FE...
- (6) Tragikomedio pri kaj per chapelumado...
 - (6.4) Esperanto kaj komputilo...

(7) La pucho de j. 1909^a: "Vi ja havas tiun rajton, sed malhavas la rajton uzi tiun rajton". [*]

(8) **Jam temp' estas!**: Plia pledo (ech se teda) por *h*-alfabeto...

[*] Chi tiea uzo de la vorto 'pucho' venas de mia strikte persona interpreto pri difinitaj eventoj.- Mi neniam legis au audis pri tia interpreto, sekve anke ne pri uzo de la dirita vorto en rilato al tiuj eventoj.

=====

Rimarkoj.- [i] Mi uzas mem la *h*-alfabeton. •

[ii] Lau la kutimaj redakto-aranghoj, jen en la sekvajho chiukaze klaras, 'kiuj vortoj estas miaj kaj 'kiuj alies. Kaj en tia kadro, eventualaj citiloj " ... " enfermas alies vortojn fidele laulitere transskribitajn, kaj eventualaj rektaj krampoj [...] enfermas vortojn miajn. •

[iii] Kadre de la dirita fideleco che citado, mi agis jene rilate tekstojn uzantajn na niaj diakritohavaj literoj:

-- Se mi tajpas mem la tekston, mi ja respektas la diakritajhojn (kvankam tio estas vere peniga por mi).

-- Se temas pri teksto rekte cherpita el la interreto pere de mia muso, mi ghin lasas tia, kia ghi rekte aperas sur mia ekrano (t.e., sen la chapeloj kaj sen arketoj, kvankam kun la ghustaj bazaj nudaj literoj). (Vidu, ekzemple, sur p. ***, mian cherpajhon de la informoj [!?] de la Akademio). •

[iv] Kiel jhus dirite en [iii], tiajn fushajn cherpajhojn mi ne korektas en chi paghoj (ech ne pere de *h*-alfabeto). Nu, mi tiel agas almene trikauze:

-- Mi ne volas atenci kontrau mia propra digno.

-- Pri tia katastrofo mi neniel kulpas, sed nur la chapelistaj moshtoj: Se mi tion korektus, jen, mi duoble masohhismus!!!.

-- Tia katastrofo estas spontane aperinta plia atuto (de mi neniel prisuspektita) kadre de kronologia studo pri 122 jaroj da masohhismado, kaj kies chefa celo (de la studo) estas ighi bazo por plia pledo al nia Akademio, ke jam temp' está ke, kadre de alineo FE.A8 de nia konstitucio, ghi oficialigu la egalrajtecon de *h*-alfabeto, apude de, kaj paralele al, la principa diakritoza alfabeto. •

[v] Estas agrable, tamen, pliafoje konstati ke ech post tia kripligo la teksto facile plu kompreneblas: Ni ja havas problemegon che skribado/tajpado, sed nenian problemegon, problemon au ech problemeton che legado. •

[vi] Kaj jam chi tie mi laute tamtame diru, ke estas al mi tre ghene kaj grumblige chagrene, ke che tia tajpado-alies-diakritajhojn-pro-transskriba-fideleco jen mi devas forlasi la liberspiran, legheran kaj senprobleman *h*-tajpadon (ja pli liberspira ech ol tiu en la hispana) por transmigri al la peza kaj problemo-dona chapelumado per komputilo.

Kaj mi aldonu, ke chiufoje kiam mi sentas ke mi ree ekkoleras che tia kons-tanta ghenado, jen mi provas fari trankviligan halteton por tosti je la sano, felicho kaj longa vivo de la chapelista moshtaro. (Sed ofte tio ne sufichas, kaj tiukaze mi devas min helpi per pli efikaj rimedoj; vidu ***).•

[vii] Kaj mi diru anke, ke malgrau la multaj allogoj venantaj de la komputila mondo, jen mi heroe sukcesis resti absolute-virga-tajpulo-mem-propravola-laiko-pri-komputilajhoj.

Mi sincere opinias, kaj laue agas, ke tiun mirindan novan mondon zorgu ties fakularo.•

[viii] Por absolute fini la redakton de chi studajho restas ankore farendaj almena jenaj tri taskoj: Korektado de chiaspecaj eraroj; numerado de la sekcioj kaj subsekcioj; metado de pli ol 100 kruc-referencoj (kies loko estas montrata per tri-asterisko, ***).

Tamen, jen mi prokrastas por aliu okazo fari tiajn polurojn.•

Post-redaktaj rimarkoj.- [i] Fininte la redakton de chi studajho, mi ghin manipulis per *pdf*-programo por *e*-poshta dissendo al pluraj personoj: Je mia kons-terno, jech ne un sola el miaj shvite tajpitaj chapelitoj reaperis, nur anstatigite jen de kvadrateto □, jen de punkto ·, jen de blanka , vakua loko!!!. (Mi tian reforma-tigon provis ech per du malsamaj programoj, "doPDF" kaj "PDFCreator"; la una pli fushis la aferon ol la dua, au almena ghin pli malbele prezentas).

Nu, mi une chagrenighis pro tia novtipa fushajho, sed jen subite komprenis, ke mi devas tion **ne** reghustigi, sed lasi ghin fusha, char tiu plia spontane aperinta atuto (anke ghi de mi neniel suspektita estas) estas, lau hispana esprimo, "la ora brocho" per kiu mi povas fermi mian prezentadon pri la masohhisma kaj menso-gema etoso kiu, rilate chapelumadon, daure regas en Esperantio jam de 122 jaroj.•

[ii] Mi jhus eltrovis komplikegan manieron tajpi chapelitojn kun la fusha rezulto chi-apuda,

c	g	h	j	s	u	ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ
ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ	ĉ	ĝ	ĥ	ĵ	ŝ	ŭ

sed kun almena avantagho, ke ghin la programo PDFCreator respektas (tamen, ne la programo doPDF): Temas pri truketo, kunmeti la literojn per la instrukcioj "sur-presi".

Sed char ghi estas tre komplika kaj tre komplikiga alternativo, mi ghin uzos nur en tre esceptaj okazoj, nur che eventuala vera bezono pri ghi.•

=====

(1) Pri la alfabetoj de pra-Esperantoj.- (LZI, p. 347^a, 351^a, 352^a.- LV, p. 19^a ghis 54^a).

(1.1) Chi-apude vidighas fama kvar-versa strofo verkita de Z (tiam 19-jara) en decembro 1878^a.

Ghi estis parto de himno per kiu Z kaj grupo da samliceanoj liaj festis la nas-kighon de la nova lingvo.

Ghi estas la sola restajho de tiu pra-E.

Rimarko.- La tradukoj "jam tempo estas" kaj "unui i" estas de Z. La tradukoj "jam temp' estas", "unuigi sin" kaj la laulitera "kununuigi sin" estas de Waringhien, respektive en LV, LZI, LV. •

La lingvo estis skribata pere de la latina alfabeto. En ghi ne ekzistis supersignitaj konsonantoj. La E v-sono estis skribata "w". La akcento ghenerale falis sur la antaulastan vokalon, kvankam che iuj verboformoj ghi falis sur la lastan (kiu, krome, estis vortofina). Por la una kazo ne necesis grafika indiko, kaj por la dua estis uzata dekstra korno " ´".

(Tiu chi afero reaperos en ***).

Rimarko.- Antau kelkaj 10 jaroj, s-ro Sergej Malcev informis min ke tian funkcion de la dekstra korno Z probable cherpis el la rusa (ghin uzanta ne en la ghenerala ortografio, sed nur por provizoraj au specialaj celoj, kiel, ekzemple, en elementaj lernejoj kaj lernolibroj por instrui pri akcentado, anke por transskribo de fremdaj vortoj, ks). (La rusa estis un el la denaskaj lingvoj de Z).

Parenca rolo de tri malsamaj kornoj, kvankam ne identa, ekzistis anke en la helena (pri kiu Z studis en la gimnazio).

Tia sama funkcio de la dekstra korno rolas i.a. en la ortografio de la hispana (tamen, sub devigaj reguloj kiuj sisteme ebligas korno-shparadon). (En tiuj tempoj Z ankore ne studis pri la hispana). •

(1.2) En la pra-E de 1881^a kaj 1882^a okazis same kiel en tiu de 1878^a pri la akcento (ekzemple, *frindoro*, *sidá*), krome ekzistis káj arkita káj konsonantoj kun dekstra korno, lau jenaj ekvivalentoj: = , ĥ = , = , = , d = . (Tia rolo de la dekstra korno sur konsonantoj ekzistas i.a. en la pola, ja un el la lingvoj sciataj de Z).

(2) Ni venas nun al la una, principa alfabeto de Esperanto:

(2.1) En la dua duono de la jaro 1887^a sinsekve eliris el la presejo Ch. Kelter, en Varsovio, la eldonoj rusa, pola, franca kaj germana de 40-pagha broshuro kun koincidaj nacilingvaj titoloj kies traduko estas "D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaularolo kaj Plena Lernolibro". La broshuron akompanis granda folio "Vortaro Internacia-R/P/F/G" kun 917 E-radikoj kaj ilia respektiva nacilingva traduko. Pli ol duonon de tiuj 40 paghoj okupis la detala antaularolo.

LINGWE UNIŬERSALA

*Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está.
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.*

Malamikeco de la nacioj / Falu, falu,
jam tempo estas! / La tuta homaro en
familion / Unui i devas.

(jam temp' estas). (unuigi sin). (kunu-
nuigi sin).

En 1888^a kaj 1889^a eliris el la sama presejo du anglaj eldonoj kaj la sveda eldono. (La una angla estis nesufiĉe bona, kaj Z ĝin detruis ĉe apero de la dua). Kaj en 1888^a eliris anke la eldonoj hebrea kaj jida, tamen el aliaj presejoj: La jida, ĉe M. Levinski; pri la hebrea, IE ne donas informon.

Rimarkoj.- [i] Tiu "Lingvo Internacia" balde estis sinsekve nomata "La lingvo de D-ro Esperanto", "La lingvo Esperanto", "Esperanto".

Krome: Komence de 1888 Z publicis (daŭre sub la pseudonimo "D-ro Esperanto") novan verkon "Dua Libro de l' lingvo Internacia, Kajero N^o 1", jam rekte en E, kun informoj, ekzercoj, lego-materialo ks. Kaj de tiam la unu aperintaj nacilingvaj eldonoj de la broŝuro "Lingvo Internacia" estas kutime kaj utile kune nomataj "Unua Libro".•

[ii] La gramatikaj partoj de la broŝuroj franca, angla, germana, rusa kaj pola konsistigas, senshanghaj, la kernon de la oficiala FE. (Vidu ***).•

(2.2) La alfabeto de Esperanto konsistas el 28 literoj bazighantaj sur la ordinara latina alfabeto (kun formoj majuskulaj kaj minuskulaj), el kiuj 5 estas vokaloj (*i, e, a, o, u*), 2 estas duon-vokaloj (*j, ĵ*) (ofte tamen konsiderataj konsonantoj), kaj la 21 ceteraj estas konsonantoj:

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ĝĝ, Tt, Uu, Vv, Zz.

En ĉi alfabeto rimarkindas la kvin ĉapelitaj konsonantoj *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ĝ* kaj la arkita duon-vokalo *ĵ*. En ĝi ne ekzistas supersignitaj vokaloj (fakte, tre simpla regulo igas nenecesa diakritan signon por montri al akcentado). Kaj rimarkindas anke ne-uzado de la kvar pliaj literoj *q, w, x, y* ekzistantaj en la baza alfabeto latina.

Rimarkoj.- [i] Supersignitaj *konsonantoj* ekzistas en multaj lingvoj, sed en neniu kun cirkumflekso ĉapelo (ekzemple, *ç, ĝ, ...* en la chehha; *ñ, ...* en la pola; *ñ* en la hispana, ktp). Cirkumflekso estas uzata en multaj lingvoj, sed ĉiukaze sur vokaloj, kiel en *â, ê, ...*. La arketo estas uzata en multaj lingvoj kaj en fakaj indikoj pri prozodio, ĝenerale sur vokaloj por indiki ke ili estas kurtaj.•

[ii] Estas al mi nekompreneble ke, kvankam Z certe pli ol bone sciis ke tiaj specialaj literoj tiam ne ekzistis en la presejoj, anke ke ajnaj specialaj literoj forte ŝokos ĉiun novan leganton en ĉiu tiama kaj posta tempo, kaj ke ili tial naskos demandojn, dubojn kaj protestojn, jen li tamen prezentis en la 23 paĝoj de la *Antaŭparolo* de sia broŝuro eĉ ne unu solan klarigon aŭ argumenton pri la avantaĝoj kaj utilo de siaj novismaj literoj, kiel anke pri la konveneco ne uzadi la tamen disponeblajn literojn *q, w, x, y*. (Ĉi lastajn li ne akceptis eĉ por sia surogata alfabeto, kun sola okazo akcepti "y", vidu *** kaj ***).

Mi konas neniu Z argumenton aŭ klarigon pri tia neakcepto (kaj, des malpli, vere konvinkan kaj sufiĉan), tiel ke li restis ŝulda je tio dum sia tuta vivo. Mi inklinas supozi ke li ne akceptis ilin ĉar per ili oni apene ricevus gajnon rilate gardadon de la originala ortografio (kvankam ili ja tre utilis por ne-etimologia sed efika

reprezento de sono, tiele shparante au ne bezonante pri chapeluloj). (Vidu en *** ke nur en liaj lastaj proponoj al la Lingva Komitato li pretis ludigi na y).

Tiele la enkonduko de tia alfabeto sin montris nura arbitra decido de Z, simple char suverena aŭtoro mem de la lingvo.

Chi problema afero –propre eksterlingva– dauris tra la tuta vivo de Z, kaj al li alportis ech eksceson da zorgoj, chagrenoj kaj doloroj. Al tio chi ni ja revenos konstante en la sekvajho, sed ja endas anticipi diri ke, jughante nur lau la vortoj de liaj skribajhoj, jen li plej ofte sin prezentis arda defendanto de sia alfabeto, foje tamen arda atakanto ghin, ofte anke pledanto por kompromisa solvo (al kio aldonighas la gravega fakto, ke liaj dischipoj sukcese oponis tian kompromisemon; vidu ***).

Komprenoble, ja estus neeble kaj sensece provi spekulativi pri la veraj tiurilataj pensoj kaj sentoj de Z. •

[iii] En UL temas nur pri la dirita chapel-alfabeto. Enkonduko la surogatan *h*-alfabeton estas afero iomete posta (vidu ***). •

[iv] En la lastaj alineoj de la *Antaŭparolo* de UL, Z prezentas jenan agadplanon por la tujaj pashoj farendaj, kiel anke por gvidado la postan vivon kaj evoluon de sia *Lingvo Internacia*:

- Li petas pri kritikoj, sugestoj, proponoj pri shanghoj k.s.
- Post un jaro li publicos specialan broshuron pri chiuj eventualaj modifoj kiuj montrighos konvenaj, kaj tiele la lingvo atingos formon konstantan kaj definitivan.
- Tiam komencighos la tempo por publicado plenajn vortarojn, librojn, gazetojn.
- La lingvo, tamen, ne restos fermita al plibonigoj, kvankam pri tio la aŭtoro ne plu rajtos, sed nur speciala, konstanta akademio ghenerale agnoskita. Chi akademio povos facile, iom post iom kaj preske nepercepteble, enkonduki chiajn plibonigojn kiujn oni taksos necesaj, ech se kun la tempopasado la komenca lingvo ighos nerekoncible.

[Tre gravas la fakto, ke dum sia tuta vivo kaj agado (kun forsa escepto ghuste en sia lasta ago pri E en 1909^a), Z firme kaj senshanghe sin tenadis al la strategio pri kiu temas la jhusa alineo. Tre gravas anke, ke liaj dischipoj chiam kaj daure komprenas tian strategion en kadro pli restriktiga ol tiu planita kaj volata de Z. (Vidu ***, *** kaj ***)]. •

(2.3) La mirinda LDI fotoreprese prezentas tutaj la sep broshurojn de "Lingvo Internacia" (kune kun la respektiva Vortar-foliego, tamen reduktitan al ordinare granda pagho kun mikroskopaj literoj) presitajn che Ch. Kelter (vidu **(2.1)**).

















Krome, la pli frua IE donas informojn pri ili, tiel kronologie aparte pri chiu el ili, kiel okaze de parolo pri la hebrea kaj jida eldonoj (vidu *** kaj ***).

(b) En tio chi estas egale rekte konstateble ke tiajn kompleksaĵojn oni kunmetis mane, literon-post-litero, char

Ĉ ĉ	Ĝ ĝ	Ĥ ĥ	Ĵ ĵ	Ŝ ŝ	Ŭ ŭ
-----	-----	-----	-----	-----	-----

nek chapelo nek arketo egale sidas sur la koncerna baza litero (nek lau-alte, nek lau-flanke). Komparu, ekzemple, " " en la unu kaj sesa kazo; " " en la kvina kaj sesa; " " en la tria kaj kvara; " " en unu, tria kaj sepa (krome, nur en sesa kaj sepa oni eliminis la punkton sur " "); " " en kvara kaj kvina; " " en unu, du kaj sesa.

(b) El la teksto de la rusa broŝuro (kaj egale en tiuj pola, franca, germana kaj unu angla):

Tio chi konfirmas chion diritan en la ĵhusa alineo, kaj ni tial ĝhin ne ripetu.

Tamen, jenaj du eroj atentindas:

-- La litero " " en " u vi ĝi,n" shajnas al mi unbloka, profesi-kvalita chapelo, en kiu la chapelo forme kaj estetike koheras kun la baza konsonanto. (Vidu la tujsekvon (d)).

-- La vorto "kontra " meze de rusa teksto shajne prezentas arketon profesikvalitan, nur ne-centran, sed iom flankan: Nu, ghi fakte estas la kursiva rusa kurta "i" uzata en la rusa teksto (kiu, krome, ne koheras perfekte kun la kursivaj latinaj literoj).

(c) En la dua angla broshuro kaj en la sveda la afero konsiderinde plibonighis rilate la chapelulojn en la teksto, kvankam la arkulo plu portis la surogatan kushantan "c", kaj la kursiva chapelo estas iom aliforma, liliputa kaj tial nekohera kun la rekta chapelo, vere klara kaj tial laudinda. Jen ekzemploj pri tio:

<p>ĉu vi ĝin ĉielo ĉielo Ĉu vi</p>		
<p>farig̃is farig̃is</p>	<p>firmaĵon la firmaĵo aĵo; kaj</p>	<p>ŝuldojn ŝuldoj</p>
<p>antaŭ ankaŭ</p>	<p>and write "kontraŭ"</p>	<p>и ѣ у ѣ одной</p>

(d) Nun, el la Vortaro de la samaj broshuroj kiel en (b). (Mi prenas el la pola broshuro, char pli klare presita ol la rusa):

<p style="text-align: center;">Ĉ (CZ).</p> <p>ĉagren martwiĉ, smuciĉ ĉambro pokoj ĉapo ĉapka ĉapelo kapelusz ĉar albowiem, ponie- wat ĉe u, przy ĉemio koszula ĉen lancuch</p> <p style="text-align: center;">ĉu ciy'</p>	<p style="text-align: center;">Ĝ (DŻ)</p> <p>ĝarden ogród ĝeni stękać ĝentil grzeczny ĝi ono, to ĝis do ĝoj ciężyć się</p>
<p style="text-align: center;">Ĵ (Ż).</p> <p>ĵaŭd czwartek ĵet rzucać ĵur przysięgać</p>	<p style="text-align: center;">Ŝ (SZ).</p> <p>ŝajn wydawać się ŝancel chwiać ŝanĝ zmieniać ŝaŭm piana ŝel skorupa</p>

Pliafoje shajnas ke la litero " " efektive estas unbloka (kvankam ghi estas de malsama formo ol tiu en " *u vi i,n*" de la sama broshuro). - Che la tri ceteraj literoj ree vidighas la samaj neperfektajhoj; ekzemple, che la tri radikoj kun " " la ĉapelo kushas malsame; krome, oni ne eliminis la punkton sur "j"; che " *an* ", " *a m*" la ĉapelo sur "s" estas malpli granda kaj alitipa ol tiu sur "g" kaj ol la arketo.

(e) El la Vortaro de la dua angla kaj de la sveda broshuroj:

Ĉ (tsch).

ĉajren' bekymra
 ĉambr' rum
 ĉap' mossa
 ĉapel' hatt
 ĉar. ty, emedan
 ĉe hos
 ĉeniz' skjorta
 ĉen' kedja
 ĉeriz' körsbär
 ĉerk' likkista

Ĝ

ĝarden' a garden
 ĝem' to groan
 ĝentil' genteel
 ĝi it
 ĝis to, till, up to
 ĝoj' to rejoice, to be
 glad

Ĵ

ĵaŭd' Thursday
 ĵet' to throw, to cast
 ĵur' to swear

Ŝ (sch)

ŝajn' synas, tyckas, fö-
 refalla
 ŝancel' göra vankelmo-
 dig
 ŝang' byta, vexla
 ŝaŝim' skum
 ŝel' skal
 ŝerc' skämta
 ŝi hon
 ŝip' skepp

Jen la kursivaj literoj estas unbloke fanditaj, lau profesia kvalito, kvankam, bedaurinde, la chapelo estas de liliputa grando, tial ne-estetika (kaj "j" kaj "j" estas apene distingeblaj). Kontraste, la arketo tro grandas, tial mis-harmonias kun la cetero (mi supozas ke ree temas pri kursiva rusa kurta "i").

Rimarkindas ke la ĉapelo sur la kap-litero estas de du malsamaj formoj, kaj ke ĝi aperas metite en ekstreme flanka pozicio che la kap-litero " ", kaj preske tiel ekstrema che " ", kvankam sur aliu flanko.

(2.4) Jen pluraj komentoj pri (2.3):

(2.4.1) Chi-apude vidighas la tuta pagho 24^a kaj parto de pagho 111^a de IE.

Pagho 24^a rilatas al la broshuroj presitaj che Kelter, kaj pagho 111^a ĉefe al tiuj che Levinski.

Nu, mi (kaj supozeble, anke la leganto) povas nur gapi che tiaj eldiroj de ludovikito (mem fakulo pri pres-tekniko kaj -arto, anke editoro kaj eldonisto de IE, de LDI, kaj de la tuta, multvoluma, impona "iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof"). Efektive, li shajne ne rimarkis (!?) ke...

(a) Pri pagho 24^a:

-- La supersignitoj ne venas de unblokaj tipoj, sed estas miksajhoj el apartaj liter-tipo kaj diakrit-tipo, permanente muntaditaj aparte por chiu unopa litero che kompostado.

jen alia problemo malfacila por solvi. por presigi la unuan libron, ludoviko bezonis muldigi novajn tipojn: kvin ĉapelitajn (ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ), kaj unu lunarkitan (ŭ). en la broŝuro troviĝas kvar specoj da ili: 1. rektaj por la "specimenoj" en la antaŭparolo; 2. kursivaj por la esperantaj vortoj en la teksto kaj la vortaro; 3. grandaj rektaj por la "alfabeto" en la plena lernolibro. tiuj tri specoj nature postulis majusklojn kaj minusklojn. 4. mezgrandaj rektaj por la indiklitteroj en la vortaro, ĉikaze, nur majuskloj. plie, li postulis streketojn por montri partojn de la vortoj.

parolante nur pri esperantaj vortoj, no 1, 2, 3, 4 kaj pra no 5 estis kompostitaj per samaj tipoj. la ĉapeloj por ili ŝajnas al mi iom malgrandaj. ekzemple, ĉe la litero "ĵ", la ĉapelo apenaŭ ŝirmas la malsupre situantan "j", kiu konservas la supran punkton jenmaniere: ĵ. kaj "ĥ" havas la ĉapelon ne sur la kapo sed sur la dorso jenmaniere: ĥ. la lunarko estas iel ronda, ĉar ĝiaj ekstremoj iom kurbiĝas kuntiriĝe.

streketoj oblikvaj estas metataj laŭ la sublinio, havante la formon de "rekta komo" renversitan, t.e. iliaj oblikvaj pintoj direktiĝas supren.

en la vortaro, la kapvortoj estas tute nudaj; t.e. ili — la radikoj — ankoraŭ ne havas la streketojn metitajn je la finoj. nur ĉe ekzemploj fojfoje aldonitaj al iaj radikoj, streketoj montras la divideblajn partojn de la kunmetitaj vortoj.

efektive, kelkaj literoj el ili ne estis uzitaj, sed ni supozu ke la presisto preparis la matricojn por ĉiuj literoj: nome por unu speco: $6 \times 2 = 12$, por tri specoj: $12 \times 3 = 36$. kaj por la kvara speco: 6. plie, eble unu por la streketo. do sume 43. kiom ili kostis?

-- Ne temas pri memstara lunarko kun ekstremoj kurbighantaj kuntirighe, sed, simple, pri renversite kushanta c-litero.

-- La chapeloj ne estas profes-kvalitaj, sed amatoraj, krome nekongruaj laŭ formo kun la belaj, profes-nivelaj bazaj literoj.

-- La permana kunmetado estas fake fusha kaj neregula.

aperta no 23 al ludoviko kaj post gila apero.

kiel jam supre menciite, tiuj ĉi broŝuroj ne estis presitaj ĉe kelter kiel la antaŭaj. do ni devas aldoni la krompagon por prepari la ĉapelitajn literojn. sed ĉu la novaj presistoj, precipe levinski, postulis ĝin aŭ ne, pri tio mi eksentis etan dubon traokulante no 23, kiun mi disponas. tie, supersignoj ne sidas tiel ekzakte kiel ĉe kelter. ekzemple, "ĉ" aperas jenmaniere: ĉ, ĉ, ĉ. ŝajnas al mi ke levinski ne preparis matricojn de la ĉapelitaj literoj. li preparis nur la matricojn de supersignoj. la kompostisto kompostis kombinate ilin kun la ordinaraj literoj. do ni vidas la ĉapelojn jen antaŭen, jen malantaŭen, jen tro supren ŝovitajn, foje eĉ alispecajn. tio ĉi, tamen, sendube postulis kroman penon de la kompostisto. tial, se korektemo tion postulas, kiel krompagon ni certe povas aldoni 10 aŭ 20 rublojn al la supre donitaj kostoj.

(b) Pri pagho 111^a:

-- La eldiro "... mi eksentis etan dubon... tie, supersignoj ne sidas tiel ekzakte kiel ĉe kelter" konfirmas ke ludovikito ŝajne ne rimarkis (!?) ke ĉe Kelter neniel temis pri ekzakteco. Krome, tio implicas ke Levinski-presajhoj estis ech tre achaj; bedaurinde, IE ne prezentas fotokopion pri ech un ties linio).

-- Nu, estas al mi perfekte kaj absolute nekompreneble ke ludovikito eksentis nur "etan dubon", ke li ŝajne konstatas ĉe Levinski sed ne ĉe Kelter ke li preparis matricojn nur por la supersignoj, ke li miksis tipojn de malsamaj specoj, kaj ke li lokis la chapelojn laŭ arango neregula kaj fake fusha (fakte, super la tria "c" aperas liliputa arketo " ").

(2.4.2) Sur p. 21^a de LV temas pri la kornohavaj konsonantoj , , , , de iuj Pra-E, kaj al tio Waringhien almetas jenan piednoton:

¹ Kial Zamenhof poste anstataŭigis la akutan supersignon per la cirkumfleksa, oni povas nur hipotezi. Mia supozo estas, ke li volonte evitis la akutan supersignon, ĉar tiajn ja havas polaj konsonantoj, kaj la renversitan cirkumfleksan, ĉar tiajn havas ja ĉeĥaj konsonantoj. Li tiel zorgis, ke lia lingvo ne havu la eksteran aspekton de unu difinita nacia lingvo. Verŝajne la materiajn sekvojn de tiu decido, la neceson, por la estontaj esperantistoj, fandigi tute novajn tipojn, li idealisme preteratentis.

Nu, jen komento mia: Lau mia kompreno, ja plej probable pravas la supozo, ke Z volis eviti koincidon kun supersignoj de aliaj lingvoj (kvankam, jam sur tiu vojo, oni ja povas imagi anke ke li egale bone povus voli eviti ĉian koincidon kun ĉia

alfabeto, kaj tial enkonduki mem tute novan alfabeton). (Cetere, al tia evitado de koincidoj parencas la decido elimini el la lingvo la bezonon pri kornohavaj vokaloj).

Diference, shajnas al mi nevershajna au almena tute nesuficha la supozo pri eventuala idealismo preteratentunta la [bedaurindajn] materiajn sekvojn de tiu decido. Lau mia kompreno, ja tute bone povus temi pri tia idealismo nur ghis la momento en kiu Z unafaje trapasis la sojlon de la una presejo kaj/au eldonejo serche al publikigo de sia verko, char en tiu momento la albatigho kontraŭ la realo unfrape venigus lin, se ne surgrunden, jen almena sur prudentan kaj saghan vojon.

Tial, se eĉ post la amaraj spertoj kaj malfaciloj kiujn la presado de UL faligis sur lin (suferado kiujn kortushite ni komprenas el la lego de ***) jen tamen Z persistis pri siaj chapeluloj, nu, pri tio certe ekzistis aliaj, pli fortaj kaj pli profundaj kausoj, psikologiaj au alispecaj, ol la nura idealismo.

Mi ne sukcesis munti al mi teorion, hipotezon au supozon kiun mi trovus sufiĉe kontentiga klarigo pri ĉi afero.

L'ŝo solan kiun mi sukcesis alveni (jam antaŭ multaj, multaj jaroj) estas mia persona konvinko, ke almena duono de la tuta problemo kushas simple en tio, ke ni ĉiuj, E-uzantoj kun Z ĉekape gvidanta, suferas pli-malpli intense je masohismo, kaj ke ni krome strukturigis/as/os nian agadon tiel, ke ni ĉefe altiru pliajn masohismulojn. (Fakte, mi certas ke se ĉi tiun artikolon mian analizus psikiatro, jen lia diagnozo estus "Plej klara masohismado"; tamen, rilate lian prognozon mi ne havas firman opinionon).

Rimarkoj.- [i] Waringhien simple diras "la materiajn sekvojn", intence lasante al la scio, kompreno, au fantazio de la leganto la taskon eksplicite 'kiuj kaj 'kiaj estis/as/ os tiuj sekvoj (kvankam, evidente, W devus plenumi mem tiun taskon, ĉar la fakulo plej kompetenta pri la afero).

Nu, mi opinias ke per tiu atako de sincereco (en li malofta), jen Waringhien komprenigas al ni ke la chapelozita alfabeto konsistigas la unan el la du grandaj fushoj el la areto da ili kiujn Z, kvankam ja genia, tamen faris. (Vidu ***). Kaj jam sur tiu vojo de sincereco, jen mi opinias ke W devus kompletigi sian opinionon per jena konkludo: "Nu, ne gravas ĉu la fusho okazis pro idealismo, au pro nekompetenteco, au pro kiu ajn aliu kauso: Kio gravas ja estas, ke ĝi estas fusho, kaj jen do ni agu lau nia plej bona scio kaj kompetento por ĝin elimini au almena mildigi".

Tamen, ĉar mi ja allasas la eblon, ke tiu mia opinio estas ekscesa, jen en la ĉi supra tekstero mia mi simple provas iomete poluri la eldiron de Waringhien enmetante (kaj nur inter rektaj krampoj) la milde eufemisman kvalifikon "bedaurindajn".•

[ii] Chi-apude montrighas fragmento de la Z letero al Borovko (vidu LZI, p. 345^a).

Nu, ja estas vere bedaurinde, ke la simpleco de la angla alfabeto (kaj de la latina) shajne ne jhetighis en la okulojn de Z samtempe kaj egale forte, draste kaj bon-efike kiel la simpleco de la angla gramatiko. •

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en la infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de la gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko jhetighis en miajn okulojn, precipe dank'al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝadi al mia nevo. Sed la ĝiantaj* vortaroj ne lasadis min trankvila.

[iii] Iam, antaŭ jam tre multaj jaroj, mi deziris presigi broshureton kun ĉapeloj en mezgranda hispana urbo, kaj la presisto rifuzis, kaj krome kun miro demandis min: "Sed, ĉu vi estas masohhistoj? ĉu Kial jheti shtonojn kontraŭ propran tegmenton?". [Hispanajho, kun signifo "agi kontraŭ sin mem"].

Kaj tio sama okazis al mi multajn jarojn poste, jam en la komputil-epoko, kvankam ĉi foje per iom kruda kaj moka galegalingva esprimo: "¿Xa vés outra vez coa carallada dos teus circunflexos?" (= Nu, ĉu ci ree venas kun la kacajho de ciaz cirkumfleksoj?) [*]

Nu, kaj kiel la jhusa anekdoto pruvas, jam de kelkaj 10-15 jaroj, kaj danke al la abundego da ĉie kaj ĉiam disponataj komputiloj, jen tajpado, kompostado kaj presado en Esperanto (kaj en relative multaj lingvoj, ja tamen ankore ne en ĉiuj) trovighas sur la vojo al senproblemeo.

Sed homoj ne plu junaj, kiel mi, ankore kun hororo memoras pri tiuj tempoj en ĉiuj, unaflanke, foje ech oni ne disponis tajpilojn per ĉiuj oni povus almeti supersignoj, ne eblis presigi chapelitajn literojn en ne-specialigitaj presejoj; duaflanke, nia pastraro daŭre rifuzis (kaj fakte, plu daŭre rifuzas) malfermi siajn paghojn ech al la oficiale surogata *h*-alfabeto; kaj, triaflanke, silente kaj sekrete devis akcepti la profunde vundigan pravecon de la mokado de idistoj, interlingua-istoj ks., "Ja jes, Esperanto; jen la lingvo pri kiu ili multe parolas, sed kiun ili ne povas skribe prezenti".

En *** temas pri E en la komputila mondo. •

[*] La maldecetaj galegaj vortoj "carallo = kaco", "carallada = kacajho" (kiel anke la respondaj kastiliaj "carajo", "carajada") ja apartenas propre al la vulgara kaj familiara lingvajho kaj, kiel tiaj, povas havi ech multajn signifojn, mem dependajn de kunteksto, intonacio, situacio, ktp. Rilate ĉi vortojn temas jen pri la plezuro uzi

maldecetan vorton lau ghia propra senco, jen ghin uzi idiomajhe kun nuancoj pri moko kaj/au malshato kaj/au malestimo kaj/au gheno, ktp.

(Tion chifoje diris al mi ne presejestro, sed tajpisto. Similajn esprimojn, kiel anke malaprobajn kaj ghenatajn rigardojn, li diris au montris al mi plurfoje, okaze de pretigado por preso la du solajn librojn kiujn sukcesis eldoni mia fiaskinta projekto K+E (vidu ***)). Rimarko.- Por pli bone kompreni pri la gheno kiun chapelitoj kauzis al li, oni konsideru, ke ili konsistigis plian kazon kiu nur pligravigis la chiam al-mene difuzan, kaj ofte laute eksplicitan ghenon kaj malkontenton kiujn la (ja neevitebla) bezono uzadi diakritojn naskas en (preske) chiuj lernejoj, liceanoj, tajpistoj, jhurnalistoj, ech verkistoj, tiel en la hispana kiel en la galega. •

(2.4.3) Chi-apude montrighas aliu fragmento de la letero de Z al Borovko (j. 1895^a), konata per la nomo "Letero pri la deveno de E" (kaj en kiu trovighas i.a. la strofo ***). (LZI, p. 350^a).

En chi tekstero reliefighas, unu-flanke, gravaj kaj kortushaj informeroj pri la intelekta, spirita kaj materia

de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro (« D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro »), kaj komencis serĉadi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la finanĉan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigadis mian broŝuron por eldono kaj fine — rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je « flankaj aferoj »; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan** trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj ... mi transiris Rubikonon.

vivo de Z, kaj, aliflanke, teknika demando, nome, 'kion entute povus pretigadi dum duonjaro la eventuala eldonanto, kaj 'kial li fine rifuzis.

Nu, mi konas neniun informon au supozon pri la kauzo de tiu rifuzo, sed mi certas ke ni chiuj certas ke en tio ne temis pri helpa laboro redakta au editora pri nura 40-pagha broŝuro sed ke, simple, temis pri presisto-eldonanto kiu longe pretigadis la presadon de la verko, t.e., kiu sin okupis ĉefe pri la tre malfacila teknika problemo, t.e., la peniga kaj temporaba kompostado de verko en nekonata lingvo, kun strangaj literoj, postulanta novajn tipojn almenaŭ por la diakritoj, krome postulanta en chi lasta alternativo anke chiupashan permanan kombinadon de literoj, diakritoj kaj apartigaj signetoj por chiu unopa aparta kompleksa litero (ja ghuste kiel ni vidis en la posta laboro de Kelter).

Che tiaj eventualaj neagrablaj laborkondicho, certe rifuzado ne estus ne-esperebla, kaj des pli se la pretiganto ne esperus pri bona gajno. Krome, ni devas kalkuli anke pri la eventualo ke la pretiganto ne esperus pri la estonteco de la afe-

ro, au, simple, ke li, char fakulo pri presado, gapante ne povus kompreni kaj/au konsenti ke la nova lingvo, propravole kaj plenkonscie, metus al si obstaklojn por ekiro kaj por irado (au, laŭ la esprimo de lia posta kolego hispana, "volus jheti shtonojn kontraŭ sian propran tegmenton", vidu ***); kaj, che pli profunda penso, ke tia volata komplikigo ne koheras kun la celo de interlingvo, eĉ ne kun la strukturo de la lingvo mem, celanta al maksimuma simpleco.

Kadre de tia supozo, la aserto de Z "Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldol an praktikon de la vivo, la finanĉan demandon, kun kiu mi ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali" volus kashi la informon ke "Mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan konstaton, ke mia alfabeto estas nek simpla nek oportuna per si mem, kaj ke, krome, ĝi postulas tro grandan elspezon se oni entute trovas presiston pretan komposti kaj presi per ĝi."

Se tiaj estas la okazintaj faktoj, jen ili konsistigis por Z auguron pri la atendintaj malfaciloj se li persistus sur tiu vojo. Tial, ŝajnas al mi, reshprucas kun pli da forto la demandoj kaj komentoj pri kiuj temas en ***.

Mi daŭre ne sukcesas komprenigi al mi 'kial malgraŭ la malfaciloj presaj kaj finanĉaj kiujn li ĉie kaj ĉiam renkontis, jen tamen Z obstine persistis dum sia tuta vivo pri siaj komplikigaj literoj (nur en la fino li konsentis veni al ia kompromiso), kaj ke li tiele komplikigis anke la tutan postan vivon de sia lingvo, la propran vivon kaj tiun de la lingvo-uzantoj.

Negrave ĉu tio ĵus dirita plene aŭ nur parte trafas pri la okazintaj faktoj, jen ni venas al la konkludo ke la obstakladon al la vivo de sia lingvo muntis Z mem, scie kaj konscie, jam antaŭ la publika apero de la lingvo en julio 1887^a. (Mi ja volonte allasas, ke Z forse havis kialojn por enkonduki chapelojn, sed li ilin neniam prezentis, des maspli konvinke. Kaj mi ja allasas anke, ke li forse esperis ke oni entuziasme akceptos liajn chapelojn aŭ, almenaŭ, ke li sukcesos facile venki ĉian eventualan kontraŭstaron al ili, sed, jen, liaj esperoj tuj kaj automate montrighis senbazaj kaj tial vanaj.

(3) Pri la dua alfabeto de E.

(3.1) Laŭ sia plano en UL, Z publicus nenion novan en la jaro 1888^a, en atendo de la eventualaj modifoj kiuj montrighos konvenaj por la lingvo.

Tamen, en januaro 1888^a li publicis, jam rekte en E, sian *Dua Libro de l' lingvo Internacia*, *Kajero N^o 1*, kaj en junio 1888^a *Aldono al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia"*. (Vidu OV p. 21^a-29^a, kaj p. 29^a-40^a).

(3.2) En la antaŭparolo al DL, Z informas ke de ĉiuj flankoj alvenadis al li tiom da demandoj pri lia lingvo kaj da petoj pri pli da verkoj, ke li ne povis ne publiki tuj tiun DL jam rekte en E kaj sub formo de pluraj kajeroj kiel tiu N^o 1, do kun respondoj al ĉiuj demandoj kaj kun sufiche da materialo por legi, lerni kaj ripeti, tiel ke oni povu ĉiuflanke konighi la lingvon, ĝin ellerni pli rapide kaj uzi ĝin.

En tiu antaŭparolo Z diras "Mi ne volas esti *kreinto* de l' lingvo, mi volas nur esti *iniciatoro*" (OV, p. 26^a), kaj aldone prezentas sian penson, ke se ia kompetenta

instruita akademio el tiuj jam konataj sciigos lin ke ghi volas preni sur sin la laboron pri la fina formo de l' lingvo internacia, jen li transdonos al ghi sian tutan materialon, kaj li tiele farighos simpla amiko de l' lingvo internacia, kiel chiu alia amiko. Sed ke se nenia akademio volos pri tia tasko, li ja daurigos kun la plano lau UL, kaj antaŭ la fino de tiu 1888^a li decidis mem la finan formon de l' lingvo, kaj sciigos, ke la lingvo estas preta.

(3.3) En ADL Z informas ke...

- En la fino de l' jaro 1887^a, antaŭ la ricevo de lia libreto [=UL], la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio (The American Philosophical Society) elektis komitaton pri la demando de lingvo internacia, kaj ke la komitato venis al la decido [nu, konkludo] ke tia lingvo estas kreebla, estas necesa, havu gramatikon plej simplan kaj naturan kaj ortografion kaj fonetikon plej simplan kun vortoj agrablaj por la orelo; ghia vortaro estu kreita el vortoj pli-malpli rekoneblaj por la plej gravaj civilizitaj popoloj; ke la fina formo de tia lingvo estu frukto de l' laboroj ne de unu persono, sed de la tuta instruita mondo.

- Ke surbaze de tio jhus dirita, tiu Filozofia Societo decidis dissendi al chiu instruitaj societoj la proponon fari internacian kongreson de instruituloj por decidi la finan formon de lingvo tutmonda.

- S-ro H. Philips, un el la tri anoj de la supre dirita komitato, sin esprimas plej favore al Lingvo Internacia ĉar la plej simpla kaj racionala propono konata, kaj montras "kelkajn punktojn kiuj lau lia jugho devus esti shanghitaj". (OV, p. 31^a).

Rimarko.- Z ne diras (kaj neniam poste diris), pri 'kiuj punktoj temis (ĉar tia informo certe estus neoportuna), kiel anke ne, 'ĉu Philips faris konkretajn proponojn au sugestojn pri la konsisto de la koncernaj shanghoj. •

(3.5) Post tiaj informoj, Z reprenas samloke siajn pensojn:

- "La kvar anoj, kiujn proponas sinjoro H. Ph., estas teorie tre bonaj, sed mi jam mem antaŭ kelkaj jaroj pensis pri ili kaj mi trovis, ke praktike ili estus tre maloportunaj. Pli vastan mian juon pri ili kaj pri iuj proponitaj anoj mi prezentos al la kongreso, se tiu ĉi efektivi os... . [Z neniam plidetalis pri ĉi afero].

- "Sciigante... pri la intencita internacia kongreso... la tuta sorto de l' lingvo internacia de nun transiras en la manojn de l' kongreso, kaj la fina formo, kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti le donanta... se la kongreso e trovus necesa an i la lingvon is nere konebleco. Mia rolo nun estas finita, kaj mia persono tute foriras de la sceno".

- "... ar la kongreso povas ankora ne efektivi i, kaj se ĉi efektivi os, povas ankora okazi, ke ĉi donos neniajn praktikajn rezultatojn. Tial ni devas labori diligente la la vojo, kiun ni jam unu fojon elektis...".

- " iujn anojn, kiujn oni proponis al mi, kaj mian personan juon pri ili – mi prezentos nun jam ne al la publiko, sed al la estonta kongreso".

- "La eldonado de la ceteraj kajeroj de la "Dua Libro" nun jam tial ne estas bezona".

- " ion, kion mi de nun faros a skribos, mi in ion faros jam kiel simpla privata amiko de la lingvo internacia, havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj au materialaj privilegioj, ol iu alia".

- " ... mi donos tie, unu fojon por iam, respondojn je kelkaj demandoj tu- antaj la lingvon kaj ian estontecon".

(3.6) Post tio resume citita en **(3.5)**, jen Z abrupte pasas al aro da numeritaj aferoj (OV, p. 32^a):

1. La lingvo internacia restas en la formo de li proponita. Li ne plu havas privilegion fari anojn en i. Tiu privilegio apartenas al la esperata internacia kongreso de instruituloj. Se la kongreso ne efektivos, jen ne pli frue ol post kvin jaroj la amikoj de l' lingvo internacia faros mem internacian kongreson, kiu havos la privilegion fari en la lingvo anojn kaj bonigojn.

2. "La sola anoj, kiun mi trovas necesa fari mem, estas: anstata "ian", "ian", "kian", "nenian", "tian" – devas esti: "iam", "iam", "kiam", "neniam", "tiam" (por malegaligi la vortojn "ian" etc. kaj "ia/n" etc)".

3. Se ia el la tipografioj ne povas presi verkojn kun signetoj superliteraj (^) kaj (˘), ĝi povas anstataŭigi la signeton (^) per la litero „h“ kaj la signeton (˘) tute ne uzadi. Sed en la komenco de tia verko devas estis presita: „ch = ĉ; gh = ĝ; hh = ĥ; jh = ĵ; sh = ŝ“. Se oni bezonas presi ion kun signetoj internaj (,), oni devas ĝin fari garde, ke la leganto ne prenu ilin por komoj (,). Anstataŭ la signeto (,) oni povos ankaŭ presadi (') aŭ (-). Ekzemple: sign_,et_,o — sign'et'o — sign-et-o.

(Tion sekvas punktoj 4., 5., 6., 7., por ni negravaj).

(3.7) Ni komentu pri **(3.6)**:

(a) Klaras, ke tiuj aferoj abrupte enkondukitaj estas adresitaj tiel al la amikoj de la lingvo kiel al la esperata instruitula kongreso, kaj ke ili estas hibridaj el propono kaj el informo.

(b) Efektive, la korelaciaj temp-adverboj aperis en UL kun fina litero "n", do, konfuzebaj kun akuzativaj adjektivoj. "Ke tiel evidentan difekton –la solan kaj e- nan homonimon en la tiama lingvo– Zamenhof ne rimarkis anta la publikigo, estas io al mi nekomprenebla" (LV, p. 52^a).

Mia komento: Ja tre pli nekompreneble estas ke, ŝajne, Z ne rimarkis la evidentegan difektagon de siaj specialaj literoj.

(c) Punkto 3. estas tiu grava por chi paghoj.

(c.1) En tiu alineo esence kunrolas du malsamaj signifoj de la vorto "povas" (kio estas chiupasha afero anke en la latinidaj lingvoj, malpli ofta en la angla, kaj malofta en la germana), jene:

- "Tipografio ne povas presi" (= malhavas kapablon) = H "no puede"; A "cannot", "isn't able"; G "kann nicht".
- "Tipografio povas anstata igi" (= havas permeson/ rajton; rajtas) = H "puede", A "may", "is allowed", "can"; G "darf".

Rimarko.- Vidu en *** la nacilingvaj FE-versiojn de chi regulo pri alfabeto-surogato. •

(c.2) Jen unafaje Z agnoskas ke, efektive, [multaj] presejoj [tute] ne *povas/ ne kapablas* presi E tekstojn, manke de ties specialaj literoj.

Klaras, ke en la penso de Z, jen tiu *povas/ rajtas/ estas permesataj* konsistigas nuran provizoran permeson, ja en espero/ supozo/ atendo ke chiuj presejoj balde achetos la koncernajn tipojn, tiel ke fine oni povos chie kaj chiam senprobleme presigi kaj presi nur per la norma alfabeto lau UL.

Do, por man-skribado kaj por tajpado daure restas nur la UL-normo.

Rimarkoj.- [i] Jen malgrava afero, tamen direnda: En la averto pri uzado de tiu alfabeto-surogato, devus esti presita anke "*u = u/*". •

[ii] Z kaj chiuj defendantoj de chapel-alfabeto chion dependigas, shajne, nur de havado au nehavado de la specialaj literoj (fine, ech nur de tio, 'chu oni disponas au oni ne disponas monon por acheti la koncernajn tipojn): Nu, ech havado estas nura una pasho, char mankas ankore la bezono trejnighadi pri ties uzado... kaj akcepti masihosmadi pere de ili. (Vidu chi supre, pri la ghenata tajpisto ***). •

[iii] Rimarkindas ke ech por chi surogata kaj lauespere nur-provizora alfabeto, jen Z daure ne uzas la tamen liberajn latinajn literojn *q, w, x, y* (mem ekzistantajn senescepte en chiu latin-litera tipujaro). Kaj en tio estas ech surprize ke li ne elektis la literon "w" por la sono " " .


[iv] Mi supozas ke chiu tiama au posta leginto tiun alineon 3. tuj pensis/as ke tia nur parta allaso de dua alfabeto, krome nur en surogata, lauespere nur provizora rolo, estas kvaze skizofrenia decido, kaj ke estus saghe kaj ne tre malfacile al Z iom shanghi ties redakton por ke fakte temu pri enkonduko de dua, plenrajta alternativa alfabeto, tiel ke chiu homo kaj ne nur presejoj rajtu libere elekti jen chapelon, jen *h*, kaj lasi al la lingvovivo mem la decidon pri definitiva arango, jen per un sola au jen per ambaj alfabetoj kune (forse, ech per miksado ilin en un sama teksto).

Tian aranghon oficiale confirmis FE, kaj dauris tra la tuta vivo de Z, kvankam chiam per malkreskanta forto, ghis nur en la j. 1908^a li proponis grandan cedon tiurilate al la Akademio –kiu, tamen, definitive iris tute alian vojon. (Vidu *** kaj ***). (Vidu ***). •

[iii] Lau mia kompreno, nu, ghuste en la naskigho-momento de *h*-alfabeto, jen la ankore nur-unjara chapelozaj alfabetoj abrupte arkaikighis, unfrape kaj absolute, kaj ghi povis/as plu vivi nur per kaj pro masohhismado de Z mem kaj de la tuta E-uzantaro. •

[iv] Jam en la komenca rimarko mi diris, ke ofte la nura tostado je sano, felicho kaj longa vivo de la chapelista moshtaro ne sufichas por min kvietigi. Nu, tiukaze mi provas min helpi anke per ia (fusha) rimajho, au (fusha) desegnajho, au (mis-harmonia) fajfado, ktp.

Specimene, jen du el la konsoliloj kiujn mi muntis por mi mem dum tajpado chi paghojn:

 <p>Kur[^]suo CAPELO[^] kaj ĝia interna, sekreta sprono (Unikode-registrita)</p>	<p>"Lau PAG §3, chapelumado estas simpla kaj oportuna sistemo por sonprezentado", jen la frap-frazo per kiu la Akademio de Esperanto jhus sin turnis al la brita registaro kun propono pri alfabet-reformo (de la angla, kompreneble). (BBC-News).</p> <p>Ekzemplo pri la ĉapeloza reformo proponata por la angla alfabeto:</p> <p>A sharpshooter in the church A ŝarpŝooter in the ĉurĉ</p>
---	--

(Char mi tre malbone desegnas, jen mi ne kuraghas meti chi tien trian specimenon: Temas pri grandega kulo, kiu kun feroca mieno, kaj kun duobla pikilo chapelforma min alsaltas). (La ideon tion "verki" donacis al mi bando da kuloj kiu min atakis en varma, humida somernokto, dum mi tajpis por chi paghoj).•

[v] Ni konstatu kun bedauro ke tre probablas ke chi paghoj, kvankam ple-dantaj por forigo de masohismado inter ni, jen tamen enhavas mem multe da masohismado mia propra.•

<p>(3.2) Chi-apude montrig-has kontrastaj</p>	<p>ar i ore etu in a tuj... char ghi hhore jhetu shin au tuj...</p>	<p>e o an o iu a - de ehhoshangho chiuujhaude</p>
--	---	---

ekzemploj pri uzado de ambaj alfabetoj.

La duan, koncizan ekzemplon, mi cherpis el Wennergren en la interreto. Kvankam la una esprimo propre estas sensenca, mi tamen ghin preferas char en ghi rolas chiu speciala litero en aparta vorto (kaj lau ties ordo en la alfabeto); krome, mi almetas "tuj" char ghi utilos al ni che kontrastigado alies pliajn proponojn por la alfabeto.

(3.2) Tia nur-parta permeso pri surogata alfabeto (aperinta post nuraj kelkaj 10-12 monatoj post la apero de UL) estas drasta pruvo pri la tuja shprucado –histo-

rie abunde atestata— de lavango da miro, plendoj kaj protestoj kontraŭ la norma alfabeto. (Estas ja certe, ke anke multaj kaj fortaj apogoj al ĝi ekzistis, sed por la celo mem de internacia lingvo, certe multe pli bone estus, se nur fortaj apogoj ekzistus). [Absolute simpla alfabeto ja estas kroma nuntempa plenrajta atuto de la angla].

(3.3) Veras, anke, ke tiu surogata alfabeto, kvankam principe akceptita de multaj kun sento de liberigho, jen tamen siavice tuj naskis lavangon da miro, plendoj kaj protestoj, kun balda rezulto, ke estighis massohisma kaj skizofrenia disdivido de la E-uzantaro al tri grupoj kun respektivaj etosoj, nome, tiu kiun ni priskribu per la intima devizo "¡Vivon al chapelaro, morton al *h*-alfabeto!", dua grupo siavice dividita al multaj subgrupoj, chiu kun "komuna" devizo "¡Morton al chapelaro, morton al *h*-alfabeto, vivon nur al mia reformo-propono!" kaj tria kies intima devizo estis "¡Vivon egalrajtan anke al *h*-alfabeto!" sed kiu sub la premo de la du aliaj grupoj, tre pli potencaj (ĉefe la una el ili), devis kashi sian preferon kaj alighi al iu aliu. (Fakte, ech nuntempe ankore dauras tia etoso, lau kiu dezirantoj au simplaj preferantoj pri *h*-alfabeto estas kun malshato konsiderataj iaj sensciuloj kaj/au herezuloj kaj/au faktaj malamikoj de E kiujn laueble oni ekzilu).

(3.3.1) Nu, kiel jam supre dirite, mi konas nenian Z klarigon au argumenton pri lia enkonduko de specialaj literoj, kiel anke ne pri neuzado de la latinaj literoj *q*, *w*, *x*, *y*.

Sed, iomete diference, jen kelkaj [kvazaj] argumentoj aperis por kondamno au ne-prefero de *h*-alfabeto. Lau mia kompreno, jenaj tri estas tiuj ĉefaj el ili:

(a) La argumentoj dirantaj ke chapelhava literaro estas simpla kaj oportuna solvo, perfekte adaptita al la son-sistemo de la lingvo ("al un sono, un litero; kaj reciproke"); ke ja estus nekohera ke interlingvo konscie planita bezonus digramojn por montri al siaj sonoj; ke, krome, chapelitoj estas belaj; ke, krome, ili individuigas esperanton inter la amaso da aliaj lingvoj.

Sekve, *h*-alfabeto estu kondamnita.

(b) La argumentoj dirantaj, ke estas vero, ke multaj lingvoj uzas digramojn *ch*, *gh*, *sh*, sed neniu uzas *hh*, *jh*. Ke, krome, ech tiuj la digramoj fakte uzataj ne havas la saman sonon en chiu lingvo; kaj en tio pleje elstaras la "nekongruajho", ke "gh" estas uzata en la itala ortografio por montri al sono "g" antaŭ "e", "i", kaj en E ĝi montrus chiukaze al " ".

Sekve, *h*-alfabeto estu kondamnita; almenaŭ, kondamno iru al *gh*, *hh*, *jh*.

(c) La argumentoj dirantaj, ke:

-- *h*-alfabeto enkondukus eblojn de mistranĉoj kaj, sekve, de miskompreno (kiel en "majhoro", kiu respondus jen al "ma oro", jen al "maj-horo")

-- Ke, krome, ĝi enkondukus ghenojn ĉe vorto-divido fine de skrib-linio (kiel en la eventuala bezono skribi "maj--horo" anstataŭ la ĝhustan "majh--oro").

Che alveno de komputil-programoj por automata divido che lini-fino, la afero ighus pli riska, ĉar programoj ne povas distingi la ĝhustan dividon en ĉiu unopa kazo.

-- Ke, krome, ĝhi portus al malsamaj alfabetaj ordoj. Kaj anke en rilato al tio ĉi ni devas distingi ĉu temas pri permana au per komputil-programa ordigo.

Sekve, *h*-alfabeto estu kondamnita.

Ekzemplo.- Lau la ordo en la vortaro de FE ni havas *pas'*, *pa '*, *paser'*, *past'*, *pa t'*, *pastr'*.- Lau la ordo en PIV ni havas *pas/i*, *paser/o*, *past/o*, *pastr/o*, *pa /i*, *pa t/i*.- Per digramoj (supoze ke oni konsideras ĉiun literon aparta) oni venus al *pas/i*, *paser/o*, *pash/i*, *pasht/i*, *past/o*, *pastr/o*.•

(3.3.2) Ni komentu pri la kvazaj argumentoj de **(3.3.1)**:

(a)' Chapelitoj estas nek simplaj nek oportunaj. Ja digramoj konsistigas nekoherajhon en interlingvo, sed anke chapeluloj konsistigas nekoherajhon, certe ne malpli skandalan ol digramoj. Ja tre eblas, ke chapelitoj estas belaj por iuj, sed tio neniel estas argumento por ties enkonduko (ech se ĉiu uzanto kaj ĉiu varboto tiel sentus au opinius pri ili). Eventuala individuigo de la lingvo inter ĉiuj ceteraj lingvoj pere de chapelitoj neniel estas argumento au atuto; krome, ja ofte okazas ke temas pri mis-individuigo, ĉar mem kontraupropaganda por la lingvo.

Sekve, oni ne hastu pri kondamno: La lingvo naskighis tiel, kiel ĝhi naskighis, kaj estas tia, kia ĝhi estas. Nu, de tio sekvas nur, ke oni ne devas celi ian neatingeblan idealan solvon, sed kontentighi per la solvo malplej malbona ebla, kun nura kondicho, ke temu pri solvo akceptebla bona.

(b)' Ĉi kvazan argumenton mi daure komprenas, eufemisme dirite, sensencaĵo, ĉar apene ekzistas un simpla latina litero kiu havus la saman sonon en ĉiuj lingvoj, kaj tial ne ekzistas kialo ke, diference, jen digramoj koincidu ĉiulingve.

Por ekzemplo, jen *c*, *g*, *h*, *j*, *v*, *z* havas malsamajn sonojn en E kaj en la hispana; *a*, *e*, *i*, *o*, *u*, *c*, *g*, *j* havas malsamajn en E kaj en la angla; *e*, *u*, *c*, *g*, *h*, *j* havas malsamajn sonojn en E kaj en la franca, ktp., ktp., ktp.

Cetere, ekzemple, la hispana havas la digramojn *ch*, *ll*, *rr*, sed ne *sh*, do, anke pri nura havado tiel de literoj kiel de digramoj la lingvoj ĝhenerale ne koincidas.

(c)' Ĉi lasta kvaza argumento bezonas kaj meritas pli da atento:

-- Evidente, digramo enkondukas eblon de mistranĉoj, kaj tial de miskomprenoj. Sed okazas jena faktoj-duopo (vidu ***): Unaflanke, la ordinara, jam denaske la chapelozaj E estas ech ekscese richa je ebloj pri mistranĉoj kaj facilaj kalemburoj. Duaflanke, jen ĝhuste okazas, ke pere de la E digramoj estas apene eble munti kalemburon, tiel ke per ili apene povus shpruci pliaj ebloj de mistranĉoj.

Cetere, kontrau tiu maloftega eblo che digramoj oni luktas per la samaj rimedoj kiel che oftega eblo che la simplaj literoj, t.e., almetante che bezono divid-strekon au apostrofon (*diveno* apud *di-veno*, *di'veno*, kaj *majhoro* apud *maj-horo*, *maj'horo*, au *senegala* kaj *sen'egala*), au aliigante la kunmetitan vorton al du au tri vor-

toj (*dia veno, veno de dio, maja horo, horo de majo, temo-sena, egalo-sena, kiu ne havas egalan...*).

-- Por vorto-divido che lini-fino principe oni apartigu per plenaj silaboj, do jen unflanke *ma-jhoro* au *majho-ro*, jen aliflanke maj-horo.

Che komputil-programoj estas bone konata kaj uzata la solvo, ke che kazo duba por la programo, jen tiu chi demandas la tajpanton pri la ghusta divido. (Cetero, ech se oni fushe dividas (kiel, ekzemple, *mus-ho* anstat *mu-sho*), jen tamen ne shprucas kompren-problemo).

-- Jes ja, kaj supoze ke oni ne almetus adekvatajn au konvenciajn rimedojn, oni venus al malsamaj alfabetaj ordoj: Nu, rilate ordo-malsamecon, anke tio chi prezentas nenian specialan problemon por homa au por komputila manipulado!

Ekzemplo.- Tradicie, la hispanajn digramojn oni manipulis jene (ekzemple, en la *Diccionario (= Vortaro)* de la Hispana Akademio): *ch* kaj *ll* estis gramatike konsiderataj ne nur digramoj, sed anke kvaze simplaj, unblokaj apartaj literoj apartenantaj al la alfabeto (respektive sekvantaj al *c* kaj *l*); *rr* (aperanta nur vortomeze) ne estis gramatike konsiderata digramo, sed nura literduopo, ne apartenanta al la alfabeto, tiel ke che alfabeto ordigo oni ghin konsideris kvaze du apartaj, memstaraj literoj. (Krome, sed jam ekster nia temo, la tildohava "ñ" ja estis chiucele plia simpla litero, en la alfabeto venanta post nuda "n". Plu krome, kornohavaj vokaloj "á, é, í, ó, ú", anke tremahava "ü" estis simple alternativa skriba formo de la nudaj vokaloj, mem ne apartenantaj al la alfabeto, kaj che alfabeto ordigo venantaj tuj post la koncerna nuda vokalo).•

Ekzemplo pri tia alfabeto ordo: *cace, cada, caza, cacho, cuna, chato; cada, calma, caza, calle, cuna, lana, luna, llama; parque, parra, parsi*.•

En la jaroj 1966^a-1967^a, María Moliner publicis la du volumojn de sia fama *Uz-vortaro de la hispana [lingvo]*, kiu por alfabeto ordigo konsideras chiun el tiuj digramoj nuraj literduopoj konsistantaj el kvaze du apartaj, memstaraj literoj. (Ja tamen, sen shangho pri "ñ" kaj pri la diakritohavaj vokaloj).

Ekzemplo pri chi nova alfabeto ordo: La jhusa ekzemplo aliighas al *cace, cada, cacho, caza, chato, cuna; cada, calma, calle, caza, cuna, lana, llama, luna; parque, parra, parsi* (che *rr*, ja koincide kun la antaŭa arangho).•

Kaj ekde la jaro 1994^a anke la Hispana Akademio sekvas la aranghon de Moliner en sia *Vortaro*.

Kaj mi certigas, ke de tio nenia katastrofo okazis; ech ne katastrofeto –escepte nur de iuj plendoj kontraŭ la nova, netradicia ordo.•

(3.8) LR, p. 45^a-48^a, prezentas kvin respondojn rilatajn al la surogata alfabeto; el tiuj, la kvar unaj estas antaŭaj al la flanko reform-projekto de 1894^a, kaj la lasta estas el 1908^a, do posta al la oficialigo de FE.

Jen, skanite kaj lau kronologia ordo, la kvar unaj respondoj, kaj miaj komentoj pri ili. Pri la kvina respondo vidu ***.

(3.2.1)

58 PRI LA ELEKTO INTER « H » KAJ SUPERSIGNITAJ LITEROJ

A La uzado de *ch* k. t. p. anstataŭ *ĉ* k.t.p. estas enkondukita nur por la presejoj, kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj, sed en *skribado* mi konsilas al vi ĉiam uzi pli

bone *ĉ* anstataŭ *ch*, ĉar la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj. Vi diras, ke la signetoj superliteraj estas maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina havas ja ankaŭ kelkajn literojn kun signetoj superliniaj (i, j, t), kaj la plej granda parto de la lingvoj, kiuj uzas la alfabeton latinan, havas ankoraŭ amason da aliaj literoj kun signetoj superliniaj kaj subliniaj. Certe ia akademio aŭ kongreso penos iam elpensi pli oportunajn skribajn formojn por kelkaj literoj (ĉar ne sole la literoj kun signetoj sed ankaŭ multaj aliaj literoj havas formon tre maloportunan); sed tio ĉi estas jam tute alia demando, kiu la lingvon mem tute ne tuŝas; ĝi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado.

La Esperantisto, 1889, p. 15.

Miaj komentoj:

(a) Konfirmighas ke, principe, temis pri permeso nur al la presejoj "ankore" ne havantaj literojn kun signetoj, sed jen li malfermas nun la pordon al uzado de *h*-alfabeto anke por manskribado [kaj tajpado], ech se tio ne estas konsilinda.

(b) Malgrau la decide klara tamen nur-formala Z aserto, jen " " **neniel** estas "un" litero en la sama senco lau kiu "c" au "m" poe estas *un* litero, t.e., *un* simpla *unstreka* signo, krome rekte ligebla che manskribado kun literoj antaŭa kaj posta. Chapelulo estas signo pli kompleksa kaj pli malfacile uzebla krajone kaj tajpe ol *du* sinsekvaj literoj *ch*. (Duonsherce, duonserioze, oni povas diri ke lau komplekseco ghi egalas al du literoj kaj duono). Nomi chi-kuntekste *un litero* tian kompleksajhon estas, milde dirite, nura jhongla vortosherco; fakte, temas pri la una ero de muntata sofismo (vidu tuj).

Cetere, ja estas ech freneze kaj frenezige enkonduki du malsamajn alfabetojn (ech se temus nur pri provizora arango), lau tio ke manskribado okazu per chapeluloj se temas pri definitiva teksto au pri originalo por richega presejo, sed per surgato se temas pri originalo por malricha presejo.

(c) Uzado de *un* litero por *un* sono ja estas pli logika ol *du* literoj por *un* sono. Krome, tre pli gravaj ol logikeco en la kadro de interlingvo estas simpleco kaj oportuneco.

Kaj jen, tio, kiu kauzis la demandon kiun Z nur shajne respondas estas, ghus-te, neekzisto en E de po *un* simpla kaj oportuna litero por difinitaj sonoj. (Kaj jen vidighas dua sofismo).

(d) La esprimo "... maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina... kaj la plej granda parto de la lingvoj..." estas la tria kaj lasta, sed nur intencita sofismo (tiel ke la sofismo ech ne povas kompletighi), char tiu esprimo fakte signifas "... maloportunaj en la skribado. **Konsentite**. Sed **anke** la alfabeto pure latina... kaj la plej granda parto de la lingvoj...".

Por kompreno tiun aferon neniel gravas 'chu Z preterlasis tiujn du adverbojn intence au senaverte au simple pro stil-glateco. Kio gravas ja estas ke Z agnoskas ke uzado de chapeluloj estas maloportuna arango kadre de internacia lingvo (char E ja neniel volus nek povus enmiksighi en la suverenajn internajn decidojn de naciaj lingvoj).

(e) La fakto ke multaj lingvoj decidas havi pro sia suverena rajto literojn kun formoj maloportunaj, au ech tre maloportunaj, neniel povus esti sugesto au pravigo pri imita enkonduko de maloportunaj literoj en la interlingvon; tute male, saghecho trudas, ke tiu fakto estu instigo kaj stimulo nur al enkonduko de oportunaj, laueble komunaj simplaj literoj.

Ja tre povus esti, ke krom tia nura pli-malpli ekzakta imitado de alilingvaj neoportunajhoj jen ekzistas pli profundaj kialoj kaj argumentoj praviguntaj tian imitadon, sed, jen, tiuj necesaj argumentoj absolute mankas.

Pli konkrete: Ech se chapeluloj ekzistus senprobleme en chiuj presejoj, jen daure pli oportunus por interlingvo ilin ne uzi, kaj tial estus fushe ilin uzi. Kaj se, plie, temas pri chapeloj ne jam ekzistantaj en aliu lingvoj, kaj kiujn oni tial devas speciale farigi nur por tiu lingvo, jen temas pri absoluta fusho.

(f) Ja tre povos esti, ke akademio au kongreso penos iam elpensi pli oportunajn formojn por multaj literoj (kaj, inter ili, ja tiuj "i, j, t" cititaj de Z, do kiel *hijito* au *cántara/ cantara/ cantaré* en la hispana, *intimissimi* en la itala, *dégénééré/ dégénère* en la franca, ktp., ktp), sed che tio, ja prudente kaj preferinde estus, se E decidus ne kreskigi la penon de tiuj eventualaj, estontaj bonfaraj institucioj (kiuj, certe, siatempe dankus tian helpemon flanke de E).

(g) Konsentite, konsentite, certe absolute konsentite, ke tio chi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado: Nu, ghuste pri tio temas, ke la chapeluloj ne estas oportunaj por la skribado, ke la demando celis oportunigon, ke Z diras ke anke aliu lingvoj havas maloportunajhojn, kaj ke li konsilas plu flegadi neoportunajhojn!!!. (Tia falsa forjhomglado de la problema demando ja estis la celo de la intencita sed fiaskinta sofismo).

(h) Konsentite, konsentite, certe absolute konsentite, ke tio chi estas afero kiu la *lingvon mem* tute ne tushas, sed la problemego estas, ke tiu afero, propre fremda al la lingvo, jen tushas kaj obstaklas la *lingvovivon* mem (kaj ghuste pri tiu tute alia afero, nome, pri *lingvovivo* kaj ne pri *lingvo*, temis la demando kiun la 'respondo' ne respondas).

Pli konkrete: Ja estas ech freneze sence, ke aferon kiu la *lingvon mem* tute ne tushas, jen tamen plenascie kaj konscie oni enkonduku por obstaklegi la *lingvovivon*.

Krome: Estas al mi ech iom shoke, ke oni tre ofte parolas pri la lingvo kaj pri la *lingvovivo*, sed apene pri la malfaciloj kaj ghenoj suferataj de la lingvanoj. (Escepteton al tio vidu en ***).

(h) Jen unafaje (kaj, shajne, unikafoje) Z kvaze argumentas por pravigo de chapeluloj kaj, jen, la konkludo logike tirebla de tiu kvaza argumentado estas, simple, ke li ilin enkondukis ĉar tio estis lia suverena rajto, kaj krome tian decidon li volus subteni per sofismo.

(i) Estas tre bedaurinde ke ni ne scias 'kion la demandinto pensis kaj sentis lau lingva kaj morala vidpunktoj che tia "respondo" de Z.

(3.2.2)

57

PRI LA UZADO DE « H » ANSTATAŬ SUPERSIGNO

Multaj plendas, ke la skribado per *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ* kaj *ŭ* estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la « Aldono al la Dua Libro » : anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon *h* kaj anstataŭ *ŭ* — simplan *u*.

La Esperantisto, 1890, p. 32.

Miaj komentoj:

(a) Z klare distingas tie chi inter du malsamaj aferoj, nome, manskribado kaj presado, kaj agnoskas –sen protestoj nek neado– ke ambaj aferoj eventuale estas maloportunaj por iuj.

(b) Li konsilas pri kuragha uzado de la surogata alfabeto en ambaj situacioj.

Nu, ja estas absurde sence, kaj kontraudire kun la celo de interlingvo, ke uzanto la *lingvon bezonus* kuraghon por ghin uzi skribe.

Rimarko.— Kvankam mi sincere opinias, ke komento **(b)** ekzakte sed per pli precizaj vortoj spegulas la enhavon de la lastaj linioj de chi *Respondo*, jen mi tamen pensas anke, ke la vera tiama penso de Z estas tiu lau **(3.2.1)**.•

(3.2.3)**59 PRI ALIAJ ANSTATAŬAĴOJ DE SUPERSIGNITAJ LITEROJ**

Sinjoro F.-V. Lorenc ¹ konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ *h* — apostrofon returnitan post la litero; ekzemple « ac'eti » anstataŭ « aĉeti » aŭ « aĉeti ». De nia flanko ni devas nur peti, ke, se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo ².

La Esperantisto, 1890, p. 54-55.

Piednotoj almetitaj de Warighien:

- (1) Poste idisto, a toro de projekto "Mundial", adepto de Nov-Esperanto, ktp.
- (2) Alian, pli oportunan surogaton vd. en la "Plena Gramatiko" de Kalocsay-Waringhien, 3a eldono, p. 25. [Pri tio chi vidu ***].

Miaj komentoj:

(a) Se jughu objektive tian apostrofadon rilate oportunecon kaj klarecon de skribado, de tajpado, de kompostado, certe temas pri arango pli oportuna kaj pli klara ol chapelumado, sed anke ghi estas neoportuna.

(b) Lau mia subjektiva vidpunkto, kaj ja nur kadre de interlingvo, jen teksto kun multaj tiaj apostrofoj ighas pli malestetika ol teksto kun multaj chapeloj.

(c) Estas al mi iom strange, ke Z pretas akcepti tian surogaton, ech se ne plene vole.

(d) Tie chi ni havas aferon al ano de tiu fekunda sagao, kies devizo estas: "¡Morton al chapeloj, morton al *h*-surogato!". Kadre de tia generala sinteno, jen plejparto de tiuj anoj prezentas proprajn novajn proponojn kiuj anstatus la chapelon, kaj principe malakceptas chiun alies novan proponon.

Lau vidpunkto de teorio (kvankam certe ne lau vidpunkto de la lingvovivo), jen principe nenio malbona donighus en tio, se chiu novismanto provus argumenti kadre de interlingvo pri la preferindeco de sia propono. Sed, kiel ni vidos, ili simple diras: "Cia, malbona; mia, bona".

(e) Demando trudighas: Ni allasu ke Lorenc ne povis kaj/au ne shatis presi per chapelitoj. Nu: ĉ'kiu estis, 'kiu povis esti la kauzo, ke li preferis apostrofon al *h*? Se la nura celo estis ebligi presadon, ja klaras, ke tion oni povis atingi jam per *h*-alfabeto.

(f) La informo ke s-ro Lorenc migradis de un projekto al aliu ne rilatas al la (ne)taugeco de lia propono, kaj mi tial interpretas ke tiu informo simple celas mis-

kreditigi lin, tiele kontribuante al konstruado timigan atmosferon kontraŭ minacantaj herezuloj.

Cetere, rimarkindas ke Ido ja malhavas chapelulojn, kaj tio probable kontribuis altiri s-ron Lorenc al tiu lingvo. (Pri "Mundial" Drezen ne donas detalojn, kaj "Nov-Esperanto"-n ech ne citas).

(3.2.4)

58 Vane vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion (*h* anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos : « por unu sono unu litero » ; kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados *ĉ* anstataŭ *ch* (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata ; sed ni ĝin uzas nur kiel necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua *h* estos absolute ĉesigita. Ne la *ĉ* estas transira ŝtupo al *ch*, sed en la *ch* ni proponis transiran ŝtupon al *ĉ*, kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de *ĉ* estas ankoraŭ teknike^o ne oportuna. Tute vere vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi al la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo al ili, sed nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas pereii. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj : « Se vi ne volas vin konformigi al^{oo} ni, ni vin ne

oʃ(ĝ o) tehniko
oʃ(ĝ oo) je

bezonas » ! La unuatempa permeso presi per *h* estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta ; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari.

La Esperantisto, 1891, p. 15.

Miaj komentoj:

(a) Jen ni havas paradigman ekzemplon de rafinita, polurita masohismado je la kuba potenco (tiel en la demando, kiel en la respondo).

(b) Nun, male al ***, ni havas aferon al ghisostulo, kiu ech timas ke Z perfidos lin, forshtelante de li la chefan bazon de lia ghisostuleco.

(c) La parentezo "(povas nur ... simplan formon)" alportas surprizo-triopon, jene:

- Jen Z finfine agnoskas ke la "unu" litero " " estas nesuficite oportuna (sekve, same che la ceteraj chapeluloj kaj che la arkulo).
- Li ne indikas 'kiaj povus esti tiuj pli simplaj formoj. Nu, mi pensas ke eblas jenaj tri alternativoj:
 - Elimini la diakritulojn kaj anstatigi ilin per tute novaj literoj, vere simplaj (oni povus cherpi el abunda, jam preta stokaro, ekzemple, el $q, x, w, y, l, , , \alpha, \beta, \gamma, \delta, \text{ и, г}$.
 - Elimini la koncernajn sonojn de la lingvo, sekve elimini anke la diakritulojn (kiuj, tiele, ja akirus siajn plej simplajn formojn eblajn), ech se tio postulus amason da shanghoj en la radikaro.
 - Elimini aliujn sonojn de la lingvo (ni diru, ekzemple, tiujn de "c, p, ...", kaj atribui al la tiele liberigitaj literoj la sonojn de la diakrituloj (kio igus superfluaĵi ĉi lastajn, kaj ja kuntrenos ech pli amasan amason da shanghoj en la radikaro).
- Kiu ajn el tiuj alternativoj igus ech pli malfelicha la ghisostulon, ĉar jen Z finfine perfidus lin samtempe dirante al li ke li vane timas/is.

(c) Por mia kompreno kaj sento, estas dispreme stulta la aserto kaj konsento ke "la presejoj kaj telegrafejoj devas sin konformigi al la lingvo kiun ili uzas, kaj ne la lingvo al ili", ĉar ĝuste la malo devus nepre donighi en lingvo kabinete kreita kun la celo ke ĝi farighu interlingvo.

(Kaj ni pliafoje konstata, ke Z daŭre restis shulda dum sia tuta vivo je provizado ian argumenton kiu pravigu la enkondukon de la malsimplaj kaj neoportunaj chapelitoj kaj arkito).

(d) Estas vere fascina tia spektaklo de homoj tiel himerantaj fremdaj al la realo: Efektive, rimarku ke tiaj pseudoargumentoj (por ni jam 120 jarojn oldaj) estas himeraj ech en nia tempo de komputiloj kaj de Unikodo (kvankam ankore nun ili estas ĉiupasse ripetataj al ni kvaze orakola vero).

(e) Aldonajho: La sola fakto ke tiaj argumentaĉoj povis shpruci (kaj, fakte, plu shprucadas) estas draste klara pruvo ke Z fushis pri la alfabeto de sia interlingvo, ĉar che alfabeto saghe kaj adekvate elektita por interlingvo estus ech neimageble ke io tia povus shpruci.

(f) Pro la grandaj meritoj de chi letero en rilato al la masohhismada afero, jen mi atribuas al ghi la unafojan Grandan Oran Premion pri Chapelumado.



KURSŬO ĈAPELO kun interna.
sekreta ORA sprono (UNIKODE-registritu) jo

(3.3) Kvankam eksteraj al la kronologia ordo kiun ni sekvas, jen estas interese meti jam nun tie chi jenajn du komentojn de ludovikito en IE (do, en j. 1979^a):

(3.3.1) Sur p. 94^a li prezentas la Z proponon pri *h*-alfabeto, kaj kronas ghin per jena demando pri la Z rekomendo ke oni avertu komence de la koncerna verko ke temas pri la surogata *h*-alfabeto:

sed se iu presejo povus presi tiel je la komenco, kial ĝi ne povus presi same uzante la ĉapelitajn literojn en la teksto mem?

Miaj komentoj:

(a) Lau objektiva vidpunkto:

Tia demando estas per si mem absurda, sensenca, pli rekte kaj draste gapiga ech ol la enhavo de *** char pri ghi povas jughu ech ajna infano sen ajna scio pri E:

Efektive: Unfoja muntado de nura duon-linio

ch = ; gh = ; hh = ; jh = ; sh = ; u =
u/

estus et-koste farebla, kaj per nur iom da laboro, che kiu ajn ech primitiva presejo, ech se por tio oni bezonus fajli alilingvajjn literojn, kaj/au luti tipo-partojn au ilin ligi per shnuretoj au per shraubetoj, tiel ke por la tuta libro-cetero oni povus spiradi plenlibere, char la koshmaro ne plu hantus iun ajn.

Por kontrasto, ni imagu ke Z postulus nur tiun linieron de la rezignonta eldonanto, de Kelter, de Levinski: Certe chiuuj tri sentus sin felichaj char neniam problemo tiukaze shprucus... kaj ili kune kun Z mem venus al la konkludo, ke endus chesi petoli pri/per chapeloj, kaj veni sur saghan vojon.

Krome: Ech supoze ke la presejo disponus tiujn specialajn literojn en la tipujaro, nu, tio ne kuntrenus ties oportunecon por uzado, char disponado ja estas afero

tute alia ol trejnighado pri ilia faka manipulado, kaj anke alia ol efektiva kompostado per ili.

(b) Lau subjektiva vidpunkto: Per tia demando, jen ludovikito spitis sian saghon, sian fakan scion pri pres-tekniko kaj -arto, sian profundan konon pri la tiam jam 92-jara historio de E.

Nu, mi ne sukcesas kompreni tiun sofisman agon de ludovikito aliel ol nov-flankan E-pastrecan provon kredigi al nesciantoj au dubantoj ke chio estas en ordo, kiel anke miskreditigi tiujn asertantajn ke, efektive, ne chio estas en ordo.

(3.3.2) Sur pagho 93^a ludovikito prezentas jenan tekston:

restas ĉe ni eta demando. kiuj estis la kvar ŝanĝoj proponitaj de phillips? estas tute ne certe, sed provizore ni hipotezu, ke phillips proponis forigi la jenojn: 1. sursignitaj literoj, 2. artikolo, 3. indikado de nombroj kaj kazoj, 4. refleksiva pronomo. ĉu nia supozo trafis aŭ ne, tio ĉi nemulton signifas, ĉar tre verŝajne, ludoviko siatempe ne rigardis liajn proponojn gravaj.

Tiu chi estas la sola okazo de mi konata en kiu un el niaj fakuloj okupighas pri tia interesa afero (kaj pri kiu Z ne detalis ĉar ja estus absolute maloportune, vidu ***).

Mi supozas ke Ludovikito venis al sia hipotezo surbaze de la postaj Z proponoj pri plibonigoj en la lingvo.

Rimarkoj.- [i] Certe, chiu leganto pri tiu chi afero pli-malpli intense cerbumis pri ghi, kaj mi ne estis escepto en tio, kvankam ĉar pri ghi mi povis/povas pensi nur per lingvaj konsideroj (ja, tamen, neniel per atento al la historiaj faktoj).

La sola el la punktoj hipotezitaj de ludovikito pri kiu ni chiu (anke li) senhezite konsentas ke ghi estis proponita de Philips, ja estas tiu pri elimino de chapeluloj, ĉar ghi rilatas al afero memkomprenebla kaj postulata de chiu ajn tra la tuta mondo, ĉar en ghi temas nur pri tipografio, tiel ke ne necesas scii pri lingvoj, des malpli pri lingviko, por konkludi ke tia komplikajho estas nura kruda fusho che projekto pri interlingvo.

Tute diference, pri la tri ceteraj hipotezeroj de ludovikito ne nepre konsentus chiu homoj, ĉar al ili povus veni homoj kompetentaj ne nur pri sia propra lingvo, sed propre nur se kompetentaj pri pluraj lingvoj kaj pri lingviko. •

[ii] Jen la kvar ĉefaj maloportunajhoj kiujn lau mia kompreno havas Esperanto, kiel anke la kialoj sur kiuj mi respektive bazas mian opinion:

(1) La specialaj literoj (certe la plej damagha maloportunajho por la lingvovivo). (Kaj la fakto ke tiuj literoj, efektive, la lingvon mem ne tushas, nur igas pli sen-senca kaj absurda la decidon ilin enkonduki en la alfabeton).

Kialo: Literoj uzataj de neniu aliu lingvo. Ech se ili estus uzataj de iu(j) lingvo(j) (kaj tial pli-malpli facile acheteblaj far kiu ajn presejo en la mondo), temas pri signo-kunmetajhoj, tial tre malpli oportunaj ol simplaj literoj por manskribado, tajpado, kompostado.

(2) Ne-enkonduko de rekte pasivaj tensoj, kaj ties konvencia surogata anstataigado per predikativa konstruo el *esti*-tenso plus pasiva participo. (Tion chi mi taksas la dua el la du grandaj fushoj de Z).

Kialo: Ignorado de pli simplaj kaj ne-konvenciaj pasivigo-rimedo(j) kiujn Z konis el siaj gimnaziaj studoj pri la latina kaj la helena. (Mi ne scias pri pasivigo en la hebrea, konata anke de Z). (Nepre vidu [iii]). Krome, de tia konvencio shprucas ne nur pezaj kunmetajhoj, sed anke ambiguajhoj.

Ekzemplo.- "La pordo estis fermita" havas káj propran predikativan sencon *estis # fermita = statis # fermita = estis # fermitajho*, káj konvencian $|estis\ fermita| =$ surogato de la neekzistanta pasiva tenso responda al la aktiva "oni fermis".

(Interkrampe: La E surogato por tenso-pasivo ja bezonas pri pasivaj participoj. Sed, per si mem, participoj estas tute alia, sendependa afero. Krome, la ses E participoj konsistigas mirinde bonan lingveron).

(La notaciiloj per " # " kaj "| |" estas du el la relative granda stoko da ili uzataj en mia nur-malneta kaj hhaoseta studajho "Semantike pri konjugacio" por eksplacite klare formale apartigi la diversajn signifojn de ambiguaj esprimoj).•

(3) Kazo-deklinacio (nominativo, akuzativo, genitivo, ktp) esprimata per mik-sajho el prepozicioj kaj finajho.

Kialo: Temas pri hibrida arangho, sekve pli malfacile manipulebla ol nehibrida arangho (t.e., au jen nur per prepozicioj, au jen nur per finajhoj).

Rimarkoj.- [i] Krom la citita kazo-deklinacio ekzistas anke nombro-deklinacio (singularo, pluralo), esprimata per finajho.•

[ii] Deklinacio per finajhoj kuntrenas anke gramatikan akordighon (do, pli da klareco je la kosto de iom pli da malsimpleco). Deklinacio per prepozicioj ne kuntrenas gramatikan akordighon (do, pli da simpleco je la kosto de iom pli da malklareco).•

(4) Selektado de vorto-radikoj sen apena atento al evitado la abundegajn eblojn de mistrancho.

Kialo: Pro la absolutaj reguleco kaj aglutineco de E, jen ofte necesas cerbumado pri vorto-analizo por trafi la ghustan sencon. (Tamen, kaj kiel en chiuj lingvoj, jen danghero de miskomprenoj ja tre malgrandas danke al helpo de kunteksto). (Cetere, ja prudento igas parolantojn kaj skribantojn eventuale respektive enkonduki adekvatan intonacion au tonemon, au apostrofon au divid-strekon, au aliigon de la esprimo, tiel ke che audantoj kaj legantoj kresku la probablo pri ghusta kompreno).

Komento: Lau hispana proverbo, "Tiu sin ne konsolas, kiu ne volas". Nu, ni konsolighu per la fakto, ke dank' al tiaj ebloj de mistranchoj, jen kalemburoj pli facilas en E ech ol en la franca:

jam tempestas / jam temp' estas labor-tago / la bor-tago / l' abort-ago perfida kontrakto / per-fida kontrakto perfide perverse / per-fide per-verse latero / la tero / lat'ero viveroj / viv'eroj kazuaro / kazu'aro eraro / er'aro amaro / am'aro la maro / l' amaro / l' am'a- ro sanga vido / sang-avido kataro / kat'aro	kolego / kol'ego volonte / vol'onte rabata / rab'ata mitulo / mit'ulo charmolino / char-muli- no la chamino / l' acha mino literaturo / litera turo mil'jaroj / mil jaroj litero / lit-ero chevalo / che valo mar alo / mar -alo / mar- alo kolbaso / kol-baso damagho / dam-ago amuzo / am'uzo	domagho / dom-ago kuragha / kur-ago diamanto / di-amanto diveno / di-veno ekstera / eks-tera ekstremo / eks-tremo mortero / mort'ero / mor'te- ro ordonema regho / or-done- ma regho sent'ema / sen-tema senegala / sen'egala indigna informo / in-digna in-formo difino / di-fino ktp., ktp., preske senfine. •
"Seshora" povas esti nur "ses-hora", ne "se ora" "Pachomo", nur "pac-homo", ne "pa- omo".	"Majhora" povas esti jen "ma ora" au "maj-hora". "Marshalo" povas esti "mar alo", "mar - alo", "mars-halo", "mar- halo".	

[ii] Mi cherpas jenon el LZI, p. 351^a (en kio temas pri nepublicita Z artikolo, el chirkau j. 1908^a):

92 b ARTIKOLO PRI LA DEVENO DE ESPERANTO.

tempo. Mi nur memoras, ke en la komenco la lingvo havis tre grandan abundon da gramatikaj formoj (el ili ekz-e la pasivo de la verbo restis ankoraŭ larĝe post 1878, la pluskvamperfekto restis ankoraŭ en 1881, la imperfekto, kies finiĝo estis «-es», restis en la lingvo ankoraŭ eĉ en la komenco de 1887), grandan abundon da vortoj, kaj precipe

koncerne ion (germana «so...») kaj precipe «io» k.t.p. Ekzistis ambaŭ participaj sufiksoj por la kondicionalo kaj la imperativo (la lasta en la senco de devo : kiu devas fari, kiu devas esti farata); la sufiksoj « ebl »


La kontraston de la terminoj "pasivo de la verbo" kaj "participaj sufiksoj" (aktiva kaj pasiva) mi ne sukcesas interpreti aliel, ol ke en iu(j) pra-Esperanto(j) Z enkondukis rekte pasivajn tensojn, kaj ke nur poste ial decidis ilin elimini kaj anstatingi per la dirita konvencia surogato. (Tial, la vorto "ignorado" en la jhusa [ii.2] ne estas neghusta au ekscesa).

Rimarkindas ke en la tekstoj de la pra-Esperanto pri kiu ni iom scias (tiu de j. 1881^a, en LV, p. 19^a-54^a), jen chiuj pasivaj tensoj estas de la surogata tipo, tiel ke ne estas konate 'kiuj kaj 'kiaj estis la formoj de tiuj praaj rekte pasivaj tensoj. (Sia-vice, chi tion mi sukcesas interpreti nur sub supozo, ke tiujn rektajn formojn li provis inter la jaroj 1882^a kaj 1887^a, kvankam li fine revenis al surogatado).

Che tia shangho de simpleco al giganta komplikajho en la strukturo de pasivaj tensoj, mi povas pliafoje nur gapi, nun preske ghis shtonigho. Kaj ech plie: Jen, tamen, Z enkondukis la verbajn sufiksojn *-ig-* kaj *-igh-* !. Kaj ree ech plie: Manke de rekte pasivaj tensoj, jen multaj sin helpas anstatingante ilin per rekte medialaj tensoj!!!.

(Pri tio chi, kiel anke pri diversaj parencaj aferoj, mi okupighas en la supre citita studajho "Semantike pri konjugacio").•

[iii] Komplemente al la jhusa [ii] mi cherpas jenon el PAG § 102 (kio, tamen, estas apene citata malgrau la fakto, ke ghi restas senshangha ekde la una eldono de PAG, en j. 1935^a):



Rimarkoj.- [i] Lau LV, en la pra-esperanto de j. 1881^a la imperfekto estis montrata per finajho *-á*, kaj la preterito per *-u*. [Tial, la imperfekto per *-es* estis provata nur poste].

[ii] En la flanka reform-projekto de 1894^a ne ekzistis imperfekto. Pri pasivaj tensoj la projekto ne parolas, kaj tial estas supozeble, ke anke en ghi temis pri surogatado per *esti*-tenso plus pasiva participo. •

(4) En chi sekcio temas pri la flanka Z reformo-projekto de j. 1894^a.

Rimarko.- Per la adjektivo "flanka" mi mallonge montras al la fakto, ke tiu projekto estis nura incidento (kvankam ja tre dolora), kaj tial ne apartenas al la historio de E propra. Tamen, per si mem, la projekto kaj chiuj cirkonstancoj al ghi rilataj havas grandan lingvikan kaj socian intereson, kaj krome kontribuas al nia scio pri la senchesa, konstanta laborado de Zamenhof. •

(4.1) Ekde la apero mem de UL, kaj lau la eksplicita peto de Z (vidu ***) grandakvante alvenadis al li proponoj pri reformoj, plibonigoj, kritikoj (ja anke laudoj), anke respondoj kaj proponoj de Z mem.

Rezulte de tia shtormado (kiun akompanis financ-problemoj kaj -premoj) naskighis du radikale malsamaj aferoj: Unaflanke, la afero pri la plibonigoj fareblaj en la lingvo ghuste lau la sendanghera, sagha kaj efika procedo kiun nur poste, en la jaro 1905^a, oficialigis la alineo FE.A8 de la Antauparolo al la Fundamento de Esperanto. Duaflanke, la afero pri la absoluta unstreka reformo de la lingvo ech ghis preska rekonebleco.

La dua afero estis nur mallonga sed plej dolora epizodo en la lingvovivo (kiu, krome, ech propre ne apartenas al la vivo de E), kaj la una afero plu iris sian ghisnunan vojon.

Nu, en chi sekcio **(4)** temas nur pri tiu dua afero, kaj en sekcio **(5)** ni reprenos la aferon pri E propra.

(4.2) LV p.52^a diras (grasigo mia): "Sed la propono de la Amerika Societo ne ricevis favoran akcepton, kaj la koncerna kongreso ne okazis [vidu ***]. Zamenhof tiam provis starigi ian "Ligon de la Esperantistoj" [temis, simple, pri chiuj individuaj abonantoj de la gazeto "La Esperantisto"], kiu prenis sur sin la decidon pri an oĵ. Sed la Ligo ne bone funkciis, kaj finfine, antaŭ la **multi o** de la kritikoj kaj proponoj, Zamenhof en 1893 decidis ataki mem la demandon, kaj en la plej radikala maniero... La efajn an ojn, kiujn proponas la nova projekto, estas: La forigo de la supersignitaj literoj, de la akuzativo, de la fleksio e la adjektivoj, kaj de la tabelpronomoj (anstataŭ itaj de pli naturaj formoj)".

Rimarkoj.- [i] Kiel jam dirite en ***, tiun proponon Z publicis sub la titolo "Pri reformoj en Esperanto" pere de ses sinsekvaj artikoloj en "La Esperantisto" en j. 1894^a.

Antaŭ la fakta publico de tiu propono, Z diris en tiu gazeto: "Mi konfesas denove, ke, se la afero dependus de mi, mi retenus ankoraŭ iujn parolojn pri reformoj, sed ar mi ne povas konstra stari al la fluo de flanko pli potenca, mi volonteprovos gvidi in, por depreni de i la dan erecon, kaj turni la malbonon al bono". (OV, p. 185^a).

En privata letero de 1894^a, pri kiu tamen oni sciis nur tre poste, Z diris: "En la fino de la jaro 1893 s-ro Trompeter sciigis min, ke se mi ne elpa os persone kun radikalaj reformoj, li esos eldonadi la gazeton [= "La Esperantisto"]; ankaŭ la aliaj reformistoj forte agitadis por reformoj. Tiam alpremita al la muro kaj vidante nenian helpon, mi vole-ne-vole devis cedi kaj alpa i kun propono de radikalaj reformoj. Nun dank' al Dio io balda estos finita; iuj esperantistoj..."). (OV, p. 496^a).•

[ii] Per du voĉdonadoj (en la una neniu alternativo atingis absolutan plimulton, necesan lau la koncerna regularo) la projekto estis malaprobata per 157 voĉoj oponaj al chia reformo, kontraŭ 107 voĉoj favoraj al iu el la tri aliaj diversaj alter-

nativoj (nome, au al plena reformo lau la Z propono, au al aliuj plenaj reformoj, au nur al iaj shanghoj en apartaj detaloj).

Jen pluraj eroj el la tiurilata informo de Z: "La fina rezultato sekve estas: la plimulto da esperantistoj decidis, ke la lingvo Esperanto devos tute sen ia an o resti en sia isnuna formo.-- Tion i ni sciigas al niaj amikoj. De iaj komentarioj ni nin detenas, ar la maldol eco de la disputoj estas ankora fre a, kaj estas bone ne tu i in... Kelkaj pensas, ke la farita decido malpermesas *por iam* ian an on en nia lingvo kaj faras in por iam tute *rigida*. Tio i estas eraro... La plimulto trovis, ke pro diversaj ka zoj en la *nuna tempo* nenio en la lingvo devas esti an ita; u *iam poste* oni faros iajn an ojn a ne, – pri tio neniu decidis nek povus decidi".

Post tiu rezulto Z dedichis sin nur al E propra, nenion volante pri tia flanka reformo-projekto. La koncernaj numeroj de "La Esperantisto" elcherpighis, kaj malgrau mendoj pri ili, ili ne estis reeldonitaj, tiel ke ili balde ighis kvaze sekreta, ech kvaze hontiga fazo de la historio de E, pri kiu nur specialistoj iam-tiam, ie-tie donas nur partajn informetojn.

Komence de julio 1905^a, la franco Javal, elstara esperantisto, petis de Z la prunton de la numeroj de "La Esperantisto" per kiuj li faris en 1894^a sian reformoproponon, kaj Z respondis ke ilin bedaurinde jam ne havas. Ghis la fino de la jaro Javal havigis al si tiujn numerojn, igis ilin manskribe kaj litografe reprodukti en broshuro, presita je 50 ekzempleroj, kaj ilin disdonis al kelkaj samideanoj (vidu LZ1, p. 167^a, 168^a, 242^a).

En 1906^a Z sendis al la Lingva Komitato leteron kun propono pri neologismoj (Vidu ***), kaj en ghia enkonduka parto trovighis la alineo chi-apuda. (LZ1, p. 304^a).

Sur tiuj ĉi facilaj solvoj estas bazitaj kelkaj novaj projektoj, kiuj volis konkuradi kun Esperanto kaj kiuj, tute ne dezirante doni ian praktike elprovitan, vivipovan kaj ĉiubezone uzeblan *L i n g v o n*, volis nur doni projekton, kiu farus bonan *i m p r e s o n*. Sur tiuj ĉi facilaj solvoj kaj sur tiu ĉi deziro plaĉi al la senspertaj kritikistoj estis ankaŭ bazita — mi sincere tion ĉi konfesas — mia projekto de reformoj en 1894, kiun kelkaj personoj trovas « bonega », sed kiun mi mem trovas nun... terure abomeninda! Ĉar pli vasta praktika elprovado baldaŭ montris al mi, kia sentaŭga senvivaĵo Esperanto fariĝus, se mi farus la fren-ezan paŝon kaj — por plaĉi al la eksteraj rigardantoj — mi elĵetus el la lingvo tiujn punktojn, kiuj estas por ĝi interne necesaj.

En 1907^a, jam post la morto de Javal, la franco Couturat represigis grandakvante en formo de broshuro la flankan reformo-projekton de 1894^a, kaj ghin plu dissendis senpage, almetante —sekve de plendo de Z— ghian finan parton (nemetitan de Javal en 1905^a), kune kun la informo, ke Z deziras, ke la leganto bone sciu "ke pro diversaj motivoj mi la projekton de 1892 [tiele] jam delonge *for etis*, ar kvankam en la teorio i ajnis bona, post pli matura pripensoj kaj elprovo i montri is tre *malbona*". (Vidu p. 11^a de tiu represajho, pri kiu tuj temos).

Z siatempe ne protestis kontraŭ Javal ĉar temis nur pri 50 ekzempleroj, sed taksis malhonesta la represon kaj la grandakvantan disdonadon de Couturat, "kontraŭ la volo de la a toro kaj sen monstro de la ka zo pro kiu la a toro for etis [la projekton]". (LZII, p.29^a-30^a).

En 1907^a anglo intencis represi la reform-artikolojn, kaj Z sendis leteron al la Direktanta Komitato de la Brita E-Asocio, għin rajtigante pri legha persekutado kontraŭ la personoj kiuj volos publikigi tiun verkon sen lia permeso. (OV, p. 560^a).

OV, p. 190^a, 191^a kaj 560^a atentigas pri la diversaj okazoj en kiuj Z esprimis sian malŝaton kaj abomenon al la reform-projekto, kaj tial reproduktas nur la enkondukon al la koncerna artikolaro, sed nenion el la projekto mem, kun jena klarigo [!]: "Li [Z] nepre ne deziris, ke oni represu ilin kaj esprimis sian deziron tre energie tiel, ke i fari is ordono. Mi sentas tion mia devo, nepre respekti kaj obei in kaj ne preni ilin en mian kolekton. Cetere ili prezentos intereson nur por filologoj" [!?!].

[Li forgesis informi, 'kie tiuj eventuale interesighantaj 'filologoj' povus aĉeti, pruntepreni au konsulti tiun artikolaron]. [Ni atentu la datojn: 1894^a, la flankara reform-projekto; 1917^a, morto de Zamenhof; 1929^a, OV venas al la ŝoka konkludo kaj dekreto, ke la enhavo de la reform-projekto ŝajne daŭre estas hontiga kaj ankore danĝera por E, kaj ke ĝi tial jam delonge ighis ŝtata/eklezia sekreto, kaj faris la necesajn aranĝojn por ke ĝi daŭre restu sekreto].

Nu, la "Revista de Interlingua" reproduktis la represajhon de 1907^a en sia n^o 146 (aprilo 1978^a), kaj danke al tiu neatendita surpriza donaco ĵen fine konighis al mi tiu tiel longe dezirata teksto.

De tiu reprodukto venas la ĵhusaj alineoj kies originon mi ne citis.

En la sekcioj tujsekvaj mi ĉerpos el tiu reprodukto. Por la celo de ĉi paghoj gravas la partoj pri alfabeto; sed mi prezentos anke resuman lauordan skizon pri la tuta cetero, ĉar tio ne postulos multe da paghoj, kaj tiele la legantoj ne disponantaj la artikolojn povos tamen ricevi sufiĉe klaran bildon pri la reform-projekto (kiu estas afero de eksterordinara graveco kaj intereso, ne nur lau vidpunkto de lingvo, de lingviko, de historio, sed anke ĉar ĝi ebligas al ni vidi kvaze funkcianta la potencon ĉarbon de la korpe febla Z, lian neelĉerpeblan kapablon kaj volon por konstanta, senlaca laboro, lian kompetenton stiri ŝipon meze de ŝtormo).

Laulonge de la postaj paghoj oni facile konstatos, ke pri pluraj sekundaraj, malgrandaj eroj ĵen Z revenis en diversaj okazoj al tiu ĉi flankara projekto. •

Rimarko.- Ankore ĝhis komenco de mia adoleska aĝo, kaj jam de tre foraj tempoj, la ordinaraj katolikoj ne rajtis (almene, en Hispanio) legi mem la biblion, sed nur auskulti pastrajn predikojn kaj legi bigotajn librojn. Por rajti pri rekta bibli-legado oni devis akiri specialan permeson per procedur(et)o garantianta 'kaj la mensan maturecon de la petanto 'kaj lian fidelecon al la eklezio. Ekde j. 1943^a tiu permeso ne plu estas bezonata (kaj mi ne scias 'ĉu, tamen, ĝi restas rekomendata).

Nu, ĵen, Esperantio povas fieri ke anke ĝi havas pastrojn zorgantajn ke ordinaraj lingvanoj ne disponu rektan aliron al danĝeraj libroj. •

(4.3) En ĉi sekcio temas pri la enhavo de la Z reform-projekto publicita en j. 1894^a en la gazeto "La Esperantisto", kaj el tio, ĉefe, pri la partoj rilataj al la alfabeto. (Pri la rezultoj de la koncernaj voĉdonadoj, vidu ***).

(4.3.1)

[L. Zamenhof]

PRI REFORMOJ EN ESPERANTO

(UNUA ARTIKOLO, JANUARO 1894, n° 1 [49], p. 3-5.)

Kiel mi promesis en la n-ro 12 de « Esperantisto » 1893, mi nun komencas sisteman analizon de nia tuta lingvo. Peco post peco, komencante de la alfabeto kaj finante per la lasta vorto de la Meza Vortaro, mi priparolos la tutan lingvon, kaj pri ĉiu peco

"... la *Meza Vortaro*, mi priparolos la tutan lingvon, kaj pri ĉiu peco mi montros, kian formon mi donus al ĝi, se mi komencus la kreadon de la lingvo nun, havante post mi jam 6½ jarojn da praktika laborado kaj elprovado kaj ĉi tiom multe da

opinioj kaj konsiloj, ricevitaĵoj de plej diversaj personoj, gazetoj kaj societoj el la plej diversaj partoj de la mondo".

"... tiam mi turnos min al la Ligo Esperantista kaj proponos al ĝi decidi per voĉdonado la sekvantajn demandojn: (1) ĉu ni devas restigi sen ŝanĝo la malnovan (isnunan) formon de nia lingvo?. (2) ĉu ni devas akcepti la novan formon, kiun mi estos prezentinta al la Liganoj, en ĝia tuta pleneco?. (3) ĉu ni devas fari aliajn reformojn en la lingvo?. (4) ĉu ni devas akcepti en principo mian projekton de reformoj, sed nur fari kelkajn ŝanĝojn en ĝiaj apartaj detaloj? (*) ..."

(*) La tri unaj demandoj aperis en la januara numero de la gazeto. La kvara demando aldoniĝis en la marta numero. Ĉiuj kvar estis kune ripetitaj en la maja numero, antaŭ la voĉdonado.

"... Niajn legantojn kaj entute la amikojn de nia ideo mi petas, ke, la mezuro de presado de miaj artikoloj pri la reformoj en Esperanto, ili da rigu sendadi al mi siajn opiniojn kaj konsilojn. Ĉiujn is nun ne esprimatajn kaj eble ankoraŭ venontajn bonajn konsilojn mi uzos en la fino (aŭ eble ankoraŭ en la daŭro) de mia serio da artikoloj en formo de aldonoj al ĉi tiuj al mia proponata nova gramatiko-vortaro de nia lingvo".

...

(4.3.2) La reform-proponojn Z prezentas rigore sekvante la ordon de la UL (t.e., la ordo anke de la pli malfrua "Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Esperanto, en kvin lingvoj", mem parto de FE).

Rimarko.- Tiel, kiel ĝis nun okazis, la teksto skribita per ordinaraj literoj estas de Z mem (jen inter ceteroj se temas pri ekzakta cito, jen sen ili se temas pri resumo, reordigo, ks. kiun mi faras). Miaj eventualaj aldonajhoj kaj komentoj aperas ĉiokaze per malpli grandaj literoj, foje anke inter krampoj, aŭ en apartaj rimarkoj. •

(4.3.3)

I. ALFABETO

En la ĝisnuna alfabeto de nia lingvo la praktiko montris la sekvantajn malofortunaĵojn : 1) **Signoj superliteraj.** Tiu ĉi punkto, kiu siatempe en teorio ŝajnis tute sensignifa, en la praktiko montris sin kiel tre grava barilo por la disvastigado de nia lingvo. Dank' al tiuj ĉi signitaj literoj, kiujn la presejoj ne posedas, la libera ĉialoka presado de libroj en aŭ pri nia lingvo kaj la publikigado de nia lingvo per gazetoj fariĝis preskaŭ absolute neebla. Ni devas tiujn ĉi literojn forigi.

2) **Superfluaj sonoj.** Nia lingvo posedas kelkajn sonojn kiuj ne trovas sin en tiu aŭ alia el la plej gravaj Eŭropaj lingvoj

— 3 —

(ekzemple ĵ, ĝ, k. c.). Estas vero, ke tiuj ĉi sonoj altigas la bonecon de nia lingvo kaj ke ellerni ilin ne estas malfacile;

...

(La reformita alfabeto konsistis el jenaj 22 literoj, el kiuj 20 gardas sian prononcon kiel en E propra, kaj du ricevas novajn respektivajn prononcojn, kiel indikate inter krampoj):

Aa, Bb, Cc (=), Dd, Ee, Ff, Gg, Hh (*), Ii, Jj (**), Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Tt, Uu, Vv, Zz (= c)

(*) En la januara numero Z diras ke povas esti, ke li siatempe proponos ankaŭ la eljheton de la *h*. En la maja numero li konfirmas, ke li restigas tiun literon.

(**) En la januara numero tiu litero ankore ne aperis. En la marta numero Z informas pri la multaj demandoj pri ties forigo, kaj pri la provoj farotaj por eventuala reakcepto ĝin. En la aprila kaj maja numeroj li informas pri ĝhia reakcepto, sed nur antaŭ vokalo.

Rimarkoj.- [i] Chi-apuda tabeleteo kontrastigas la reformitan alfabeton kontraŭ tiu propra.

Rimarku ke la 22 literoj uzataj kaj tiuj 4 daŭre ne rolantaj elĉerpas la tutan literan stokon de la baza alfabeto latina (kiel ghi ekzistas, ekzemple, en la angla).•

Malaperas literoj kaj respektivaj sonoj: , , , ,

Malaperas litero, restas sono: (nun reprezentata per litero c)

Malaperas sono, restas litero: z (kiu ricevas la sonon de antaŭa c).

Ree ne rolas: q, w, x, y.

[ii] Tre surprizis/as min la tre drasta kaj patosa publika parolo per kiu Z malakceptis chi-okaze la specialajn literojn ("Ni devas tiujn i literojn forigi", tiel ke, propre, li kondamnas ilin). Mi ja ne scias 'chu tio estis lia vera penso, au 'chu Trompeter k.a. preme postulis tian parolon. Lau mia kompreno, li povus publike proponi la reformon per pli simplaj vortoj, neniel patosaj. (Vidu en *** kaj *** ke ne estas tiel drastaj la vortoj per kiuj li sin poste plurfoje turnis nepublike al la Lingva Komitato kun propono pri pli vasta uzado de *h*-alfabeto; vidu ***).

(Cetere, io analoge patose ekscesa vidighas en *** kaj ***).

Nu, mi inklinas opinii, ke tia plurloka ekscesa parolo estas un el la kauxoj kiuj igis lin klopodi eviti la postan represadon de la projekto. •

[iii] Nekohera káj kun tia kondamno káj kun la arda defendo kiun li antaue faris pri la chapelitoj estas la esprimo "kiu siatempe en teorio ajnis tute sensignifa": Efektive, li ja daure restis shulda pri ia minimuma akceptinda klarigo pri la utileco kaj konveneco de la specialaj literoj. Krome, parolo pri "teorio" povus eventuale rilati nur al la tempo en kiu li per plumo au kraĵono faris siajn notojn kaj redaktis sian originalon, sed ja neniel ekde la momento en kiu li unafaje ekretis la soĵlon de la una presejo. •

[iv] Anstat "Dank' al tiuj i signitaj literoj" li povus pli bone diri "Maldank' al ..." au "Kulpe de ...". •

[v] Ja veras, ke pro neposedo la specialajn literojn jen publikigado ighis preske absolute neebla, sed la problemo estis (kaj plu estas) pli profunda: Ech supoze ke oni posedus la specialulojn, mankus ankore ke la presistoj kutimighus al ties flua uzado. Krome, ja chiukaze daure restus, simple, ke temas pri literoj neoportunaj tiel por manskribado, kiel por tajpado, kiel por presado. •

(4.3.4) Z proponas tute forigi la artikolon *la* char, kvankam tre oportuna, ghi prezentas malfacilon en la komenco por anoj de difinitaj lingvoj. Che neceso, anstataŭ artikolo difinita uzeblas *is* (la nova formo por *tiu*), kaj anstataŭ artikolo nedifinita uzeblas *un* (la nova formo por *unu*).

libro = libro / la libro (is libro) (un libro)
--

Rimarko.- Chi ekzemplojn, kaj tiujn analogajn en la ceteraj sekcioj, almetis mi. Por ilin munti mi ja devis preni vortojn el sekcioj ankore ne traktitaj. •

(4.3.5)

-o = finajho de substantivo en ununombro.

-i = finajho de substantivo en multenombro.

Akuzativo estas egala al la nominativo, do sen finajho nek prepozicio (char malfacila por iuj kaj kauxanta multajn erarojn, kaj kontraŭa al la komuna spirito de la lingvo, havanta deklinacion **nur** per prepozicioj [grasigo lia]) .- Ceteraj kazoj, per prepozicioj.

patr'o = (la) patro / (la) patron patr'i = (la) patroj / (la) patrojn patr'in'o = (la) patrino / (la) patrinojn patr'in'i = (la) patrinoj / (la) patrinojn kun patro = kun (la) patro

Al komencantoj oni povas konsili (ne devigi) pri la ordo "Subjekto - Verbo - Objekto".

Karlo amen Olga	Olga amen Karlo
Karlo amas Olgan	Olga amas Karlon
Karlon amas Olga	Olgan amas Karlo

La vort-ordo restu libera, char la logika sento kaj kelka kutimo facile donos eblon eviti malkomprenighon.

Rimarko.- Se la deklinacio okazu nur pere de prepozicioj, oni principe atendus nepran specifan prepozicion anke por akuzativo, do ne ambigue ghin lasi formale egala al la senprepozicia nominativo. (Pensu, ekzemple, pri la foje sed neoficiale uzata "na", kiel en *Karlo amas na Olga = Na Olga amas Karlo*, ja diference al *Olga amas na Karlo = Na Karlo amas Olga* . (En sia *Historio de la Mondolingvo*, p. 180^a, Drezen infomas ke de Saussure proponis en sia "Antido n-2" (j. 1910^a) prepozicion "i" por akuzativo, do ghuste kiel tiu "na").

Nu, mi supozas ke tia decido, ne distingi formale akuzativon disde nominativo venas nur de la premo de reformistoj kies denaskaj lingvoj tiel agas (kvankam por la celo de interlingvo tio povus esti nur damagha).•

(4.3.6) -e = nevaria finajho komuna al adjektivo kaj adverbo (char ilin distingi estas malfacile por kelkaj popoloj).

La vort-ordo plu restu libera; al komencantoj oni povas konsili (ne devigi) pri ordo lau chi-kunaj ekzemploj.

Komparativo kaj superlativo, lau chi-apudaj ekzemploj.

(4.3.7) Nombrovortoj.- El la bazaj numeraloj nur 1 kaj 9 shanghighas. ("**unu** ekzistis, por ke ni povu formi **unu**j, sed kiam la multenombro havas **i**, ni povas diri **un**, **uni**").

bon'e = bona(j)(n) / bone
bone patro kanten = (la) bona patro kantas
patro kanten bone = (la) patro kantas bone
bone patro kanten bone = (la) bona patro bone kantas
patro bone kanten= [(patro bone) kanten] au [patro (bone kanten)] (evitinda, char ambigua)

plu blanke kvam nivo = pli blanka ol negho
mi haven maksu bele patrino el omnui =
mi havas la plej belan patrinon el chiu.

un, uni = unu(n), unuj(n)
novu = nau
une = unua(j)(n)/ unue.- (sese, novue, ...).
en du / du = duope (sufikso -op- malaperas)

(4.3.8) Pronomoj personaj kaj posedaj.

Rimarko.- En la februara numero Z diras ke la UL-formoj (*mi, ci, ktp*) havas neregule finighon de verbo, kaj ke plej logikaj kaj regulaj formoj estus *mo, to, lo, lino, so, mi, ti, li, lini, si*, kvankam ili estus neoportunaj.- Li proponis *mu, tu, lu, elu, su, nu, vu, loru*; kaj por *oni*, che bezono, oni diru *homi = homoj* au *alikvu* (la nova formo por *iu*).- Kaj en la maja numero li fine proponis chi-apudan liston. •

(4.3.9) Verbo.- [Pri tensoj]: Anstatego de la akra fina litero "s" che -as, -is, -os, -us per la (nun libera) "n" igas la parolon pli harmonia.-

La ses participoj de E estas per si mem objekto tre logika kaj oportuna, sed nenia lingvo ilin havas [!?!], tiel ke ili ighas malfacilaj por

anoj de lingvoj kun po nur du participoj (kiuj povas sufichi, kiel provoj montras); krome, la du vortoj *pasate* kaj *future* forigas la mankojn naskatajn de la forigo de la ceteraj participoj.

La literparoj *an, en, in, on, un* ludas plurajn rolojn, sed ili estas nekonfuzablaj pro la malsamaj lokoj en kiuj ili aperas.- Ekzemplo: *in* = la nuna *en*; *-in*, verba finigo pri tempo estinta; *-in-* sufikso por virina sekso.

Rimarkoj.- [i] Z ne prezentas ekzemplojn pri la uzo de tiuj "pasate" kaj "future".

Kvankam la afero shajnas al mi stranga, jen lau formala vidpunkto principe temus pri *fermente / fermente pasate / fermente future = fermanta, ferminta, fermenta* kaj pri *fermate / fermate pasate / fermate futura = fermata / fermita / fermota*. •

[ii] Char Z nenion diras tie chi pri pasivo che tensoj, jen anke en la reformita E ne ekzistus rekte pasivaj tensoj, kaj oni ilin plu konvencie anstatingus per predikativa konstruo el *esti*-tenso plus pasiva participo. En la reformo propono, cetere, mankas ekzemploj pri tiaj pasivajhoj. (Vidu ***). •

<p>mi = mi(n) tu = ci(n)/ vi(n) (singulare) lu = li(n)/ ghi(n) elu = shi(n) su = si(n) on = oni(n) nos = ni(n) vos = vi(n) (plurale) ilu = ili(n)</p>	<p>mie = mia(j)(n).- Analoge: tue, lue, elue, sue, one, nose, vose, ilue</p>
<p>ferm'a = fermi ferm'an = fermu ferm'en = fermas ferm'in = fermis ferm'on = fermos ferm'un = fermus</p>	<p>ferm'ent'e = fermanta ferm'at'e = fermata pasate = estinta future = estonta</p>

(4.3.10) Vortojn kunmetitajn oni faru el plenaj vortoj; krome, oni uzu ilin kiel eble plimalofte, ĉar nebone respondaj al la romana karaktero de nia lingvo, kaj ofte nekomprenablaj por kelkaj popoloj.

-- vaporonavo (*ne* vapornavo) (= vapors-hipo)
 -- mi veturen versu Berlino (*anstat* Berli-non)
 -- jova pro id = jova de id (= ghoji pro/pri tio, malaperus *je*).

Ĉar akuzativa finajho ne plu ekzistas, anstat akuzativon de direkto oni uzu la vorton *versu* = *en direkto al...*

Prepozicio *je* malaperu, anstatita de pli precizaj prepozicioj.

(4.3.11) Adverboj apartaj [e-finajhaj] ĉesas ekzisti. (Vidu ***).

Pri prepozicioj, en la vortaro.

Ortografio plu estas tute regula.

Akcento plu ĉiam sur la antaulasta silabo.

Ĉe aliu nea vorto plu estas forlasata la vorto *ne*.

Pri la t.n. vortoj *fremdaj*, kiel en UL.

Pri apostrofado, kiel en UL; prefere, nur en versoj. (Ja ne ekzistas *la nek I'*).

La vortoj de la tabelo de interrilataj pronomoj kaj adverboj aliighas al pli naturrecaj simplaj vortoj sen reciproka interrilato. Tial, pri ili, en la vortaro.

Pri sufiksoj kaj prefiksoj, anke en la vortaro.

(4.3.12) Pri la vortaro.

(a) "Nun mi transiras al la plej granda parto de mia analizo – la vortaro. En tiu i vasta parto la plej multe estas al mi necesa la helpo de la amikoj, kaj tial mi petas iun, kiu deziras partopreni en la reformado de la vortaro, ke li volu fari la jenon: ...".

(b) Multaj radikoj shanghighas, ĉefe pro jenaj kauzoj:

-- Ja, simple, pro la malpli granda nova son-katalogo de la lingvo.

-- Ne malpli grave au abunde, pro dezirinda pli unforma karaktero de la lingvo, surbaze, kiom ghi estas ebla, de la lingvoj romanaj (latina (la plej bone), itala, hispana, ktp), kaj tial evitante vortojn germanajn au slavajn.

-- Ĉar "Kiom ni povas, ni devas peni, ke la vortoj simplaj ne donu ian konfuzon kun vortoj kunmetitaj (kiel ekzemple la isnuna vorto **defendi** povus signifi **de-fendi**)".

(c) [En la ekzemploj supre almetitaj de mi jam aperas kelkaj el la novaj radikoj. Kaj en ĉisekva tabelo mi transskribas la parton respondan al la radikoj kiuj en la *Meza Vortaro* komencighas per "a", ĉar tio estas pli bona mestro pri la tuto, ol selektado de vortoj tra la tuta vortaro]:

-e = ghisnunaj -a kaj -e abat == ap = abel abiet = abi abomin = abomen abon == ablativ == abrikot == absces == absint == acer == kompr = a et acid == -ad- == adiu = adia adjektiv == administr == admir == admon == ador == adulter = adult adverb == aer == aer'a == aer'um'i afabl == afekt == afer == ag == etad = a agac == agl == akord = agord agrabl ==	aks == obstetr = aku akusativ = akuzativ akv == al == alavd = ala d alcion == ali == alk == almenu = almena almos = almoz aln == alt == altar == alte == altern == alud == alumet == alun == am == amas == ambi = amba (*) inkud = ambos amid = amel amfibi == amik == kortes = amindum amoniak == ampleks == amus = amuz -an = -u -an- == ananas == anatr = anas	antu = anta antikv antimon == Anunziazi = anun- ciaci apart == aparten == apenu = apena aper == aplod = apla d apog == apr == april == aprob == apud == -ar- == arakn = arane arang = aran arb == arbitr == arket = ar heron = arde ardes = ardez aren == arest == argent = ar ent argil == argument == arkitektur = ar itek- tur ark == arleken == arm == arogant ==	atak == atentad = atenc atend == atent == atest == ating == atripl == atut == u = a entend = a d Avgust = a - gust askult = a s- kult atun = a tun av == avar == avel == aven == aventur == avert == avid == avis = aviz asen = azen azot == ----- e = kaj ----- Mankas la radi- ko est == , kiu tamen ape- ras en la ek- zemplo ***. -----
--	--	--	---

(*) Rimarku ke *ambi* havas formon de plurala pronomo. (Vidu ***).

(4.3.13) "Por ekzemplo de la nova dialekto" Z prezentas la preĝon *Patro nia*. En ĉi tabeleta aperas anke la teksto de tiu preĝo laŭ UL:

<p>Patro nia, kiu estas en la ielo, sankta estu Via nomo, venu re eco Via, estu volo Via, kiel en la ielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian iutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni ŭldojn niajn kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŭldantoj; ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malvera, ĉar Via estas la regado, la forto kaj la gloro eterne. Amen.</p>	<p>Patro nose, kvu esten in cielo, sankte estan tue nomo, venan reksito tue, estan vulo tue, kom in cielo, sik anku sur tero. Pano nose omnedie donan al nos hodiŭ, e pardonan al nos debi nose, kom nos anke pardonon al nose debenti; ne kondukan nos in tento, sed liberigan nos de malbono. (*)</p>
---	--

(*) La vortoj estas laŭ la definitiva vortaro de la maja numero. La preĝo aperis en la februara numero, kun atentigo, ke la vortoj estis provizoraj, kaj eble ankoraŭ ŝanĝitaj ĉe la analizado de la vortaro; fakte, la definitivaj *nos, nose, reksito, vulo* provizore estis *nu, nue, regito, volo* en februaro.

Rimarkoj.- [i] Por faciligi la kontraston, jen anticipu la versio de *Patro nia* laŭ la intencita propono de Z pri plibonigoj en j. 1906^a (vidu ***)

<p>Patro nia, ku as en la chielo, sankta u Via nomo, venu regno Via, u volo Via, kom en la chielo, sik anke sur la tero! Nia ĉiutaga panon donu al ni hodie e pardonu al ni nia ŝuldojn, kom ni anke pardonas al nia ŝuldantoj. Ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de mavo.</p>
--

[ii].- LV, p. 49^a kaj 50^a prezentas tri pliajn versiojn de *Patro nia*, verkitajn de Z dum sia elprovado pri la reform-projekto de 1894^a.- En ili rimarkindas jenaj du faktoj:

-- Aperas vortoj *venuh, donuh, sah, seh, suh*, k.a., prononcendaj *venú, donú, sá, sé, sú*,... (t.e., kun akcento sur la lasta vokalo, krome vortofina, kiel *kadó, está* en "Lingwe Uniwersala", vidu **(1.2)**). (Kaj, inverse, lau chi nova skrib-arango, jen chi lastaj vortoj estus skribataj *kadoh, estah*).

Tiaj akcentitaj vokaloj montris ambakaze al difinitaj tensoj. (Vidu ***).

-- Montrighas speciale interesa la tre oportuna un-litera radiko *s-* (= *est-*), kaj aperanta en la formoj *seh, sah, suh, ... = estas, estas, estu, ...*

[Se tiun radikon ni lude uzus kadre de la definitiva propono pri verbaj finajhoj, jen ni venus al *sa, san, sen, sin, son, sun, sente = esti, estu, estas, estis, estos, estus, estanta*].

[Aliflanke, tiu radiko ne taugus kun la finajhoj *-as, -is, -os, -us* de E propra, char tio portus al ekscesa akumuligho de *s*-sonoj, *si, sas, sis, sos, sus, su, santa*].•

(4.4) Komplemente al la projekto mem, Z informas ke li legis chiujn multajn ricevitaajn proponojn, ke che konveneco ilin studis kaj eventuale ech provis, kaj li redaktis la projekton tiel el propraj pensoj kiel el la proponoj kiujn li jughis taugaj.

Kaj li prezentas jenajn ekzemplojn de proponoj ne akceptitaj, kune kun la respektivaj kialoj:

(4.4.1) Uzadi nur minusklajn literojn, forjheti majusklajn. "Tiu chi propono estas lau mia opinio tre prudenta, kaj mi in aprobas el la tuta koro, ar efektive la uzado de du specoj de literoj estas tute superflua kaj sensenca" [!?!]. Sed ghi havas nenion komunan kun la [problemo pri] la konstruo de la lingvo, ni evitu superfluan bataladon kontrau la kutimoj de la popoloj. "Povas esti, ke post plua pripensoj mi akceptos in...".

(4.4.2) Enkonduki sufikson *-ir-* por montri al vira genro, paralele al *-in-* por la ina genro. "... mi trovis ke i estas ne sole tre logika,

frato = ido, rigardata rilate al aliaj idoj de samaj gepatroj
fratiro = virgenra frato
fratino = ingenra frato
frati = gefratoj (kaj prefikso <i>ge-</i> estus forjhetita) (*)

sed anka tre oportuna". Sed ghi estus kontrau la kutimoj de la popoloj; alme ne en la komenco ("plej grava tempo!") prezentus kelkan maloportunajhon kaj estus fonto de eraroj, ktp. "... la vira sufikso ne devas ekzisti".

(* Lau mia kompreno, *ge-* chiukaze restu, char ni havus (singulare kaj plurale): Sen indiko pri sekso: *frato, frati*.- Kun indiko pri sekso: *fratiro, fratiri, fratino, fratini, gefrati*.

(Che eventuala akcepto oni devus doni alian formon au al la sufikso au al la verbo *ir-*).

(Nuntempe oni foje uzas *fraticho, fratichi*). (Oficialigo de tiu virgenra *-ich-* estus bona kaj bela gajno por la lingvo).

(Al tio paralelus *li, hi, shi; ili, ihi, ishi*).

(4.4.3) Uzi finajhon *-a* anstat sufikson *-in-*.

Neakceptebla, char nekohera kun la lingvostukturo: Ghi postulus novajn konstruojn, enkondukon de nova finajho por la propre adjektivaj formoj *vira, virina*, ktp.

viro = viro; virighi = ighi viro
vira = virino; viraighi = ighi vira

(4.4.4) "Por pliri igi la lingvon, kelkaj amikoj proponis diversajn novajn sufiksojn kaj prefiksojn, el kiuj kelkaj estas la mia opinio tre bonaj, tamen mi ne povis ilin akcepti... lingvo, kies unua kaj plej grava celo estas fari i tutmonda, devas anta io esti la plej simpla kaj plej facila por iuj...".

(4.4.5) En chi komplementa noto Z informas pri la provoj de li faritaj por montri al difinitaj tensoj pere de vortofinaj akcentitaj vokaloj. (Vidu **(1.2)**, jam el la tempoj de "Lingwe Uniwersala", kaj ***, che lia esplorado por la reform-projekto):

(a) Klaras, ke la eventuala fremdeco pri kiu parolas Z rilatas al la grafika aspekto de la problemo (t.e., al uzado de dekstra korno, au de *-h*), do ne al la parola akcentado, kiu estus per si mem grava gajno por la lingvo.

mi volis proponi en mia projekto la sekvantan ŝanĝon : la verbaj formoj finiĝu per akcentitaj vokaloj (á, é, í, ó, ú). En la vortaro ni tiam dirus : *o* signifas substantivon, — *ó* signifas tempon estontan de verbo. Maloportunaĵon tiu ĉi ŝanĝo ne prezentus, ĉar akcentitaj vokaloj ekzistas en ĉiuj presejoj de la mondo (tiom pli, ke estus ja tute egale, ĉu la presejo uzus *o* au *ó* k. t. p.) dume oportunaĵojn la dirita ŝanĝo prezentus grandajn : 1) la formoj de la verbo estus tre klare diferencigeblaj eĉ por orelo tute ne alikutimita; 2) la formoj de la verbo, renkontataj en la parolado sur ĉiu paŝo, perdus la finiĝon konsonantan kaj tiel preskaŭ ĉiuj vortoj en

(b) Chi noto estas perfekte kohera kadre de la reformo-projekto: Efektive, negrave 'chu la presejoj rekte disponas au ne akcentitajn vokalojn kaj chapelitajn konsonantojn, jen tiuj chi povas prezenti

ion fremdan por multaj personoj, speciale por la gravegaj komentantoj.

Tial, ni devas uzi neniun el tiuj maloportunaj literspecoj.

nia lingvo havus finiĝon per vokalo, kio altigus la bonsonecon de la lingvo; 3) ricevinte certan nombron da vortoj kun akcento en la fino, la lingvo, sen malfaciliĝo de la lernado, ricevus kelkan diversecon en la akcentado, kiu levus ankoraŭ ĝian bonsonecon: 4) por la versofarantoj la granda nombro da vortoj kun akcentita finiĝo estus tre agrabla gajno. — Dank' al la 4 diritaj oportunaĵoj, kiuj povus esti akiritaj per unu tre simpla reguleto, la akcentitaj formoj havis por mi jam de longa tempo grandan allogon kaj mi decidis akcepti ilin en la projekton. Sed pripensinte la aferon pli objektivite, mi devis konfesi, ke la akcentoj sur literoj por multaj personoj prezentos ion fremdan en nia lingvo, objekton de disputado kaj nekontenteco; al la komen-

cantoj tiuj ĉi personoj estas por ni la plej gravaj: la akcento, per la unua rigardo prezentos ion komplikitan, la lingvo tian ŝajnos al ili ne tiel simpla, kiel ni dezirus. Mi akceptis la formojn, eljetis ilin, denove akceptis, provis anstataŭigi ilin per aliaj formoj, kiuj en la esenco donus tion saman, ne fortimigante tamen la unuan rigardon (ekzemple h post vokalo devus signifi, ke la vokalo estas akcentita... k. t. p.), kaj post multaj provoj kaj reprovaj mi fine devis forjeti la akcentitajn formojn, kvankam mi persone forte ilin aprobas.

(c) Sed la afero ighas tute alia en rilato al la alfabeto propra de E: Efektive, se la akcentitaj vokaloj ne prezentas maloportunajhon char ilin havas chiuĵ presejoj, jen, kontraue, konsonantoj kun cirkumflekso prezentas tre grandan maloportunajhon char principe neniun presejo ilin havas, kaj maloportunaj estas anke konsonantoj kun alispecaj supersignoj char nur malmultaj presejoj ilin posedas.

Tial, pro tiu chi noto des pli forte trudighus la konkludo, ke ni absolute devas ne uzi la chapelitojn au konsonantojn kun aliaj diakritoj, kvankam ni povus tute bone uzi akcentitajn vokalojn.

(5) La *Fundamento de Esperanto*, la konstitucia alineo FE.A8 de ghia *Antaŭparolo*, kaj la du alfabetoj en ghi.

(5.1) En ADL Z diras (OV, p. 33^a):

"... Unu homo tie povas esti nur iniciatoro sed ne kreanto. Lingvo tutmonda devas esti pretigata pa o post pa o per la kunigita laborado de la tuta civilizita mondo. Por ke la lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgra la dis etita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devis krei komunan fundamenton, sur kiu iuj povus labori. Tia komuna fundamento por la "Lingvo internacia" devas esti mia unua bro uro ("Lingvo in-

ternacia. Anta parolo kaj plena lernolibro.") kiu havas en si la tutan gramatikon de la lingvo kaj sufi e grandan nombron da vortoj".

(5.2) Inter la diversaj verkoj de Z postaj al ADL kaj antaŭaj al la *Unua Universala Kongreso de Esperanto* (Boulogne-sur-Mer, Francio, en aŭgusto 1905^a) estas speciale gravaj la *Universala Vortaro* (j. 1893^a, plus kvar postaj pliaj eldonoj) kaj la *Ekzercaro* (j. 1894^a, plus tri postaj pliaj eldonoj).

Kaj komence de julio 1905^a (do, unu monaton antaŭ la UK) li publicis *Fundamento de Esperanto*, konsistanta el *Anta parolo* kaj la tri pli fruaj verkoj pri kiuj temas en ĉi-sekva punkto.

Rimarko.- Mi ne kompetentas juĝi, ĉu la nomo "Universala Kongreso de Esperanto" estis ĝuste uzata en tiuj tempoj. Sed mi ja kompetentas diri, ke almenaŭ ekde mia junagho ĝis nun, kaj almenaŭ en la hispana, tia eldiro estas ŝoke ŝvela kaj iom ridinda por la ĝenerala socio (kaj, tute speciale, por ĵurnaloj ks). Laŭ mia kompreno, la nuntempe taŭga nomo estas "Internacia Renkontiĝo de Esperantanoj", aŭ io tia .•

(5.3) Pere de tiu *Anta parolo* Z proponis al tiu Unua UK la akcepton de oficiala fundamento de la lingvo. El tiu propono ni ĉerpas jenon (vidu FE, p. 43^a-49^a; grasigo kaj rughigo, kiel anke bildeto pri montra maneto estas miaj):

(a) A2.- "La silenta interkonsento de iuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1) La 16-regula *gramatiko*; 2) la "*Universala Vortaro*"; 3) la "*Ekzercaro*". Tiujn i tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis iam kiel *le ojn* por li, ... li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ iuj aliaj esperantistoj iam rigardados tiujn i tri verkojn kiel la solan le an kaj netu eblan fundamenton de Esperanto".

(b) A7.- "*Ri igadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam *nun*, per konsilio kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo... tiuj i vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj... en korespondado kun personoj *nekonataj* estas bone iam peni uzadi nur vortojn el la "Fundamento"... Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel "*Aldonon al la Fundamento*"".

Fundamento de Esperanto. Anta parolo. 8^a alineo. [Mallonge: FE.A8]

(c) Chi-
apude mon-
trighas la
kerno de la
oficiala nor-
maro por
gardado la
unecon de
la lingvo.

[Rimarku
ke en ghi,
kiel anke en
la ordinara
lingvo,
"shanghi
vorton, regu-
lon au for-
mon" signi-
fas "elimini
la jam ekzis-
tantan kaj
ghin

per nova".
Nu, tio ne
eblas lau chi
normo, char

vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento »

1 2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi

2 paralele kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura

3 lingvo. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj; sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.

1 Mi montris en *principo*, kiamaniere la severa netu-

vorto a regulo / tro neoportuna / **ne** devos forigi a an i /
povos proponi **formon** novan / **paralele** kun la formo malnova /
fari os ar aismo

oni rajtas nur proponi novan, paralelan alternativon, tiel ke la lingvovivo eventuale decidu pri preferindeco de iu el ili, tamen ambaj daŭre restantaj egale validaj].

Rimarko.- El la interreto mi cherpas jenon: "La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ian evoluon".- "La Akademio de Esperanto estis fondita en 1905 en la unua Universala Kongreso de Esperanto, la propono de Zamenhof, sed tiam sub la nomo "Lingva Komitato". La nomon "Akademio de Esperanto" portis unue supera komisiono de la Lingva Komitato. En 1948 la Lingva Komitato kaj ia Akademio kunfandi is en unu solan korpon nomatan "Akademio de Esperanto" ".

La Akademio havas Konsultejon pri lingvaj demandoj. [Ghi povas ricevi peticiojn rilatajn al la lingvo, kiuj eventuale estas prenitaj en konsideron por la koncernaj sekvoj].•

(d) A11.- "La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian *privatan* opinion. **Le an sankcion** ili ricevos nur en

tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua **internacia kongreso** de esperantistoj, al kiu tiu chi verko kune kun sia anta parolo estos prezentita".

Rimarko.- En *** ni konstatos, ke en j. 1909^a la Akademio de Esperanto faris puchon (ankore reganta(n) inter ni) kies chefa ingredienco estis la nuligo fakta de tiu fundamenta, konstitucia FA.A8, kvankam surpapere ghin gardanta senshangha. •

(5.4) La Unua UK akceptis kaj oficialigis i.a. jenan aferon:

"Esperanto havas neniun personan le donanton, kaj dependas de neniun aparta homo... La sola unu fojon por iam deviga por iuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo "Fundamento de Esperanto", en kiu neniun havas la rajton fari an on". (Vidu FE, *enerala Enkonduka Notico*, p. 37^a).

Rimarko.- Tiu chi oficialigo rilatas nur al la verko "Fundamento de Esperanto" (t.e., al la *Gramatiko + Vortaro + Ekzercaro*), do ne al estigo de tiu "ia a toritata centra institucio" (kio ja estas tute alia afero, kaj kiu estis aparte traktita). Krome: La *Anta parolo* al FE longan tempon ne estis konsiderata oficiala, ghis en j. 1958^a la Akademio ghin oficialigis lau lingva vidpunkto. •

(5.5) La gramatika parto de FE havas titolon en E "Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Esperanto en kvin lingvoj" (sinsekve temas pri la franca, germana, angla, rusa kaj pola).

La alfabeto ja daure konsistas el tiuj samaj 28 literoj kiel en UL (vidu ***), sed al ghi aldonighas (per liliputaj literoj) du rimarkoj en la rusa parto, kaj nur unu rimarko en la ceteraj partoj.

La unu rimarko en la rusa parto diras, i.a.: "... la litero (kiu estas uzata nur post vokaloj)..." (которая употребляется только посл гласной)

La dua rimarko de la rusa parto jenas: Типографio [= presejo], ne posedanta literojn , , , , , povas en la una tempo (на порахъ употреблять) uzi *ch, gh, jh, hh, jh, sh, u*.

La sola rimarko de la kvar ceteraj gramatikoj samtemas kiel la rusa parto pri h-alfabeto, tamen sen parolo pri tiu "en la una tempo", jene:

Franca parto: La tipografioj [= presejoj] kiuj ne havas la literojn , , , , , , povas ilin anstatigi per *ch, gh, jh, hh, jh, sh, u*.

Angla: Se montrighus nefarebla presi verkojn kun la diakritaj signoj (^,), la litero *h* povas esti anstate uzata por la signo (^), kaj la signo () povas esti tute forlasata.

Germana: Che mankantaj tipoj en la presado oni anstatigas , , , , , per *ch, gh, jh, hh, jh, sh, u*.

Pola: Presejo, ne posedanta tipojn kun signoj, povas anstat , , , , , presi *ch, gh, jh, hh, jh, sh, u*.

Jen, apud la chapeloza alfabeto ighis oficiala anke la *h*-alfabeto, kvankam daure sub la arango, ke la una estas la principa alfabeto, kaj ke la dua estas sim-

ple permesata nur por surogata rolo (kiun, krome, oni firmafide kredis nur provizora, nur kurte dauronta).

Rimarkoj.- [i] Tiu ankore revanta "en la una tempo" aperas nur, do, en la rusa versio, ghuste versio kiun certe Z plenredaktis mem: Nu, E tiam estis jam 18-jara, ja agho de seksa matureco post la unaj tempoj de infaneco kaj adolesko, sed kiu, shajne, ne estis sufichaj por matura kompreno, ke chapeloj konsistigadis nuran obstaklon al la lingvovivo. •

[ii] Tia esprimo "en la unua tempo" trovighas anke en la pli frua EKZ.27.3, kvankam en tute alia kunteksto, nome: "La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo... povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ar i estas oportuna, sed ne necesa"). •

(6) Tragikomedio pri kaj per alfabeto(j).

Rimarko.- Lau PIV, *tragikomedio* estas "speco de tragedio, kiu ne fini as per katastrofo". En la hispana, *tragicomedia* estas "drama verko, kun elementoj 'kaj de tragedio 'kaj de komedio", kaj kiu ofte sed ne nepre finighas per felichajho; krome, ghi estas vorto figurasence aplikata al situacioj havantaj trajtojn de tragikomedio.

Nu, en chi sekcio mi uzas tiun vorton lau la dirita hispana figura senco. •

(6.1) Z agnoskis ke "La plej atakata flanko de nia lingvo estas ia alfabeto" (Vidu ***LZII, p. 115^a, kiel anke chi tie, ***).

Kadre de tiaj atakoj jen amase shprucis/as en chiuj tempoj proponoj por alfabet-reformo (kiuj eventuale inkludis modifon de ech multaj vorto-radikoj, kaj en kio ja certe elstaras la reform-propono de Z mem en 1894^a).

En p. 18^a-21^a de n^o 321 de "Boletín" de HEF (majo 1995^a) mi publicis hhaosan artikolon "¿Kío bonas por la lingvo, kío bonas por la fajro?", kun tabelo pri la monstre enorma aro da proponoj pri alfabet-reformo pri kiuj mi iel-iom ghis tiam sciighis.

Nu, mi esperas ke mi nun sukcesos trakti chi aferon per arangho ne-hhaosa.

Rimarko.- En n^o 334^a de "Boletín" (Januaro-Februaro 1998^a) mi publicis novan artikolon *Pledo por h-alfabeto*, kiun la redaktoro akceptis presi per tiu alfabeto. Nu, ja neniuj problemoj che *h*-teksto, sed che la 11 duon-linioj en kiu temis pri alternativaj alfabetajhoj, jen ree hhaoseto aperis. (En tiu tempo mi laboris per komputilo *Atari* kaj ghia mirinda programo *Calamus* por teksto-prilaboro). •

(6.2) En chi-apuda tabelo trovighas kontrastaj

ekzemploj, kronologie ordigitaj, pri la du E-alfabetoj kaj pri dek du el la amaso da alternativaj alfabetoj, jen nur proponitaj, jen ech relative intense praktikataj.

(A) kaj **(B)**.- Ili ja estas la alfabeto propra kaj ties oficiala surgato por celo nur-parta. Pri ili jam detale temis supre.

(A)	har i ore jetu in a tuj	–ore koruse ù
(B)	char ghi hhore jhetu shin au tuj	aw
(1)	c'ar g'i h'ore j'etu s'in ? tuj	¿au? ¿a'u?
(2)	char dji ? jetu shin au tuy	ci ce tsa tso tsu
(3)	cyar gyi hyore jyetu syin ? tuj	
(4)	char ji ? jetu shin au tuy	¿aw?
(5)	? qi xore yetu ? ? tuj	¿char, shin, aw?
(6)	car gi hore jetu sin au tuj	
(7)	câr gî hôre jêtu sîn àu tuj	
(8)	^car ^gi ^hore ^jetu ^sin a^u tuj	aû
(9)	cxar gxi hxore jxetu sxin aux tuj	
(10)	tcar dqj ? qetu cin ? ?	
(11)	char ji khore zhetu shin au tuy	
(12)	qar yi koruse jhetu xin aw tuj ji hhore tuy	[ludajho mia]

En tio rimarkendas, ke kvankam chapelitoj estis apene troveblaj en presejoj, jen pere de tajpilo ili estis facile metebblaj pere de la t.n. "morta klavo" (au "senpasha klavo"); anstat " " oni ghenerale metadis "ù" char pli klare legebla ol "û". Nu, tamen, che alveno de komputiloj la afero farighis problema, ofte ech ne solvebla (vidu poste pri (8) kaj (9)).

Pro la preske absoluta arkaikigho de la sono kaj litero " ", jen fakte malaperis anke bezono uzadi "hh" (kaj ja analoge en chiuj ceteraj alternativoj).

Uzante la *h*-alfabeton, multiuj metis/as "w" anstat " " (kio teknike ja estas perfekte tauga solvo, kvankam la ghisnuna normo ghin ne permesas).

(1).- *c'ar g'i h'ore j'etu s'in ? tuj.*

Anke pri ghi ni jam parolis supre (vidu ***).

(2).- *char dji ? jetu shin au tuy.*

En 1904^a (do, antau la apero de FE), la [franc]-kanada gazeto "La Lumo" proponis chi alternativon por faciligi [!?] la presadon de E tekstoj en la gazetoj (vidu LZI, p. 74^a; en ghi ne aperas indiko pri la alternativoj proponitaj por " "). Nu, ghi gardas "ch" kaj "sh" de *h*-alfabeto, al "j" donas la maloftan sonon de "j" (t.e., de la franca "j"), la oftegan sonon " " ghi reprezentas per digramo "dj", kaj por la sono de "j" ghi prenas "y" (kiu ja estas un el la kvar latinaj literoj kiujn Z ial rifuzis meti en sian alfabeton).

Krome: Fine de 1906^a (do, jam post la apero de FE) Javal (vidu ^{***}, kaj LZI p. 294^a) aldonis al la kanada propono ke *ce*, *ci* plu estu skribataj *ce*, *ci*, sed *ca*, *co*, *cu* aliighu al *tsa*, *tso*, *tsu*.

Komento: Lau mia kompreno, tiu alternativo ja plifaciligus la presadon kompare kun la chapel-alfabeto, sed ne kompare kun la *h*-alfabeto propra. Shajnas tamen klara, ke la vera celo estis, ke la litero "j" ne aperu vortofine, por eviti la shokon kiun ghi en tiu pozicio kauzas unavide al francoj, angloj, hispanoj, k.a., (kiuj, ekzemple, la esprimon "karaj fratoj" unavide respektive legus "karáj fratój", "kára fráto", "kará frató"). Diference, vortofina "y" por la sono de "j" estas komuna en angla (*boy*) kaj hispana (*doy*), kaj, kvankam malpli komuna, anke en franca (*Parthenay*, *Moÿ*, *pays*, klasikaj *moy*, *ay*).- Krome: Ja probablas, ke la proponantoj preferus la simplan literon "j" por la oftega sono " ", sed tiukaze ili devus au jen trovi ian artifikan "nenaturan" digramon por montri al la malofta sono "j", au preni por ghi duan literon el la kvaropo *q*, *w*, *y*, *z*.

Aliflanke, mi daure ne komprenas pri la propono skribi *tsa*, *tso*, *tsu*.•

(3) *cyar gyi hyore jyetu syin ? tuj.*

LZI, p. 119^a, temas pri letero de Z en marto de 1905^a al Michaux (la chefa organizanto de la tiam jam balda Unua Kongreso), kaj kiu inter pluraj aliaj aferoj enhavas jenan respondon: "La demandon pri la supersignoj decidis la kongreso. ajnas al mi, ke Via propono anstata igi "h" per "y" (renversita "h") estas neoportuna kaj kredeble ne trovos multe da aprobantoj. Mi tamen volas nenion anta decidi, kaj se Via propono trovos aprobantojn, mi anka nenion havos kontra i, ar mi mem volonte akceptos ion, kio havos por si la plimulton da vo ojn". (LZI, 119^a).

Shajnas, do, ke temis simple pri privata afero pri kiu nenio estis publicita.

(Char "y" estas uzata kvaze diakrite, do certe temis pri "tuj", ne pri "tuy". Mi supozas, ke por anstatigi na " " temis au pri "u" au pri "w", nen pri "uy").

Komento: Ghin vidu kadre de la komento pri **(9)**.•

Rimarko.- LZ montras per maldensaj literoj la simplan substrekon de la originalaj tekstojn (kiel en ion), kaj per malgrandaj majuskloj [= versaloj] la duoblan substrekon (kiel en ION). (Mi esperas ke mi sukcesis gardi tian aranghon).•

(4).- *char ji ? jetu shin au tuy.*

Chi propono venis de Javal komence de 1906^a (do, post FE sed antaŭ lia aldono al **(2)**), kaj rezulte de esploro komisiita al li de la Unua Kongreso) (vidu ^{***}), principe nur por redakti telegramojn en E, por ke "ili estu akceptataj de iuj telegrafejoj kaj samtempe facile legeblaj de laikoj".

Evidente, baze temas pri la komenca propono de "La Lumo", kun elimino de la digramo "dj", kaj uzante "j" tiel por " " kiel por "j".

Komento: Mi tiun chi proponon ne sukcesas kompreni, lau teknika vidpunkto, alia ol nura masohhismado.•

Rimarkoj.- [i] Kion Javal vere celis estis tenadi viva la aferon pri eliminado de la supersignoj. (Vidu LZI, p. 176^a kaj 255^a).•

[ii] Vidate de nia malproksimeco de tiuj tempoj, estas apene kompreneble ke tia bagatelajho povis esti tiel profunde drama kiel ghi fakte estis rilate la vivon de E kaj de la koncernaj personoj. (Vidu LZI, p. 294 k.a.).

Nu, lau mia kompreno, en tiu chi dramo decide rolis la personeco de Javal: Min-ingeniero, li decidis farighi oftalmologo kun celo kuraci fratinon sian, tre straban (kiel anke lia patro). En 1878^a, kiam li estis 39-jara, fondis la Laboratorion pri Oftalmologio de Sorbono, kiun li gvidis ghis 1900^a (i.a., li enkondukis la uniton "dioptrio" por lensoj, inventis diversajn okul-instrumentoj, ktp). En agho de 45 jaroj lin trafis la unaj simptomoj de glaukomo, kaj en 1900^a, en agho de 61 jaroj, li estis jam tute blinda. Li tamen legis al si librojn kaj jhurnalojn, kaj ankore plu verkis mem (li ech elpensis aparaton, kiu ebligis al li skribi mem krajone siajn leterojn). Li intense laboris socie kaj politike por sociaj reformoj favoraj al malrichuloj, infanoj, blinduloj. Jhus antau la Unua Kongreso (1905^a) li publicis libron "Fiziologio de la legado kaj de la skribado" en kiu, i.a., li donas praktikajn konsilojn al presistoj, instruistoj, stenografoj kaj blinduloj. Por gardi la okulojn de danghera lacigho, li rekomendas uzadon de flava papero, simpligado de litertipoj al rektaj literoj (li jam pli frue kontraubatalis la uzadon de kromsignoj che la latinaj literoj de la franca alfabeto kiel kauzon de plia lacigo de la okuloj, ktp). En tia kadro, li trovas la konvenecon ke E estu skribata sen supersignoj char ili efektive okazigas mezureblan plian stretchigon de la leg-organoj. (Vidu LZI, p. 81^a kaj ***).

Shajnas, tial, evidente, ke por Javal estis absolute necese kaj sen plia parolo unstreke elimini la literojn kun supersignoj, kaj la sola problemo restanta estas, 'kion uzi anstat ilin. Tute diference, por Z la afero estis tre pli kompleksa, char li devis atenti chiujn flankojn de la vivo de E. (Vd abunde pri Émile Javal pere de la indekso de LZI, kaj lian biografion en internet).•

Almetajho: Jen nun kronologie venas la vico al la kvina kaj lasta lingva respondo de Z pri la alfabeto (vidu ***):

(3.2.5)

La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas presi « h » anstataŭ supersigno; sed kio estas permesata por presado, tio ankaŭ estas permesata por skribado. Tiel same, kiel neniu povas protesti, se vi skribos ekzemple per artifikaj gotaj literoj anstataŭ per literoj ordinaraj, aŭ per literoj presaj anstataŭ skribaj, tiel same ankaŭ neniu povas protesti, se vi skribos per « h » anstataŭ supersignoj. Sed la demando estas, ĉu viaj korespondantoj estos kontentaj,

se, skribante al ili, vi uzos la pli artifikan manieron kun « h » anstataŭ la pli simpla kun supersignoj. Tio ĉi sekve estas ne demando de permeso aŭ malpermeso, sed simple demando de gusto. Sed, se vi deziras anstataŭigi la supersignon en « ĉ » kaj « ŝ », vi nepre devas anstataŭigi ĝin ankaŭ en « ĵ », « ĥ », kaj « ĝ », ĉar ĉiu el la ambaŭ skribmanieroj aparte estas permesita en nia lingvo, sed uzado de ia skribmaniero *miksita* estus jam arbitraĵo kaj kondukus al ĥaoso. — Se vi volas skribi per « h » anstataŭ supersignoj, vi povas tion fari, ne bezonante demandi ies permeson; sed se vi volas uzi skribmanieron *miksitan*, aŭ — tiom pli — se vi volas uzi *sisteme* la tute novajn literojn « y » kaj « w », anstataŭ « j » kaj « ŭ » (mi ne parolas pri *specialaj* teknikaj okazoj, kiam tio eble estas necesa) vi devas — se vi deziras esti lojala esperantisto kaj ne enkonduki anarĥion en nian aferon — akiri por tio la permeson de la « Lingva Komitato ». Formulu klare vian deziron kaj prezentu ĝin al la voĉdonado de la Lingva Komitato, kaj se via propono estos akceptita per plimulto da voĉoj, ĝi fariĝos permeso oficiala. Sed memoru, ke pro la bono de nia afero la Lingva Komitato devas esti tre singarda kaj akcepti

Rimarko.- Chi tiun respondon nepre kontrastigu al la sam-jara ***.•

Miaj komentoj:

(a) Jen, Z unafaje publike eldiras, ke la tamen duaranga *h*-alfabeto povas esti uzata anke che permana skribado.

Lau "jura" vidpunkto, li agas ekster la oficiala FE, ĉar la "Rimarko" piede de la alfabeto ja parolas nur pri presejoj ne disponantaj la chapelitojn. Tamen, tio povus igi ero de grava pasho antauen por la lingvo-vivo (t.e., al plena egalrajta valideco de ambaj alfabetoj en kiu ajn okazo).

(b) Sed jen tujsekve li verŝas tutan jharon da frida akvo sur la esperojn kiujn li jhus vivigis, ĉar li timige parolas pri ebla nekontenteco de korespondantoj, ke "h" daŭre restas artifika aranĝo kontraste al la pli simpla (!?) ĉapelo, ke uzado de "h" montras mankon de gusto.

(c) Pli ofte jen li volas nenion kun la tamen daŭre liberaj latinaj literoj *q*, *w*, *x*, *y*.

(d) Mi supozas ke la eblaj specialaj teknikaj okazoj bezonantaj literojn *w*, *y* rilatas al propre ne-esperantaj aferoj (ekzemple, matematikaj formuloj, simboloj sur planoj, ktp). Sed pri tio (kiel anke pri eventuala uzado de *q*, *x*, α , β , ...) ja E povus nenion almeti au trudi.

Ni revenas al la tabelo **(6.2)**.

(5)- ? *qi xore yetu* ? ? *tuj*.

Chi nova alfabeto estis provo de René de Saussure reformi la esperantan alfabeton (en sia "... *fonetika internacia alfabeto, sistemo Antido n-ro 2*", j. 1910^a).

LZII, p. 278 informas nur pri la tri literoj *q*, *x*, *y*; sekve, temis anke pri *tuj*, kaj ne *tuy*. Mi supozas, krome, ke temis anke pri *aw* (ĉar li tiele uzus la kvar liberajn latinajn literojn); fine, probable temis anke pri la kutimaj *ĉar* kaj *ŝin*.

Miaj komentoj:

(a) Kiom rilatas nur al E, kaj almenaŭ nur-formala vidpunkto, jen temas pri malŝparado de la latinaj literoj, ĉar li "elspezas" du el ili por la du plej maloftaj E konsonantoj, ($x = \text{ĉ}$, $y = \text{j}$), kaj uzas digramojn por du el la plej oftaj ($ch = \text{ĉ}$, $sh = \text{ŝ}$).

(b) Kiel dirite, LZII nenion diras pri la celo kaj amplekso de tiu "fonetika internacia alfabeto", kaj Drezen eĉ ne detalias pri *q*, *x*, *y*.

Nu, ni ĉiuj ja estus tre felichaj se pere de la nuraj 26 literoj de la baza latina alfabeto li sukcesus kontentigi la bezonojn pri alfabeto de almenaŭ relative granda nombro da malsamaj lingvoj, kaj krome sukcesus ĝin akceptigi de la koncernaj landoj.

Sed ja estus saghe, ne miksi tiajn aferojn kun E: Oni klopodu pri ĝenerala sukceso en la ĝeneralaj akademiaj, politikaj kaj ŝtataj instancoj; kaj nur post tia eventuala sukceso, jen anke E povos profiti de ĝi. (Vidu *** internacia Albault).

Rimarko.- La svizo René de Saussure (matematikisto kaj lingvisto) publicis, anke en 1910^a, sian epokfaran *La construction logique des mots en Espéranto* (= *La logika vort-farado en E*), en kiu li science aposteriore konstatas ke tiun faradon regas jenaj du principoj: Unaflanke, principo pri la kategorieco de vorto-radikoj laŭ klasoj substantiva, adjektiva-adverba kaj verba, kaj, duaflanke, la principo pri neceso kaj suficho (laŭ kiu por kunmeti vorton oni principe uzas ĉiujn erojn necesajn por la celata senco, sed ke se el kunteksto jen iu ero estas jam klara, oni ĝin ne ripetas en la vorto, ĉar neutila kaj nenecesa).

(René estis frato de la fama lingvisto Ferdinand de Saussure).•

(6) kaj **(7)**.- Chi novaj alternativoj aperas en la fina kaj malplej grava parto de PAG §3, kiun mi metas tie chi tuta:

Kompare kun la norma latina alfabeto, la esperanta diferencas per du trajtoj: la ĉefa estas, ke ĝi prezentas la gingivajn sonojn ne per kunigo de simplaj literoj (digramoj, kiel la F. *ch*, la A. *sh*; trigramoj, kiel la G. *sch* aŭ la I. *sci* ktp.), sed per modifita formo de la kvin konsonantoj, de kiuj la gingivaj sonoj historie devenas: oni supermetas al ili ĉirĉumfleksojn, kaj pro la formo de tiu signo, oni iafaje nomas ilin "ĉapelitaj" literoj (*ĉ*, *ĝ*, *ĵ*, *ŝ*); tiu sama supersigno estas uzata por distingi la frikativan velaron (*ḥ*) disde la laringala (*h*). Male, por averti, ke u fariĝas en kelkaj okazoj dua elemento de diftongo, oni supermetas al ĝi renversitan duoncirklon (*ũ*).

Tiu sistemo de sonprezentado estis inspirita de la ĉeĥa alfabeto (en kiu cetere la ĉirĉumflekso estas returnita). Ĝi estas simpla kaj oportuna. Tamen en la komencaj jaroj, ĝi estis serioza ĝeno por la propagando, ĉar ĝi postulas specialajn litertipojn. Tial Zamenhof donis, jam en la "Unua Libro", kaj oficialigis en la "Fundamento" la permeson anstataŭigi la supersignitajn literojn per la digramoj *ch*, *gh*, *hh*, *jh*, *sh*, kaj tute forlasi la supersignon de *ũ*. Kvankam tio estis ia sistemigo de la ĥaosaj naciaj digramoj aŭ trigramoj, la esperantistoj instinkte sentis, ke tiu ~~maniero prezentas fonetikan malprogreson~~. Zamenhof mem uzis ĝin nur en telegramoj; kaj, malgraŭ la provo de franco, E. Gasse, kiu presigis per tiu metodo sian tradukon de la "Vivo de Jesuo" de E. Renan (1907), ĝi restis praktike ne aplikata. Eĉ en la okazoj, kiam oni devas presigi esperantajn komunikojn per neesperanta gazeto, la plej multaj preferas tute forlasi la supersignojn, kio alkondukas al nedefendebila kripligo de la lingvo.

Ĝuste por tiu lasta okazo ekzistas unu, eble ne tre logika, sed oportuna elturniĝo. Konsiderante, ke tre multaj okcidentlandaj presejoj havas la rimedojn presigi la ĉirĉumfleksajn vokalojn de la franca lingvo (ekz-e en la vortoj: *pâté*, *fête*, *maitre d'hôtel*, *croûton* – kiuj cetere estas uzataj ankaŭ tiuforme en la angla lingvo), St. La Colla proponis, ke oni kvazaŭ deŝovu la supersignon de sur la konsonanto sur la tuj postan vokalon, kaj akceptu la konvencion, ke, en tiaj okazoj, supersignita vokalo donus gingivalan sonon al la ĵus antaŭa konsonanto. Tiu artifiko iel konservas la fizionomojn de la esperantaj vortoj, kiel oni vidas el jena ekzemplo: "*Cĉe la ŝangôj okazintaj en la ĉi-landa vojkodo, ĉiuj automobilistoj zorge informigû pri la ĵûsaj legâj instru:ccioj*".

Nu, ni analizu tiun chi trezoron da planita kaj mensoga malobjektiveco:

(a) La chapelozita alfabeto estas nek simpla, nek oportuna.

(b) Ne nur en la komencaj jaroj, sed anke en la aper-jaroj de PAG mem, kaj eĉ ghis nun (j. 2009^a), tiu alfabeto ne nur estis/as/os serioza ĝeno, sed tro ofte eĉ netrapasebla obstakla baro.

Fakte, la redakto estas tiel lerte farita, ke tre grandas la probablo, ke chiu nova leganto komprenu ke la "serioza ĝeno" donighis "nur" en la komencaj jaroj.

(c) Ghi estis/as/os obstaklo ne nur al la propagando, sed anke al chia ordinara apliko de ordinara lingvo (skribado, verkado, tajpado, printado, presado, eldonado).

(d) La permeso pri *h*-alfabeto estis donita en ADL, ne en UL.

(e) En tio ne temis pri "permeso", sed nur pri "parta permeso", cetere en la espero ke tiu permeso balde ighos nenecesa.

Rimarko.- En la aperjaro de la una eldono de PAG (1935^a), E estis jam 48-jara, tiel ke oni povus esperi pri veno sur saghan vojon, kaj ke, tial, tiu nura "parta permeso" ighus "plena rajto".

Nu, estas al mi tre dolora la fakto, ke jen la granda, mia dankata kaj admirata Waringhien, estis tamen arda defendanto kaj chefa dauriganto de la pucho de 1909^a kaj de ghia strategio. (Vidu ***).•

(f) ¿'Kiu estas "la esperantistoj"? Nu, se temas pri la ordinaraj E-uzantoj, jen ili nenion instinkte sentis pri afero kia "fonetika malprogreso", char ili nur konstatis/ sentis/ debatis 'chu la sistemo estas au ne estas simpla kaj oportuna, kaj povis nur sciighi kaj konsternighi pro la fakto, ke la elituloj de la E uzantaro senchese interbatalas dum dekoj da jaroj, tiel ke jen iuj ilin admonas pri uzado de chapelitoj kun celo eviti la morton de la lingvo, kaj alij ilin admonas pri ne-uzado de chapelitoj kun celo eviti la morton de la lingvo.

(g) La vera celo de tiu alineo pri malprogreso estas sugestii per flatado al chiu nova leganto ke anke li ekabomenu pri *h*-alfabeto, jene: "Vi, kara leganto, prave kaj instinkte sentas, ghuste kiel viaj kleraj kaj saghaj antaŭuloj sentis, ke *h*-alfabeto estas 'kaj fonetika malprogreso 'kaj minaco al la vivo de E".

(i) Ja estus vere shoke ke Z ne uzus *h*-alfabeton en telegramado. La be- daurinda fakto estas, ke li ghin uzis nur tiucele, kaj ke kiam li fine pretis ghin uzi normale, jen la pastraro kiun li mem flegadis tion ne permesis al li. (Vidu ***).

Nepre vidu en *** pri la definitiva opinio kaj sentoj de Z pri tiu "Vivo de Jesuo" (opinio kaj sentoj kiujn la E pastraro fine silentigis/as/os, kvankam mi ne scias 'chu kun spontana au perfortita konsento de Z).

(.) Jen venas fine la vico al la atendantaj alternativoj **(6)** kaj **(7)**:

(6) *car gi hore jetu sin au tuj* (PAG ne metas ekzemplon, simple citas la forlasadon de chapeloj):

Konsentite, konsentite, ke nura forlasado de chapeloj konsistigus kripligon de la lingvo.

-- Sed en tio ne temas pri "la lingvo", ja nur pri telegramado.

-- Rimarkindas, tamen, ke pro la interna lingvo-redundeco jen ech che forlasado de chapeloj la teksto ighas ankore ghenerale komprenebla (kaj des pli, se temas pri teksto sufiche longa kaj sen artifika akumulo de specialaj literoj). (Vidu *** kaj ***).

-- Ni tiele venas al la fakto ke, negrave 'kiun alfabeto-alternativon oni uzas, jen nenikaze shprucas malfaciloj, des malpli problemoj, che legado. Problemo au neoportuneco povas shpruci nur che skribado, tajpado, kompostado, komputilado, ja depende de la alternativo uzata: Nek pli, nek malpli.

-- Ja estas vere shoke ke masohhismado kaj/au skizofrenio kun malamo au hororo al *h*-chapelo atingis tian kulminon, ke ech che telegramado oni preferis riski miskomprenon al uzado la surogatan alfabeton.

(7) *câr gî høre jêtu sîn aù tuj*

Nu, jen okazas ke la kulmino priparolita en la jhusa alineo ech ne estas kulmino, char jen al *h*-alfabeto oni preferas chapelumadon sur la sekvanta vokalo, krome ke tian aranghon oni konsideras oportuna kvankam eble ne tre logika, kaj, finfine, ech pli oportuna ol uzado de apostrofo lau *** (!?).

Rimarko.- Klaras, ke por PAG kaj multaj aliaj, jen *h*-alfabeto estas io absolute abomena, tamen ne klaras 'kiuj estis ties kauzoj. (Mi pensas, ke por tio ekzistis / as ia psikologia kauzo, ja tamen al mi nekonata).•

Jen ni venas al alternativoj **(8)** kaj **(9)**, rilataj al la komputil-mondo. (La duan mi metas rugha por montri al ghia vasta uzateco):

(8) *^car ^gi ^hore ^jetu ^sin a^u tuj*

Kiel jam dirite en ***, jen ni, laikoj pri komputilado, shokighis en ties komencaj tempoj che sciigo ke tiuj mirindaj mashinoj tamen ne povas bone manipuli diakritojn char ili ne posedas "mortajn (= senpashajn) klavojn" por tiujn meti tiel facile kiel che tajpiloj, anke ke se oni achetis au farigis al si programon taugan por tiu celo, jen ghi preske certe ne estos kongrua kun aliaj programoj, ktp.

Nu, por *h*-uzantoj ja neniu problemo shprucis de tiu neatendita problemego. Kaj se oni deziris pri chapeloj, jen oni tajpis kvaze temus pri tajpilo, kaj oni rekte ricevis tajpajhon **(8)**, kiu ja estas perfekte klara kaj tauga por komunikado, ech se malbela kaj mis-efika por publico.

Rimarko.- Mi opinias memori, ke mi ie legis, ke uzado jen de chapelo " ^ ", jen de signo " < " povas havi difinitajn (mal)avantaghojn che chi alternativo porkomputila.•

(9) *cxar gxi hxore jxetu sxin aux tuj*

Tiu chi nova alternativo estas nomata "la x-kodo", vaste uzata en komputilado. Strukture ghi identas al **(3)**, tiel ke ambaj estas alternativoj al **(B)**, kiun ili avantaĝas lau vidpunkto de manipulado char tiel "y" kiel "x" ne estas E literoj, kaj tial ne ekzistas, au maksimume ekzistas nur malgrandaj ebloj de mistranchoj, de fushoj che retrokonvertado, ktp.

(9.1) Jam antaŭ tre multaj jaroj (forse ech pli ol 40, mi ne memoras precize) mi unfoje sciighis ke komputilistoj uzantoj de E planis anstataŭi la surogatan *h*-alfabeton per *x*-alfabeto char pli tauga por iliaj fakaj celoj, ja kun chefa argumento, ke

char *x* ne estas mem E litero, jen ghi estus senerare traktebla per la mashinoj, kaj tiele oni evitus la ambiguajhojn kiujn *h*-alfabeto kuntrenas, kaj ke, krome, che automata alfabetigo jen la nova surrogato provizas rezulton koincidan kun alfabetigo per chapelitoj (kio ne okazas per *h*-alfabeto; almena, nen pere de la pionire krudaj alfabetigo-programoj).



Aldone al tio, la planantoj informis ke en tio temis nur pri faka ilo, uzota/uzebla nur por provizoraj redaktaj kaj preparaj celoj sur la ekrano en laborejo au en propra hejmo, char por la definitiva publiko "jen tre simpla programo" rekte kaj automate transskribus la tutan provizorajhon per la ghusta chapel-alfabeto.

(9.2) Sciighinte anke ke Ingh. A. Broise estis un el la laborantoj pri la dirita plano, mi 2-3-foje skribis al li pri la afero, chefe parolante pri la *y*-alternativo **(3)** (de Michaux, jam en j. 1905^a), char almena por miaj okuloj de hispanlingvano ghi vidighas malpli malplacha ol la *x*-alternativo.






Li respondis al mi per densa poshtkarto kun listo da 6 kialoj por preferindeco de *x*, (inter ili, ke *x* estas malpli granda ol *y*, kaj tial pli bone tolerebla che ofta uzado). (Mi tre bedauros ke pro miaj pluraj translokighoj tra Hispanio jen tiu karto estas un el la relative multaj paperoj kiuj perdighis al mi, kiel anke ke mi ne memoras pli precize pri ghia enhavo). (S-ro Broise afable sendis al mi anke ekzempleron de sia verkata komputika terminareto. Anke ghi perdighis al mi).

(9.3) Mi komence tajpadis per komputilo *Atari* kaj ghia mirinda programo *Calamus* por teksto-prilaborado. Sed char tiuj komputiloj malaperis el la merkato, mi jam de multaj jaroj tajpadas per *WordPerfect 8* (al kiu mi, tamen, ne venis rekte, sed nur post ech multe da provoj per la absolute fusha *MicrosoftWord*).

Tajpado de la E specialaj literoj estas principe tre simpla, ech se ghena kaj teda: "Insertar / Símbolo / Multinacional / liter-tabelo aperas / selektu literon / klaku". (Tiele mi tajpis chiujn specialajn literojn en chi paghoj).

Eblas anke kombini simbolojn: Ekzemple,  ,  (sed ilin mi ne povas sendi per e-poshto).

Makroojn mi ne sukcesis manipuli.

Problemo tamen donighas, ke la specialaj E-literoj ne ekzistas por chiu grandoj kaj tipoj. Krome, tio ofte kuntrenas erarojn kiujn oni devas poste korekti, kaj foje shprucigas neatenditajn malagrablajhojn. (Por ekzemplo, en chi momento, jen mi ghuste tajpas per rektaj literoj Arial, sed che kursivigo jen foje aperas  , jen foje  , kaj ofte ili kvaze spontane shanghighas de un formo al aliu. Kaj per Arial Narrow aperas  ,  , ), ne le meti la ghustajn literojn, kaj che tio, krome, malghustighas la cetero de la linio, almena dum tajpado, kvankam en la fino chio ghustighas mem. Kaj pluraj aliaj ghenajhoj donighas, sed ne necesas detali pri ili (char, kiel jam oftege dirite, ech se tiaj malagrablajhoj ne ekzistus, mi same ne volus pri chapelumado).

(9.4) Cherpado de E tekstoj el la interreto montrighas ofte 'kaj ridiga 'kaj plo- riga, kaj pri tio mi donas tie chi du elstarajn ekzemplojn:

(A) En http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/universala_vortaro.html

la Akademio prezentas la tutan tekston de la Universala Vortaro.

Nu, el ghi mi povas cherpi, ekzemple,

carlatan' charlatan | charlatan | Charlatan | ?????????? | szalbierz.

carm' charmant | charm | anmuthig | ?????? | nadobny.

carnir' charnier | hing | Charnier | ???????? | nit, wyciecie.

carpent' charpenter | do carpenter's work | zimmern | ???????????? | ciosac.

carpent'ist' charpentier | carpenter | Zimmermann | ?????????? | ciesla.

carpi' charpie | lint for a wound | Charpie | ??????? | skubanka.

cas' chasser (vénerie) | hunt | jagen, Jagd machen | ?????????? | polowac.

cas'aj' gibier | game, venison | Wild | ????? | zwierzyna.

cast' chaste | chaste | züchtig, keusch | ???????????????? | niepokalany, czysty.

ce chez | at | bei | ?, ??? | u, przy.

ced' céder | yield, give up | abtreten, weichen | ?????????? | ustepowac.

cedr' cèdre | cedar | Ceder | ?????? | cedr.

cef' principal | chief | Haupt, Chef | ??????,

T.e.: Malgrau la tajpisto-shvitado konstatebla per la chapeloj ghuste aperantaj sur la ekrano, jen che remetado la tekston sur mian ektranon neniu diakrito aperas.

(B) Jen plia perlo (kiu fakte estas re-perlo, mem kronantan la perlon **(A)**):

En http://akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_1_2006.html prezidanto Mattos aplombe asertas au admonas en du malsamaj lokoj:

- Krome, nun estas jam eble plene kaj sekure dissendi pere de la reto nian tutan alfabeton.
- Tio sama devas validi por la skribo sur la ekrano de komputilo, ciam nur sur gi kaj neniam trans gi!

Che tiu aplomba "nun estas jam eble plene kaj sekure" de la prezidanto (tre pli bone informita ol mi, kaj certe ne mensoganta, des malpli publike) trudighas la konkludo, ke tiu fusha senchapela "ciam nur sur gi kaj neniam trans gi!" venas de mia nekompetenteco pri komputilado kaj/au de tio, ke mi ne posedas suficite bonan komputilon kaj/au komputilprogramon.

Sed... ĵmi simple deziras simple uzi esperanton, mi neniel volas spertighi pri komputilado, mi ne volas pli elspezi por mashinoj kaj/au por programoj!.

(Krome, mi ja neniel volus ke la Akademio propagandu pri difinitaj mashinoj au programoj).

Krome: Ech se Mattos vere pravus pri ne-plu-ekzisto de tiaj problemoj, jen estas mirige, ke la Akademio havis la monumentan paciencon atendi ĵpli ol 40 jarojn! ghis ghi povis frandi revenghon kontraŭ tiuj petintaj/petantaj pri sagheco.

Se mi ghuste komprenas la eldiron de Mattos, jen la Akademio pretas grandanime toleri ke komputilantoj uzu *x*-alfabeton surekrane, anke ke simpluloj uzu *h*-alfabeton (tiel rekte sur propra ekrano, kiel por transsendo kaj intershanghado kun aliaj ekranoj), sed ne toleras *x*- au *h*-printajhon au -presajhon.

Mi tre dankos na Mattos, se li bonvolos publici informon pri la ghenoj, doloroj, ploroj, kostoj, kiujn li kaj la tuta Akademio suferadis/as ghis ili sukcesis pri tia "estas jam eble plene kaj sekure".

Ja estas vere shoke, kaj ridinde, ke la alveno de la mirinda kaj dankenda komputila mondo jen tamen en la esperantana mondo chefe helpas al tio, ke en ghi masohhismado kaj skizofrenio pli kresku ol ech en pli fruaj tempoj!!.

Rimarkoj.- [i] Pro la kunteksto, mi komprenas ke tiu "eble" en "nun estas jam eble plene kaj sekure" havas sian propran, bazan signifon pri kapablo, kompetento, k.s., (do, kiel en H "es posible / se puede", A "it's possible / one can", F "il est possible / on peut", G "kann man", I "è possibile / si può"), kaj ke ghi ne enfermas mokan trompon pere de sia konvencia signifo pri eventualo, probable, necerte-co, ks., (do, kiel en "quizás / es posible que", "perhaps / maybe", "peut-être / il se peut que", "vielleicht", "forse").

(Mi chiam uzas la vorton "eble" nur por la una signifo. Por la dua mi chiam novisme uzas la italan "forse", do anke "forsa", "forso").•

[ii] Tia parolo kaj sinteno de Mattos (kaj de multaj aliaj) chiam memorigas min pri jena epizodo el *Don Quijote* [pr. donkihote]:

"... Venis al lia flanko, kaj tie restis piede, unu viro (kuracisto, kiel poste vidi is), kun barta vergeto en la mano. Oni delevis tre blankan kaj ri an tukon, kiu kovris fruktojn kaj grandan nombron da pladoj kun diversaj man oĵ. ... Alia viro, funkcianta kiel butlero, metis pladon da fruktoj anta la gubernatoro, sed apena li enbu igis peceton, kiam la doktoro verge tu is la pladon, kaj oni in formetis kun eksterordinara rapido.

...

-- Se tiel –diris Sancho– la plado da rostitaj perdrikoj tie videbla ne farus al mi dama on. Ili ajnas tre bone kondimentitaj.

-- La sinjoro gubernatoro ne man-
os ilin dum mi estos viva.

...

-- Tamen i alia pladego fumanta –diris Sancho– ajnas al mi miksita stufa o, kaj en i, pro la diverseco de iaj ingrediencoj, certe mi trovos ion konvenan kaj bongustan.

-- *Absit!* (*) –ordonis la kuracisto. –For etu de vi tiel eraran ideon! Ne ekzistas en la mondo pli mava man o ol miksita stufa o. in konsumu la kanonikoj, la direktoroj de kolegioj kaj la eestantoj al la nuptoj de kampuloj, sed i ne aperu sur la gubernatoraj tabloj, kie devas montri i nur rafinitaj delikata oĵ...

(*) Latine: in ne tushu!. Abstinu de tio!. [(Tio) estu for! / (Tio) forighu! / For!].

(Tio chi estas cherpajho el la 47^a chapitro de la dua parto de *La in enia hidalgo Don Quijote de la Mancha*, trad. Fernando de Diego. (Kadre de pluraj mokoĵ faritaj de la duko kaj la dukino al Don Quijote kaj al lia malklera kampula sed sagha shildisto Sancho Panza, jen chi tiun tiuj nomumis gubernatoro de insulo, kaj al li suferigis dolchojn kaj maldolchojn de gubernatora vivo).•

[iii] Malgrau la simileco, jen tamen diferenco ekzistas: La kuracisto shercis, sed, shajne, Mattos kaj aliaj seriozas.•

[iv] Ech ankore plia ridiga/ploriga afero enmiksighas chi tie: La Akademio jam delonge perdis sian virgecon, char jen, por ebligi la funkciadon de sia web-pagharo ghi ne povis ne uzi ĵchiujn tri alfabetojn (*chapel, h, x*)! (ja vere masohhisma, ech skizofrenia ago), kaj tamen, ghi volus ke chiuĵ lingvanoĵ ghin adoru virga sank-



tul(in)o, kaj ke, krome ili estu mem vere virgaj, ke ekster la ekrano nur chapeloj regu. •

(9.5) Mi nemulte scias pri E en la interreto, tamen ja sufiĉe por admiri kaj profunde danki la multon da laboro farita, ofte bona aŭ tre bona.

En la sekvajho temos pri jenaj tri pagharoj:

http://bertilow.com/html/esperantaj/html_sur.html (de akademiano Bertilo Wennergren).

<http://www.akueck.de/eoskribo.htm> (de Andreas Kück).

<http://groups.yahoo.com/group/peticio/>.

La unan el tiuj mi jam konas de kelka tempo; kun la du lastaj mi ĵus konatighis, ĝuste serĉante materialon por ĉi sekcio.

La du unaj fake rigore prezentas, i.a., la multegon da diversaj kaj implikaj eblaj manieroj laŭ kiuj oni povas nuntempe (Julio 2009^a) munti aŭ provi munti komputilprogramojn por chapelumado, kaj la tria temas pri peticio al la Akademio (al kio mi revenos en ^{***}, do nun temante nur pri tiuj du unaj).

Mi (kaj, mi supozas, anke la aŭtoroj, kaj ĉiu homo) povas nur horori de tia monstra, novtipa Babelo da operaciaj sistemoj, programoj, kodoj, eĉ trukoj (kaj preske ĉiuj manipuleblaj nur de fakuloj, aŭ de preskaj fakuloj), kiuj esta jen bone, jen nur mezbone, jen malbone taugaj por chapelumado, krome tute aŭ preske tute nekongruaj inter si. (Vidu pli konkrete, ĉisekve, en ^{***}).

Kück subskribis la peticion ^{***} al la Akademio, tiel ke estas absolute klara lia sagha starpunkto rilate oficialan plenan agnoskon kaj ĉiuflankan validecon de *h*-alfabeto. Krome, li sin esprimas perfekte klare, koncize kaj ĝuste (kaj pri tio mi lin dankas kaj gratulas): "**Sensupersigne lau-Fundamente!**". Aldone al tio, li citas jene: Kiel Zamenhof faris, ankau aliaj esperantistoj pledas por la uzado de la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u), ekzemple Nikolao Grishin (en [3]): "Mi ne estas stulta, kaj supozeble por mi ne estus problemo ellerni chapeligan. Sed mi scias, ke tio estus tute nenecesa kaj kausus problemojn al aliaj homoj. Ne ĉiuj kapablas esti programistoj. Internacia lingvo uzu internacian alfabeton. Ni iru plej facilan kaj mallongan vojon renkonten al la mondo." (Se vi samopinias, tiam bonvole subskribu la de Neil MacKilligin iniciatitan peticion por lau-Fundamenta sensupersigna skribo: <http://groups.yahoo.com/group/peticio/>).

Rimarkoj.- [i] La aserto "tio... kausus problemojn al aliaj homoj" ja signifas, ke eĉ se li sukcesus mastri tajpadon per chapeloj, jen tamen ankore restus la evidente eĉ pli granda problemo, ke ĉiu tia speciala programo estus kongrua kun nur malmultaj samcelaj programoj (forse eĉ kun neniu), kaj tial interkomunikado, intershanghado de tajpajhoj, dosieroj, ks nur lame funkcius, kaj ke ofte eĉ estus neebla. (Vidu tujsekve pri ĉerpajhoj el la Wennergren-pagharo). •

[ii] Vidu en ^{***} kaj ^{***} pri la ekzakta kunteksto kaj signifo de tiu "Kiel Zamenhof faris". •

El la pagharo de Wennergren mi cherpas jenon (en kio, tamen, ne aperas la chapeloj kaj arkoj de la originalo, kaj mi tial ripetas la ghustan ekzemplon inter rektaj krampoj) (grasigo mia) (mi resumas pri la prezento de liaj sep lastaj alternativoj):

Se oni rezignas pri gustaj Esperantaj supersignaj literoj, oni povas uzi iun el la multaj surogataj sistemoj, kiuj ekzistas por skribi Esperantan tekston. Jen la plej gravaj el tiuj sistemoj. Fakte ne multe gravas, kiun el ili oni elektas. Praktike oni povas legi ilin ciujn senprobleme. Plej popularaj [el la surogataj], kaj plej rekomendindaj, estas la du unuaj: *la Fundamenta H-sistemo*, **kiu estas plej bela kaj plej launorma (tute lau-Fundamenta!)**, kaj *la X-sistemo*, kiu estas tre konata kaj vaste uzata.

Ehosango ciujaude	jxaux ; jxaw ; jxavx ;
[E o a n o i u a d e]	^ja^u ; j^au^ ; ^ja~u ; j^au~
Ehhoshangho chiujhaude	

Se vi pensas kelkajn sekundojn, vi certe povas mem krei ankoraŭ unu sistemon. Sed ne malsparu vian tempon. Cio ajn, kion vi povas eltrovi, estas jam centfoje elpensita. Sciu ankaŭ, ke **surogata skribado estas ciam malpli kaj malpli bezonata**. Ne indas do malspari tempon por elpensi ian "perfektan" surogatan skribon.

Nu, ni komentu pri la du asertoj kiujn mi tajpis grasaj:

(a) Lau mia kompreno, la ekscesa kvalifiko "plej bela" al lau-Fundamenta *h*-alfabeto fakte estas kasha informo, ke la ne-Fundamentan *x*-alfabeton li trovas malbela.

Krome, la kvalifikoj "plej launorma", "tute lau-Fundamenta" estas nur parte veraj. Ili povos ighi plene veraj nur, se *h*-alfabeto iam estos oficiale egalrajta kiel chapel-alfabeto (vidu ***).

(b) Lau mia kompreno, anke Wennergren (akademiano kaj fakulo pri informiko) deziras / esperas / atendas pri la felicha kaj felichiga tago en kiu ech laikoj pri komputilado povos perfekte manipuli pri chapelitoj, do tre pli bone ech ol li nun povas fari (char, jen, ech post mi-ne-scias-'kiom-da jaroj dum kaj tra kiuj li baraktadis/as por chiam fari un plian pasheton antauen, tamen li ankore ne sukcesis ke mi povu ekzakte cherpi liajn chapelojn kaj arkon).

Lau tiu mia kompreno, do, masohhismado-pri-kaj-per-chapeloj plu kaj daure vive shprucas kaj floras ech en lokoj kaj tempoj apene prisupozeblaj.

Rimarkoj.- [i] Mi ne konas kontrastajn statistikojn pri uzateco en la interreto de chiuj tri alfabetoj (t.e., *chapelo*, *h*, *x*), sed havas la impreson ke en tio chefas chapeloj, poste venas *x*-alfabeto, kaj ke *h*-alfabeto estas apene uzata. Kaj mi havas anke la impreson, ke plejparto de tiuj *x*-skribajhoj celas nur resti tiaj en la interreto, sen plano pri surpapera eldonado.

Se tiaj estus la faktoj, jen ni venus al la paradoksa situacio, ke komunumo kies granda parto dum da dekjaroj, oficiale kaj private, obstine kaj kun malamo rifu-

zadas la surogatan *h*-alfabeton, jen nun spontane kaj fervore adeptas al la surogat-surogata *x*-alfabeto, krome daure en teorio (sed tute ne en praktiko) uzebla nur por laboro provizora, kabineta, ks., do nen por definitiva publiko.

Nu, lau mia kompreno, tre pli bone por ni chiuj estus, se tiuj nur-interretaj *x*-skribajhoj anstate aperus per *h*-alfabeto. •

[ii] Mi supozas, ke mi ne estis la sola kiu, che alveno de komputiloj, naive vartis la esperon, ke la bezono sin adapti al tia potenca nova mondo kaj kulturo kvaze automate kuntrenus la oficialan egalrajtigon de ambaj alfabetoj, ja ambaj por definitiva redakto kaj publikigo, krome kun forta oficiala rekomendo laueble preferi *h*-alfabeton.

Nu, evidente, temis pri naiveco je la kuba potenco (mi ech kuraghus diri je ronda, perfekte polurita kuba potenco). •

Komplemento.- Mi ne domaghas dedichi du tutajn paghojn al jena dis-peca, tre resuma cherpajho el la pagharo de Wennergren, char per ghi mi trafas du gra-vajn celojn:

-- Unacele, por informo pri la enorma aro da aferoj rolantaj chi-terene, al tiuj homoj kiuj –kiel mi– ne scias pri ili, kaj krome estas kaj eventuale volas resti absolutaj laikoj pri komputilado ks char tion ili volas nur por la koncernaj fakuloj (ja tute analoge al tio, ke por sukcesi pri tajpado ja neniu volus bezoni fakulighi pri integral-kalkulo).

-- Duacele, char nur per tia cherpajho ighas mia komento *** komprenebla al absolutaj laikoj pri komputiloj.

(La kolorigo de iuj vortoj estas mia).

Esperanto en la komputilo.- Linukso.- Vim.- OpenOffice.- WordPress.- Fajrovulpo.- Vindozo.

Esperanto en Linukso.- **Por bone uzi Esperanton en Linukso, necesas iom da agordado de la sistemo.** Jen kelkaj notoj pri tio,... Mi uzas la Linuksan distribuon “Ubuntu 7.10 (Gutsy Gibbon)”. Antaue mi uzis “Kubuntu 7.04 LTS (Feisty Fawn)”.... **Se vi uzas alian specon de Linukso, vi eble devas iom alie fari.**

Ciujn komandojn, kiujn mi mencios ci-poste, oni faru en konzolo. Ciujn sangojn de agordoj en dosieroj, oni faru per simpla tekstoredaktilo (**kate, nano, vi, vim, emacs...**). Por kelkaj sangoj necesas... **Felice** pli-malpli ciuj Linuksaj distribuoj **nuntempe** uzas **Unikodajn** lokajarojn defaulte. Por kontroli... klavu la jenan komandon: locale charmap. Se aperas la respondo “UTF-8”... tiam cio pri signokodo en via lokajaro jam estas en ordo. Tiam vi povas tuj salti al la klarigoj pri Esperanta klavaro au, se vi volas, al la klarigoj pri Esperanta lokajaro.- **Sed se aperas io alia**, vi devas mem salti UTF-8-an lokajaron... komandu: ... kiu **versajne jam trovigas** en la komputilo. Por tion fari, **oni unue provu la sekvan komandon: export LANG="en_US.UTF-8"**... Tie ankau eblas elekti lingvon por la KDE-interfaco. (Ankau Esperanto haveblas, sed eble vi devas aparte instali la Esperanton lingvopaketon. Esperanto uzointerfaco tamen ne vere estas necesa por labori Esperante en

Linukso... Se oni jam havas en sia sistemo alian lokajaron UTF-8-an, oni povas skribi la nomon de tiu lokajaro anstataŭ “en_US.UTF-8”.- Por ekscii, kiuj lokajaroj estas instalitoj, oni komandu jene:locale -a.- Se mankas lokajaro tauge por via lingvo, vi eble bezonas kompletigi vian sistemon per paketoj por tiu lingvo. Uzu por tio la programon “synaptic” au... Poste rekontrolu per la komando locale charmap, cu funkciis la ensalto de “UTF-8”. Se jes, la sekva paso estas zorgi ke tiu lokajarelekto estu farata automate por ciu uzanto. ...komandojn en la dosieron “.bash_profile”, kiu troviĝas (au troviĝu) en la hejma dosierujo de ciu uzanto... Tie skribu jene: LANG=en_US.UTF-8 export LANG.- Se vi volas alian UTF-8-an lokajaron, vi kompreneble skribu tiun nomon anstataŭ “en_US.UTF-8”.

Por kontroli, cu la sango al UTF-8-a lokajaro vere funkcias, vi elsalutu kaj reensalutu. Poste faru la komandon locale charmap. Se tiam aperas la mesaĝo “UTF-8”, vi sukcesis. provu ankaŭ Se vi deziras veran Esperantan lokajaron... En iuj Linuksaj distribuoj tia lokajaro jam ekzistas, kaj tiam nomigas “eo_XX.UTF-8” au “eo_EO.UTF-8”... En Ubuntu kaj Kubuntu oni povas instali Esperantajn lokajaron kaj tradukojn de programoj pere de la paketoj "language-pack-eo", "language-pack-eo-base", "language-pack-gnome-eo", "language-pack-gnome-eo-base", "language-pack-kde-eo", "language-pack-kde-eo-base" kaj "language-support-eo".... Noto: La dosiero “eo_XX” estas bazita sur Esperanta lokajaro kompilita de Eric Lesh. En mia versio mi korektis kelkajn eraretojn, kaj krome sangis la monatonomojn tiel, ke ili aperas kun komencaj majuskloj. Mi tamen ne komprenas tre multe pri tiaj lokajardifinaj dosieroj, kaj versajne eblas ankoraŭ plibonigi tiun lokajaron.

Esperanta lokajaro en Gnome...

Preta Esperanta klavarfasono...

En KDE oni faras tion per la Sistemagordilo (“System settings”) ? Regionoj & Alireblo (“Regional & Accessibility”) ? Klavarfasono (“Keyboard layout”). Tie oni ebligas... elsercu la Esperantan klavarfasonon en la maldekstra kolumno, kaj gin aktivigu.... Eble vi ankaŭ devas gustigi la agordon pri klavarmodelo (pri la nombro de klavoj sur via klavaro).

Esperanta klavaro en SuSE.- De Pablo Morales mi ricevis klarigon, kiel oni povas instali Esperantan klavarfasonon en SuSE 10.0. Mi tamen tute ne testis, cu funkcias. Lau li oni faru jene:...

Senpasaj klavoj

Mi kaj multaj aliaj preferas tajpi la Esperantajn literojn per senpasaj supersignaj klavoj. Se vi jam uzas nacilingvan klavarfasonon, kiu havas ... tiam vi jam havas cion necesan por tajpi Esperanton per tiu klavarfasono.- Klavo por senpasa cirkumfleksa situas tamen en tre diversaj lokoj en diversaj klavarfasonoj. En iuj fasonoj gi troviĝas sur... Se vi estas bonsanca, vi povas atingi senpasan hoketon per “AltGr”+“u”.... Testu, cu vi povas per gi tajpi “â” (“a” kun cirkumfleksa).... Se al via klavarfasono tute mankas klavo por senpasa cirkumfleksa, tiam vi eble aktivigu alian klavarfasonon (por alia lingvo)... Plej multaj Gnome-programoj, Vim kaj iuj versioj de Fajrovulpo uzas por sia grafika interfacio la ilaron GTK. Bedaurinde en GTK la senpasaj kla-

voj funkcias tute alie (ne demandu min, kial...), kaj senpasaj klavoj por la Esperantaj literoj tial ne funkcias en tiuj programoj.- **Bonsance eblas solvi tiun problemon. Necesas komandi al GTK**, ke gi ne uzu siajn proprajn klavarorutinojn, sed tiujn de la generala sistemo. Por fari tion, vi aldonu...".bash_profile" (kiu troviĝu en la hejma dosierujo)... GTK_IM_MODULE=xim... export GTK_IM_MODULEEble vi devas aldoni la samon ankau al la dosieroj ".bashrc" kaj ".profile".... **Espereble** nun funkcias klavado ankau de la Esperantaj cirkumfleksaj literoj pere de senpasa cirkumfleksa klavo.

Noto: Se tamen ne funkcias, tiam eble vi devas sangi pli draste: Provu redakti la sistemdosieron "/etc/environment" kiel administranto. Aldonu al gi... **Se vi havas klavon por senpasa hoketo, kaj se gi funkcias por tajpi "u"**, kaj se vi trovas tiun tajpomanieron tute konvena, tiam cio jam estas en ordo.

Sed povas esti, ke vi tute ne havas manieron tajpi senpasan hoketon, au povas esti, ke gi estas iom malkonvena (tro da klavofrapoj), au povas esti, ke vi simple deziras unu solan klavon, kiu produktas Esperantan supersignon cirkumfleksan au hoketan depende de la posta litero. Tiel estas por mi. Mi volas unu solan klavon por ambau Esperantaj supersignoj. Tion bonsance oni povas facile arangi per ".XCompose":

“.XCompose”

Por efektiviĝi, ke senpasa cirkumflekso + u donu “u”, necesas redifini la konduton de la senpasa cirkumflekso. Tion oni povas fari per dosiero nomata “.XCompose”. Gi troviĝu en la hejma dosierujo de la uzanto. En tiu “.XCompose”-dosiero oni povas meti ekz. la jenajn liniojn:

include "%L"

<dead_circumflex> <u> : "u" U016D	<dead_circumflex> <U> : "U" U016C
<dead_circumflex> <v> : "û" U00FB	<dead_circumflex> <V> : "Û" U00DB
<dead_circumflex> <C> : "C" U0108	<dead_circumflex> <c> : "c" U0109
<dead_circumflex> <G> : "G" U011C	<dead_circumflex> <g> : "g" U011D
<dead_circumflex> <H> : "H" U0124	<dead_circumflex> <h> : "h" U0125
<dead_circumflex> <J> : "J" U0134	<dead_circumflex> <j> : "j" U0135
<dead_circumflex> <S> : "S" U015C	<dead_circumflex> <s> : "s" U015D

(Eble vi bezonas nur la unuajn kvin liniojn.)

Rimarku, ke tiu arango difinas senpasan cirkumflekson + “v” por klavi “û” (“u” kun cirkumflekso), car senpasan cirkumflekson + “u” gi uzas por “u”. Se vi bezonas pli ofte tajpi “û” ol “u”, vi eble volas sangi tion iel.

Redifini la klavaron.- Eble vi volas uzi certan klavarfasonon por tajpi Esperante, sed al tiu fasono mankas la bezonataj klavoj. Au eble vi volas, ke la haveblaj klavoj estu iom rearangitaj por ke la tajpado estu pli konvena por vi. **Tiam, se vi estas kuraga, vi povas provi redifini tiun fasonon.** Por fari tion en la plej bona maniero **necesas iom da scioj pri la sistemo XKB. Bedaurinde XKB estas tre kompleksa, kaj mi**

ne kapablas gin bone klarigi. La koncernaj dosieroj troviĝas en “/usr/share/X11/xkb/symbols/”.... Mi mem sukcese redifinis mian Svedan XKB-klavaron (post multaj vanaj provoj). Jen la linio, kiun mi aldonis al la dosiero “se” (en “/usr/share/X11/xkb/symbols/”) por meti senpaskan cirkumflekson sur tiun klavon, kiu situas du pasojn dekstre de “p”:

```
key <AD12> { [dead_circumflex, dead_circumflex, dead_tilde, dead_caron ] };Mi aldonis tiun linion ene de la sekcio ‘partial alphanumeric_keys xkb_symbols "se"’.
```

Jen kelkaj Anglalingvaj pagoj, kiuj provas klarigi XKB-on:

The XKB Configuration Guide An Unreliable Guide to XKB Configuration Creating custom keyboard layouts for X11 using XKB X keyboard extension (Vikipedio) Krome: Se vi sukcesas fari funkciantan kaj bonan klavardifinon XKB-an, tiam nepre faru sekurecokopion de via kreaĵo, kaj metu gin en ian sekuran lokon, **car povas esti, ke viaj sangoj nuligos, kiam la sistemo estos gisdatigita.**

[Ktp, ktp, ktp].

Miaj komentoj: Mi klopodu ordigi la pensojn kaj sentojn kiujn la ĵhusa skribajho (kaj ĉiuj al ĝi parencaj) vekas en mi:

(a) Estas al mi ĝapige, fakte nekompreneble, ke kvankam Wennergren eĉ ne sukcesis post tiom da jaroj da strebado lia ke mi povu ĉerpi liajn tekstojn el la ekrano, jen tamen li insistas pri preferindeco de la chapeloza alfabeto en la komputilo.

(b) Tia oficiala kaj privatula insistado pri chapelumado per komputiloj (dau-ranta jam pli ol 40 sufer-jarojn, kaj plu-ankore-minacanta-per-mi-ne-scias-'kiom-dapliaj-suferjaroj) estas afero perfekte kaj absolute fremda al la celo de E, sekve anke al E.

Fakte, temas pri sintenado malutila al la ordinaraj E uzantoj, tial anke al E.

(c) Bonigo de tia bedauriga situacio povas veni nur per oficiala kaj ĝenerala plena akcepto anke de senproblema alfabeto, almenaŭ ĝhis la tempo en kiu komputiloj prezentos **absolute nenian** problemon ĉe uzado la chapelitojn por trankvila tajpado, trankvila dosier-intershanghado, trankvila farado de TTT-pagoj, trankvila eposhtado, ktp., ktp. (Vidu ***).

Rimarko.- Tiu "almene ĝhis la tempo" ja venas de tio, ke eĉ se chapelumado iam ĉesus esti eĉ netrapasebla obstaklo kaj iĝus senprobleme manipulebla, tamen, permanente kaj inherente neeviteble, jen sendiakrita alfabeto estas strukture pli facile kaj pli oportune uzebla –tiel aktive, kiel pasive– ol diakritoza alfabeto. (Vidu ***, pri la ĝhenata kompostisto).•

(d) Ĉiuj hispanlingvaj laikoj mem pri informiko (kaj mi inter ili), kaj supoze ja anke ĉiuj alilingvaj laikoj, tre surprizighis en la komencaj tempoj de komputiloj ke ĉi novaj mirindaj mashinoj ne disponis tamen por almetado de diakritaj signoj pere de tiuj t.n. "mortaj au senpashaj klavoj" kaj mem tiel simple efikaj ĉe tajpiloj, tiel ke komputilaj diakritoj estis problemo por ĉiu lingvo aparta kaj problemego por la ku-

najho de ili chiuj, ktp. De tio aperis relative multaj plendoj kaj/au shokoj en la jurnalo (mi mem kontribuis per un tia letero en la plej grava galega jurnalo).

Che alveno de mortaj klavoj por la hispanaj dekstra korno " ´ " kaj tremao " " " iu diris al mi ke fakte ne temis pri mortaj klavoj, sed nur pri ia truko kiu por la uzanto ja funkciis kiel morta klavo, sed kiu vere en la intestoj de la mashino temas pri unbloka, memstara kompleksa litero (kiel, ekzemple, en "á").

Nu, el la lego la tekston de Wennergren mi komprenas ke la afero pri mortaj klavoj ne estas ankore bone au unforme solvita, ktp.: Mi ja povas tute bone tion toleri por la hispana char en ghi temas pri afero neevitebla, sed certe nur tre malbone kaj kun kolero en rilato al E, char en ghi temas nur pri la kaprica kaj obstina sintenado al fusha arangho, nur komplikiga por la lingvovivo kaj por la vivo de E-uzantoj, ja mi inter ili. •

(d) Jen masohhismado ne nur daure regas inter ni, sed ech trovis en komputilado plej fekundan grundon por plu kaj multege pli floradi, krome en plej diversaj landoj kaj personoj, kaj por bunta katalogo da malsamaj alternativoj inter si nekongruaj.

Jam pli ol 40 jarojn chi nov-speca masohhismado dauras, kaj minacas dauri por eterne.

(e) Fakte, ech temas pri masohhismado tute paralela, "izomorfa", al tiu pionirita de Z ekde la presad-malfaciloj de sia UL (vidu ***). La kerna diferenco estas, nur, ke li tiam havis aferon al diakrito-problemoj en presejoj (anke en tajpiloj), kaj nun oni havas aferon al diakrito-problemoj en komputiloj.

(f) Tamen, inter ambaj situacioj ekzistas jena grava psikologia diferenca fakto:

-- Por Z temis pri nura, pura kaj dura masohhismado, luktante kontrau eksterhejmaj presejoj kaj kontrau sen-inteligentaj mashinoj kaj ferajhoj super kiuj li havis nenian povon au influon.

-- Por komputilistoj temas, krom pri masohhismado, anke pri la intelekta ghuado (profesia au hobia) venki logikajn kaj struktur(ig)ajn problemojn de kvaze-inteligentaj mashinoj, komforte hejme sidante, kaj kun scio kaj konscio ke ili povas kontribui al pliperfektigado de la programoj manipulataj, tiele kontribuante al progreso de la mirindajho de nia epoko, nome, informiko.

Kaj mi krome pensas ke, en tia kadro, ilin spronas al persistemo sur tiu vojo la intima sento kaj ekkolero kontrau sin mem pro la malsukceso (tuta au nur parta) de iliaj ghisnunaj klopodoj.

(g) Ja veras, ke multaj lingvoj havas, che siaj diakritoj, problemojn multe pli gravajn kaj ghenajn ol E, sed tio neniel povus esti pravigo, ech tute male, por ke E elektu la malfacilan kaj frenezigan vojon anstat la facilan kaj senprobleman, ankan vojon, kiun ghi havas je dispono.

(10) *tcar dqj ? qetu cin ? ?*

Pri tiu chi alternativa propono informis min amiko jam antau relative multaj jaroj: Malgrau sia stranga aspekto, ghi havas klaran strukturon: "c" reprezentas la oftan senvochan sonon " " (do, kiel en la reformo-projekto de 1894^a), kaj "q" reprezentas la respondan maloftan vochan sonon " j " (supozeble, char ambaj literoj estas grafike iom similaj per la vosto).- Do, nun, digramoj por du oftaj sonoj: tc = t = (kiel en IFA); dq = d = (kiel en IFA , kaj analoge al *dj* en ***).

(11) Chi propono vidighas en <http://pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha21.html>, en kiu ghi estas nomata NHA = Nova Help-Alfabeto (kun kompreno, ke la "malnova help-alfabeto" ja estas *h*-alfabeto). (La *h*-alfabeton ili nomas FHA = Fundamenta Help-Alfabeto).

Rimarko.- Se jughi nur lau la lingv(ik)a gravo de chi propono, jen estas ekscesa la atento tie chi donota al ghi. Tamen, tia atento estas necesa por ghusta kompreno de la socia kaj etosa enhavo de (***) fare de tiuj, kiuj ne jam sufiche scias pri la afero. •

Chi pagharon tenas D-ro André Albault, la multe merita kaj dankata editoro de la 9^a eldono de FE, anke iama Direktoro de la Sekcio de la ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto, kaj poste anke ĝhia Prezidanto (j. 1983^a-1995^a).

La konsisto de tiu chi propono estas la lasta fazo de procezo kiu publike komencighis en j. 1995^a kaj finighis en 2005^a. Paralele al tiu konsisto-shanghado evoluis anke ĝhia nomo (el kiuj mi memoras pri "aeiou" kaj pri "Universala Alfabeto", kvankam ne plu memoras 'chu ghi ricevis pliajn nomojn).

En <http://www.liberafolio.org/2005/Agado/ekstrenha/> aperas informo (ne el Albault) pri la historio de tiu chi afero (inklude de parolo pri iuj Jon Walter Yung kaj Yannic Gicquel, probable pseudonimoj de Albault mem).

Rimarko.- La sciigho, ke Albault muntis, au gvidis, au almena partoprenis proponon pri alfabet-reformo, estis skandalo por la esperantana mondo, char ghis tiam li chiam kaj senescepte sin montris skrupuleme rigora observanto kaj observiganto de la Fundamento de Esperanto. (Por ekzemplo, la una alineo de la " ĝenerala Enkonduka Notico" kiun li verkis estiel editoro de la 9^a eldono de FE, finighas per jenaj vortoj: "... la *Fundamento* restos la roko, e kiu ies opinio devas cedi a rompi i"). •

Kun chi afero mi chesis havi kontakton jam antau nau jaroj. Nu, por redakti chi sekcion mi revenis al ghi pere de la interreto en la supre citita adreso, kaj je mia granda surprizo mi tie trovas jenon (la koloroj kaj grasigo estas de la originalo):

[] Resume NHA perfekte taugas por sia **rolo de surrogato de la Oficiala Alfabeto** : ji ne nur certigas la **dudirektan materialan transdonon** al kay de la oficiala, sed ankaŭ ji **repzentas nian lingvon en la mondo**, dum nenies vango rujijos fronte al la publiko pro strangay portempay grafemoy [= x-alfabeto, forse anke *h*-alfabeto].

Cetere la oficialan alfabeton oni principe chiam uzu, krom se ne eblas. [T.e. (chefe, kaj ruze): En la interreto oni nepre uzu nur NHA tiom longe, kiom chapeloj daure restos komplikajho che komputiloj; t.e., ni uzadu NHA ghis la tago de Sankta Neniamo]. [Pri *h*-alfabeto, kaj des pli pri x-alfabeto, ech ne ekzistas kauzo paroli].

Nu, la novajho en tio chi estas, ke, unaflanke, ne plu temus (kiel en la komencaj tempoj de la propono) pri anstatigo la chapel-alfabeton per nova alfabeto (kiu, krome, igus superflua la *h*-alfabeton), sed nur pri anstatigo la *h*-alfabeton per tiu nova (tiele lasante valida kaj senshangha tiun saman chapel-alfabeton kiun almenaŭ en la komenco ili volis kaj esperis elimini). Kaj, duaflanke, ke nun temas pri moderatona prezentado de propono, en forta kontrasto kun la drasta postulo de la unaj tempoj (char, efektive, temis pri postulo, nen pri propono, vidu ***).

Krome: Pri la signifo de tiu bombasta, mistera ech, "... ji [NHA] reprezentas nian lingvon en la mondo..." oni sciighas nur per kaj post cerbumado pri la enhavo de la tuta dosiero, nome: Temas simple pri la aserto ke "la NHA estas **subaro** [= sub-aro, parto] de difinenda **Internacia Ortografio (IO)**..." rilata al la lingvoj skribataj au transskribataj lau la latina alfabeto, kaj muntita de Albault mem. (Vidu tujsekvan **(c)**).•

Nu, ni komentu pri chi tiu afero per laueble apartaj partoj (kaj el kiuj mi taksas grava nur la lastan, nome (***)):

(a) *char ji khore zhetu shin au tuy*

Ghi, evidente, estus en praktiko tute bone uzebla aktive kaj pasive, char ghi malhavas chapelojn kaj estas rekte komprenebla ech sen eksplikoj pri ghi (kio cetere, kaj kiel jam traktite en ***, preske automate okazas che chiuj proponoj por alfabet-reformo).

Ghi gardas digramojn, do ghi gardas anke la respondajn eblojn de mistrancho.

La ortografio en vortoj *char, ji, shin, tuy* sekvas la anglan ortografion (en kio "y" estas un el la kvar bazaj latinaj literoj ne akceptitaj de Z).

La tute nova ortografio en *khore, zhetu* sekvas la manieron ghenerale uzatan en la angla por respektive montri al la sonoj " ", " j " che transskribado de alilingvaj vortoj (ja, chefe, propraj nomoj de personoj, landoj, ks).

Do, nur *au* diverghas de la angla normo au kutimo (kiu postulus por ghi la formon *aw*). Tial, *u* plu gardas la du valorojn *u/* (kiel, respektive, en *zhetu* kaj *au*).

(b) En la unaj fazoj de chi plurfoje shanghighinta propono pri reformo de E alfabeto la litero " i " ludis anke la rolon de E " j " (char tiam ankore (i)li ne decidis/kuraghis ekuzi por ghi la ne-zamenhofan " y "); krome, laudire de Albault, estis uzataj anke la literoj " q " kaj " x ", ktp.

Rimarko.- Malgrau chiaj sinsekvaj shanghoj, jen ili chiam laute asertis sin pravaj, krome chiukaze egale pravaj. Lau mia kompreno, ili sentis sin absolute pravaj rilate la celon, kvankam rilate la konsiston de la sinsekvaj proponoj ili probable havis almena pli-malpli grandajn dubojn. •

-- Enkonduko de litero "y" por la sono de E "j", kune kun uzado de la tiele liberigita "j" por la sono de E " ", konsistigas la trian kaj lastan shtupon eblan kadre de la sinsekvaj proponoj **(2)** kaj **(4)**, enkondukitaj ghuste por ke litero "j" ne aperu en vortofino, krome kun avantagho (lau la penso kaj gvidanta kriterio de Albault), ke ghi nun ricevas la sonon kiun ghi havas en la plimulto da lingvoj kaj che la plimulto da parolantoj uzantaj tiun literon en la tuta mondo (angla, ktp), kaj ke, krome, oni evitas un digramon, nome, "ch".

Ekzemploj.- Chi-apude vidighas ke " j " kaj " y " estas uzataj ekzakte egale kiel E " " kaj "j". (*)

ji najas

yu, tuy, meylo, meyloy, myelon, myeloy.

(*) Chi ekzemploj, kiel anke tiuj en la sekvantaj alineoj, estas metitaj de mi.

-- La duoblan rolon de *u* por la sonoj *u/* oni gardis lau jenaj konsideroj:

- Lau la una rimarko pri la alfabeto en la rusa parto de FE, "... la litero (kiu estas uzata nur post vokaloj)..." (vidu ***).

- Malvolvante pri la surogata alfabeto en FE, Z proponas i.a. jenan redakton (vidu *** k.a.): "La sono " " estas skribata simple "u", sed en la lernolibroj oni klarigas, ke "u" post vokalo estas elparolata mallonge (konsonante), farante kun la vokalo unu silabon... Se la "u" devas esti elparolata aparte de la anta iranta vokalo, i ricevas anta si apostrofon". (En ***: "En tiuj maloftaj kazoj ... antau si apostrofon au streketon").

- Z enkondukis neniun vorton en FE kun la sono " " antau vokalo. Krome, che vortoj kies etimo havas tian sonkombinon li sisteme shanghis " " al "v".

- Albault chiam arde defendis la tezon, ke la jhus traktita arango pri " " estas lau-fundamenta, absolute nemodifebla legho, ech strukture nepra por la lingvo.

• NHA senshange akceptas tian tezon, lau chi apudaj ekzemploj. (Lau sia gherale anglema sinteno, jen NHA devus alpreni la literon "w" por la sono " ", do sen bezono pri apostrofo, sed pri tio ghi neniel pretus konsenti). [Gvatemalo, ktp].

Fra lo ÷ fraulo	Washington ÷ Va ington
praulo ÷ pra'ulo	quattuor (*) ÷ kvar
pra-ulo	Guatemala ÷ Gvatemalo
balda ÷ bal-dau	Wikipedia ÷ Vikipedio
balau ÷ bala'u.	(*) latina

-- En la supre citita propona teksto, Z diras anke, i.a.: "La sono " " estas tute el etata. Tiu i sono estas rezervata en la alfabeto nur por fonetika skribado de nomoj kaj havas la formon "kh". En chiuj vortoj kiuj ghis nun... ".

Nu, lau NHA, avantaĝo de chi nova digramo estas, ke ghi estas samcele uzata de la angla, ktp, kaj tial ghi ghin alprenas al si, sendepende de tio, 'chu la lingvo gardos au ne gardos tiun plej maloftan sonon, krome tiele evitante la 'strangan' digramon "hh".

-- Restas nun la digramoj "ch", "jh", "sh". Nu, char la angla ktp uzas digramojn "ch" kaj "sh" ghuste kun sama valoro kiel en *h*-alfabeto, jen NHA ilin gardas. Fine, la angla ktp prenas anke digramon "zh" por sono " j " (la dua plej malofta sono en E) che fonetika skribado de alilingvaj vortoj; tial jen ghin anke NHA alprenas, krome tiele evitante la 'strangan' digramon "jh".

- Fine: Plu lau la supre citita propona teksto de Z, "... Se la 'h' devas esti elparolata aparte de la anta staranta c, g, j a s, i ricevas anta si apostrofon". (En ***: "En la tre maloftaj okazoj... anta si apostrofon au streketon").

marshalo
marsh-alo
mars'halo
mar-shalo

.....

(c) La difinenda au difinota IO estas, simple, alfabeto konsistanta el la 26 simplaj literoj de la baza alfabeto latina plus 7 digramoj (kaj kiun Albault mem muntis lau chi-apuda arango en, liadire, tri grupoj).

b, d, f, g, h, k, l, m, n, p, r, s, t, v, z
a, e, i, o, u
ch, sh, zh, gh, kh, dh, th ; c, j, q, w, x, y

Chiam lau Albault, chi alfabeto taugas por la ortografio de ech tre multaj lingvoj en la mondo (ja inklude de E, mem ne bezonanta la tutan alfabeton).

Rimarkoj.- [i] Tio chi shajnas laucele tre parenca al la "Fonetika Internacia Alfabeto" de de Saussure (vidu **(5)**), tial egale fremda al E kaj al ghia vivo, kaj tial tenenda rigore aparta disde esperantajhoj. (Tamen, ja anke chikaze E povus eventuale aposteriore profiti de la eventuala internacia kaj institucia akcepto de chi nova mirindajho).•

[ii] Estas ech komike ke por klopodi skribe speguli la prononcon de ne-esperantaj vortoj (tute speciale, de propraj nomoj personaj kaj geografiaj), jen Albault agnoskas al si la rajton uzi literojn *w*, *q*, *x* kaj digramojn *th*, *dh*, chiuj fremdaj al sia alfabeto, sed rifuzas agnoski egalan rajton al uzantoj tiel de la chapeloza alfabeto, kiel de *h*-alfabeto. •

(d) Jen tie chi mi cherpas el tiu nun moderatona artikolo jenajn lingve kaj lingvike harhirtigajn erojn, ghuste lau la ordo per kiuj ili tie aperas kaj sen komentoj (pri kiuj temos en **(e)**):

-- Chi tiu artikolo sinsekve bezonas pri jenaj novaj sigloj: NHA = *Nova help-alfabeto*, IO = *Internacia ortografio*, FA = *Fundamenta alfabeto* (= chapel-alfabeto), FHA = *Fundamenta help-alfabeto* (= *h*-alfabeto), KAT = *Komputile asistata transalfabetigo*.- (Lau mia kompreno, tie mankas, krome, siglo UA = *Universala alfabeto*, ja la patrino au avino de NHA).

-- "Se tiuy pseudodigramoy [c-h, s-h, ktp] aperas interne de vorto, - en tiu okazo ili pley ofte apartenas al propray nomoy, - oni prefere uzu apostrofon , ekz-e, *C'hristaller*. Ni atentu tion por la kazoy, en kiuy ni deziros elfari *Komputile Asistatan Transalfabetigon* (KAT). Pseudodigramo ne povas aperi meze de vorto, krom se tiu estas kunmetita (pac-himno)".

-- "La litero *y* pli ol bone taugas por la ofico reprezenti la Zamenhofan literon *j*.

Efektive *ji* estas monde konata por tiu sono (**yes, Bayonne, Tokyo, Kenya, Surabaya, Yemen**, ktp), dum la Zamenhofa *j* estas samsone konata nur en Centra Europo : chefe en la Jermanay kay Slavay lingvoy".

-- "La procento de parolantoy de tiuy lingvoy...".

-- "La lingvoy "IFA-ecay" (jes/kai), ... la lingvoy "Zamenhofecay" (jes/kaj)... ". [Tiele: "IFA-ecay" (jes/kai)].

-- "Ni diru du vortoyn pri lasta konsonanto, kiu estas simile internacia kiel *y* ! Temas pri *w* ! Okazis en la yaroy 1960-1980 sub la premo de diversay autoroy la enkonduko de *krona u* por noti la internacian antaŭvokalan *w* : fonetiko instruas, ke *krona u notas duonvokalon*, dum *w* en ties internacia uzado estas **bilabia konsonanto**. Konvenas respekti ambau literoy (*krona u* & *w*) kay iliayn sonoyn, des pli, ke la dua el ili estas monde internacia (**Wakayama, Walwis Bay, Wenzhou, Wellington, Wonsan**, ktp), dum la unua estas almenau tre konata". [Tiele: "almenau tre konata"].

-- "Ni notu, ke la litero *w* valoras [V] en malmultay lingvoy de Centra Europo, chefe la Jermanay kay la Slavay. Juste tio kondukis Zamenhofon preferi la transskribon per litero *V* : *Vashington* lau la samprononcay [V] Pola (*W* : *Waszyngton*) kay Rusa (В : Вашингтон). Aliparte li malkonsilis uzi la *kronan u* komence de vorto au de silabo".

-- [Che parolo pri IO]: " ke *gh*, trovebla ekz-e en la Araba, ...*dh*, *th* ... en la Angla kay Araba. ... *q* gorja *k* de la Araba, Persa . . . *x* [KS] de la okcidentay lingvoy..."

"Kiam oni konas la grafemoy de IO, oni per tio mem konas la alfabeton de la lingvoj skribatay per ia subaro de la IO. Ni citu la ekzemplon de la Yapanana alfabeto : komprenu la transskribon el la kana-silabaro al la nuna Romaji, ankau nomata *Hepburn* (Yapane : *hebon shiki*) ! Se vi mastras la IO-on, vi tuy komprenas tiun transskribon : vi tuy povas legi Yapanayn proprayn nomoy kun granda aproksimo, ekz-e, en la okcidentay zhurnaloy au publikazhoy, en viay libroy au sur la televiday ekranoy".

-- "... la Indonezia kay la Swahila. Sufichos, ke vi lernu po unu literon ... ji shanjas la digramon *zh* al la yena : *zi*. ... pri *pinyin*, au oficiala transskribo de la **China**,... En ji oni retrovas la grafemoy : *ch, sh, zh, j, w, y*. Tamen la China pro-

nonco iom malsamas por du el chi grafemoy : ... Aldonu al tiuy tri sonoy fortan dentalan atakon".

"Tio estas ankau la kazo de multay aliay lingvoj Afrikay kay alilokay . . ."

-- "Chi-rilate sciu, ke la Anglalingva publiko disponas pri fonetika sistemo perfekte adaptita al sia lingvo ! La pley multay vortaroy destinitay al tiu publiko aperigas en siay enkondukoy iun detalan *Prononc-Shlosilon* multe pli agrabla kay komprenebla, ol la tre kay tro scienca Internacia Fonetika Alfabeto (IFA).

Nu, ni ne miru, ke tiu Prononc-Shlosilo tute respondas al IO, estas alia subaro de IO, almenau por la konsonantoy. La Angla posedas 20-on da vokaloy, kiuy estas specifay ! Konsekvence ili estas prezentatay per la sama nombro da specialay grafemoy".

-- "Ni konkludu, ke estas do neniel mirige, ke enfine oni trovu en la IO juste la elementoy, kiuy oni enmetis dekomence en tre diversayn lingvoyn !"

-- "La X-kodo estas sistemo bazita sur la nekompreno de injenieroy (1956, UK de København) : ili opiniis, ke la matematika simbolo *x* de nekonateco estas aparte konvena por noti ambau signoy ! . . ."

Evidentas, ke tiu « X-kodo » tute ne taugas por serioze kay elegante vesti nian lingvon ! Ji estas nur ia shercazho, iu farsazho ! Klaras, ke ji produktas strangayn vortbildoyn (*gxusta, anstatauxa, aux, gxi, kauxzas, kontraux* . . . klare kay pli bele traduku per : *justa, anstataua, au, ji, kauxzas, kontrau*).... Chiu scias, ke ech la X-kodo ne estas imuna kontrau la plago aperanta post konverto kay retrokonverto : oni scias pri la urbo Bruxelles, kiu farijis Br elles".

(e) Komentoj pri (d):

-- Rimarkindas la chikana maniero lau kiu Albault volus pravigi sian decidon, ke anke en sia bombasta IO = *Internacia Ortografio* jen *y* kaj *u* konduytu samkiel en sia NHA = *Nova Help-Alfabeto [por Esperanto]* (t.e., samkiel *j* kaj *u* en la surogata *h*-alfabeto):

- "... fonetiko instruas, ke *krona u* notas duonvokalon, dum *w* en ties internacia uzado [= pli granda internacia uzado] estas bilabia konsonanto. Konvenas respekti ambau literoyn (*krona u* & *w*) kay iliayn sonoyn".

Nu, mankas almenaŭ provo pravigi tian aserton pri konveneco.

- "La litero y pli ol bone [?] taugas por la ofico reprezentante la Zamenhofan literon *j*". (Substreko mia).

Nu, eĉ ne unu vorto pri la instruoj kiujn fonetiko alportas al ni pri la roloj duonvokala kaj de palata konsonanto de tiu litero, kiel anke nen pri la nekonveneco distingi ties sonojn per malsamaj literoj.

- Dukauze surprizis min la aserto "IFA-ecay (jes/kai)" (t.e., unafle, ke la Internacia Fonetika Alfabeto (Angle, IPA) distingas grafike ĝuste pri tiuj du sonoj, antaŭvokala aŭ postvokala; duaflanke, ĉar tio kontraŭdiras lian decidon, uzi unu literon "y" (Z "j") por ambaŭ roloj.

- Tiu '(jes / kai)' mi opinias evidenta fusheto pro preteratento, ĉar ĝuste tia ortografia kontrasto *j / i* estis uzata en la unaj tempoj de la projekto, kiam (i)li ankore ne decidis/kuraghis enkonduki la ne-zamenhofan "y".

Kaj eĉ plie: Ili tiam kun granda malkontento, preske kolere kaj kun malestimo, parolis pri fusho kaj malscienca decido de IPA atribui al "j" ĝuste la saman rolon kiun Z atribuis al ĝi. [Oni ne forgesu, ke la kerno kaj ghermo de la tuta afero ja estis, ke "j" nenikaze povus aperi vortofine; vidu ***].


-- "La plej multaj vortaraj destinitaj al tiu publiko [= anglalingva] aperigas en si aj enkondukaj iun detalan *Prononc-Shlosilon* multe pli agraba kaj komprenebla, ol la tre kaj tro scienca Internacia Fonetika Alfabeto (IFA)".

Nu, fine kompreninte ke liaj ĉekomencaj eldiroj nur ridindigis lin, jen li simple diras nun ke IFA estas tre kaj tro scienca: Sed ĉar li efektive nenion eksplicitan diras pri tiu IFA-'fusho', jen lia aserto estas tiel fremda al nia temo kiel, ni diru, parolo pri (rok-kaj-pop)-muziko.

Rimarko.- Mi aldonu tie ĉi ion pri mia sperto en rilato al IFA:

Dum pli ol duono de mia vivo mi konstante bezonis baraktadi kontraŭ kvar malsamaj anglaj vortaroj, chiu el ili kun propra "Key to pronunciation symbols", chiu el ili neniam kaj neniel informodona krom por anglalingvanoj (kiel videble en chi-apuda skanajho), tial kompreneblaj nur al ili, kaj agrablaj al neniu lingvano, angla au alia.

Feliche, ni chiu jam disponas, anke en la interreto, anglajn vortarojn uzantaj la IPA-simbolaron, kiu ne nur montras la simbolojn, sed anke instruas nin pri la prononcado.



Bedaure, tamen, ke en tiaj vortaroj estas uzata tro simpligita IPA-simbolaro, fakte nesufiĉa por hispanlingvanoj, ĉar ili ilin ne atentigas pri konstanta distingado laŭ la okazoj inter anglaj [l] kaj [], inter [p] kaj [p], ktp; ĉar anstataŭ la simbolo [] por la angla "r" oni uzas [r], ktp., ktp.

Bedaure, anke, ke la elementaj lernolibroj de mi konataj ankore ne uzas tiun simpligitan IPA-simbolaron.

Kaj tre pli bedaure, anke, ke tia saĝan, pedagogian kaj sciencan progreson okazantan en la angla oni ankore apene au eĉ tute ne adoptis en aliaj lingvoj (almenaŭ, ne en la lingvoj pri kiuj jen por vera uzo, jen pro nura scivolemo, mi deziras sciigi pri prononcado).

Aldonajho: Dum posta serĉado materialon en la interreto por redakti ***, mi trafis jenan ghojigan paghon:
<http://www.sinosplice.com/life/archives/2008/10/23/ipa-for-chinese-children>: ĴInstruado de IFA al ĉinaj infanoj!.

Nu, mi jam antaŭ longe kaj relative ofte instruis la kernon de IFA al pluraj infanoj (kiuj, krome, eĉ tre ĝhuis la plezuron ludi per fremdaj sonoj). Ĝuste nun tio okazas kun Marina, 9-jara nepino mia, kaj antaŭ 5 jaroj okazis kun Toñito, 9-jara najbareto mia.

Mi tial profitas la okazon elkore danki chiujn IFA-fakulojn. •

-- "La Angla posedas 20-on da vokaloj, kiuj estas specifaj ! Konsekvence ili estas prezentataj per la sama nombro da specialaj grafemoj".

Nu, mi ne sukcesas kompreni, 'kial Albault ne deĝnis prezenti al ni tian mirindan aron da 20 specialaj grafemoj por la angla: Mi certas, ke li ilin tute ne havas; sed, negrave 'ĉu jes havas au ne havas, jen li per tia aserto nuligas sian alfabeton, kaj lasas eĉ senbaza tian IO pri kiu li volus tamtami.

-- Albault apene au neniom informas pri siaj fontoj. Nu, mi ne sukcesis trovi 'kie trovighas la eksplicita malkonsilo pri kiu temas en "Aliparte li malkonsilis uzi la *kronan u* komence de vorto au de silabo".

-- Mi rezignas plu komenti pri **(d)**, char nin atendas aferoj pli gravaj ol tia nura chikanado kaj kvazaj argumentoj.

(e) Tie chi mi prezentas plurajn skanajhojn el du leteroj kaj fotokopioj de jhurnal-eltondajhoj senditaj al mi de Albault kaj Doublet che la jarshangho 1999^a-2000^a (kaj kiuj, kiel dirite en ***, konsistigas mian lastan kontakton kun chi afero ghis veno al mia nuna tajpajho).

Rimarko.- Mi ilin tie chi prezentas nen lau vidpunkto de lingvo au lingviko, sed nur pro ilia granda valoro lau homa vidpunkto. (Kiel mi jam diris en ***, ni parolas kaj debatas preske nur pri la lingvo, kaj apene pri la lingvanoj).•

Aliparte ni respektas vian deziron uzadi la
Fundamentan Help-Alfabeton. Vi luktu por ĝi ! Brave, sed ni neniel !

De A. Albault, Prezidanto de TRENHA = "Tradicia Esperanto. Nova Help-Alfabeto").- (1999-12-24)

Dankon pro via letero (18.12.99). Mi agnoskas, ke inter ni vi tute pravas: FA kaj FHA certe sufiĉas.

Fakte, vi tute pravus, se Esperanto estus lingvo parolata de deko da Okcidentanoj, sen deziro pri monda ekspansio.

Nu, se ni faras nenion nun, la Angla finmortigos Esperanton. Baldaŭ ni estos dek Esperantistoj, tiam vi tute pravos. Ni ĉiuj respektos la Fundamenton laŭlitere kaj Esperanto malaperos, kiam la lasta el la dek mortos. Kiu diras, ke mi troas, tiu troas. D-ro Tazio Carlevaro ĵus eldonigis [Hans Dubois]: « Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045? »

Post legado de tiu eseo multaj iĝas pli humilaj.

(De J. Doublet, komitatano de TRENHA).- (2000-I-09)


Kiu havas malfacilon por lerni la Latinan alfabeton, tiu rifuzos ludi per hobia lingvo, kiu kripligas la nomojn:

VIJAYAWADA [VIGHAJA-UADA]

Almenaŭ la Angla estas gajniga! Kiam iu ricevos teleron da lentoj dank'al Esperanto?

Kion vi faros sola kontraŭ unu miliardo da loĝantoj, kiuj jam posedas oficialan komunan lingvon?

(J. Doublet)



(Doublet)

(Doublet)

-- En la unua skanajho vidighas bona specimeno pri la konstanta sinteno de Albault, nome: Sen klarigoj nek eksplikoj, li simple, intime kaj spontane sentas la *h*-alfabeton hida, forse dangherega kiel venena serpento, kaj tial ghin malestimas kaj malamas.

Nu, mi ne sukcesis vere sciighi pri la kauzo psikologia kaj/au historia, ks. de tiaj sentoj (kiuj, cetere, montrighis kaj plu montrighas tre fortaj kaj profundaj en preske chiuj niaj elstaruloj, jam de 120 jaroj).

(En rilato al la jhusa alineo rimarkindas ke, en sia pagharo Albault fakte donas nenian fundamentitan argumenton anke por sia propono).

-- El la dua skanajho vive reliefighas doloraj sentoj de malespero kaj de timo pri la estonteco de E.

Tamen, almenaŭ du demandoj trudighas insolentaj:

- Ĉu vere, ke Doublet, Albault kaj chiuj iliaj samopinianoj iam esperis / supozis / imagis al si / revis, ke che la eventuala akcepto de ilia surogato por la surogata alfabeto jen la estonteco de E ighus pli hela, almenaŭ iometete pli hela?.

Nu, mi ne sukcesas imagi al mi ke ili ech minimume fidus au esperus je tio.

- Kaj nun, sob-venante de la revo-altoj al la vulgara grundo: Ĉu vere, ke Doublet, Albault kaj chiuj iliaj samopinianoj iam esperis / supozis / imagis al si / revis, ke ilian alfabeton, mem surogatan al la oficiale surogata, povus akcepti tiuj samaj esperanto-uzantoj (tiel ordinaraj, kiel elstaraj, kiel la Akademio) kiuj jam 104 jarojn havas la rajton uzi la oficialan surogaton, sed obstine rifuzas uzi tiun rajton?.

Nu, mi ne sukcesas imagi al mi ke ech pri tiu chi pli simpla afero, ili ech minimume fidus au esperus.

(Vidu la tujsekvan rimarkon).

-- En la tria kaj kvara skanajhoj montrighas du samspecaj specimenoj pri la esplor-tekniko kaj argumento-strukturo de (aeiou/NHA/IO)-flagelantoj (ja draste konstatebla anke en la kvaza argumentado de Albault en lia pagharo).

Nu, facilus analizi kaj detali pri tia fushado, tamen mi preferas tion ne fari tie chi, char ne plu peninde.

-- Mi inklinas opinii ke la kvina skanajho simple prezentas dolorplenan argumenton de despero.

Rimarko.- Kiel jam supre dirite (vidu ***), NHA / Albault sin prezentas nun per modera tono, sed en la unaj tempoj, jen aeiou/??? kampanjis per eldiroj kiel "... [fari] solenan deklaron de la tria jarmilo, suplemente al la Deklaracio de Bulonjo en 1905 kaj ani ante al la nova kulturo, tiel ke ni iuj, kaj la Akademio de Esperanto epinte, nuligu nian oficialan alfabeton kaj akceptu kaj defendu la alfabeton novan".

(Evidente, tia truda kruda orgojla postulado estis strategia fushego fare de Albault, char ghi povis nur kreskigi ghis absoluta certeco la altegan probablon ke ech moderatona propono ne estos akceptita).

(Char la originalo de chi citajho perdighis al mi, mi ghin cherpas nun el la ekzemplero de HEF-Boletín en kiu mi publicis la hhaosan artikolon cititan en ***. Nu, mi fidus min mem pri la ghusteco de la citajho).•

(f) Ni venas nun al la fino de chi longega sekcio:

-- El la ekzemplero de "libera folio" supre citita (vidu **), mi cherpas nun jennon:

"En sia recenzo pri la 100-paga verko de Albault kaj Doublet pri alfabeto reformo John Wells, lingvisto kaj iama prezidanto de UEA, en marto 2003 skribis interalie: 'Foje okazas, ke eminenta maljuna esperantisto obsedigas pro detalo de nia lingvo, tiom ke tiuj, kiuj antaue respektis lin, povas nur skui la kapon en bedauro'."

"Propran reform-projekton de la esperanta alfabeto cetere elpensis en alta ago ankaŭ alia eminenta esperantisto, Vilho Setälä (1892–1985), kiu estis unu el la plej gravaj finnaj esperantistoj de la pasinta jarcento kaj ankaŭ akademiano".

Rimarkoj.- [i] John Wells ree estas prezidanto de la Akademio ekde 2007^a.•

[ii] Mi jhuras per Zamenhof, ke anke chi-foje mi ne kulpas pri tio, ke sur mia ekrano ne aperas la belaj kaj ghuste supermetitaj chapeloj kaj arkoj de la originala teksto en "libera folio": Nu, mi hipotezas, ke char ili scias ke mi ilin ne shatas, jen ili decidis ne degni sin lasi esti manipolataj de malklera fushulo.

Pluse: KREDU min, ke mi ne intencis plu rideti sed, jen, jhus montrighis antaŭ mi jena ridetiga perlo fine de tiu sama pagho (grasigo mia): "Novaj reform-proponoj dum jardekoj aperadis preskaŭ same ofte kiel la malnovaj malaperadis. La **perfektan** argumenton kontraŭ ciaspecaj sencapeligoj *Libera Folio* jam prezentis en [La fina venko de la chapeloj](#)". (Bedaure, la ligilo ne funkciis, kaj la komputila moshto

trifoje informis min "The page cannot be found)". [Kaj tion ghi senshanghe diradis al mi ghis mia lasta tajpado-tago].•

-- Parolo/akuzo pri alta, meza au malalta agho neniel konsistigas argumenton por au kontraŭ la pritemata afero: Fakte, ghi konsistigas nuran nelojalan kashan provon shajnigi ke oni konstatas bedaurindan malpliighon de la mensa kapablo de la koncernaj personoj kaj/au manko de optimisma energio, ktp., tiele provante eviti trakti pri la vera temo.

-- Se ni entute akceptu jugho-kriterio la statistikan (mal)oftecon de la koncernaj faktoj, jen chiuj psikologi- kaj psikiatri-libroj konstatas ke la mensa ankilozo kaj konservativemo estas tipa trajto ne nur de olduloj, sed anke de bedaurinde eĉ tre granda proporcio de maturuloj kiujn tro frue trafas mensa maljunigo.

-- Cetere, oni apene povus chikaze akuzi na Albault pri maljuneco ktp: Li estis 71-jara kiam li en 1995^a publicis la unan formon de sia propono, kaj nur li povus diri al ni 'chu la enhavo de la propono estis rezulto de nur kelktaga au kelkmomata laboro post subita iluminigo, au 'chu temis pri plur- au mult-jara procezo pri kiu kaj dum kiu li ial bezonis hipokriti kauze de la socia atmosfero kaj institucia superstrukturo kiujn ni tiel bone sukcesis munti al ni.

-- Couturat, la aŭtoro de *Ido*; de Saussure, la aŭtoro de *Antido* k.a., ktp., ktp., neniel estis iaj kadukuloj kiam ili argumentis ke nia alfabeto ne nur estas teknike fusha por la celo de interlingvo, sed anke kaj sekve, obstakla al la lingvovivo, kaj treege ghenas, malagraba kaj malbela por almena konsiderinda parto de la tuta lingvanaro.

-- En chi kazo neniel temas pri nura "detalo de nia lingvo", sed pri la "detalego alfabeto", do pri problemego kiu, kvankam "*la lingvon mem* tute ne tu as", jen jam de pli ol 122 jaroj, do eĉ de antaŭ la naskigo mem de la lingvo, venenas kaj obstaklegas la lingvovivon, kaj ghenas la vivon de almena multaj lingvanoj. (Diference, *h*-alfabeto obstaklus neniun, nek la lingvon, nek la lingvanojn). (Vidu *** kaj ***).

-- La mispasho de la eminenta esperantisto Albault ja estas bedaurinda ago.

Tamen, tre pli bedaurinda, bedaŭrenda, analizenda kaj korektenda estas la fakto kaj situacio, ke laŭlonge de 122 jaroj jen granda parto de la energio, tempo, laboro, mono, chagrenado ktp, tiel de la junaj kiel de la maljunaj, tiel de la ordinaraj kiel de la eminentaj uzantoj de Esperanto, nu, chio chi estis vane forelspezata kaj forperdata kauze de, kaj kulpe de, nia alfabeto.

-- En tia nepra analizado oni ne forgesu ke, negrave 'chu la Akademio jam verdiktis au ne, negrave 'chu la veteranoj jam interkonsentis au ne, negrave 'chu eldonistoj jam interkonsentis au ne, nu, kauze de la strukturo mem de la afero, jen che chiu nova lernanto, che chiu nova dezirata presisto, che chiu nova interesighanta jhurnalo au institucio, neeviteble shprucos duboj, miroj, gapoj, kaj ja abundaj ekdeziroj reformi la alfabeton, tiel ke la problemo daŭre strukture reproduktighas tra la generacioj.

Per pli precizaj vortoj: Tia sama bedaurendajho daure obstaklos la lingvovivon **almene** tiom longe, kiom daure ekzistos ghiaj kauzoj. (Tiu rugha "almene" ja montras al la evidenta fakto, ke ech che la eventuala eliminado de la problemokauzoj, jen ni ne povas certi, ke automate eliminighos la ghistiamaj nekonvenajhoj kauptaj de tiuj kauzoj).

-- Konklude: Chia eventuala memkontentigha aserto ke problemo ne ekzistas char chapelumado perfekte kaj nesidigeble kongruas kun la strukturo de la tuta lingvo, anke char la akademio decidis ke, anke char la veteranoj konsentas ke, anke char la komputilistoj esperas ke, ktp, ktp, estas nura vortado, nura superstruktura/eklezia/pastrara sinteno kaj ne-agado, kiu la strukturan kaj tial konstante renovighantan problemon ne solvas.

Kredu min, nur tajpante la trian au kvaran el la jhusaj alineoj, jen mi subite konsciighis, ke anke chi skribajhon mian oni analoge povus tute bone jughi fusha estiel rezulto de mia alta agho, char mi jam estas 80-jara; kaj des pli oni povus tiel jughi, char mi certe ne estas eminenta esperantisto.

Nu, sendepende de tiu subita konsciigho, mi jam antaue planis meti jenan informeton pri mi en rilato al *h*-alfabeto.

-- Mi defendas por la *h*-alfabeto rajtojn egalajn al tiuj de la chapel-alfabeto ne char ghi igus min felicha kaj/au char mi ghin taksus ideala, sed nur char mi taksas ghin la malplej malbona el chiuj eblaj solvoj al la problemo kauptita de la daure misefikanta una kaj plej grava fusho farita de la tamen genia Zamenhof.

En tia kadro, mi ree dankas kaj gratulas na Kück pro sia perfekta, konciza devizo **"Sensupersigne lau-Fundamente!"** (vidu ***).

Rimarko.- Char lau la jhus dirita opinio oni devas rezigni pri ideala solvo, jen demando povus shpruci, 'kial ne proponi, ekzemple, solvon per *x*-alfabeto anstatede de per *h*-alfabeto.

Nu, la kialo tre simplas: Che la tri fakte funkciantaj alternativoj (nome, chapel-alfabeto, *h*-alfabeto, *x*-alfabeto) jen *h*-alfabeto estas tiu kiu postulas malpli da cedado al la partianoj de la ceteraj alternativoj, tiel lau vidpunkto de lau-fundamenteco, kiel de tradicio, kiel de eventualaj estetikaj valoroj, kiel de oportuneco pri faka perkomputila manipulado. •

-- La tristiga afero pri la "Vivo de Jesuo" (vidu *** kaj ***) klare pravas ke jam tiam estis apene espereble ke niaj eminentuloj kaj institucioj iam konsentus pri egalrajteco de ambaj alfabetoj.

Pri la sinteno de ne- eminentaj esperantistoj en rilato al chi afero mi nenion konkretan scias: Kvankam forse temas pri iluzio kiun mi volus fari al mi mem, mi pensas ke duono de ili tion akceptus gojhe au almene senprobleme, sed ke la dua duono tute ne, au nur tre malfacile, ghin akceptus.

-- Dum mia 8-jara prezidanteco de HEF (= Hispana Esperanto-Federacio) (en la jaroj 1989^a-1997^a), estus ech nepenseble, ke mi povus konvinki nian chef-redak-


toron pri ĝenerala egalrajta akceptebla de ambaj alfabetoj en nia organo "Boletín"; krome, certe, tion ne akceptus plejparto de nia anaro.

-- Mia fiaskinta projekto "K+E = Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto" (en la Universitato Santiago de Compostela, Hispanio) havis sekretan parton, neesencan, tamen gravan: Se ghi sukcesos firmighi, kaj nur post tia eventuala firmigho, ghi allasos egalrajtaj ambajn alfabetojn.

La projekto sukcesis eldoni (ja per la chapel-alfabeto) la originalon de Miguel Fernández pri García Lorca, la originalon de Rafaela Urueña pri la Europa Juro, kaj havis en preparo por presado la originalon de David Galadí pri Astronomio kiam la projekton trafis la definitiva morto (tiel ke la libro de Galadí devis iri aliloken).

Nu, tiam mi jam havis mem jam preske pretaj la kvaran kaj kvinan originalojn, unajn per *h*-alfabeto.


(1) La unua havis titolpaghon

 <p>Stud-kajeroj</p>	<p>Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto. Ekzerco de analiza geometrio Tri surfacoj rilataj al fiziko-leghoj, plus pluraj komplementoj. Antonio <i>Alonso Núñez</i>. Licenciulo pri Matematiko.- AIS-Adjunkto Hispanio</p>
<p>Universitato de Santiago de Compostela (Hispanio)</p>	

(Temas pri la leghoj pri: Kunmetado de samrektaj rapidoj lau la Galilea-Newtona kinematiko.- Kunmetado de samrektaj rapidoj lau la Ejnstejna kinematiko.- Idealaj gasoj).

Tiun chi studkajeron mi nun reverkas kun grandeta peno, tamen kun granda gajno, char la interreta trezoro ebligas ghin treege plirichigi, tiel koncepte kaj redakte, kiel anke per fotoj ks. I.a., ghi enhavas plurajn skemajn desegnajhojn komputile faritajn de mi mem.

(2) La dua havis titolpaghon

 <p>Seminari-kajeroj</p>	<p>Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto. Kronologie pri la alfabeto(j) de Esperanto. Antonio <i>Alonso Núñez</i>. Licenciulo pri Matematiko.- AIS-Adjunkto Hispanio</p>
<p>Universitato de Santiago de Compostela (Hispanio)</p>	

(t.e., temas pri la una redakto de la teksto kiun vi nun legas).

Ghia nuna reverkado ja postulis tre ampleksan ghisdatigon. La tre pli perfektaj kaj tre pli simplaj reproduktiloj nuntempaj ebligis ke mi ne domaghu la penon anstatigi multon da transskriba, nur-parta kaj nur-pene legebla tajpajho per skanaĵoj de plenaj alineoj el la presitaj fonto-tekstoj. Krome, la kajer-enhavo ighis malpli akademie asepsa.

Rimarkoj.- [i] Almene en la hispana, la vorto "asepsa" havas, krom sian propran signifon medicinan, anke tiun figuran (tie chi uzatan) de "neutrala / frida / senpasia".•

[ii] La verkado de chi seminari-kajero okazis tra kvar malsamaj fazoj:

(a) Jam antaŭ multaj jaroj, kiam ankore mi ne pensis pri K+E, mi komencis faradi manskribitajn slipojn pri la alfabeto kaj pri aliaj E-aferoj, ĉar min tre ghenadis la multaj makuletoj kiujn mi daŭre opiniis konstati ĉe legado librojn pri E.

Tamen ĉio restis propre nur-embrie, ĉar krom la pezeco de la tasko, jen anke ghia enhavo estis daŭre malplacha, kaj propre seninteresa por mi.

(b) Kiam venis la tempo revii pri K+E, kaj jam disponante komputilojn legherigantajn la diritan pezan taskon, jen trudighis la penso, redakti koncernan seminari-kajeron.

(c) La komike ploriga epizodo, ke mi kandidatighis al la Akademio (vidu ***), nur plifirmigis la kajer-projekton (ĉe se mia kandidateco ja povis daŭri nur tre mallonge).

(Kaj ĉe la malsukceso pri K+E, kaj ĉe la adekvata sukceso pri la Akademio, jen la kajero restis en nur-preska preteco).

(f) Fine, antaŭ kelkaj monatoj, paro al mi amika sugestis al mi, ke mi iom paghumu tra la esperantaj pagharoj de la interreto, eventuale ion verku por la Vikipedio, kaj jen la ideo ion reverki ekvivighis.•

[iii] La antaŭa verkado de chi kajero, kiel anke ghia nuna reverkado, neniel estas placha tasko au afero por mi (kaj krome, ghi neniel lauas la temojn por mi interesaj): Mi nur kun tristo pensas, ke tre pli bone por ni ĉiuj estus, se ne ekzistus kauzo pensi ion tian verki.

(Mi pensas nun ke jes, ke ghi fakte min treege interesas... sed lau la treega intereso kiun propra malsano povus vekii en mi).•

Evidente, mia tiama kaj ghisnuna penso estas ke, sendepende de tio, 'ĉu la Akademio finfine agos saghe au persistos en sia superstruktura/eklezia damagha sintenado, jen estus bone, ke la dezirantoj pri libera, senghena skribado en esperanto por laborado per esperanto, sukcesus organizi internaciajn aranghojn kiujn la ghenerala socio kaj ghiaj institucioj povus taksii rekte gravaj kaj utilaj per si mem por la socio, sendepende de la lingvo uzata en ili.

Aldone mi diru ke escepte de tio, ke temus pri nedubeble bela kaj/au nedubeble grava verko, mi opinias, ke ja preferindas nenion publici ol kontribui mem al la ghera masohismado per chapelumado.

Rimarkoj.- [i] La projekto K+E estis kovata dum multaj kaj longaj jaroj, ghis chirkau la j. 1982^a ghi trovis tre favoran akcepton che la universitata rektoro. La plano komence estis tre ambicia, char ghi konsistis el du fazoj: En la una fazo, instruistoj de elementaj lernejoj komencis studi E-on, kun celo instrui tujsekve siajn lernantojn, kiuj farighos mem siatempe studentoj de la somerkursoj. Por la dua fazo: La kurso okazu kadre de ghera kultur-agado de universitato, kvankam ja ekster oficiala titolado kaj simile; universitato helpu per siaj strukturaj, financaj, eja rimedoj.- Internacia profesoraro verku studkajerojn en esperanto lau la nivelo kaj celo de la projekto, kaj ilin oni eldonu.- Internacia profesoraro instruu; laueble, la autoroj mem de la kajeroj.- Internacia studentaro (ja, espereble, kun galega plimulto), principe post fino de mezgradaj studoj, kaj prepare al siaj tujaj universitataj studoj.- Esperanto-asocioj stipendiu la venon de siaj studentoj al la kursejo.

Bedaurinde, tamen, la rektoro subite mortis, la nova rektoro ne plu akceptis la projekton, kaj tiu chi lame trenighadis, 2-3-foje reprenis iom da forto, ghis chirkau j. 1995^a, kadre de la solenoj festantaj la kvinan centjaran dat-revenon de la universitat-fondigo ghi povis ree revii almenaŭ pri tre modesta malvolvo de la dua fazo. Tamen, la cirkonstancoj ree montrighis nefavoraj, kaj mi, jam preske 60-jara, decidis tute rezigni pri la afero. •

[ii] Mi povus malvolvi nun pri la vera senco kiun lau mia kompreno devus havi la eldiroj "interna ideo" k.s. (per si mem perfekte vakuaj), sed tion mi ja ne faru. •

Komplementeto.- Mi cherpas jenan leteron de Sten Johansson el la leterkesto de tiu "libera folio":

"Mi konstatis, ke inter la H-peticiantoj trovigas homoj kun la nomoj Székely, Françoise, Rubén González, Seán Ó Riain kaj Rogério. Sajne ili do ne malsatas ciujn supersignojn, nur kelkajn. Por ke estu iom da metodo en la frenezo, ni do ekde nun nomu ilin ekzemple Szehekely, Franczoise, Rubehn Gonzahlez, Seahn OH Riain kaj Rogehrio".

Nu, chi nova frenezigoza perlo indas je komentado:

-- Mia komputilo sukcesis ghuste cherpi chiujn ses dekstrajn kornojn kaj la cedilon de la originalo, sed ech ne un el ghiaj kvar chapeloj.

Jen, do, komputiloj (au, almenaŭ, mia komputilo) pli bone funkcias che naciaj lingvoj ol che esperanto, almenaŭ por la pasiva tasko cherpi alies tajpitajn diakritojn.

Kaj por la aktiva tasko tajpi diakritojn:

- En mia komputilo, kaj se en la hispana, la afero estas triviala; se en esperanto, ghi estas ghene kompleksa kaj kun kolerigaj konstantaj internaj fushoj kvarobligantaj la tempon kaj la laboron bezonatajn.

Krome, en la una kazo mi havas nenian problemon por dosier-intershangado, alfabetigado, ktp., sed en la dua kazo, jen ĝenerale nenio tia estas farebla. (Vidu jam ***, kiel anke ***, tujsekve).

Kaj, mi supozas, tio sama okazas ĉe la komputiloj kies posedantojn Johansson volus stulte primoki. Kaj, ja certe ĉar pruvite (vidu tuj), tio sama okazas ĉe la komputiloj de "libera folio", Wennergren kaj la Akademio... kaj ja Johansson.

- En la komputilo de la Akademio, de Wennergren kaj de "libera folio" ĝi estas ege komplika, ankore nebone solvita, kaj kun fushaj rezultoj. Krome, jen estas harhitiga la aplombo kun kiu ili jam de 40 jaroj insistadas aserti, ke problemo ne ekzistas (au, provante kashi sian trompon al ni, ke "*vera problemo propre* ne ekzistas").

-- Mi, uzanto 'kaj de la kastilia (= la antonomazie hispana) 'kaj de esperanto, havas bezonojn, eblojn, dezirojn, devojn kaj rajtojn tre malsamajn en rilato al ĉiu el tiuj du lingvoj:

- Eventualaj neoportunajhoj en la alfabetoj de naciaj lingvoj estas socia kaj longahistoria fenomeno en kiu la respektivaj lingvanoj vivas denaske mergite.

Tute diference, scia kaj konscia enkonduko, akceptado kaj flegado de neoportunajhoj en la alfabeto de planita interlingvo estas nura kruda kontraudirajho. (Vidu *** kaj ***).

- Mi ne povas liberighi disde la hispanaj diakritoj, sed ja estus tre felicha se tio povus okazi. (Kaj pri tio mi certe ne estas solulo: Demandu kiun ajn lernanton en kiu ajn elementa lernejo hispana, anke la kompostisto pri kiu mi parolis en ***, ktp).

Tute diference, en esperanto mi povus esti tute libera; sed jen, la etoso kaj la institucioj insistadas (kaj sukcesas) min kateni.

- Tajpajho en la hispana principe celas hispanlingvanojn, tiel ke altas la probablo ke la aŭtoro kaj la legontoj disponas programojn kongruajn almenaŭ rilate hispanlingvajn diakritojn.

Tute diference, tajpajho en esperanto principe celas plej diversajn lingvanojn, tiel ke altas la probablo ke ekzistas pli-malpli fortaj nekongruajhoj inter la programoj uzataj de la aŭtoro kaj de liaj legontoj.

- La hispana longan tempon ne povis komputile tajpi siajn *í, é, á, ó, ú, ü, ñ*, kaj devis sin kontentigi per sendiakritaj vokaloj, kaj la diakritan konsonanton ĝenerale anstatiigi per sorstreko " / " (ĉar tio montrighis preferinda al nuda "n"). Poste venis la eblo senprobleme tajpi la diakritajn vokalojn pere de t.n. "morta au senpasha klavo", kaj nur konsiderinde poste ne plu ekzistis problemo anke por "ñ" estiel memstara, kvaze simpla litero (almenaŭ, ĉe miaj modestaj bezonoj por ordinara plata tajpado kaj e-poshto).

Nu: Antaŭ kelkaj dek jaroj, okaze de parolo kun prof. John Wells, li informis min kun malkontento, pri la ĝenoj kaŭzataj de la obstineco de la hispana registaro (mi ne memoras 'kiuj estis la ĝenatoj/ĝenitoj, kaj anke ne, 'ĉu temis anke pri

pliaj registaroj de hispanlingvaj landoj), ke ghi ne allasos por vendo en sian teritorion komputilojn ne disponantajn senprobleme ne nur tiujn vokalojn (daure per "morta klavo"), sed anke tiun konsonanton, kaj ke nur danke al tia registara obstinado jen "ñ" disponas sian propran, tute ordinaran rektan klavon en hispanlingva klavaro, do kvaze mem simpla simbolo sen bezono je morta klavo por almetado la tildon.

Tute diference, esperanto tute ne havas la eblon egale obstine kaj egale sukcese ghenadi la koncernajn instancojn au instituciojn pri niaj diakritoj (des pli, ke ili propre ne estas bezonataj, sed nur kaprice enkondukitaj en la lingvon).

(Mi supozas ke de tio venas, ke chiuj tre diversaj provoj munti programojn por niaj diakritoj estas **nura privata dislaboro de privataj homoj**).

-- Chion chi Johannson scias ne malpli bone ol mi: Tial, li klopodu kompreni 'kiu vere frenezas en rilato al chi problemo. Li klopodu kompreni anke, ke parolo al E-uzantoj estu afero tute alia ol prediko al beboj au al shafoj au al bigotoj. Li klopodu agi bonafide. Li klopodu chesi fushe chikani.

(12) Ni venas al la lasta alternativo de la tabelo ***:

qar yi koruse jhetu xin aw tuj ji hfore tuj	[Ludajho mia]
--	---------------

El chiuj proponoj de tabelo *** plej surpriza por mi estas **(5)**, nome ? *qi xore yetu ? ? tuj* de de Saussure (kaj kiun mi tie opinias kompleta per *char qi xore yetu shin aw tuj*).

Efektive, ja strangas, ke li decidis enuzigi la kvaropon *q, w, x, y* da bazaj latinaj literoj kiujn *Z* ne akceptis, sed dedichas du el ili al la plej malofte uzataj sonoj de *E*, kaj daure reprezentas per digramoj du el la plej oftaj sonoj.

Nu, spontane shprucas la eblo ludi pri tiu afero por igi ghin pli "laucela", pli ekonomia, kaj krome vesti ghin per kvazaj argumentoj pruvuntaj ghian "logikecon kaj pravecon" ktp.

Rimarko.- Tia kvaza argumentado chiukaze estus facile farebla, sed post apero de la trezoro interreta ghi ighis ech triviala, krome per multaj eblaj alternativoj lau la jhonglo-preferoj de la redaktanto.

Aliflanke, oni bonvolu konstati ke, efektive, tie chi temas nur pri ludajho mia, do ne pri ia provo kontrabandi plian proponon por sensenca alfabet-reformo. (Maksimume, oni supozu, ke jen Albault ricevas dischiplon, kvankam sendisciplinan).•

(a) Unuflanke, Esperanto havas ses literojn donacadantajn problemojn al ni, nome, , , , *ŝ*, , . Aliflanke, la baza latina alfabeto proponas al ni kvaropon da bele simplaj, por ni ankore liberaj literoj *q, w, x, y*.

Nu, per chi lastaj ni volas elimini au almene mildigi tian nedeziratan abundan donacadon.

(b) La plej simpla solvo estas gardi la ghisnunajn surogatajn digramojn de la du malplej oftaj sonoj de la lingvoj, kaj uzi la novajn literojn por la ceteraj kvar sonoj.

La du malplej oftaj sonoj estas tiuj de kaj de β ; sekve, ni ilin daure reprezentu per siaj respektivaj, jamaj digramoj *hh* kaj *jh*.

Krome, ju pli da vortoj kun ni decidis aliigi al novaj formoj sen tiu litero kaj sono, jen des malpli ofte estos bezonata la digramo *hh*.

(c) Por anstatigilo de litero nedisputeble trudighas litero *w*, tiel che duonkonsonanta rolo kiel che duonvokala.

Tion pruvas: IPA (= International Phonetic Alphabet = IFA = Internacia Fonetika Alfabeto).- La angla, kiel en *wow*, *twenty*.- La malta, per siaj *Parlament Ewropew*, *Ewrasja*, *widna*, *dawn*, *ugwaljanza*, *mowbajl*.

(d) Por anstatigilo de litero nedisputeble trudighas litero *x*.

Tion pruvas: La galega (un el miaj du denaskaj lingvoj) kiel en *axexar*, *xexún*.- Portugala, kataluna, euska.- La malta, kiel en *xadina*, *xena*, *ambaxxata*.- La china, kiu en sia pinyin-transskribado uzas tiun literon por reprezenti un el la du malsamaj -sonoj kiujn ghi havas (fakte [χ]), kiel en *x*, *xu n*.

(e) Por anstatigilo de litero nedisputeble trudighas litero *y*.

Tion pruvas: La kastilia (= la antonomazie hispana, mem la aliu el miaj du denaskaj lingvoj), kiel en *yerno*, *yace*, *cayó*.

Rimarko.- Tie chi temas pri hispana fonemo kun ech multaj alofonoj. Wells (*en Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo*) citas [$d\text{̞}j\text{̞}r\text{̞}n\text{̞}$] (kun vocha antaŭpalata afrikato), [$\text{ɲ}r\text{̞}n\text{̞}$] (kun vocha palatalveola afrikato), kaj [$j\text{̞}r\text{̞}n\text{̞}$] (kun simpla aproksimanto). En Argentino ekzistas diversaj alofonoj kiujn mi bone distingas per la orelo, sed kiujn ne kompetentas fonetike priskribi: Por mia orelo esence temas pri variaĵoj frikativaj, jen chirkau [$\text{ɲ}r\text{̞}n\text{̞}$] (pli ofte), jen chirkau [$d\text{̞}j\text{̞}r\text{̞}n\text{̞}$], forse ech ia tre speciala [$j\text{̞}r\text{̞}n\text{̞}$].

Plu lau Wells, tia hispana prononco de [$\text{ɲ}r\text{̞}n\text{̞}$] estas tute akceptebla sono por la esperanta fonemo / ɲ / [kvankam, shajne, ghia principa sono estus vocha postalveola afrikato, do kiel en la angla].

Fine, kaj lau mia opinio, tiu hispana alofono [$\text{ɲ}r\text{̞}n\text{̞}$] estas la plej ofte uzata. •

(f) Por anstatigilo de litero nedisputeble trudighas *q*.

Tion pruvas: La china, kiu en sia pinyin-transskribado uzas tiun literon por reprezenti un el la du malsamaj -sonoj kiujn ghi havas (fakte [tʃ]), kiel en *qí*, *qiú*.

(g, aldone) La sono reprezentata per litero *j* nepre devas resti reprezentata per *j*, tiel por duonkonsonanta kiel por duonvokala rolo.

Tion pruvas: IPA.- (Mezepoka) latino (kiel en *jam*, *jus*).- Germana, pola, ktp..- Malta, per siaj *jum*, *Ewrasja*, *ugwaljanza*, *bejn*, *mowbajl*.

(h, aldone) Oni ja povas tute bone munti pli komplikigan aranghon, kaj ghin pravigi per tute analogaj argumentoj.- Ekzemplo: Oni povas intershanghi la rolojn kiujn en la jhusa arango ludas *y* kaj *j*.

Tion pruvas: NHA (kiel en *jenoy* anstat *yenoj*).

(13) Jen, en chi nova alineo ne temas pri plia alfabet-propono, sed pri alfabet-proponanto kaj pri la etoso kiu incitis lin al "esplorado" pri solvo de la alfabet-problemo kaj al proponado ties "rezulton":

Mi iam havis okazon paroli en Madrida Esperanto-Klubo kun esperantano fieranta, ke li sukcesis elpensi ech du 'perfektajn' novajn alfabetojn, kaj kiujn li proponis per slogano "Nur sidighu kaj ektaĵu!" kaj per frapfrazo "La sola moderna aparato uzebla en chapeloza Esperanto estas la globkrajono!".

Nu, mi venigis lin apud tajpilon, nur sidighis kaj ektaĵpis per *h*-alfabeto. Kaj jen li, surprizite, naive demandis min: "Sed... ĉu vere, ke ghi taugas?. ĴLa gheralpa parolo ja estas, ke *h*-alfabeto estas aĉa, netauga!". [Mi ne memoras bone, ĉu li fakte diris "aĉe netauga"].

Tiu chi anekdoto tute ne estas escepta okazo: La etoso kreita de niaj elstaruloj kaj daure reganta pri la *h*-alfabeto estis/as tia, ke ghi portis/as al rektaj debatoj/ 'esplorado'/ proponado/ labor-perdado/ tempo-perdado multajn esperantanojn en

kies kapojn ech ne venis/as la penso, ke antaŭ ol 'esplori' pri solvoj ktp ili devus unu funde esplori kaj taksu mem pri la supozate aĉa netaugajho.

=====

(..) En chi plej grava sekcio temas pri la eroj rilataj al nia temo kiuj trovighas en LZI kaj LZII.

Lau kronologia ordo, jen preske chiuj tiuj eroj devus interplektighi kun eroj de la antaŭaj sekcioj, sed pro sia graveco kaj aŭtoritateco ili nepre aperu memstare apartaj, ja tamen, ĉe konveneco, kun akompanaj kruc-referencoj al tiuj jamaj eroj.

Krome, ni ĉerpas tiuj leteroj anke ech abundajn erojn kiuj, kvankam strikte ne rilatajn al nia temo, jen havas plej grandan intereson ne nur por pli bona kompreno de la dirita temo mem, sed anke por la gheralpa vivo de E.

Rimarko.- [i] Oni bone atentu, ke ĉiukaze temas pri privataj leteroj, do nen pri artikoloj publicitaj.

La editoro, Waringhien, almetis (per malsama litertipo) abundegajn notojn, rimarkojn, sciigojn.

LZI enhavas leterojn el la jaroj 1901^a-1906^a.- LZII, el la jaroj 1907^a-1914^a.- (Zamenhof mortis en j. 1917^a, en aĝo de 57 jaroj).

Mi montras al la ĉerpo-lokoj lau jenaj ekzemploj: (II.216/11.07) = LZII, p. 216^a / novembro 1907^a.- Kaj (I.54/05)(W) = Noto de Waringhien en rilato al LZI, p. 54^a / j. 1905^a.•

[ii] La plej grava parto de chi sekcio ja rilatas al la diversaj proponoj pri plibonigoj kiujn Z planis au efektive prezentis al la Lingva Komitato kaj al la Akademio de Esperanto en la jaroj 1905^a-1908^a, kiel anke pri la decido de la Akademio en j. 1909^a ilin ĉiujn puche rifuzi ĉar ili estus "kontraufundamentaj shanghoj" (!?).

Do, tie chi reaperas la una aferon citita en ^{***}, jam poste kaj sendepende de la dua epizoda afero pri la reform-projekto de j. 1894^a.•

[iii] Chiuj proponoj pri plibonigoj pri kiuj temis en la epoko antaŭ la reform-projekto reaperas pli sisteme kaj en pli ampleksa kadro en la proponoj pri kiuj temas LZ, kaj tial ni ne detalas tie chi pri tiuj fruaj proponoj. (Pri ili vidu en pluraj lokoj inter p. 105^a-189^a de OV (= Originala Verkaro [de Zamenhof]).•

[iv] PAG §89 Rim. II citas Z jenan proponon el tiu epoko, el la jaro 1892^a, tamen eliminante de ghi la ekzemplojn donitajn de Z. Nu, ni cherpas el OV, p. 149^a: "La konsiloj, kiujn ni ricevis... mi proponas: 1) ..., 2) "Anstataŭ la finigo "au" en diversaj vortoj oni povas uzi apostrofon. Ekzemple: " adi " (legu " ad i ") anstataŭ "adiau"; "adi'a" anstataŭ "adiaua"). Ankaŭ tio chi levos la bonsonecon, ne enkondukante ian konfuzon (char "au" ne apartenas al la radiko, sed estas nur kondiĉa finigo, tiel same forlasebla, kiel "o" en la substantivo). 3)...".- Kaj PAG aldonas: "Sed tiu elizio de "au" che la adverboj ne estis praktikita; nur en la lasta tempo [ch. j. 1935^a] kelkaj poetoj provis uzi ghin en versoj".

Nu, por eksterulo, sed ja nen por scianto pri la kashitaj kauzoj, estus eĉ ŝoke, ke tiu sama PAG (j. 1935^a) kiu tiel diligente informas nin pri tiam jam tre fora afero de j. 1892^a, jen tamen kvaze forgesas aŭ ne degnas informi pri tiaj samaj Z proponoj, mem tre pli postaj kaj tial pli 'freshaj' (el la jaroj 1905^a-1908^a), kiel anke pri la fakto, ke en j. 1909^a la Akademio malakceptis tiujn proponojn char 'kontraŭfundamentaj' (!?). (Vidu ^{***}, ^{***} pri PAG kaj Kalocsay en postaj tempoj).•

[v] Tia fruega zamenhofa propono (ĵam en la jaro 1892^a!) estas vere densa kaj grava: Ghi altigus la bonsonecon de la lingvo, ghi anstatigus finajhon propre fremdan al la ĝenerala strukturo de la lingvo per aliaj laŭaj al tia strukturo, kaj per sia "ne enkondukante ian konfuzon" ghi gherme enhavas jam la tutajn FE.A7/A8 (pri kio, cetere, eĉ temis jam en UL, j.1887^a, che parolo pri konstanta akademio kiu facile kaj nerimarkeble povos enkonduki chiajn plibonigojn kiujn oni taksos necesaj).•

[vi] Principe estas eĉ ŝoke, ke PAG informas pri tiu Z propono el la jaro 1892^a, tamen kvaze ne degnas informi pri liaj proponoj el la jaroj 1905^a-1909^a.

Tian sekretigon mi povas kompreni nur kadre de la muntado araneajhon ĉirkaŭ la puĉo de j. 1909^a. (Vidu ^{***} kaj ^{***}).•

(A) El LZI:

(I.20/01).

[Mi volonte rifuzus komenti chi tekston kaj ghian etoson, sed mi almenaŭ diru, ke tian parolon pri "internacia lingvo hereda" mi trovas stulta kaj ofenda].

Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton, se eĉ milionoj da personoj ĝin uzadus — nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Se ĝi unu fojon « eliros el la modo », ĝi plej rapide pereos por ĉiam. Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj.

Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la

(I.66/04)

[La eldiroj de Z pri la chapeloj nur shanghigadis, eĉ en sinkvaj leteroj, tiel ke mi ne scias 'chu entute temis pri lia egale

La gazetojn mi danke ricevis. Via opinio pri la literoj supersignitaj estas tute prava. Mi diris, ke oni povas uzi h anstataŭ ^ NUR en tia okazo, se oni ne povas havi literojn kun ^. La redaktoro de « The Esperantist » kredeble baldaŭ rimarkos, ke li faris eraron per sia propono,

shanghighanta opinio, au simple pri tio, ke li klopodis laueble minimume dolori leterintojn.

Cetere: Sagha interpreto de tiu "oni ne povas" ja simple portus al tio, ke oni tajpu kaj pres(ig)u per chapelitoj nur en tiuj kazoj au cirkonstacaroj en kiuj tio estas egale facile farebla kiel la ordinara senchapelita skribo, sed ke oni rifuzu chapelumadon se ghi ial farighas malpli facila.-- Tamen, jen estas konstatita fakto historia, ke multiuj pretis/ as/ os fari eĉ ekscesajn oferojn por simple povi fieri ke anke ili sukcesas pri chapelumado. •

(I.74/04)(W) informas pri la nova alfabeto de "La Lumo" (vidu ***).

(I.81/04)(W) informas pri Javal (vidu ***).

(I.81/04) Letero al Javal.- "... e plej malgranda parolado pri reformoj estus por nia afero tre kaj treege

en Via letero.

Viaj rimarkoj pri la alfabeto Esperanta estas tre ĝustaj. La literoj akcentitaj estas tre neoportunaj kaj mi estus tre kontenta, se ili ne ekzistus. Sed la forigo de tiuj ĉi literoj estus r e f o r m o, kaj en la nuna tempo ne sole ĉia farado de reformoj, sed eĉ ĉiu eĉ plej malgranda p a r o l -

dan era... Kiam ni afero statos jam tute forte... ia centra a toritata akademio unu fojon por iam faros en la lingvo iujn plibonigojn, kiuj montri os necesaj... Jam

antau dek jaroj mi provis proponi an ojn en la lingvo [ja temas pri la reform-propono de 1894^a, vidu ***], sed tiam tuj komenci is tia grandega interna malpaco, ke, se ni tiam ne estus tuj esiginta la paroladon pri plibonigoj, nia afero nun jam longe estus mortinta...".

(I.86/09.04) Letero al Michaux (la organizanto de la Unua Kongreso).

[jBrrr!]

[Mi ja volonte rifuzas komenti chi tekstojn, sed mi almenaŭ diru, ke tiu "korekscita religia centro" tre iritas mian galon].

Kiam mi estos iom pli libera (post 5-6 semajnoj) mi intencas verki ian specialan himnon por la malfermo de la kongreso.

[Tiu himno komenciĝos kiel solena preĝo (sed preĝo pure filozofia kaj neŭtrale-homa, por ke ĝi tuŝu la religiajn konvinkojn de neniuj en la mondo) kaj finiĝos kiel brua, vigliga, flamiga kaj esperiga marŝo.]

Mi intencas pretigi por la kongreso projekton de "Deklaracio pri la aspekto de la esperantismo" kaj se post

gasto, k.t.p.).

La kongreso devas efiki sur la sentojn kaj fari impreson, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson. Multe da soleneco, muziko, efektoj por la okulo k.t.p.; ju pli ni efikas sur la sentojn, des pli niaj kongresoj, kaj sekve ankaŭ nia afero fariĝos popularaj en la mondo. Estas domaĝo, ke ni devas akiradi la mondon en tia maniero; sed la homoj havas tian naturon, ke oni povas ilin venki nur per la sentoj, dum per seka parolado Vi neniun konvinkos. Ni devas peni, ke niaj kongresoj per sia soleneco kaj ĉarmeco fariĝu korekscita religia centro, kiu allogados ĉiujare la amikojn de internacia frateco el la tuta mondo.

Aldono.- Mi organizis en la j. 1960^a la Hispanan Kongreson en la galega urbo Pontevedra. Bedaurinde, unu kongresano mortis pro kor-atako, kaj jen farighis novajho por la ĵurnaloj la svarmo da verdaj flagoj kiuj (elirinte de mi ne scias 'kie, kaj ne informinte min, la organizanton) akompanis la procesion al la tombejo tra la ĉefaj urbo-stratoj. Poste, unu el la HEF-estraranoj tre serioze konsilis min, ke mi igu la konstantan vizitadon al la tombo de la mortinto kerna ero de miaj E-kursoj.- Fine, la tiam plej grava verkisto galega, A. Cunqueiro, publicis en grava ĵurnalo 'nekrologan' noton: "Amiko mia rimarkigas... en preske ĉiu E kongreso unu kongresano subite mortas... temas pri statistika scio [mi estis ŝtata funkciulo por statistiko]... Povas okazi, ke ilin tra-strangolas vorto de Esperanto, lingvo ne uzata kaj tial kun eghaj vortoj, kun formo geoida, raspaj, sablozaj... Eble de tio ĉi forpasas la esperantistoj. ĴDio ilin ricevu konfesintaj tiel, kiel por mi deziras!. ĴAmen!".

Jen, min ankore hantas la honto de tiaj okazoj, de tiuj tagoj: ĴNe, ne, absolute ne!. Mi neniel povas konsenti kun tia etoso, des malpli kun la konscia planado por ke tia etoso regu.


La interlingvo Esperanto estas afero serioza, ne vulgaracha kaj ofenda. •

(I.95/04)(W) informas ke Javal kaj kanadano Saint-Martin jam petis de Michaux, ke la demandon pri la supersignoj li enmetu en la tagordon de la Kongreso.

(I.95/04) Z al Michaux: "... La demandojn pri la supersignoj kaj pri la vortaroj Vi povas kura e enmeti en la programon de la kongreso, ar mi penos aran i la aferon tiel, ke i elvoku nenian malpacon inter la kongresanoj... La plej gravaj punktoj, pri kiuj mi raportos, estos: 1) "Deklaracio pri la esenco de la esperantismo" (tiu i deklaracio, subskribota de iuj kongresanoj, devos montri al la mondo tute klare la celon, karakteron kaj programon de nia agado, la senpersonecon de nia afero, la fiksitajn le ojn de ia estonta evoluciado, k.t.p.); ... 4) pri la demando de reformoj....

(I.119/05) diras sian penson pri la y-alfabeto de Michaux (vidu ***).

(I.126/05) piednote, en letero al Michaux:



¹ Uzante la okazon, mi nun ripetas publike tion, kion mi jam ofte diris kaj skribis private : mi kore petas ĉiujn esperantistojn, ke en siaj leteroj al mi aŭ en sia buŝa parolado kun mi ili neniam uzu la vorton «majstro», kiu estas al mi tre malagrabla, sed ili ĉiam uzu simple la vorton «sinjoro». — L. Zamenhof.

(I.166/07.05)(W) informas pri: Apero de FE kun sia fama *Anta parolo*. La libro de Javal pri legado kaj skribado (vidu ***). Javal petas de Z la prunton de la artikoloj pri reform-projekto de j. 1894^a.

(I.168/07.05) diras al Javal "La numerojn de l'Esperantisto de 1894 mi beda - rinde jam ne havas".- Anke, ke se la prezidanto de la ministroj volos donaci al li la ordenon de la Honora Legio, li kompreneble tion akceptos kun plena danko.

(I.175-176/05)(W) informas pri la Unua Kongreso.

[Mi bone scias pri la argumentoj celebrantaj tian unan signon de la socia envivigo de la lingvo.

Tamen, mi neeviteble daure sentas min ege ghenata kaj hontigata de tia kongresa etoso.

La lingvo ja ricevis sian Fundamenton pere de libro, sed en la fundamenton de la lingvovivo enshovighis sablo kaj shlimo].

pri la sukceso de la kongreso. Kelkajn tagojn antaŭe, Michaux estis veturinta Parizon, k en la domo de Cart, kien kuniĝis Boirac, Bourlet, Javal, Sébert, li estis leginta la Parolon k la Preĝon, kiujn Zamenhof jam komunikis al li, kiel ni vidis. Oni povas malfacile prezenti al si, kia estis la mirego k skandaliĝo de tiuj francaj intelektuloj, kun sia kartezia k racia spirito, reprezentantoj de laika universitato aŭ apogantoj de ekleziefremda registaro, jam de longe kutimintaj identigi liberpensadon kun sendieco, kiam ili aŭdis tiun flaman preĝon al « la alta morala Forto », k tiun aŭdacan alvokon al unuiĝo de la eklezioj :

Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj...

« Sed estas juda profeto ! » ekkriis Bourlet, k Cart siaflanke : « Jen la slavo ! Neniame Michaux kapablos bridi tiun frenezulon ! » — k Sébert lamentis : « Ni ruiniĝos de ridindeco ! ». Sekve ili decidis, ke almenaŭ tiun Preĝon oni nepre devos sufoki.

Tuj kiam Zamenhof alvenis Bulonjon, sabaton 5 Aŭgusto, li ekloĝis ĉe Michaux, kiu invitis por vespermanĝo ankaŭ la francajn eminentulojn. K en la salono, antaŭ la manĝo, ili ĉiuj admonis Zamenhof (« oni vin priŝajfos ! »), ke li modifu kelkajn lokojn « danĝerajn » (interalie la « misteraj fantomoj ») en sia parolado k forreziĝnu pri la Preĝo. Zamenhof, ĝis larmoj emociita, tamen rezistis, apogita de Michaux. La sola, kion la ceteraj atingis, estis, ke la lastan strofon, la plej « frenezan », oni ne publikigos.

Ili tute ne antaŭvidis la eksterordinaran atmosferon de la kongreso, la religian entuziasmon de tiuj homoj el 20 diversaj nacioj, kiuj komuniĝis en la sama ideo pri tutmonda komprenemo k paco. Kiam, vespere, en la malgranda Bulonja teatro, Zamenhof faris sian

143 PAROLON ANTAŬ LA UNUA KONGRESO (O.V. p. 360),
k finis per la

144 PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO (O.V. p. 589)

senfina ovacio rekompencis lian obstinon k pravigis lin antaŭ la francaj skeptikuloj. Tiu atmosfero faciligis la klopodojn de Michaux por elimini (provizore) la militkaŭzojn inter la francaj ĉefoj: Fruictier alportis flugfoliajn pamfletojn kontraŭ Bourlet-Hachette, k Bourlet volis provoki lin duele. Michaux malhelpis la disdonadon de la folioj k atingis armisticon inter ambaŭ. Sed por la laborkunsidoj Boirac devis ŝarĝi sin je la prezidanteco, ĉar la aliaj ne fidis la spirillarĉon de Michaux k tiu, siatlanke, malfidis la

(I.176/05)(W)
, plu informas pri la Unua Kongreso, kaj prezentas la originalan tekston de tiu demando. (Vidu ***)

la spirillarĉon de Michaux k tiu, siatlanke, malfidis la despotemon de Bourlet k Cart. Boirac montris sin tre lerta manovristo, kapabla milde deturni la ŝtormojn, subtile eviti la brulajn punktojn k prokrastigi la malfacilaĵojn... ĝis la venonta kongreso: tiel okazis pri la du ĉefaj problemoj de la organizo k de la alfabetreformo. Pri tiu ĉi lasta tamen, li ne sukcesis silentigi Javal, kiel li faris pri Saint-Martin k pri aliaj belgoj. Javal formulis la problemon sub jena formo:

145 Kiel redakti la telegramojn en Esperanto, por ke ili estu akceptataj de ĉiuj telegrafejoj kaj samtempe facile legeblaj de laikoj?

15 k li atingis, ke li estis komisiita prezenti raporton antaŭ la venonta kongreso.

94 Efektivaj rezultoj de la Kongreso estis...

(I.177/05)(W)
plu pri la Unua Kongreso.

venenos ĉiun ilian agon. La Lingva Komitato, tro grandnombra por povi labori (kiel tuj rimarkigis Bein), konsistanta el personoj kun tre diversnivela lingvoscio, havas difinitajn nek rolon, nek rajtojn; oni ne scias, ĉu ĝi tiras sian aŭtoritaton de Zamenhof aŭ de la Kongreso, k la valoro de ĝiaj decidoj ĉiam restos duba — kio ne faciligos la solvon de la estontaj krizoj. Same la Kongres-estraro ne povos agadi sen unu konkreta bazo, unu administra centro, kiun siateme oferos al ĝi Javal k Sébert. Sed tiel, rifuzinte demokrati...

(I.195/05)(W)
 [W maltimas
 falsi ech
 FE.A8 (vidu
 ***): "Se ia
 a toritata
 centra insti-
 tucio trovos,
 ke tiu a
 alia **vorto** au
regulo en
 nia lingvo
 estas tro
 neoportu-
 na..." (grasi-
 go mia).

*etpasi kun sia dua karesajo, la Homaranismo. Ankaŭ aŭan
 intencon li reportis de la Kongreso — provi rimedon por
 kontentigi la multajn dezirojn pri reformoj, kiujn li aŭdis
 de la flanko de Javal, Majoro Lemaire k de la Kanadanoj;
 tiun rimedon li jam indikis en la antaŭparolo al la Fundam-
 ento, k nun li nomas ĝin « metodo de neologismoj ». **Oni**
 ordinare komprenas per tiu termino la novajn radikojn,
 enkondukitajn apud la malnovaj (kiaj kalva apud
 senhara, fajna apud delikata): Zamenhof
vastigas ĝian sencion ĝis la morfologiaj aŭ sintaksaj elem-
 entoj, sed samtempe li limigas ĝin je la « enkonduko de nova
 formo paralele kun la Fundamenta, k ne forpuŝonta tiun ».
 Oni devas do atenti ne **miskompreni** lian penson en la
 sekvantaj tekstoj.*

*La unua, al kiu li konfidis siajn novajn projektojn,
 estas lia « kunfrato » Javal:*

El FE.A8: **vorto** a **regulo** / tro neoportuna / ne devos forigi a
 an i / povos proponi **formon** novan / **paralele** kun la formo
 malnova / fari os ar aismo

Jen, do, ne temas pri tio, ke Z vastigus, sed pri tio, ke W volas malvastigi.
 Cetere: ĉi 'Kiu estas tiu "oni"?, ĉi 'kion tiu "ordinare" signifas en chi kunteksto?, ĉi 'kiu
 igas tiun "oni" aŭtoritata?.

ĉi 'Kial W timas aŭ ne volas esprimi sian opinion (kaj, preferinde, ĝin priargu-
 menti), ke jen tiu FE.A8 estas ekscesa, aŭ danghera, ktp?.

Rimarku anke la jezuitecan/rabenecan trompon kaj intencan misgvidadon por
 legado la Z tekstojn: "Oni devas do atenti **ne miskompreni** [!?] lian penson en la
 sekvantaj tekstoj".

(Vidu en *** ke chi tie W simple ripetas tion faritan de siaj antaŭuloj, la pu-
 chintoj en 1909^a).

Tiu chi falsajho, kiel anke ***, tre doloras min. (Nepre vidu, anke, ***).

(I.196-199/05) (Al Javal) "Projekto unua"

"... Esperanto enhavas 100-150 vortojn a formojn, kiuj efektive estas malbonaj...
 Estas vero, ke Esperanto povas anka tre bone ekzisti sen tiuj an oĵ; sed la
 konstanta devigata uzado de la diritaj malbonaj formoj kaj vortoj estus iam mala-
 grable sentata de la esperantistoj kaj konstante devigus ilin revii pri reformoj, dum la
 reformoj unu fojon faritaj faciligus por iam la korojn de la esperantistoj, iuj paroloj
 kaj revoj pri reformoj esus por iam kaj iuj isnunaj efektivaj maloportuna oĵ de
 Esperanto malaperus...

Sed ekzistas aliaj formoj a vortoj, kiuj prezentas efektivan kaj senduban maloportuna on, ekzemple: [kaj tie venas la teksto chiapude skanita] ...

- a) la supersignitaj literoj en la alfabeto ;
 b) la sonoj « ŭ » kaj « ĥ » ;
 c) la finiĝo « j » de la multenombro ;
 d) la tabelo de la pronomoj-adverboj* kaj la vorto « esti », kiuj pro sia tro ofta kaj ĉiupaŝa uzado en la parolado nepre devas esti unusilabaj kaj perfekte bonsonaj (la mallongigo de tiuj vortoj alportus al la lingvo grandegan ekonomion kaj elegantecon, dum la konstante ripetataj « kiu, tiu ĉi, estas » estas tre neoportuna (precipe por versofaristoj) kaj malagraba) ;
 e) la konfuzantaj homonimoj, ekzemple « defendi » kaj « de'fendi », « volont'e » kaj « vol'ont'e », « rabat'a » kaj « rab'at'a », k.t.p.
 f) tro granda longeco de kelkaj propozicioj, kiuj havante grandegan rolon en farado de kunmetitaj vortoj, devas nepre esti mallongaj kaj oportunaj.

Se ni esploras la aferon tute sennartie, tiam ni facile

.... Nun estas la demando, kiamaniere enkonduki tiujn 100 novajn vortojn?. an i iun vorton a formon en la fundamento de la lingvo devas esti plej severe kaj absolute malpermesita... Ekzistas tamen rimedo... Ni povas tion i akiri per enkonduko de kelka nombro da neologismoj, t.e., novaj vortoj kaj formoj, kiuj ne anstataus la malnovajn, ne senvalorigus ilin, sed ekzistus paralele kun ili... nun li diros, ke tiu verko enhavas diversajn araismojn...".

(l.199-206/05) "Projekto dua".

"Tiu i projekto, kiun mi pli a malpli frue intencas prezenti al la mondo sub la nomo de "Hilelismo" [el "Hillel" antikva rabeno hebrea, p. 201^a] estas la plej grava el iuj laboroj, kiujn mi iam fari a faros... la tuta afero esperanta estas nur parto de tiu komuna ideo...

(I.200/05)
Pluas la lete-
2	Forigo de la artikolo	9	Enkonduko de la afiksoj <i>-a -</i> , <i>-al-</i> , <i>-atr-</i> , <i>-end-</i> , <i>-esm-</i> , <i>-if-</i> , <i>-ism-</i> , <i>-iv-</i> , <i>-iz-</i> , <i>-jer-</i> , <i>-oz-</i> , <i>-ur-</i> , <i>mis-</i> , <i>retro-</i>
3	Pluralo per <i>-i</i>		
4	Forigo de la akuzativo	10	Forigo de fina o <i>-a</i> e la adverbo
5	Ne an ebleco de la adjektivo	11	Forigo de tiu fina o e la prepozicioj
6	Forigo de "si" kaj "sia"	12	Enkonduko de la prepozicioj <i>anter</i> , <i>sob</i> , <i>di</i> , <i>par</i>
7	Seksigo de la triapersona plurala personpronomo (li, i, i; ili, i i, i i)	13	Anstata igo de "kaj" kaj de "a "
		14	Modifo de radikoj fini antaj per ajnaj a internaciaj sufiksoj
		15	Starigo de derivreguloj

Rimarkoj.- [i] Jen, la institucia pucho ekiras sian vojon (jam citita en ***): Tio, kiu lau la ordinara lingvo, anke por kaj lau Z, anke lau nia konstitucia FE.A8 (vidu ***) estas nura propono pri **novaj paralelaj formoj** libere uzeblaj apud la malnovaj (kiuj nenikaze ighus nevalidaj) ricevas nun la falsan kaj akuzan nomon "propono pri **shanghoj** en la fundamento". Kaj vidu en *** ke tia falsa nomo tuj aliighis al la perfekte kontraukonstitucia, draste kondamna kvalifiko, "propono **kontraufundamenta**", tiel ke tiu novtipa eklezio/pastraro jam disponis pri propra "anatemilo kontrau la herezuloj". (Rimarku, anke ke, shajne, ech la starigon de derivreguloj oni metus en la sama korbo kiel "reformoj"). •

[ii] Estas al mi klare, ke tiaj aferoj ne shprucis spontane, sed estas eroj de zorge planita institucia pucho. Mi ne estas kompetenta jughi, 'chu vere la situacio ighis tiel implika kaj despera ke ghi portis iujn al pucho (kvankam estas vershajne, ke Z ne gvidis bone la aferon, tiel ke chiam pli malbona situacio minacis). Sub tia supozo, mi inklinas opinii, ke Z mem ne partoprenis en la pucho, sed nur silente konsentis char tio shajnis al li la malplej malbona el chiuj alternativoj eblaj, tiel ke li chesis labori pli la lingvo kaj sin dedichis al organizado kaj, chefe, al la afero por li plej grava, nome, ia religio (vidu en *** kaj sekvan-taj).•

(II.247/14.03/09) Al Cart.

Klaras, ke ech la pacien-cega Z venas fine al la penso, ke necesas meti finon al la dolora kaj senfrukta situacio.

Neniu institucio [sekve, ech ne la Akademio].

Char "shanghoj" jam neniam eblis (vidu ***), jen temas pri malpermeso proponi au enkonduki paralelajn formojn, ambaj daure egale validaj, kaj lasi ke la lingvovivo eventuale decidu inter ili per la vojo de

kaj admonoj de privataj partiaj personoj, sed estas necese havi ian klare kaj interkonsente faritan decidon de nia aŭtoritata institucio ...

Mi opinias, ke estus bone, ke la akademianoj kunvenus, per kelktaga serioza laborado esplorus la tutan lingvon kaj decidus : ĉu en la principaj partoj de nia lingvo ekzistas iaj punktoj, kiuj nepre devas esti ŝanĝitaj, — aŭ ĉu tiuj punktoj ne ekzistas. Se oni trovos, ke ekzistas tiaj punktoj, kies ŝanĝo estas efektive NECESEGA, tiam ni devos ŝanĝi ilin unu fojon por ĉiam (per vojo de paralelaj neologismoj, t.e. ne senvalorigante la formojn ĝisnunajn); se oni trovos, ke tiaj necesege ŝanĝindaj punktoj ne ekzistas, tiam ni devos deklari, ke kun plena konscio, post matura esploro la Akademio... decidas, ke nenio devas esti ŝanĝata kaj ke de nun nia lingvo devas esti rigardata kiel lingvo natura, en kiu NENIU INSTITUCIO HAVAS LA RAJTON FARI IAJN ŜANĜOJN; sekve la esperantistoj sciu klare, ke de nun la Lingva Komitato nur solvados la demandojn pri diversaj duboj, sed ĉiujn proponojn pri arbitraj ŝanĝoj la L.K. absolute forĵetados.

Tia estas mia opinio, kiun mi volis prezenti al la akademianoj. Sed ĉar oni tute prave rimarkigis al mi, ke estos pli bone por la afero, se mia persono restos flanke..., tial mi reprenis mian projekton.

Pri la cirkulera letero de s-ro Boirac, mi devas diri, ke mi donis al ĝia dissendo mian konsenton..., sed mi skribis al li, ke mi persone opinias, ke estus pli bone esplori la tutan demandon pri ŝanĝado aŭ reŝanĝado per unu fojo.

Kelkajn tagojn poste, Boirac jam dissendis

"neologismoj-arhaismoj".

Cetere, ĉ'kiuj estas la limoj, 'kiu metas la limon inter arbitreco kaj nearbitreco?.

Klaras, ke Z opiniis, ke pucho necesis. Sed, ĉ'kiu(j) estas tiu(j) "oni" kiuj konsilis al li, ke li restu flanke (t.e., char "aliuj" prenos sur sin la taskon puchi)?.

Kiel ni tuj vidos, che lia konsento resti flanke, jen Boirac kaj la Akademio "solvis" la problemon per decida tranĉo, nome, "konstatante" ke ne ekzistas necesego shanghindaj punktoj, kaj tial ne necesas prezenti paralelajn formojn (de kio fontis ĉiuj nekontentoj kaj oponaj opinioj).•

(II.247/03.09)(W) informas ke Boirac dissendas la...

DUA CIRKULERO AL LA AKADEMIO (18.03.1909) [La unua, en 01.02.1909] Resumo pri la respondoj [de la 12 akademianoj] al la Unua Cirkulero.
Preske unuanime for etitaj, kiel kontra aj al la Fundamento, la proponoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7 kaj 11 de la Unua Cirkulero.
Pri la aliaj punktoj de tiu Unua Cirkulero la Prezidanto petis siajn kolegojn sendi al li detalajn opini-esprimojn, el kiuj li faros raporton submetotan al definitiva vo - dono.

Rimarko.- Rimarku ke, efektive, la terminoj fulme rapide shanghighis, sub la komuna konfuziva akuzo nomo "reformoj", lau sinsekvaj pashoj *propono pri paralelajho / propono pri shangho en la Fundamento / propono kontraua al la Fundamento*.

Tiele la Akademio naskis la timindan, perfekte kontraukonstitucian ĉar eksterfundamenta, anatemilon "kontraufundamenta", kiu dissemis/as teroron tra la tuta lingvano. •

(II.249)(W) informas ke Boirac dissendas la...

TRIA CIRKULERO AL LA AKADEMIO (01.08.1909) [La dua, en 18.03.1909] Raporto pri la kolektitaj opinioj de la [12] Akademianoj rilate al la Dua Cirkulero [tiu "kolektitaj" shajnas klare indiki ke temis pri per-poshta kolektado]
La solaj punktoj, kiuj ricevis la favoron de pluraj konsultitoj, estis: [1] a, b, c, d, e.- Enkonduko de la afiksoj -oz-, -iv-, -end-, retro-, mis- f.- Anstata igo de la fina o -a per la fina o -e de la adverboj. g.- Anstata igo de la prepozicio "de" per "par" post pasiva verbo. h.- Starigo de reguloj por la elekto de novaj radikoj. i.- Starigo de derivreguloj.
Pri tiuj punktoj do devis vo doni la Akademianoj.

[1] Per tio mi komprenas, ke temas pri favoro de almenaŭ 2 akademianoj.

(W numeras la punktojn 1, 2, ..., 9, sed mi preferas meti literojn a, b, ..., i por eviti eventualajn konfuzojn kun la numeritaj punktoj de la Unua Cirkulero).

(II.249)(W) informas pri...

REZULTO DE LA VO DONO PRI KIU TEMAS LA TRIA CIRKULERO.

La vo dono fermi is en (15.08.09) [La tria cirkulero, en [01.08.1009]

[tiu "fermighis" shajnas klare indiki ke anke chi vochdono okazis pere de la poshto].

Nombro de akademianoj: 12.-

Nombro de partoprenintoj en la vo dono: 9.-

Punktoj akceptitaj [supozeble, char ili ricevis almena la 5 vochojn de la plimulto de la vochdonintoj]:

a.- La sufikzo *-oz-*. (5 vochoj).

d.- La prefikso *retro-*. (6 vo oj).

e.- La prefikso *mis-*. (7 vo oj).

h.- Starigo de reguloj por la elekto de novaj radikoj. (9 vo oj).

i.- Starigo de derivreguloj. (9 vo oj).

Sed Boirac aplikis la regulon de la du trionoj al la nombro de vo povantoj (t.e., 9 vo oj), kaj li tial deklaris alprenitaj nur la du lastajn punktojn, *h* kaj *i*.

La demando pri la landsufikso *-i-* estis resendita al "speciala komisiono".

(II.251-252/09)

« Sub la varma suno mediteranea, skribos s-ro Privat, fluis belsonaj versoj kaj elokventaj paroloj... Ĝi estis la vera kongreso de la lingva eleganteco. »

En tia atmosfero, ne mirige, ke nek Sébert nek Michaux povis atingi, ke oni serioze diskutu la problemon de la organizo. Kvazaŭ protokolon de tiu oficiala senpoveco faris Zamenhof, en sia

435 PAROLO ĈE LA MALFERMA KUNVENO DE U.E.A.
(7. IX. 09 : O.V., p. 392).

en kiu li salutis tiun asocion en korpigo de la interna ideo de la esperantismo. (C?)

Fine, k plej grave, la Barcelona kongreso estis tiu, kiu metis la finan punkton al la tuta afero de la reformoj.

La 11 Septembro 1909, en sia tria laborkunsido, la kongreso aŭskultis k donis sian sankcion al la

436 RAPORTO DE S-RO BOIRAC, PREZIDANTO DE LA L.K. KAJ DE LA AKADEMIO.

... En Dreseno, ni deklaris, ke la supera tasko de L.K. kaj Akademio estas zorgi pri la konservado de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ni ricevis, de post tiu kongreso, amason da proponoj pri ĉiuj punktoj de la lingvo, sed ĉiu proponanto, laŭ lia diro, celis nur helpi la evolucion, ne kontraŭstarante la fundamentajn principojn. Do, ni devis apartigi, post ekzameno, unuflanke la proponojn vere konformajn al la principoj de la lingvo; aliflanke tiujn, kiuj celas ŝanĝi esence la lingvon. Ĉar oni diras, ke la L.K. ĉion rifuzas, je la nomo de la fundamentaj principoj, mi decidis, konsente kun D-ro Zamenhof, remeti la tutan lingvon sur la tablon, por esplori, kio estas, aŭ ne, konforma al ĝiaj principoj. Poste oni povis esperi, ke la demando estos por ĉiam solvita.

En unua cirkulero mi demandis la akademianojn pri ĉiuj punktoj de alfabeto kaj gramatiko. Tiel oni forigis

la proponojn, kiuj reale ŝanĝus la lingvon. Restis la ceteraj proponoj, kiuj celas nur enkonduki neologismojn, kiuj povus esti permesitaj, almenaŭ en kelkaj teknikaj okazoj, kiel ekzemple la sufiksoj -o z -, -i v -, -i z -. Tamen la Akademio ne akceptis rekomendi ilian uzadon en la komuna lingvo. Sciencistoj, se ili bezonas la sufikson -o z -, filozofoj, se ili bezonas la sufikson -i v -, povas ilin uzi, laŭ la senco difinita de la Akademio mem. Cetere, la limo inter scienca kaj komuna lingvo ne estas tre preciza, kaj se la uzo de tiuj novaj sufiksoj fariĝos pli ofta kaj se nenia malhelpo aperos, tiam la L.K. kaj Akademio povos denove esplori la demandon.

!! — Sed la Akademio unuanime aprobis la proponojn pri la konsiloj por elekto de novaj vortoj kaj pri starigo de principoj de derivado.

Estus necese, ke la estontaj vortaristoj, antaŭ ol enkonduki novan vorton, atente ekzameni, ĉu tiu vorto estas efektive necesa kaj ne anstataŭigebla; plie, ĉu tiu vorto estas vere internacia, kaj fine, ĉu ĝi ne elvokas konfuzon kun la jam ekzistantaj vortoj. Pri la derivado, speciala komisiono de akademianoj provos eldoni specialajn regulojn.

Jen la laboro farita. De nun, pri proponoj de reformoj kaj ŝanĝoj, ni povos tuj rifuzi, ne perdante tempon, kaj oni sin dediĉos al studo de aliaj demandoj kaj aparte de la du punktoj ĉi-supre* montritaj...

Per tiu ĉi preciza k klara decido, la kontinueco de la lingvo estas definitive asertita en teorio, same kiel en la praktiko ĝin neŝanceble certigadis ĝia ĉiam kreskanta literaturo. De nun, indifera al la trompaj logoj de la plibonigistoj, perfektigistoj, reformistoj k aliaj nov-obseditoj, la esperantistaro iros sian vojon, dediĉante sian tutan forton al la propagando k al la verkado, la du rimedoj, kiuj, en la estonteco, donos al ĝi la finan venkon.

* supre.

!Bnd!(j.1948^a) !Bnd!



¡Ve al ci, nov-obsedito!

[La hundo proponis boji per "¡Bau, bau!" au per "¡Guau, guau!" anstate de per "¡Boj, boj!" (PAG §126). Tamen, la malnova, ranca obsedito Waringhien tion tuj rifuzis kaj, ne perdante tempon, rekte sin dedichis pere de sia anatemilo al la vere bezonataj taskoj (lau la instruoj de sia mentoro Boirac)].

-- Miaj komentoj pri la du jhusaj paghoj:

(a) "... la kongreso a skultis kaj donis sian sankcion al...".

Mi ne sukcesas bone kompreni la signifon de tiu "donis sian sankcion", ĉar pro kunteksto shajnas klara, ke Boirac prezentis nenian proponon por aprobo, sed simple informis pri la laboro farita, tiel ke, principe, la Kongreso simple "aprobis la ghistiaman laboron de la Akademio".

Shajnas, tamen, ke Boirac, kaj kun li la tuta Akademio, certe anke kun la konsento de la dume silentanta Zamenhof, tion interpretis, kaj laue agadis, kiel oficialan nuligon de la alineo FE.A8 de nia konstitucio, kiel anke ties oficialan anstatiĝon per la interpreto kiun Boirac volus doni al sia parolo antaŭ la Kongreso.

(Tio estas kohera kun la parolo de Sébert "... en la limoj, liberale komprenataj, de via Anta parolo al la Fundamento". Vidu ***).

(b) Nu, se, efektive, oni volis pri tia shangho en nia konstitucio, jen la koncerna proceduro nepre devus esti pli rigora kaj publika; krome, ghi devus aperi esti oficiala komuniko, tiel ke chiu lingvano plene sciighu pri ghi, kaj eventuale povu korekti en siaj dokumentoj kaj libroj la koncernan tekston.

(c) "... mi decidis, konsente kun D-ro Zamenhof...".

Tiu "mi" ja estas Boirac, la Prezidanto de la Akademio. Tiu "konsente kun" ja signifas, ke Boirac akceptis la sugeston de Z (vidu ***) ke la iniciativo prezenti lian 3^{an} cirkuleron devus veni de Boirac au de ia Akademiano, kiel anke ke Z konsentis resti aparte de la tuta afero (vidu ***).

(d) "Tiel ni forigis la proponojn, kiuj reale an us la lingvon".

Kiel ni jam scias (vidu ***) en la punktoj 1 al 7 kaj 11 kiujn la Akademio ne akceptis fakte temis pri proponoj enkonduki novajn formojn alternativajn al jam ekzistantaj formoj kaj paralele uzeblaj apud tiuj (kiuj daŭre restos validaj).

Nu, ĉar oni konsideris ke ghuste la enkonduko de paralelaj formoj konsistigis "la" fonton de problemoj (ĉar ne chiu konsentis pri ili, ktp.), jen almenaŭ Boirac, kun konsento de Zamenhof, decidis ke paralelajhoj ne plu ekzistu.

En tion chi, tamen, oni enkondukis novan duopan situacion kiun mi ne sukcesas bone kompreni:

-- Lau mia kompreno, sufichus diri ke la Akademio opinias ke la paralelajn formojn proponitajn ghi konsideras nenecesaj, kaj tial ilin ne akceptas.

Sed, tamen, jen oni ial decidis, ke anstat paroli pri "paralelaj formoj proponitaj ne akceptitaj char ili estas nenecesaj", oni une mensoge diru "proponoj ne akceptitaj char temas pri realaj shanghoj" (t.e., proponoj elimini jamajn formojn kaj ilin rekte anstatigi per novaj formoj – kiuj senplie ne estas akcepteblaj), kaj ech tuj poste plu mensogi per parolo pri "proponoj kontraufundamentaj" (kio propre estis sinonimo al proponoj pri shanghoj, tamen aldonante ian nuancon pri speciala peko kaj tial merita tanta speciale fortan anateman kondamnon).

-- En la parolo de Boirac estas implicita la aserto, ke li ne parolas anke pri proponoj pri formoj paralelaj, simple, char al ili ne venis proponoj tiajspecaj.

Sed, tamen, chiu kongresano bone sciis ke Z mem faris tiajn proponojn.

(e) "Restis la ceteraj proponoj, kiuj celas nur enkonduki neologismojn".

Char "ne ekzistis" proponoj pri paralelajhoj, kaj proponojn pri shanghoj oni ja ne akceptis, jen ja restas nur parolo pri tute novaj vortoj.

(f) Kaj nun venas la institucia pucho: Aldone al la implicita informo, ke la Akademio ghis tiam ricevis nenian proponon pri alternativaj formoj paralele uzeblaj, jen Boirac tute eksplicite sed trompe eldiras, ke la Akademio malpermesas ke en la tuta estonteco proponoj tiaspecaj venu al ghi, char "... ni povos tuj rifuzi, ne perdante tempon...".

(La trompo ja trovighas en tio, ke li mencias nur proponojn de reformoj kaj shanghoj, sed daure ne mencias proponojn pri paralelaj formoj: Nu, ja oficiala devo de la Akademio estas automate rifuzi reformojn kaj shanghojn, tiel ke estas ne nur superflue sed ekster la temo ilin citi. Kompreneble, lau la nova trompa terminologio, ja "shanghoj" signifas "proponoj pri paralelaj formoj").

Krome: Boirac, tamen, lau mia kompreno pri la afero, ne kuraghis peti de la kongreso la oficialan nuligon de la alineo FE.A8, kaj tial, ghi restas daure valida.

Kaj tiele ni venas al jena situacio: Lau Boirac kaj la Akademio, probable anke kun konsento de la dume silentanta Zamenhof, kaj mi ne scias 'chu kun konscio kaj aprobo au ne de la Kongreso...

"Al chiu esperantanoj estintaj, estantaj kaj estontaj: Vi ja daure havas la rajton pri kiu temas FE.A8.- Sed, pro nia decido, jen vi malhavas la rajton efektive uzi tiun rajton; ni lauplache decidis en chiu unopa kazo, 'chu atenti vin, au ne".

T.e.: La puchistoj ne nur nuligis la alineon FE.A8 de nia konstitucio, sed kun ghi anke deklaris kontraufundamenta chian proponon pri paralelajhoj. (Tiele, kaj en rilato al la alfabeto, ili deklaris kontraufundamenta la egalrajtigon de *h*-alfabeto al chapel-alfabeto... kio de tiam ighis esenca parto de niaj historio, tradicio kaj "kulturo", vidu ***).

Per guteto da humuro: La puchistoj deklaris nekonstitucia la konstitucion.

K Kaj ech drame: Tiu pucho ja estas la plej kontraufundamenta ago ebla, char ghi en praktiko (nen lauleghe) nuligis la kerne esencan parton de la konstitucio por nia Fundamento.

Se en tio chi temus ne pri privata afero, sed pri afero submetita al la ordinaraj leghoj ghegeneralaj, jen oni povus procesi kontrau la puchintoj kaj kontrau ilia nelegha decido; ech, eventuale, povus temi pri proceso oficiala, automate estigita de la jughistaro, do sen bezono ke la pripuchitoj ion ajn denuncu ktp.

Tia nuligo de FE.A8, ja nur fakta kaj nelegha, dauras de 1909^a ghis nun, tiel ke estighis tradicio en la Akademio ke ghia daura respekto al la pucho ne nur estas ghia rajto, sed anke ghia devo (mi ech supozas, ke tian "devon" ghi konsideras esenca ingredienco ne nur de "nia" tradicio, sed anke de "nia" kulturo... per kooptado flegata).

Rimarko.- Kiel jam dirite en ..., tiu baza rajto uzeblas pere de peticio al la Akademio. Sed, kiel minacis Boirac (kaj efektive faris, kaj ne nur li), li arogis al si la rajton "tuj rifuzi, ne perdante tempon").•

(g) La finan komenton de Waringhien mi komentas jene:

-- Li verkis sian komenton en la jaro 1948^a, do 39 jarojn post la eventoj (en 1909^a).

-- Mi konsideras ekscese ofenda, ech fia, lia parolo pri *plibonigistoj, perfektigistoj, reformistoj kaj aliaj nov-obseditoj*.

Li shajne ne konsciis, ke per tia jugho li deklaris na Zamenhof "La Granda Obsedito" au "La Chef-Obsedito".

-- En la momento en kiu li eldiris tian fiajhon jen okazis, ke la plej malnova kaj ranca obsedito estis Waringhien mem.

-- Mi kun fiero kaj kun honoro akceptas tian fian anateman insulton al mi, kaj egale akceptas ties pludauron.

LZII prezentas neniun postan leteron de Z rilatan al UK de Barcelono, kiel anke ne al la lingvo E, sed nur rilataj al organizado kaj, chefe, al sia laboro pri religio.

Mi ja komprenas ke tio venas de la simpla fakto, ke Z ne plu leteris pri la afero.

Sed estas al mi nekompreneble, ke W dedichas ech ne un solan linion por informi nin pri la pensoj, sentoj, esperoj, opinioj de Z post la UK de Barcelona: Estas nedubeble ke W sciis pri chi nova afero almena tiel bone kiel pri chiuj antaŭaj kaj postaj eventoj rilataj al Z, sed jen li ial decidis silenti pri tiuj, kaj ni tial estas absolute sensciaj pri ili.

Rimarkoj.- [i] Pli lojala kvalifiko ol "kontraufundamenta" estus diri "ekster-fundamenta", do en la senco ke temas pri vorto, formo au regulo ne jam oficialigita.

Nu, mi jam ne memoras bone 'kie mi legis ke Mattos, la tiama prezidanto de la Akademio, eldiris sian opinion, ke uzado de "un" anstat "unu" probable [!?] estas kontraufundamenta.

Do, se mi bone komprenas tian eldiron, jen temas pri jena paro el un sama korbo: (a) Neniu rajtas uzadi la alternativon "un" tiom longe, kiom la Akademio (kaj forse, anke Universala Kongreso) ghin ne oficialigos aprobe.- (b) La Akademio (kaj forse, anke Universala Kongreso) ne povos aprobe oficialigi la alternativon "un" tiom longe, kiom ghi ne pruvighos vaste uzata.

Do, definitive klare: ¡Anatemo kontrau tiu alternativo!. ¡Ghi ne rajtas ech nas-kighi!.

[ii] Mi prezentas tie chi specimenojn de la sinteno de Kalocsay kaj Waringhien pri la finajho -au:

PAG §300 (1^a eldono j. 1935^a, 4^a eldono j. 1980^a) (Auroroj, K. Kalocsay kaj G.

la au-adverboj preskas neniam en uzado en la lingvo.

Rim. IV. La aŭ-adverboj (morgaŭ, apenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, almenaŭ ktp.) propre estas puraj adverboj, tiel do nenio motivas ilian apartan formon. Jam okazis provoj uzi ilin en simpla adverba formo (*morge, apene, anke, ankore, almene* ktp.), kio cetere kunportus ankaŭ la simplan formon adjektivan (*ankora, almena, apena*) kaj substantivan (*hiero, hodio, morgo*). Tiuj provoj eĉ estas oficiale *tolerataj* de la Akademio (Raporto de prezidanto Boirac: *Oficiala Gazeto*, Aprilo 1910). La grandan forton de la E-a tradicio pravas, ke tiu ŝanĝo, malgraŭ siaj avantaĝoj kaj malgraŭ la oficiala nekondamno, tamen ne povis enhejmiĝi.

Lau la eldiro de Z. la aŭ-finaĵo en la adverbo "ne apartenas al la radiko" kaj oni

povas ĝin anstataŭigi per apostrofo: *ankor', apen'*. Sed krom kelkaj sporadaj provoj en la poezio, ankaŭ tiu permeso de Z. ne estis atentata. → *! kie?*

Waringhien):

(La 'arketo' ne estas arketo " ", sed kunmetajho el liva kaj dekstra kornoj " ". La chapelo ne sidas akcepteble lau faka vidpunkto de presistoj, sed iom flanke). (PAG disponis en j. 1980^a la plej bonajn tiamajn komputilajn rimedojn por chapelumado). (La parolo estis/as lau la feroce anatemaj *kondamno/nekondamno*, nen pri la simple humanaj *neakcepto/akcepto*).

K. Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo* (3^a eldono, j. 1970^a, p. 118^a; probable jam en la 1^a eldono, j. 1931^a):

Waringhien atentigis min pri tio, ke per la uzo de tiaj preskaŭrimoj oni povas fari rimvortojn el la aŭ-finaĵaj vortoj, kiuj cetere tute perdiĝas por la rimado. Vere, tiuj ĉi vortoj estas tute ekzilitaj el la societo de rimvortoj, kaj certe multajn poetojn jam ĉagrenis tio, ke Zamenhof, ni konfesu, sennecese, tiel apartigis, krom la prepozicioj ankaŭ purajn adverbojn, kiuj estus eminentaj rimvortoj (morgaŭ, adiaŭ, hodiaŭ, ankaŭ, preskaŭ, hieraŭ, almenaŭ, apenaŭ, ankoraŭ, kvazaŭ), se ili havus la naturan, adverbane-finaĵon. Nu, pri ĉi tio oni jam ne povas helpi, kaj tial eble akcepteblaj estas: *morgaŭ-zorgaj, ankaŭ-dankan, preskaŭ-plenkreskaj*, do tiaj preskaŭrimoj, en kiuj la radikrimado estas tre forta, almenaŭ dukonsonanta. Superrimo bone akceptebligas ankaŭ aliajn diverĝojn (trompataj-kompatan,

(PAG §89 diras: "Zamenhof, prave au malprave [!?!], opiniis necesa, ke certaj adverboj havu nevarian finaĵon... "). (La perfekteco de ĉi presaj chapelitoj kaj arkito akre kontrastas kun tiuj fushetaj komputilaj de la antaŭa dokumento).

Komento: Mi kun plena sincereco kaj bona fido asertas, ke mi ne sukcesas kompreni 'kiel entute eblas, ke jen eĉ niaj plej grandaj aŭtoroj akceptas kaj konsentas pri tia masohismado. Nu, mi egale ne sukcesas forigi de mia imago la bildon pri flagelantoj kiun tia sintenado insistas meti en mian cerbon. •

=====

(II.262/10)(
W)

maljunaj pruntoj.

Al la sama kunveno de la L.K. estis prezentita verketo, modesta laŭ la dimensioj, sed gravega laŭ la enhavo :

445 LA LOGIKA BAZO DE VORTFARADO EN ESPERANTO
(*Eltiraĵo el « Scienca Revuo », Aŭgusto 1910*)

esperantigo de la antaŭa franclingva broŝureto « La Construction logique des mots en Esperanto », de la sama aŭtoro Antido, t.e. René de Saussure. Pri tiu unua formo de la verko Zamenhof varme gratulis lin :

446 L. al R. DE SAUSSURE (? VIII. 10 : O.V., p. 455).

... La... verkon mi legis kun granda intereso ; mi trovas ĝin bona ... Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al Via propono sian oficialan aprobon.

K eĉ konfirmitaj konservativuloj, kia Cart, deklaris ĝin « genia ». R. de Saussure tie ne nur plej trafe rebatas la kritikojn de Couturat (Kp. n^o 275), sed li perfekte difinas la verajn principojn de nia vortfarado, kiujn post li ellaboros

(II.358-359)

Chi-apu-
de montrig-
has la lasta
parto de la
"Epilogo"
per kiu W
metas finon
al siaj edito-
ritaj LZI kaj
LZII.

reformon.

*Al tiu lingva revolucio oponis tuj Zamenhof, pli rapide k
pli tranĉe ol ĉiuj aliaj intertraktantoj — kontraŭe al la
legendo de la Idistoj, kiuj ĉiam akuzis Sébert k Bourlet pri la
iniciato de la forrompo. Sed ankaŭ ĉe Zamenhof la afero ne
estis definitive senriska; ĉar, kun la obstino, kiu estis esenca
trajto de lia karaktero, li neniam rezignis pri reformado de
Esperanto per tiu sistemo de « neologismoj », kiun li jam*

✓ Pom.

Mi daure konsternig-has che chi paghoj, por mi harhirtigaj, de la granda, de mia admirata kaj dankata Waringhien:

(a) Per la una substrekita frazo li eksplicite informas chiun komprenanton ke, efektive, esenca parto de la institucia pucho estis ne-allasado de paralelaj alternativoj.

1916

skizis en la ruslingva eldono de la Unua Libro, k kiun li provos efektivi tri sinsekvajn fojojn (Kp n° 240, 340 k 424 & Bonŝance lian persistemon vantigis du faktoj: la unua estis la kaosa konsisto de tiu Lingva Komitato, kiun Zamenhof antaŭvidis 15-membra, sed kies amplekson li etendis ĝis 100 anoj, kiam la opozicio de Beaufront devigis lin anstataŭigi sian multfakan Centran Komitaton per unika, nur lingva konsultotaro. La dua estis la sovaĝa necedemo de Carl, kiu senĉese k nevarie kontraŭstaris al ĉia reformoprovo, de kiu ajn ĝi venis, eĉ de la Majstro, k kiu tuj de la komenco deklaris k finfine deklaris al la L.K., ke Esperanto estas jam vivanta lingvo, kiun arte plibonigi estus tiel same absurde, kiel la francan aŭ la anglan. K tio restos lia neforgesebla merito k ne forviŝebla gloro, ke dank'al li Esperanto akiris tiun sekreton de la triumfo, kia estas, laŭ la fama formulo de Prof. Bouchard, membro de la Delegacia Komitato, la « plena respektateco k netuŝebleco de unu sankta lingvo ».

Porv. Ĵi! Harhirtigaj rezultoj k konkludoj!!

(b) Estas al mi nekompreneble ke W allasas kaj faras mem argumenton per parolo pri sankteco de lingvoj.

(II.216/08)
al Bourlet
(tiam kunlaboranta en la organizado de la Barcelona Kongreso, j. 1909^a).

P.S. — En la antaŭlasta linio de la paĝo 9 de mia nova teksto Vi povas aldoni la sekvantajn vortojn :

Ĉiu, kiu volas nur kompreni, komprenas ja tre bone, ke la « Fundamento », pri kiu parolas la Bulonja Deklaracio, neniam havis la celon prezenti ian « sanktan libron », sed ĝia celo estas nur : gardi la kontinuecon de nia lingvo.

Al tiu letero estis aldonita la dua, korektita, sed ankoraŭ ne definitiva teksto de la

[Shajne, al W ne sufichis chi letero de Z al un el la plej senlacaj kaj efikaj laborantoj por E, kaj bezonis eldiron de iu Bouchard, kiu ech ne aktivis en E, sed nur estis membro de la Komitato kiun Couturat muntis kun celo lanchi sian "Ido"].

Rimarkoj.- [i] Kushas tute ekster mia kompren-kapablo, ke che Waringhien (mem enorma forto de la naturo, egale kiel Zamenhof) kunekzistis, unufanke, lia majstreco kaj enorma kapablo verkista, lingvista, historiista kaj, aliflanke, ne tiom lia rigideco puchista, kiom lia subtila manovrado eklezia/pastrara/superstruktura, kiu por teksado sian araneajhon

ech ne hezitis abunde uzi duon-sofismojn, duon-verojn, ironion, k.s. majstre konstruante etoson favoran al plutenado de la pucho laulonge de la jaroj.

Kaj ne irante tiel foren alten, kaj nin tenante sur la vulgara grundo, ĉu kiel estas entute eble, ke li allasis prava tian sensencan aserton "... kiun arte plibonigi estas tiel same absurde, kiel la francan au la anglan?". [Nu, ghuste tajpante la demandon, jen mi subite komprenis: ĵTio estas un plia ero de la araneajho!].

ĴJen, ech che la granda Waringhien, 'kia akumuligo da patosaj, eksterlingvaj esprimoj, tiel ke ne plu temu pri netushebleco de iniciatora gherma instrulibro nomata *Fundamento de Esperanto*, sed pri plena respektateco kaj netushebleco de unu sankta lingvo!.

[ii] Mi ne estas kompetenta jughi 'chu, efektive, Z kulpis pri ekscesa proponado paralelajhojn (kvankam mia propra opinio ja estas, ke entute temis pri ridinde malgranda kvanto da, kaj ke, chefe, li neniam prezentis la aferon sufiche klara kaj drasta).

Lau W, jen Z suferis ian psikan malsanon trenantan na li al memdetruo, tiel ke por li jen Z fakte estis "La Grand-Obsedito" au "La Chef-Obsedito" (se ni adoptu kaj laue adaptu la terminologion de W, vidu ***).

Tamen, sendepende de tio, 'chu li efektive tion suferis au ne, certe tamen plene veras, ke tiajn proponojn Z ne faris arbitre, char ili estis rezulto tiel de la propra giganta laboro pri kaj per la lingvo (laboro verka, traduka, parola), kiel anke de la komentoj, jughoj kaj proponoj al li venantaj pere de la revuoj kaj de la egale giganta korespondado (ech 30-50 leterojn chiutage (LZ ***) kiun li ricevadis.

Kaj en rilato al nia temo, ja estas bedaurege, ke ni ne disponas statistikojn pri la proporcio da proponoj, jen pri gardado de la chapel-alfabeto, jen pri uzado de senproblema alfabeto, kiuj venadis al li jen de tiuj obseditoj por kiuj E principe estis ilo por elita, kabine-ta laboro literatura au poshtmark-kolekta, kaj tiuj venantaj de vulgaraj obseditoj kiuj volus au proponus ghin uzi por komerca korespondado, por telegramado, por publicado sciencajn verkojn, ktp.

=====

(.) Chi-sekve temas pri tri cherpajhoj nerilataj al Z, sed ja jes al nia temo:

(l.298/1908)

(El la franca).

Letero de Bourlet al Michaux, parolante pri provoj reformi la E-alfabeton.

Cetere la pripenso, la longa pripenso kaj la diskutado kun multaj bonaj amikoj pruvis al mi, ke mi tremalpravas, kiam mi konsideris ebla reformon de la alfabeto. Mi estas nun certa, ke ĝi estas neefektivebla, sen morta danĝero...

(II.151/1908)(
W)

[Mia komento:
Duon-sofisma
argumento de
W].

*La historio de Ido estas do instruplena k ekzempla
demonstrado de la principo, ke en efektiveco la reformemon
oni ne povas limigi k, de la momento, kiam oni forcedas unu
supersignon, oni estas neeviteble kuntrenata de cedo al
cedoj, meze de diverĝaj aŭ eĉ kontraŭaj postuloj, ĝis la fina
disdialektiĝo.*

[Char fremda al nia temo, por chi paghoj ni nenion cherpis el LZ pri Ido, ja la dua, paralela problemo kiun Z devis fronti].

=====

(II.152/1908)(
W)

+ letero el
1933.

(Temas pri la
sama dokumen-
to, kiel en la
jhusa chelo).

[Lau mia
kompreno, Mi-
chaux argumen-
tas kadre de la
tuteca shangho
kiun Ido celis].

[Sed por chi
paghoj gravas
nur la neceso

*de Couturat; k necesaj estis la senfinaj diskutoj de tiu
lasta kun ĉiaspecaj kontraŭdirantoj, por ke ĉiuj konfesu la
nedisigeblan koherecon de la verko de Zamenhof. Antikva
kritikisto asertis, ke estas pli facile forpreni de Heraklo lian
klabon, ol de Homero unu verson; ion saman diris iam al
mi unu bona atestanto de la laboroj de Couturat:*

355 L. de MICHAUX al WARINGHIEN (20. III. 33). *El
la franca.*

... Dank'al tiuj diskutoj, mi akiris la certon, ke estas
neeble reformi Esperanton, eĉ ne la supersignitajn literojn:
Couturat trovis sin blokita antaŭ la n e d i v i d e b l a
verko de unu genio... Antaŭ ol li, ankoraŭ neniu konstatis,
ke la tuta konstruaĵo estas solidara kun simplaj vortetoj,
kiaj « ŝi, ĝi, ĉi, -iĝ- » k.t.p. Ĉiuj partoj de tiu ĉefverko estas
nerompeble interligitaj...

*Pli ĝustan k profitan konkludon oni ja ne povus doni al
la Ido-afero.*

oficialigi la egal-rajtecon de *h*-alfabeto kaj de chapel-alfabeto].

(.) Tie chi mi cherpas letererojn en kiuj Z parolas pri sia malfortighanta sano:

(II.234/08)

Mia farto estas ne tre bona. La konstanta ekscititeco
en la lasta tempo, kune kun la profesiaj malagrabloj,
kiujn mi ordinare havas post ĉiu longa forestado, iom
elĉerpis la forton de miaj nervoj; mi tamen esperas, ke
ĉio reboniĝos.

Vi scias jam verŝajne, ke la deklaro de fideleco en la

(II.238/08)

[Laudire, febla korpo.- Sed... ĵ'kia giganta forto de la naturo!]

Krom tio mi devas ankoraŭ aldoni jenon : kun granda malĝojo mi antaŭsentas, ke eble baldaŭ venos la tempo, kiam mia laca kapo ne povos plu labori (eĉ nun la skribado de ia artikolo aŭ eĉ de simplaj leteroj fariĝas por mi ĉiam pli kaj pli malfacila). Povas esti, ke se mi havos la eblon absolute ripozi en la daŭro de ia pli longa tempo, mia kapo denove refreŝiĝos ; sed ĉar oni nenion povas antaŭvidi, tial estus utile, se por ĉiu okazo la esperantistoj kutimiĝus labori sen mia partopreno, por ke ia malagrabra eventualaĵo ne kaŭzu subitan konfuzon en nia afero kaj ne malgrandigu subite la valoron de niaj kongresoj.

Ĉiujn al mi la estas neceso unu fojon por ĉiam meti

(II.294/11)

En la lasta tempo mi sentas min ĉiam pli kaj pli malbone. La irado estas por mi tre malfacila (pro arteriosklerozo kaj manko de pulso en la piedoj), ĉiu laboro min baldaŭ lacigas.

Mi devas nun nepre iom kuraci min, kvankam mi ne scias, ĉu la kuracado multe min helpos.

(II.296/11)

La stato de mia sano tute ne estas bona. Mi estas tre malforta kaj ĉio min lacigas. Malgraŭ la kuracado mia pulso estas nun ankoraŭ mezonombre ĉirkaŭ 120 batoj en minuto. Jam de antaŭ 4-5 jaroj la kuracistoj insiste konsilis al mi longan ripozon kaj eviton de ĉia ekscitiĝo, sed mi ne povis tion plenumi, ĉar ĝis nun mia partopreno en la kongresoj estis nepre necesa. Ĉar en la lasta tempo mia farto komencis multe min turmenti kaj ĉar mi sciis, ke en Antverpeno ankaŭ sen mia veno la kongreso estos sufiĉe

(11.297-298/11)

diversaj suspektoj.

Konsiliĝon kun parizaj kuracistoj mi rigardas kiel tute sencelan, ĉar mi jam konsiliĝis en Varsovio kaj en Berlino, kaj la parizaj kuracistoj certe ne diros al mi ion novan. Oni konsilas al mi antaŭ ĉio plenan longan ripozon kaj trankvilecon, sed bedaŭrinde mi nun ne povas tion plenumi ; oni postulas, ke mi nepre ĉesu fumi, kaj mi efektive dum du monatoj ne fumis ; sed nun pro la ekscitanta prepariĝo al la kongreso mi devis denove

komenci la fumadon ; mi esperas, ke post mia reveno hejmen, se mi ne havos ian ekscitiĝon, mi denove ĉesos fumi. D'Arsonvalizadon mi jam komencis, sed ĝi nenion helpas.

Koncerne la proponon de la firmo Gaumont mi povas

=====

(II.269/10)(W) informas ke Z verkis memuaron okaze de la "Kongreso de Ra-soj" (Londono, 1911^a), kun titolo "Gentoj kaj Lingvo Internacia". (OV, p.345-353).

=====

(II.317-334/01.13) Z reprenas sian laboron por "neutrale homa religio".

-- Li sin turnas konfidence al Bourlet: Temas pri afero kiu povas alfluigi multe da ne-esperantistoj al la Pariza E-Kongreso en Parizo, en 1914.- Neniu oficiala esperantisto povas elpashi publike kun la religia demando, sed tion povas facile kaj sendanghere fari iu alia.- Tial mi serchas personon, kiu volas preni sur sin la aranghon de kongreso por starigo de neutrale homa religio.- Chu vi ne povas trovi inter viaj konatoj iun, kiu volus preni sur sin la aranghon de la Kongreso?... multreligia Rusujo... la kolosa inujo... La kongreso havus tian fajron kaj sukceson, kian ghis nun havis neniu kongreso en la mondo... tial grandega multo el la partoprenantoj de la kongreso neutralreligia partoprenos ankau en la kongreso esperantista kaj donos al tiu kongreso plej brilantan kaj imponantan sukceson...

[La nomo de tiu "religio" unue estis Hilelismo, poste Homaranismo, poste Neutralismo (=neutrale homa religio), fine revenis al Homaranismo. [lom de ghi disfluis sub la nenidira esprimo "interna ideo"].

(II.326-327/13) Al Sébert: "Tiel same, kiel katoliko scias, ke liaj nepoj restos katolikaj, a hebreo scias, ke liaj nepoj (se ili ne volas vendi sian konsciencon) restos hebreoj – tiel mi dezirus, ke anka la nepoj de liberpensulo havu garantion, ke liaj nepoj restos liberpensuloj kaj ke nenio devigos ilin reveni hipokrite al religio rivelacia kaj gent-karakterata".

Zamenhof, genio kaj giganta forto de la naturo en febla korpo, naskighis en 15-12-1859, kaj mortis en 14-04-1917, do 57-jara.

=====

(.) De kaj pri la **Akademio de Esperanto**:

(a) Una dokumento:

Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 0 [j. 1982]

Pri niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, sangi au modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia sango estas necesa au dezirinda, au en ligo kun modernaj presmasinoj au komputmasinoj, por kiuj gia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, au pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformigas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia sango nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldonigas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn c, g, h, j, s, u, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u".

Por la Akademio, ties Prezidanto,
William AULD

Miaj komentoj:

[1] Mi ne scias, 'kiuj estas tiuj diversaj proponoj cititaj de Auld, kaj krome ili min ne interesas.

Mi havas intereson nur al jenaj aferoj:

(a) Rekta intereso:

(a.1) La chapel-alfabeto (oficiale fundamenta, oficiale principa).

(a.2) La *h*-alfabeto (oficiale fundamenta, oficiale surogata, krome nur por tre limita celo).

(b) Nerekta intereso: La *x*-alfabeto (ekster-fundamenta, neoficiala).

[2] En chi decido/informo daŭre intermiksighas la terminoj *alfabeto* kaj *ortografio*, kvaze ili estus sinonimoj.

Nu, en E ja ekzistas problemoj che ghiaj du oficialaj alfabetoj, sed ja neniam problemoj che la ortografio.

Sekve, chiun vorton "ortografio" en chi teksto oni aliigu, depende de kunteksto, jen al "la chapel-alfabeto", jen al "la *h*-alfabeto", jen al "la du alfabetoj" de Esperanto.

[3] Estas strikte sensenca la aserto, ke la Akademio konstatas ke neniam alfabeto shangho estas necesa au dezirinda.

Ghi povas tute bone konstati ke por ghi kaj por aliaj shangho estas nek necesa, nek dezirata, nek dezirinda, kaj ja povas tute bone decidi aprobi au malaprobi difinitan reformon/ shanghon/ plibonigon, sed ghi ne rajtas decidi ke ghi ne konstatas la kontraŭajn sentojn kaj opiniojn en aliaj.

[3] Estas strikte sensenca la aserto, ke ĉiuj alfabetoj de ĉiuj lingvoj estas egale oportunaj por komputil-manipulado.

[4] Estas strikte triviala, ĉar tautologia, kaj tial seninteresa, la aserto ke la **du oficialaj alfabetoj** de la lingvo Esperanto estas integra parto de la historio, kulturo kaj tradicio de la lingvo Esperanto.

Diference, tute ne estus triviala, kaj ne tautologia, kaj krome plej interesa, kaj krome plej grava, la mankanta fundamentita aserto, respondanta al la demando, 'ĉu la kultur-parto bazighanta sur la chapelitaj literoj estas au ne estas la mirinde efika ilo por nia jam 122-jara masohismado, 'ĉu tia kultur-parto parencas au ne parencas al la kultur-parto bazighanta sur la t.n. "vinditaj piedoj" ĉe la knabinoj kaj virinoj en iama Ĉinio.

[5] Estas strikte sensenca, ĉar nenidira, la aserto, ke chapel-alfabeto konformighas perfekte al la karaktero de Esperanto.

Tute diference, estas plene sencohava kaj bedaurinde plene prava la aserto, ke chapel-alfabeto estas malsimpla kaj maloportuna sistemo por reprezenti la sonojn de lingvo aspiranta al la rolo de interlingvo.

[6] Estas neallaseblaj la sintagmoj "iu ajn" kaj "nur kompromitus" en la aserto, ke iu ajn alfabeto shangho nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion; krome, en tio oni devas aparte konsideri la lingvon, kaj aparte la tradicion. Efektive:

- Ja principe tre povas esti ke alfabetoshanghoj kompromitus lingvon, sed ekzistas empiria sperto pri eĉ abundaj kazoj en kiuj nenio tia okazis (por ekzemplo, ĉe pasado en Turkio de la araba al la latina alfabeto).

Sekve, la aserto nun komentata neniel povus esti ĝenerala, sed nur konsiderata aparte por ĉiu aparta lingvo kaj por ĉiu aparta ties alfabeto.

- En rilato al Esperanto, estus sensenca kaj ridinda la aserto ke eĉ la uzo de la sola *h*-alfabeto au de la sola *x*-alfabeto povus eĉ minimume kompromiti la lingvon (escepte forse en la eksterlingva senco, ke pro malshato iuj forlasus la lingvon au eĉ ne venus al ghi – kio, cetere, tro ofte okazas jam de 122 jaroj pro la chapelitaj literoj).

Krome: Mi ne scias, 'ĉu ĉi decido/informo de la Akademio sekrete havas aferon al pliaj proponoj por shanghoj krome vere dangheraj, sed ili ja ĉiukaze restas ekster konsidero.

- Kaj ni parolu nun pri eventuala kompromito "ties" tradicion: Jen, ree, tro ĝenerala, tro ampleksa esprimo: "Ties tradicio, la tuta tradicio" povas enfermi par-

tojn nepre konservendajn, sed anke partojn nepre au prefere eliminendajn au tenendajn apartaj.

Por ekzemplo: Mi supozas, ke la tuta Akademio kaj Auld konsideras eliminendaj tradiciojn kiel la china "vinditaj piedoj", au kiel la fortrancho de la klitorio al infaninoj en iuj regionoj de Afriko, au kiel la ludo [!?] forjheti vivantan kaprinon de la supro de sonorilturo grunden en iuj lokoj de Hispanio (tradiciero nun mildigita me-tante tolon iom super la grundo), ktp., ktp.

Nu, ni supozu nun ke, pro apene esperebla Akademia decido, jen apud chapelitoj povus aliu(j) alfabeto(j) egalrajte lukti por sukcesi plene enuzighi: Jen, l'o plej danghera okazunta estas, ke chapelitoj irus, se ili tion volus, trankvile dormi por eterne, post la penado de la farita laboro, en propran, komfortan arhhaismujon. Sed ja povus okazi anke, ke ili plu rolos por taskoj solenaj, ks.

Mi ja komprenas ke nek al la Akademio nek al Auld chi lastaj ebloj estus plachaj. Sed mi opinias ke ili devus diri, kaj siakaze argumenti, 'chu en tio tamen donighus por la lingvo kaj ghia vivo ia ajn katastrofo, au ech katastrofeto, au ech stumblo, au ech stumbleto.

[7] En la lasta alineo ne temas pri "konfirmas, ke..." sed pri "konfirmas sian decidon, ke...".

[8] Konklude: Chi dokumento estas koncepte kaj argumente perfekte vakua. Ghi ne estus prezentbla al ekstera klerulo, gravulo au institucio estiel ekzemplo de Akademia agado.

L'o sola atentenda en ghi estas la ukazo superstruktura/ eklezia/ pastrara per kiu ghi finighas, kaj kiu estas jam 100-jara, Akademie 'tradicie (= kooptade)' daure vartata rezulto de la institucia pucho de la jaro 1909^a.

Komplemente, pri x-alfabeto:

-- Mi supozas, ke anke ghi aperas en la listo de tiuj "diversaj proponoj" pri kiuj Auld parolas.

-- Mi shatus sciighi, 'kiuj estas fakte la kompreno de la afero kaj la planoj de uzantoj de x-alfabeto tiel por la nuno, kiel por la estonteco (kaj en tio chi distingante, 'chu la Akademio daure restos che sia ghisnuna pozicio, au 'chu ghi iam egalrajtigos ambajn fundamentajn alfabetojn).

(.) Ghenerala komento.- Ekde j. 1929^a (en kiu aperis OV), la interesighantoj pri la historio de E povis fine disponi kreskantan informaron pri la gheneralaj trajtoj de la afero. Sed antau tiu jaro nur manpleno da specialistoj, okupantaj mem la altajn postenojn de la E movado, povis havi adekvatan scion pri la tuto.

Sed antau j. 1929^a, por la ordinaraj E uzantoj ekzistis nur lernolibroj kaj pli-malpli granda kvanto da onidiroj pri la aferoj kaj problemoj pri kiuj sin okupis la elitularo.

=====

(b) Dua dokumento:

AKADEMIO DE ESPERANTO

El "Oficialaj Informoj 6 - 2007 01 21"

Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel gi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu sango estas necesa au dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la gustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataua skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstatauigi la supersignajn literojn per aliaj signoj au signokombinoj. Tian anstatauigon, kiam gi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam gi neniel kausas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontrau-Fundamentan.

Ekzistas ankau aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata au transsendata elektronike en cifereca formo lau diversaj kodsistemoj, kaj ancorau aliaj similaj okazoj. Ankau tiajn manierojn skribi, transskribi au prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontrau-Fundamentajn.

Geraldo Mattos

Prezidanto de la Akademio de Esperanto

Miaj komentoj:

[1] Mi konstatas ke anke sub chi nova Prezidanto la termino "ortografio" estas uzata kun la signifo "alfabeto".

Nu, de tio mi konkludas, ke pri tio simple okazas, ke mi estas postrestinta en miaj scioj pri la mirinda kaj daura plishveligado de terminologio kaj da terminologioj en nia epoko.

Sed almena mi diru, ke en la "Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Esperanto en Kvin Lingvoj" sinsekve aperas, per grandaj grasaj literoj, **ALPHABET, THE ALPHABET, DAS ALPHABET, АЗБУКА, ABECAD O** ; do, "alfabeto", kaj ne "ortografio".

[2] Mi dankas Prezidanton Mattos, ke li komencis, kiel ende, per la kutima kaj rutina ukazo jam 100-jara pri niaj alfabetoj.

[3] Lau mia kompreno, la dua alineo rilatas al x-alfabeto, tiel abunde uzata de komputilistoj.

Nu, mi ne komprenas 'kial Mattos tiel timas mortigan kontaghton kun tia alfabeto, ke ech ghia nomo farighis tabua por li.

[4] Mi ne sukcesas kompreni 'kial la Prezidanto opiniis necesa informi komputilistojn, brajle-tajpistojn, fonetikistojn, ktp., ke la Akademio degnas konsideri nekontraufundamenta ilian uzadon de la respektivaj malsamaj specialaj alfabetoj.

Nu, mi supozas, ke chiu koncernatoj simple ridetis kun shultro-levo che tia Akademia indulgo al ili.

Rimarko.- Jen duafoje aperas en chi paghoj, Akademie uzata, la timinda kaj perfekte eksterfundamenta anatemilo "kontraufundamenta", kvankam chi kaze ghi estas uzata ne por puni, sed nur por averti ke, en okazo de bezono, la Akademio senhezite kaj senindulge ghin skurghe manipulos kontrau kiu ajn. •

=====

(.) Char mi jhus komentis la decidojn/informojn de du Akademiaj prezidantoj, jen endas ke mi rakontu pri mia iama **kandidatigho al la Akademio**:

-- Mi ne memoras bone, forse antau kelkaj 15 jaroj, jen iutage mi ricevis telefonvokon de akademiana amiko, kun sugesto, ke mi kandidatighu al la Akademio. Mi tuj rifuzis, kun argumento ke mi nenion publicis, ke mi estas perfekte kaj absolute nekonata en tia mondo, ktp. Anke, ke se mi kandidatighus, tio riskus ighi atenco ne nur al mia honoro sed anke al tiu de la Akademio. Li kontrauargumentis ke li bone konas min, kaj ke, tial, nenia atenco-risko ekzistas, ktp.

Nu, tamen, mi ne akceptis, kaj tial ne kandidatighis.

-- Mi ne memoras bone anke, 'chu 1, 2 au 3 jarojn poste, mi ricevis leteron de aliu akademiana amiko, kiu komencighis: "Ne; ne diru 'ne' ", kaj anke li sugestis, ke mi kandidatighu.

Kio pleje surprizis min en tio chi, estis, ke la tuta esperanta mondo bone sciis ke tiuj du akademianoj kiuj sinsekve sin turnis kun la sama sugesto al mi, estis/as ech krudaj malamikoj inter si.

Per telefono mi diris al chi dua akademiano ke mi ne kandidatighos. Tamen, per novaj argumentoj kiujn li tiuokaze donis al mi, jen fine mi konsentis kandidatighi.

-- Kelkajn tagojn poste mi ricevis telefonvokon de la una akademiano, anke kun sugesto, ke mi kandidatighu, kaj li forte surprizighis ke mi jam kandidatighis, kaj komentis: "Bone, kio gravas estas, ke vi kandidatighis".

-- Kompreneble, mi sherce diris al mi mem, ke granda risiko ekzistas, ke mi ech farighu prezidanto de la Akademio, char shajne min apogus la du "eternaj rivaloj" [lau la jhargono uzata de futbalemuloj, almene en Hispanio].

-- Kredu, ne kredu, mi ricevis 7 vochojn, sep!, tiel ke mi ne ighis akademiano.

¿Kial entute eblis, ke mi ricevis tiom da vochoj?. Logiko trudis, ke mi maksimume ricevu 1 au 2 vochojn, ja venantajn de tiuj miaj amikoj.

(Mi per tio neniel volus kritiki miajn du bonajn amikojn, char ili pli bone ol mi sciis pri la kulisoj kaj pri la profundoj de la afero. Sed ja, tamen, en tio io grincis).

-- Kaj tio chi finighis lau maniero kiu ankore dum longa tempo posta tremigis min de honto en rilato al mia persono kaj al E, sed jam fremde de la Akademio: Mi prelegantis pri E en universitato, kaj la amiko kiu min prezentis, malprudente informis ke mi estas kandidato al la Akademio de Esperanto: La cheestantoj esperis ke li listigus miajn meritojn, librojn, ktp., char en Hispanio "la Academia" estas preska sakralejo, kien nur la plej elstaraj elstaruloj estas kooptade akceptitaj.

La prelego estis fiasko, tute speciale por mi, kiu la tutan tempon ech ne kuraghis rekte rigardi la publikon.

(Tio chi iel rilatas al tio dirita en *** pri la eventuale neprudenta uzo de la termino "kongreso").

=====

(.) Drasta, plia pledo (ech se teda) por *h*-alfabeto: **Jam temp' está, jam temp' estas!.**

Rimarko.- Evidente, la chefa celo de chi studajho (kvankam, egale evidente, ne la sola celo), ja estis provizi adekvate firman bazon por plia, drasta pledo por *h*-alfabeto. •

(a) Tiu chi pledo rilatas al mia opinio kaj al miaj bezonoj.

Mi scias ke mi ne estas la sola esperantano kun tia starpunkto, sed ja egale scias pri tute alia starpunkto che aliuj esperantanoj.

Nu, mi pensas, ke jam temp' está ke ambaj starpunktoj ghuu egalajn rajtojn, tiel ke ili povu pace kunvivadi kaj fruktadi, krome neniel pretendante sed anke neniel oponante al la eventualo, ke la lingvovivo finfine decidu favore al nur un el ambaj starpunktoj.

(b) Zamenhof bezonis trasuferi 22 jarojn da masohismado por fine akcepti la jam longe evidentan fakton, ke lia chapelitaro konsistigas gravan obstaklon al la disvastigado de lia lingvo, kiel anke al la vivo de la lingvo mem. (Vidu ***).

(c) Forgesu pri la institucia pucho de 1909^a, kiel anke pri la cirkonstancoj kiuj forse ghin pravigis.

(d) Forgesu anke pri tiuj eroj de la Akademia agado kiuj nur celis/celas muntadon kaj tenadon de eklezia/pastrara superstrukturo por tenadi viva la institucian puchon de 1909^a. (Sed ja neniel forgesu pri la multaj ceteraj taskoj, ja nepre necesaj... kaj dankataj de ni chiu).

(e) Chesu vane/ eklezie/ pastrare/ superstrukture sofisme vortadi pri "nialingva kulturo", "nialingva tradicio", ktp., ks.

Mi ja, tamen, ne petas ke vi ekparolu laute, kuraghe kaj elegante, publike agnoskante niajn 122 jarojn da masohismado.

(f) Se Zamenhof bezonis la diritajn 22 jarojn por veni al la dirita konkludo, ni povus eventuale kompreni ke vi bezonis 122 jarojn por konkludi same, sed opinias, ke tio pli ol sufichas (kvankam ni jam bone scias, ke vi plej sindone kaj ofereme pretas bezoni ech pliajn 100 jarojn).

(g) En la kadro de internacia lingvo, kaj jam ekde la naskigho mem de E...

-- Ni ne volas kundividi la felichon de hispanoj, francoj, germanoj, chehhoj, poloj, vjetnamoj, ktp., ktp., bezoni pri tajpiloj, kompostiloj kaj komputiloj kompetente kapablaj pri komplikajhoj diakritaj.

-- Ni ne volas pri la richo disponi alternativajn alfabetojn, mem dependajn de tio, 'chu temas pri ankore nur preparata kaj traktata teksto, au 'chu temas pri definitiva teksto.

-- Ni ne volas frandi la ghisorgasman plezuron barakti kontrau komputil-programoj, makrooj ks., provante venki ties nekongruajhojn rilate diakritojn kaj diakritohavajn literojn.

-- Kaj, tre kaj tute speciale, ni ne volas meriti kaj ghui la pezan kaj hontigan honoron efektive disponi specifan, tute apartan, individuan citon kaj lokon en Unikodo.

-- Ni simple volas la simplan, vulgaran kaj spontanen felichon, ghohon kaj ghupon de anglalingvanoj kiuj, jen, simple sidighas kaj tajpas, char al ili sufichas la simpla senproblema manipulado de la simpla nuda alfabeto latina; t.e., de la alfabeto baza anke por E.

(g) Jen do, la devo de la Akademio estas klara, kaj plej simpla, kaj kadre de nia konstituciero FE.A8: Unanime aprobi mem, kaj unanime proponi poste al Unversala Kongreso, ke ghi aprobe sankciu jenan proponon vian:

-- Oficialigo de la egalrajteco de *h*-alfabeto kaj de chapel-alfabeto por kiu ajn celo (inklude, do, de publikigo de kiu ajn verko per kiu ajn el tiuj alfabetoj, sen ia chikana parolo pri "eventualaj teknikaj specialaj bezonoj, rimedoj au cirkonstancoj").

-- Forte rekomendi ke niaj institucioj, eldonistoj, redakcioj, revuoj, asoci-bultenoj, ktp., libere kaj senprobleme allasu uzadon de tiu el la du alfabetoj kiun la teksto-autoro preferos.

-- Forte rekomendi ke en tia nova sintenado kaj agado, jen la Akademio estu konstanta ekzempla modelo.

(h) Fine, jen la devo de chiuj koncernaj UK-anoj estas egale klara, kaj plej simpla, kaj egale kadre de tiu sama konstituciero FE.A8: Unanime akcepti kaj oficialigi la Akademian proponon lau **(g)**.

=====

Por fini chi studajhon, mi komentas jenan esperigan dokumenton (vidu^{***})

<http://groups.yahoo.com/group/peticio/>.

Kampanjo por la h-alfabeto. **Sensupersigne lau-Fundamente!**- **Peticio** al la Akademio de Esperanto. En decembro 1907, L.L.Zamenhof skribis al la Lingva Komitato (la antaŭulo de la Akademio) leteron, en kiu li proponis ke ghi deklaru la jennon: [vidu ^{***}]:

"Por ke la mondo ne opiniu erare, ke tekstoj en Esperanto ne estas facile preseblaj kaj por ke tiu erara opinio ne servu plu kiel batalilo en la manoj de la malamikoj de Esperanto, la Lingva Komitato rekomendas, ke ghis la plena fortikigo de Esperanto chiuj verkoj kaj gazetoj Esperantaj estu presataj per la litero "h" anstataŭ la signeto "^", kaj anstataŭ "u`" estu uzata simple "u", kiu post vokalo chiam devas esti legata kiel "u". En la tre maloftaj okazoj, kiam "h" post la literoj "c", "g", "h", "j", "s", au "u" post vokalo, devas esti elparolataj memstare, ili devas havi antaŭ si apostrofon au streketon (-)."

Ni, la subskribintoj, peticias la Akademion de Esperanto akcepti tiun proponon

Evidente, mi el la tuta koro kaj el la tuta cerbo absolute konsentas kun la celo de la peticio, sed mi ne povas ghin subskribi ĉar, kiel jam dirite en ^{***}, mi konsideras ghian redakton neghusta kaj nepravigita postulo pri kapitulaco fare de tiuj, kiuj deziras plu uzadi la chapelon, au almenaŭ ne deziras ke oni forprenu tiun rajton de iu ajn.

Mi tial sugestas al la iniciatintoj pri jenaj du aferoj:

(a) Ke ili re-redaktu la peticion sub formo ghusta, neniel ekscesa.

(b) Ke kadre de la kampanjo, tamen prefere ekster la petici-teksto mem, ili abunde...

-- Substreku la ridigan situacion ke, kvankam la Akademio jam delonge perdis sian virgecon ĉar en sia web-paĝaro ghi uzas chiujn tri alfabetojn (chapelan, h-an, x-an), jen tamen insistas ke oni daŭre akceptu ghin virga.

Kaj oni ja aldonu, ke jen, ghuste el tiuj tri alfabetoj de ghi uzataj, nur la chapel-misfunkcias, ĉar ne chiuj povas ĉerpi el ghi chapelozan tekston, kaj por serĉado en ghi oni devas uzi kiun ajn el la du ceteraj alfabetoj.

-- Substreku ke lau la puĉo de j. 1909^a kiun ghi volas restigi esenca ero ne nur de nia historio kaj tradicio, sed anke de nia "kulturo" (!?), jen chia nura propono pri enkonduko de novaj alternativoj paralele uzeblaj apud la malnovaj (kaj inter ili, ghuste la nura propono pri egalrajtigo de h-alfabeto kun chapel-alfabeto) estas... ĵkontrafundamentaj!".

-- Substreku anke, ke tiu anatemo "kontrafundamenta" estas ruza elpensajho de la puĉistoj, ĉar ghi neniel apartenas al nia konstitucio, krom en la senco, ke nian konstitucion oni puĉe deklaru kontraukonstitucia.

=====

Mi deziras al ili kaj al la kampanjo plenan sukceson, ĉar tion bezonas 'kaj la lingvo, 'kaj almenaŭ granda nombro de ĝiaj uzantoj (kaj ja mi inter ili).

Sensupersigne, lau-Fundamente!
Jes, al skribado-ghojo!

Verkita en j. 1993^a
Planita por (K+E)-Seminario.- Nepublicita
Tralaborita kaj reformatigita en j. 2009^a

WordPerfect8 + PDFCreator

===== **FINO** =====

Komentaro kaj kritiko pri la...

Studo de Gonçalo Neves pri la vorto *ambau* (LODE, 2003. Nº 2 (100)).

Rimarkoj.- [i] Mi skribas per *h*-alfabeto. Mia komputilo ne sukcesas cherpi la chapelon nek la arketon el la sur-ekrana pagho de LODE; nu, mi tion ne korektas (ech ne per *h*-alfabeto), char pri tiaj fushajhoj mi certe ne kulpas. •

[ii] Mi almetas por referencaro malnovan nepublicitan artikolon mian pri la sama temo, kaj kies titolo estas *Ambau / ambau, ambi, amboy, ambaj(n)*.

K La argumentojn kaj konkludojn de chi artikolo mia mi konsideras almena principe pravaj, char ili estis traktitaj lau procedo strikte semantika kaj parola (ja diference de la artikolo de Neves, kies enhavo estas preske nur formalisma kaj vortada). •

[iii] Referencoj kun formoj kiel en **(3)**, **(S.3)** respektive montras al sekcioj de chi komentaro kaj de la almetita artikolo. •

=====

(1) Enhavo de la artikolo de Neves, kaj nombro de linioj sur mia komputil-ekrano:

Enhavo	Linioj
Chapitro 1 ^a .- Chu la vorto <i>ambau</i> estas adjektivo [adjektuvo]? [*]	35
Chapitro 2 ^a .- Historio de la vorto <i>ambau</i>	160
Chapitro 3 ^a .- Kio do estas la vorto <i>ambau</i> ?.....	21
[Adia saluto].....	2
Bibliografio konsultita.....	37
Notoj.....	6
	Sume: 261

[*] Neves ja skribas "adjektivo", sed kun signifo alia ol tiu kiun ghi havas en la ordinara parolo kaj gramatiko, kaj mi tial montras al ghi per la elpensita vorto "[adjektuvo]". (Vidu la tujsekvan **(2)**).

=====

(2) Averta.

En la tro malfrua linio 25^a de sia chapitro 1^a Neves asertas:

Ciu ~~adjektivo~~ [adjektuvo] kvalifikas substantivon, au alivorte, gi espris ideon pri kvalito au rilato, kiun la parolanto opinias apartenanta – definitive au provizore – al iu au io.

Rimarkoj.- [i] Do, en tiu chi **(2)** Neves informas nin ke por li la vorto "adjektivo" signifas tion, kiu lau la tradicia, element-lerneja gramatiko, estas "strikte kvalifika adjektivo".

Nu, por eviti eventualajn miskomprenojn che tia atenco al la ordinara signifo de tiu vorto, jen en chi paghoj mi sisteme uzos jenan notaciajhon:

La vortoj skribitaj "adjektivo" kaj "adjektiveca" ja gardas sian ordinaran signifon. (Adjektivoj povas esti kvalifikaj, determinaj au semantike mikstaj). (Vidu (S.12)).	La vortoj skribitaj "[adjektuvo]" kaj "[adjektuveca]" signifas "adjektivo lau Neves" kaj "adjektiveca lau Neves"; t.e., respektive, "adjektivo strikte kvalifika" kaj "strikte kvalifike adjektiveca".
--	--

[ii] La troa malfrueco de chi **(2)** ja venas de tio, ke dum la 24 unaj linioj de la artikolo (inklude de la chapitro-titolo, kaj en kiuj la vorto "adjektivo" estas uzata ne nur de Ne-

ves, sed anke en citajho), jen la leganto ne estas avertita de la dirita terminologia atenco, kaj tial, ghis veno al tiu punkto (kiel tio okazis al mi), li gapante kaj mirante miskomprenas au neniel komprenas la legatajhojn.

[iii] Mi cherpas el PIV: **adjektiv/o** Vortspeco, ordinare rilatanta al substantivo, kaj esprimanta ideon pri kvalito, rilato au determino rigardata kiel apartenanta al iu au io, ekzemple "bela", "homa", "ioma", "mia", ks.

Kaj el PAG §24, "*la adjektivo...* esprimas ideon pri kvalito au determino, rigardatan apartenanta al iu au io: *bela, homa, ioma, mia*."

K El tio chi ja klaras, ke Neves cherpis tiun **(2)** el PIV, sed de ghi forstrekante, tamen, la vorton "determina" (t.e., ke la adjektivojn determinajn [kiel anke la adjektivojn semantike miksajn] li ne konsideras adjektivoj, sed [probable] nur pronomoj). (Sub tia konsidero, jen, ekzemple, la vortoj *tiu* kaj *ambau* ne nur estus pronomoj en "Tiu ridas", "Ambau ridas", sed anke en "Tiu knabino ridas", "Ambau knabinoj ridas".

(Por la tradicia, element-lerneja gramatiko, la vortoj *tiu* kaj *ambau* chiukaze estas, lau vidpunkto de semantiko, adjektivoj; krome, en la du lastaj jhusaj propozicioj ili ludas propran adjektivan rolon, char akompanaj al substantiva kerno *knabino(j)*; plu krome, en la du unaj jhusaj propozicioj ili ludas pronoman rolon char ili ne akompanas substantivan kernon, tiel ke *tiu* chi estas iel subkomprenata. Vidu **(S.13.1)**).•

=====

Rimarko.- Post la jhusa enkonduka averto, jen mi komencas mian komenton kaj kritikon ghuste lau la malordo reganta en la artikolo de Neves.•

=====

(3) Pri la antaularola parto de la 1^a chapitro *Cu la vorto ambau estas [adjektuvo]?*

(3.1) Neves diras en la una alineo de chi chapitro:

"J.C. skribis i.a.: "la adjektivo ambau ne finigas per la fundamenta a de ciuj adjektivoj." Interlinie oni do legu, ke la vorto ambau (kvankam fundamenta kaj zamenhofa) estas erara, kaj anstataŭ gi estus uzinda la formo ambaj, a-finaja kiel "ciuj adjektivoj". La saman opinion (eble vortumitan iom alie) oni renkontas iam-tiam en artikoloj tra nia gazetaro".

Miaj komentoj:

(3.2) Malgrau sia polemiketa tono, chi antaularolo havas nenian rilaton kun la enhavo propra de la artikolo de Neves, kaj nur informas nin pri iuj aferoj forse motivaj por lia decido verki la artikolon.

Tial, ni povus tute bone preteratenti chi tiun alineon. Tamen, mi ghin komentos char en ghi vidighas pluraj eroj kiujn mi taksas iom malicaj.

(3.3) En la titolo de chi chapitro Neves ja uzas la terminon "adjektivo", kvankam kun la signifo [adjektuvo]. (Vidu **(2.i)**).

Aliflanke, en la alineo trifoje aperas inter citiloj la vorto "adjektivo" atribuita al J.C. Char Neves ne informas pri la signifo kiun tiu vorto havas por J.C., jen mi ghin lasas senshangha. (Vidu tuj).

(3.4) Lau mia kompreno, en la esprimo "... la fundamenta a de chiuj adjektivoj" jen J.C. parolas lau la sama senco kiel FG.3, "La adjektivo finighas per -a", t.e., en rilato al kvalifikaj adjektivoj, ja kun subkompreno ke ne chiu adjektivo finig-

hanta per *-a* estas kvalifika (kiel *multa, pluraj, tia, mia, kia*), kiel anke ke ekzistas adjektivoj ne-kvalifikaj malhavantaj tiun finajhon (kiel *tiu, ties, kies...*).

(3.5) En plena konsento kun J.C., mi asertas ke la vorto *ambau* evidente estas per si mem adjektivo. Kaj en neevitebla konsento kun li mi asertas ke tiu vorto malhavas *a*-finajhon.

Rimarko.- (S.10) proponas jenan tabelon pri la gramatika kaj semantika priskribo de la vorto *ambau* :

ambau = **la du samparaj** (sam-paraj, el un sama paro)
la+du+samparaj (adjektivo de kompleksa, miksa semantiko).

Nevaria adjektivo, difina+(nombre determina)+(duale kvalifika), kiu ja povas funkcii pronome. [Do, ne temas pri pronomo kiel, shajne, pensis Z].

El tio sin trudas la konkludo, ke tian semantikon ghuste eksplicite montras la formo *amb'(a')(n)* (kiu estas adjektivo plurala anke morfeme, kaj varia lau la deklinaciaj kazoj). [Ja analoge al la iel parenca vorto *plur'(a')(n)*].

Kaj el ghi oni povus derivi, almena principe, vortojn *amb'e, amb'o, amb'a-*, ktp.

Tiu formo *ambaj(n)* lauas la preskribojn de alineo FE.A8 de nia konstitucio por ke ghi eventuale povus esti oficiale akceptita por libervola paralela uzado apud la principa kaj daure valida formo *ambau / ambau*.

(3.6) *Interlinie oni do legu, ke*

Tio chi estas malicajho de Neves: J.C. simple eldiras aserton kiu por li estas nura konstato de faktoj, tial, kun nenia eksplicita au interlinie implicita peto, propono au sugesto por veni al difinita ago.

(3.7) ... *ke la vorto ambau estas erara.*

Per tio chi Neves nur pligrandigas sian malicajhon, char ne nur temas pri tio, ke li efektive maltimas "legi interlinie", sed ech audacas interlinie meti mem la legendajhon/ legotajhon kiun li volas tie renkonti.

Krome: La enkrampajho "kvankam fundamenta kaj zamenhofa" fetoretas je eklezia anatemigemo.

(3.8) *Anstatau ambau estus uzinda la formo ambaj, a-finajha "kiel ciuj adjektivoj".*

Neves insistas nur pligrandigi sian malicajhon, char li ech nun audacas atribui al J.C. tiun opinion.

Rimarko.- Mi ne scias, kaj tie chi ne gravas, 'chu J.C. havas au ne havas tiun opinion; tie chi gravas nur la fakto, ke manke de eksplicita eldiro de J.C. mem pri la afero, au cito pri tia eldiro, jen estas senrajte tion atribui al li. •

(3.9) *La saman opinion (eble vortumitan iom alie) oni renkontas iam-tiam en artikoloj tra nia gazetaro.*

Nu, mi tre ghojas sciighi pri tio, kaj ech pli ghojus sciighi pri tiaj artikoloj, char jen mi jam de tre longe havas tian saman opinion, kaj senhene uzas ambajn paralelajn formojn, kaj jam antau longe mi ech verkis artikolon pri tiu afero.

=====

Ni venas nun al la **1^a chapitro propra**, post la jhusa antaularolo.

=====

(4) Neves starigas **tezon** kiu konsistigas la kernon de lia artikolo, kaj kiun li provos pravi prava; krome, kaj probable ne rimarkante mem la eblon, li provizas anke ekzemplan frazon, taugan por testi lian tezon:

(4.1) Una parto de la tezo (en la 7^a linio de la una chapitro):

Mi tute ne konsentas. Lau mi la vorto ambau neniel estas [adjektuva] au ec [adjektuveca], kaj tial gi neniel devus alpreni la a-finajon.

(4.2) Dua parto de la tezo (en la treege fora linio 12^a de chapitro 3^a):

"Gi [la vorto ambau] estas propre pronomo, au se specifi kaj harfendi, gi estas numeralo pronomo, signifanta: ciuj du jus menciitaj."

(4.3) Li finas sian artikolon per adia saluto:

*Ambaumane subskribas, **Gonçalo Neves**.*

(Kiel ni vidos en (4.5.d.5), chi propozicio taugas por testi la tezon; krome, ghi estas la sole tauga en la tuta artikolo, kaj tial oportunas ghin jam meti tie chi)..

Rimarkoj.- [i] Lau mia kompreno, la ghusta vortigo de (4.1) lau la penso de Neves estas "kaj tial ghi neniel **povus** alpreni la a-finajhon", au, alternative, "kaj tial ghi **devus neniel** alpreni la a-finajhon". Sed ni lasu tion. •

[ii] La treega foreco de (4.2) ja klaras per si mem: Neves une diras, en (4.1), 'kio lau li **ne** estas la vorto *ambau*, kaj nur post 182 pliaj linioj li degnas informi nin, en (4.2), 'kio lau li **jes** estas tiu vorto *ambau*. •

[iii] Kiel ni konstatos en la sekvajho, jen en tiu saluto temas pri la sola okazo en kiu Neves uzas la vorton *ambau* (= li parolas per tiu vorto), char en chiuj ceteraj okazoj li nur citas ghin (= li parolas pri tiu vorto).

Pro la esceptezoj de tia parola uzo, krome nur en la adia saluto (propre, do, jam ekster la artikolo), mi opinias ke Neves ech ne pensis la saluton parto de sia artikolo, sed nura adia ghentilajho kiun li trovis sprita. Kaj ja, des malpli li pensis, ke ghi taugus por testi lian tezon, ech ke ghi estus la sola artikolero vere tauga por tia celo.

(Mia opinio estas ke, tre probable, li tian saluton metis pro preteratento, char ja esenca struktura trajto de la tuta artikolo estas la nura citado pri la vorto *ambau*, ja nenika-ze parolo per ghi). •

Miaj komentoj:

(4.4) Ni ripetu la unan chelon de tabelo (3.5.Rim) pri priskribo semantika kaj gramatika de la vorto *ambau*:

ambau = la du samparaj (sam-paraj, el un sama paro)

la+du+samparaj (Adjektivo de kompleksa, miksa semantiko).

Nevaria adjektivo, difina+(nombre determina)+(duale kvalifika), kiu ja povas funkcii pronome. [Do, ne temas pri pronomo kiel, shajne, pensis Z].

(4.5) Ni analizu la kvar erojn de la tezo de Neves pere de la jhusa chelo:

(a) *Ambau ne estas [adjektuvo] = Ghi ne estas strikte kvalifika adjektivo.*

Evidente, Neves absolute pravas pri chi (a), char *ambau* estas adjektivo de miksa semantiko, ne nur de kvalifika semantiko.

(b) *ghi neniel estas [adjektuveca] (= ghi havas nenian nuancon de kvalifika adjektivo).*

Diference, li absolute malpravas pri **(b)** char, efektive, esenca parto de la semantiko de *ambau* estas la nuanco "duale kvalifika adjektivo".

(c) *ghi ne devus alpreni a-finajhon.*

Li nur infaneske kapricas pri **(c)**, char kvankam *ambau* bone vivas sen a-finajho, ja nenio povus oponi al tio, ech male, ke ghi ricevu tiun finajhon, char la sola konforma al sia semantiko.

(d) *Gi estas propre pronomo, au se specifi kaj harfendi, gi estas numeralala pronomo, signifanta:* ciuj du jus menciitaj.

Li plurkauze absolute malpravas pri **(d)**, nome:

(d.1) Malgrava afero: La vorto *ambau* ne estas pronomo, sed adjektivo. (Tute alia afero ja estas, ke ghi, kiel cetere chiu adjektivoj, povas ludi pronoman rolon en la parolo).

(d.2) Li devus klarigi la signifon de la adverbo "propre" en lia esprimo "propre pronomo".

(d.3) Ja estas ech shoke, ke che studo kiun li volus lingvika, jen li diras "se specifi kaj harfendi". (!?).

(d.4) Ja estas ech pli forte shoke, ke li, tamen, ne sukcesis specifi kaj harfendi, char rilate la sintagmon *chiuj du jhus menciitaj...*

- Estas sence kaj absurde aserti ke la vorto *ambau* enfermas en sia semantiko la eron *jhus menciitaj*. (Tia fushego postulas apartan traktadon, vidu **(d.5)**).
- Nur la vorto "du" estas numeralala (fakte, pli precize, nombra).
- La vorto "chiuj" estas kolektiviga adjektivo (tiel ke la vortoduopo "chiuj du" kombinas ambajn signifojn, kaj ghi krome akiras nuancon pri difineco).
- Fine kaj plej grave, tiu *jhus menciitaj* estas afero absolute fremda al numeraloj (kvankam ja ne fremda al gramatika nombro "pluralo", kiu estas tute alia afero): ĝi ja estas **adjektive kvalifika** sintagmo!

K Ech kadre de tiu arbitra au laudezira aserto **(4.2)** de Neves, ni venas al la rezulto ke *ambau* ne estas pronomo, ke ghi ja ne estas strikte kvalifika adjektivo (= ne estas [adjektuvo]), sed ke ghi enfermas signifon kvalifike adjektivan (= ghi estas [adjektuveca] vorto). (T.e., ni revenas al lia absoluta malpravo lau la supra **(b)**).

(d.5) En chi tabelo temas pri la testo anoncita en **(d.4)**:

(α) Ambaumane subskribas, G.N.

(β) Per ambau manoj subskribas, G.N.

(γ) Neves subskribas per chiuj du manoj jhus menciitaj.

En **(α)** temas pri la adia saluto de Neves lau **(4.3)**.

Sendepende de la fakta signifo de tiu **(α)**, kaj atentante nur la formalajn legojn de la E-gramatiko, jen en **(β)** temas pri alternativo perfekte sinonima al **(α)**, krome kun avantaĝo ke ghi pli klaras por analizado char la originala adverbo estas dividita al tri apartaj, memstaraj vortoj.

En **(γ)** temas pri tiu sama **(β)**, kun nura shangho, ke *ambau* anstatighas per *chiuj du jhus menciitaj* lau la signifo kiun Neves volus atribui al ghi en **(d)**.

Nu, en **(γ)** donighas jena kruda kontraudiro:

- Unafanke, ja veras, ke Neves mencias siajn manojn en sia saluto.
- Duaflanke, ja neniel veras ke, aldone al tio, jen Neves mem au iu ajn aliu, jhus au iam ajn antaue, jam menciis tiujn manojn.

K Sekve, la fina parto **(4.5.d)** de la aserto Neves esta nura, pura kaj dura sensenca absurdajho. (Pri la malpli grava erareco de ghia una parto jam temis en **(d.1)**).

(Pri la vera signifo de *ambau* vidu **(3.5.Rim)**. Pri la eventuala rolo eksplicita au implicita de la esprimo "chiuj du jhus menciitaj" kaj similaj, vidu **(8.9.b)**).

Rimarko.- Lau teoria vidpunkto eblas la inversa disparata interpreto, nome: Ke tiu fina parto de **(4.2)** estus prava, sed ke Neves ne mastrus la normon kiun li sukcesis konstrui, tiel ke, finfine, Neves ne kompetentus paroli (char tiun saluton li fakte eldiris, serioze, nen ne-sherce).•

=====

(5) Neves ekmalvolvas sian provon pravi prava sian tezon:

(5.1) En linio 8^a de 1^a chapitro:

Por komprenigi tion, mi trarigardos la komunajn trajtojn de "ciuj [adjektuvoj]" kaj esploros, cu ilin lauas la vorto ambau.

"Komprenigi tion" rilatas al la una parto de lia tezo, vidu **(4.1)**. La duan parton de la tezo li prezentas **(4.2)** aparte fora, do kvaze sendependa de la nuna komprenigo.

Lau mia kompreno, la citiloj en "chiuj [adjektuvoj]" superfluas, char nun Neves citas neniun, sed parolas li mem. Kiel ajn estu, en la sekvajho ja klaras ke temas pri "[adjektuvoj]", ne pri "adjektivoj".

(5.2) En linio 10^a de chapitro 1^a:

Se mi bone kalkulas kaj rezonas, la [adjektuvoj] en Esperanto havas almenau jenajn sep komunajn trajtojn:

-- Nu, jen du rimarkoj eventuale utilaj por pli leghera kompreno la sekvajhon:

(a) Neniu el tiuj sep trajtoj estas semantika. Esence, ili chiuj estas nur-formalaj, kvankam en du el ili aperas tushetoj al alispecaj aferoj. (Vidu **(10)**/**(11)** kaj **(12)**).

(b) Lau la eldiro **(4.1)** de Neves, la kerno de lia celo estas provi pravi ke la vorto *ambau* estas nek [adjektuva] nek [adjektuveca].

Tamen, ni triviale konstatos, ke li fakte provas pravi nur, ke ghi ne estas [adjektuva] (ja trivialajho pri kiu ni chiuj ni jam apriorie konsentas, vidu **(3.5.Rim)**), kaj ech pri tio li apene sukcesas, des malpli li sukcesas plene (kaj, ja, kompreneble, ech ne povante ekflari iam minimuman arometon de la semantiko de *ambau*).

Rimarkoj.- [i] Ja estas nur gapige, ke por veni al tia perfekte malgrava, senintereza fusha rezulto, li rompis al si la kapon por konstrui la monstran nur-formalan, sen-semantikan malordajhon kiu konsistigas lian artikolon... kaj sukcesis rompi anke mian propran kapon che legado ghin kaj che la klopodado ghin dechifri.

(Fakte, plurfoje venis en mian kapon la penso, ke Neves ne celis konstrui seriozan artikolon, sed nur dupigi siajn legantojn. Nu, se tio efektive estis lia plano, mi ja konfesu, ke almena rilate min li plene sukcesis).•

[ii] Ja estas surprize ke Neves, mem beletristo, tamen muntis chi artikolon konsistantan chefe el nur-formalisma vortado kaj nen el semantika parolo.•

=====

(6) Pri la kontrasto *ambau / la ambau*.

(6.1) En linio 12^a de la 1^a chapitro:

a) *Ciu [adjektuvo] uzeblas kun la artikolo, kaj singulare kaj plurale, se la kunteksto nur tion allasas: la bela knabino, la belaj knabinoj. La vorto ambau neniam uzeblas kun la artikolo, kia ajn estas la kunteksto: ambau knabinoj*¹.

(6.2) La jhusa superindico " 1 " sendas al la una el la du finaj Notoj de la artikolo (do, al post 143 pliaj linioj), jene (enkrampajho lia, grasigo mia):

1. *Zamenhof skribis* (Oficiala Gazeto, IV, 1911, pg. 221): «Kvankam mi ofte uzis la formon "la ambau" [i.a. en la traduko el Dickens: La batalo de l' vivo, 1891], tamen mi opinias nun, ke **pli logike** estas uzi la vorton "ambau" sen artikolo». *Kaj verdire tiu erara uzo kunartikola neniam enradikigis. (ZAMENHOF 1936, pg. 72). [Ja temas pri LR121 lau la eldono de j. 1962].*

(6.3) En punkto k) de chapitro 3^a (*Kio do estas la vorto ambau?*) Neves prezentas jenan citajhon (substreko mia):

Rim. Uzo de la artikolo apud ambau estas senutila k malkonsilinda." (Grosjean-Maupin, j. 1933).

(6.4) En punkto p) de chapitro 3^a Neves citas el la PMEG de Wennergren (grasigo mia): *"Zamenhof foje uzis ambau anstataŭ du (sen la signifo de ciuj): Ciuj sidigas cirkau la ambau Pjotroj Ivanovicoj. (Rz.13) Gi (la rivero) inundis siajn ambau bordojn. (Kr1.12) Oni vidas, ke ambau tiam povas aperi kun difinilo (la, siajn...). Zamenhof poste skribis, ke tia uzo estas malbona (Lingvaj Respondoj pg. 64). Oni do uzu ciam du en tiaj frazoj: Ciuj sidigas cirkau la du Pjotroj Ivanovicoj. Gi inundis siajn du bordojn. Oni tamen povas bone diri ekz.: Gi inundis ambau siajn bordojn.*

Miaj komentoj:

(a) En la ekzemploj de sia artikolo Neves kontrastigas nur la vortojn "ambau" kaj "bela". Nu, tio estas konstato, ke "adjektivo lau Neves" signifas, efektive, "[adjektuvoj]".

(b) Mi ne komprenas, 'kial Neves diras "neuzeblas" anstat "ne uzatas" au "apene uzatas" au io tia.

Efektive, tiom longe kiom li malvolvos nur formale, kaj ne klarigos semantike 'kial ne eblas ghin uzi, jen li povas nur statistike, empirie konstati nur pri uzateco au ne-uzateco, ja neniel pri ebleco au neebleco.

Tia kruda, nefundamentita eldiro ne estas allasebla en teksto sinnomanta "studo".

(c) En (S.3) temas pri la supozo, ke tiu Z "pli logike" signifas ke "la" estas nura redundo al la una ero de la kompleksa, miksa semantiko de "ambau", kiel anke al evitado la hiaton en "la ambau" (kune kun ne-deziro pri elizio "l' ambau").

Tie temas anke pri la jhusa citajho de Grosjean-Maupin, kiu ja konfirmas la diritan supozon. (Pri tiu citajho mi sciighis ghuste nur legante la artikolon de Neves).

K Do, simple ne veras ke tiu trajto pri "la", mem komuna al chiuj [adjektuvoj], ne estus komuna anke al *ambau*. Sed, ech se la artikolo vere ne uzeblas kun *am-*

bau, jen l'o maksimume provebla estus, ke *ambau* ne estas [adjektuvo] (pri kio ni chiuj jam apriore konsentas), sed de tio oni neniel povus ricevi pruvon ke ghi ne estas [adjektuveca] (kia ghi efektive estas).

Kaj ĉar Neves decidis nenion esplori pri tiu dua afero (forse eĉ ne venas al la penso ke tio necesas, kvankam li tion metas anke en la unan parton de lia tezo), jen ni havas aferon al vakua, nenidira laudezira aserto. (Se li decidus esplori pri tio, ja tre probablus, ke li trafus la solvon al sia problemo).

(d) Tre konsternas min, ke li audacas meti sian laudeziran aserton "Kaj verdire... enradikighis" inter la Z teksto kaj la cito pri la teksto-fonto. (Jes, ja, li tion enmetas sen citiloj. Sed la pruvo ke li efektive nenium volis trompi au dupigi ja konsistus simple en tio, ke sian laudeziran aserton li metus tute aparta de la Z teksto).

(e) ¿'Kion signifas tiu "verdire"?

(f) Analoge al tio dirita en **(a)**, mi ne komprenas, 'kial Neves arogas al si la rajton aserti ke la esprimo "la ambau" estas erara: Li povas eventuale empirie statistike konstati neuzatecon au apenan uzatecon de tiu esprimo, sed la kvalifiko "erara" estus allasebla nur post sukcesa pruvo semantika pri erareco.

Krome, estas eĉ ŝoke, ke tiun sian laudeziran aserton li metas en la sama alineo en kiu Z simple diras ke la nuda "ambau" estas pli logika. Kaj ree ŝoke, ke en sia artikolo li citas la aserton de Grosjean-Maupin ke "la" apud "ambau" estas, simple, senutila, kaj tial malkosilinda (t.e., ke temas simple pri afero de stilo, neniel pri eraro).

Sed kio pleje ighas nekomprenebla al mi en rilato al tio ĉi estas ke, ŝajne, Neves ne sentis eĉ minimume la bezonon esplori pri la kaŭzoj pro kiuj "la ambau" estas malpli logika ol "ambau", au 'kial estas senutila la artikolo en tiu esprimo.

(g) Fine, ja estas perfekte absolute gapige, ke li audacas diri (pardonu, 'verdiri') ke la uzo de "la ambau" neniam enradikighis, ĉar li eĉ citas la ateston de Z mem, ke ĉe li tiu "la ambau" eĉ tre forte, absolute forte enradikighis, kaj ke nur per konscia agado ĝin li poste elradikigis.

(h) Ni venu nun al la ĉerpajho el Wennergren: Evidente, en tiu ĉi teksto Wennergren miksas (krome, fushe) du tute malsamajn aferojn kvaze ili estus un sola, nome: Unu afero estas, 'ĉu oni diru "la ambau" au "ambau", kaj aliu afero estas 'ĉu oni diru "(la) ambau" au "la du".

Nu, tiu LR 121 rilatas nur al la una el tiuj du aferoj.

Kaj tiu "malbona" kiun Wennergren atribuas al Z estas mem, milde dirite, treege malbona cito pri la simpla Z aserto "pli logike estas".

Rimarko.- Cetere, ja klaras, ke gramatiko-libroj –tute speciale, se celantaj lingvoinstruadon– klopodu ĉefe kaj antaŭ ĉio pri semantiko, pri ekspliko 'kial tiu esprimo estas erara au malbona, kaj tial forgesu pri nur-formalaj, ukazaj nemotivitaj reguloj, mem nenidiraj, kaj nur rigidigantaj la parol-liberon kaj -nuancivon. (Vidu **(13.3.iv)**).•

=====

(7) Sur linio 15^a de ĉapitro 1^a:

b) Ciu [adjektuvo] uzeblas kaj singulare, kaj plurale: la bela knabino, la bela knabinoj. La vorto ambau uzeblas nur plurale: ambau knabinoj.

Mia komento:

(a) En (4.1) li diris, ke lau li, la vorto *ambau* ne estas [adjektuvo], ech ne-[adjektuveca]. Tamen, li daure celas nur provi pruvi, ke *ambau* ne estas [adjektuvo], tiel ke lia parolo pri ne-[adjektuveca] estis nura retorika pli forta aserto de lia sola dirita celo.

Nu, char li ne esploras pri chi dua afero (mem la sole grava en chi studo), jen ni ree havas aferon al vakua, nenidira konstato. (Se li decidus esplori, jen tre probablas, ke li trafus la solvon al sia problemo).

(b) En sia "klasifiko" li distingas nur inter "[adjektuvoj]" (= kvalifikaj adjektivoj) unaflanke, kaj "pronomoj" (= pronomoj + determinaj adjektivoj + adjektivoj de miksa semantiko) duaflanke. Kaj tio, nur lau mekanika formala procedo, sen ech minimuma cedo al la tento, almena iel iom pensi kaj analizi pri kaj per semantiko.

Ech probablas, ke pri la vorto-speco "adjektivoj de miksa semantiko" li ne havas person formalan nek semantikan, kiel anke ne pri dualo, tiel ke li ne povas trafi la klarigon pri semantiko kaj uzado de *ambau*. (Vidu en la fino de PAG §85, anke en (S.12) kaj (S.9.3)).

(c) Li ja bone scias pri la nombra nuanco pri pluralo de *ambau knabinoj*, do kiel en *du knabinoj*, *la du knabinoj*, *tri knabinoj*, *pluraj knabinoj*, ech *tiu knabinoj*, sed egale bone scias ke en *ambau* io speciala krome ekzistas, kaj tion li kvaze provas solvi per sia absurda, tro fora (4.2), kun sensenca arbitra almeto de tiu "chiuj du jhus menciitaj".

=====

(8) Sur linio 17^a de la 1^a chapitro:

c) *Ciu [adjektuvo] uzeblas kaj antau, kaj post la koncerna substantivo, depende de la stil-efekto: la bela knabino, la knabino bela. La vorto ambau uzeblas nur antau la koncerna substantivo: ambau knabinoj.*

Miaj komentoj:

(a) Jen pliafoje li obsedighas nur pri sia superflua nur-formala, ne-semantika provo pruvi ke *ambau* ne estas [adjektuvo], kaj daure plu shajne ech ne suspektas, ke li devus provi pruvi anke pri ne-[adjektuveco].

Jen do, ni pliafoje havas aferon al vakua, nenidira konstato. (Se li decidus esplori pri tiu vojo, jen tre probablas, ke li trafus la solvon al sia problemo).

(b) Char li obsedighas nur pri tio dirita, jen ighas al li neeble ekhavi la person, ke se li ech nur iomete pensus semantike, jen tre probablas, ke li malkovros la nuancojn kiujn li decidis ignori por sia artikolo.

=====

(9) Sur linio 20^a de la 1^a chapitro:

^c) *Ciu [adjektuvo] uzeblas kaj epitete (la bela knabino, la knabino bela) kaj predikative (la knabino estas bela). La vorto ambau uzeblas nur epitete: ambau knabinoj.*

Miaj komentoj: Ekzakte la samaj, kiel en (8): Jam apriore ni scias ke *ambau* ne estas [adjektuvo]; mankas nun esplori 'chu ghi estas [adjektuveca] vorto, sed li ne volas au ech ne konscias ke li devas tion fari. Do, ree, vakua, nenidira konstato; se li esplorus, li tre probable trafus, ktp

=====

(10) Sur linio 22^a de la 1^a chapitro:

d) *Ciu [adjektuvo] uzeblas por respondi la demandon kia?: Kia estas la knabino? — La knabino estas bela. La vorto ambau neniam uzeblas por respondi la demandon kia?*

Mia komento: Jen pliafoje klaras, ke Neves komprenas nur pri "Au strikte kvalifika adjektivo, au ne-(strikte kvalifika adjektivo)", do neniel pri "adjektiveca vorto".

Sekve, ree: Vakua, nenidira konstato. Se li esplorus, probable trafus, ktp.

=====

(11) Sur linio 25^a de chapitro 1^a:

e) *Ciu [adjektuvo] kvalifikas substantivon, au alivorte, gi esprimas ideon pri kvalito au rilato, kiun la parolanto opinias apartenanta – definitive au provizore – al iu au io. La vorto ambau neniel kvalifikas substantivon: gi nur esprimas gian nombron kaj la manieron, kiel la parolanto rigardas tiun nombron.*

Miaj komentoj:

(a) La una parto de tiu chi "traĵto" estas ripeto, gramatike vortigita, de la una parto de (10) .

Tial, mi ghin elektis jam che-komence por klarigi la enkondukon de la notaciaĵo "[adjektuvo]".

Do, ree, li okupighas nur pri [adjektuvo], ne pri [adjektuveco]. Do, ree, vakua, nenidira konstato. Do, ree, se li okupighus, probable trafus, ktp.

(b) Kaj ni provu nun kompreni la duan parton:

- *La vorto ambau **neniel** kvalifikas substantivon (grasigo mia).*

Tio chi estas nova redakto, malpli preciza, pri la esencaĵoj de la tezo de Neves (vidu (4.1) kaj (4.2)), kaj ghi do ricevu nun la saman komenton, kiel en (4.5): La kompleksa, miksa semantiko de *ambau* estas "(difina **la**) + (nombre determina adjektivo **du**) + (kvalifika adjektivo **sam-paraj**)".- Sekve, ja veras ke ghi ne estas **nur** kvalifika adjektivo, sed ne veras, ke ghi **neniel** kvalifikas substantivon.

- *gi nur esprimas gian nombron.*- Mi supozas, ke tio estas vere artifika maniero diri "du".

- *kaj la manieron, kiel la parolanto rigardas tiun nombron.*- Nu, mi ne sukcesas kompreni, 'kiel parolanto povas rigardi la nombron pri kiu temas en "ambau".

=====

(12) En la una chelo chisekva ripetighas la jama sekcio (4.2), kaj en la dekstra chelo temas pri la nova sekcio (12).- [Mi opinias ke tia reordigo provizas ordon pli taugan por rekta kaj sekve pli simpla kompreno la tuton].

<p>Ripeto de (4.2): Sur fora linio 12^a, chapitro 3^a: <i>Gi [la vorto ambau] estas propre pronomo, au se specifi kaj harfendi,...</i> <i>... gi estas numeralo pronomo, signifanta: ciuj du jus menciitaj.</i></p>	<p>(12): Sur linio 29^a de chapitro 1^a: <i>f) Ciu [adjektuvo] uzeblas en kiu ajn momento kaj kunteksto, tute egale, cu la parolanto jam menciis la koncernan substantivon au ne.</i> <i>La vorto ambau uzeblas nur ce substantivoj jam menciitaj de la parolanto: [*]</i></p>
---	--

Ekzemplo el (12):

En la ghardeno kuris du belaj knabinoj;

ambau [t.e. la du knabinoj, kiujn mi jus menciis] haltis, kiam mi alvenis.

Eblas anke:

En la ghardeno kuris du belaj knabinoj;

ambau knabinoj [t.e., tiuj du jhus menciitaj knabinoj] haltis, kiam mi eniris

[*] Chi alineon mi komprenas jene: "Char la ankore vidota, fora 12^a linio de la 3^a chapitro, preskribas ke la vorto *ambau* signifas *chiuj du jhus menciitaj*, jen la nun vidata 12^a linio de la 1^a chapitro anticipe preskribas ke tiu vorto uzeblas nur che substantivoj jam menciitaj de la parolanto".

Miaj komentoj:

(a) En (4.5.d.5) ni analizis la adian saluton "Ambaumane subskribas", kaj per semantika analizo ni konstatis ke estas strikte fushe kaj sence atribui al "ambau" la signifon "chiuj du jhus menciitaj".

(b) La klarigo pri la semantiko kaj uzado de "ambau" vidighas en (3.5.Rim), kaj ni ghin resumu tie chi:

(b.1) Ni havas jenan semantikan priskribon: *ambau* = *la+du+(sam-paraj)*.

(Rimarku ke en tio chi ekzistas nenia parolo au nuanco pri "chiuj du jhus menciitaj").

(b.2) Sam-pareco estas afero intime rilata (se ne identa) al dualeco (en la senco de gramatika nombro, apud singularo kaj pluralo).

Tiu sam-pareco au dualo donighas lau diversaj intenco-gradoj, en kio ni distingas "natura dualo" (kiel che *la ambau manoj* de Neves), "funkcia" au "laucela dualo", "gea dualo" kaj, fine, "por-okaza" au "stil-efekta dualo" (kiel che *la ambau fieraj filinoj* de EKZ, ***, au che *la ambau enghardenaj knabinoj* de la ekzemplo chi-supra).

(b.2) Nu, la dualeco de la tri unaj gradoj estas jam pree konata de la kunparolantoj kadre de ilia sciaro-pri-la-mondo, sed tio ne okazas en la kvara.

Kaj de tio venas, ke en la tri unaj kazoj ne necesas (kvankam ja senprobleme allaseblas) eksplicita kunteksta indiko pri dualeco char ghi estas rekte antausciata de la kunparolantoj, sed tia indiko estas necesa en la kvara kazo (kiel en "chiuj du jhus menciitaj"), char alikaze la informato principe komprenus nur pri duopeco, ne pri pareco.

(c) Al la jhusa, fajne distingiva rezulto, oni klare kaj facile venas per semantikaj konsideroj. Sed mi ne sukcesas imagi al mi nur-formalan, sen-semantikan procedon/procezon, per kiu oni povus veni al tiu rezulto, ech ne al la penso, ke tiaj fajne malsamaj nuancoj povus ekzisti.

=====

(13) Sur linioj 33^a-35^a de la 1^a chapitro (per kiuj tiu chi finighas):

Se la vorto ambau prezentas neniun el la supre diritaj trajtoj [adjektu vaj], se gi tial tute ne estas [adjektuvo], kio do gi estas kaj kion gi propre signifas? Eble iom nin helpos historia trarigardo.

Rimarko.- La demando "kio do ghi estas kaj kion ghi propre signifas?" (apartenanta al la 1^a chapitro) ne estos respondita de Neves ghis la fora linio 12^a de chapitro 3^a (cetere, nur fushe, kiel ni jam vidis), kvankam en chi komentoj ni jam metis ghin en (4.2) ghuste por eviti obskurajhojn kaj miskomprenojn. •

Miaj komentoj: Por igi la komentojn laueble simplaj, ni forgesu pri chiuj lamajhoj konstatitaj en la argumentado de Neves. Nu, tiukaze:

(a) Efektive, per ege komplika kaj senorda arango, li sukcesis pruvi nur, simple kaj nur, la apriore bone konatan trivialajhon, ke la vorto *ambau* ne estas [adjektuvo]; t.e., ke ghi ne estas strikte kvalifika adjektivo. Sed per tio ni ankore ne scias ekzakte pri ghia semantiko, kaj ni ne scias ekzakte, 'kio do estas tiu vorto.

(b) Diference, per tradicie elementaj, parole sukaj kaj logike plej simplaj konsideroj kaj argumentoj, kaj sen bezono forgesi pri lamajhoj, ni rekte scias multon pli: Ni ja scias pri la trivialajho, ke ghi ne estas strikte kvalifika adjektivo, sed scias anke ke ghi estas adjektivo de kompleksa miksa semantiko *la+du+(sam-paraj)*, ni scias anke 'kiam necesas kaj 'kiam ne necesas almeti kuntekstan informon por ke la alparolato ricevu informon pri sampareco.

(c) Ja estas ne nur surprize, sed tre ghene, ke jen li decidis surshuti nin per ĵ160! linioj da historio pri la vorto *ambau* antaŭ ol fine lasi nin frandi liajn sciojn pri la esto kaj pri la signifo de tiu vorto.

=====

(14) Dua chapitro. "Historio de la vorto *ambau*".

Ghi okupas 160 erudiciajn liniojn, temantajn entute pri 21 libroj.

El chio chi, por ni gravas nur (krome, tre gravas) jena citajho el la 15^a libro (substreko mia): "Rim. Uzo de la artikolo apud **ambau** estas senutila k malkonsilinda" (kiun ni jam metis en (6.3)).

Rimarko.- Aldona graveco de chi citajho estas, ke ghi prezentas modelon de honesta citajho kaj/au ekzegezo fare de lingvisto, ja en akra kontrasto kun la tre postaj miscito kaj miskomento de Wennergren kaj Neves (vidu (6.2) kaj (6.4)).•

=====

(15) Tria chapitro. Kio do estas la vorto *ambau*?

(15.1) "En 1935 Kalocsay kaj Waringhien nomas gin "nevaria pronomo" ".

[Temas pri PAG §61]

K (15.2) Mi ne komprenas 'kial Neves decidis forgesi citi el la fino de PAG §86 (grasigo mia): *Al la numeraloj iel apartenas ankaŭ la apartaj adjektivoj ambau, lasta kaj fina, kaj ech sola, unika.*

(15.3) "En 1970 Waringhien nomas gin "nevaria pronomo kaj adjektivo" ".

[Temas pri PIV].

(15.4) "En 2000 Wennergren nomas gin "difinilo", kaj metas gin en la saman kategorion kiel la artikolon, kelkajn tabelvortojn, la posedajn pronomojn kaj la vorton unu". [Temas pri PMEG].

(15.5) Nun parolas Neves mem (grasigo mia): *Mi opinias, ke la PIV-a difino de Waringhien iom komplikas la aferon, car gi unufoje prezentas la vorton ambau ne nur kiel pronomon, sed ankaŭ kiel adjektivon. Tiu klasifiko estas lau mi erara.*

Miaj komentoj:

(a) Se Neves pravus en sia aserto, ke Waringhien unufoje allasas en PIV 1970 ke *ambau* estas anke adjektivo, nu, li tion devus kompreni lau la senco, ke jen finfine Waring-

hien komprenis ke li fushis en sia antaŭa opinio pri nur-pronoma *ambau*, kaj ke li nun provas korekti sian fushon. Sed eĉ...

... Antaŭ tre longe perdighis al mi mia fotokopio de PAG 3^a eld. (j. 1957, do tre antaŭa al PIV), kaj ne povas kontroli mian preskan certecon, ke tiu 3^a eld. enhavis jam tiun saman alineon pri la "apartaj adjektivoj" kiel PAG §86 4^a eld. (Kaj eĉ ne estus surprizo por mi se tio sama okazis jam en tiu PAG 1935 kiun Neves citas).

(b) Se en tiu PAG 1935 ne aperas la alineo pri "apartaj adjektivoj", jen li devus informi nin, 'kiam tiu unufoje aperis.

(c) Ĉar li decidis forgesi pri PAG §86, jen li decidis perdi al si la okazon kriegi "Tiu klasifiko estas laŭ mi eraregega".

(d) Pri tiu sensenca "erara" kaj miaj prikomentoj vidu jam en (6.2).

(15.6) Plu Neves: *Kiel mi montris supre, da [adjektuveco] la vorto ambau havas neniom. En ĝi manifestigas absolute neniu el la sep trajtoj [adjektuvaj] supre skizitaj.*

Mia komento: Nu, da [adjektuveco] ĝi havas eĉ multon, nome, "sam-pareco".

(15.7) "Ĝi [la vorto ambau] estas propre pronomo, aŭ se specifi kaj harfendi, ĝi estas numeralo pronomo, signifanta: ĉiuj du ĵus menciitaj".

Miaj komentoj:

- ĉ'Kiu estas la diferenco inter "pronomo" kaj "propre pronomo"?
- Li ja asertas, ke *ambau* estas "propre pronomo", sed ĝuste tion li **ne** pruvis: Li nur provis prui la trivialajhon, ke *ambau* ne estas [adjektuvo], kaj pri tio eĉ nur parte sukcesis.

ĉ'Kio, pri tiu *ambau knabinoj* en liaj ekzemploj?

- Pri tiu fusha "ĉiuj du ĵus menciitaj", vidu (12.b).

(15.8) "Kaj ĉar pronomoj en Esperanto propran kaj specifan finajon ne havas (jen: *tiu, mi, ĉio*), ankaŭ tian ne bezonas la pronomo *ambau*, kiu tre bone fartas kun sia vosto diftonga".

Mia komento:

- Negrave ĉu pronomo, adjektivo, [adjektuvo], adverbo, interjekcio aŭ io ajn, ĝi daŭre apartenas al la aro da 20 vortoj kun *au*-finajho, kaj multaj el ni, kune kun Z ekde j. 1892^a ĝis almenaŭ j.1908^a, opinias ke ili ja vivas sed treege malbone fartas kun sia vosto diftonga, kaj tial arde deziras, ke, kiom eble, oni allasu alternativajn formojn kun semantike pli konvenaj finajhoj, mem paralele uzeblajn apud la tradiciaj kaj daŭre validaj formoj.

(15.9) "Se la latino kaj kelkaj latinidoj fleksias la vortojn, kiuj respondas al nia *ambau*, tio estas afero, kiu Esperanton tute ne tusas".

Mia komento: Konsentite, konsentite, ke tio Esperanton tute ne tushas. Sed ĝi povas esti tre bona instruilo al nur-formalistoj por ke ili konsciighu kaj ekkomprenu, ke semantiko treege gravas en kiu ajn lingvo, kaj ke ili tial devas trejnighadi pri semantiko en Esperanto propra antaŭ ol provi formalismumi pri ĝi.

=====

(16) Lia adia saluto: "ambaumane subskribas, **Gonçalo Neves**".

Mia komento: Vidu (4.5.d.4).

=====

(17) Bibliografio konsultita. [Temas pri 19 verkoj].

=====

(18) Notoj.- [Temas pri du notoj. La una el ili estas jam citita en (6.2); la dua ne gravas].

Verkita en j. 1997 ^a .- Nepublicita Reformatigita en j. 2009 ^a
WordPerfect8 + PDFCreator

===== **FINO** =====